

A decorative border composed of a grid of small squares in various colors (blue, green, purple, orange, yellow) surrounds the central text area.

Ilja Ilf

Evgenij Petrov

Dek du seĝoj

Hajfo

2008

Tradukis: A. Kerbel

Pri la aŭtoroj

«Bonaj homoj, alie ne eblas diri. Bonaj verkistoj: dum tre malfacila tempo oni ridetis, legante iliajn verkojn. Ĉarma fripono Ostap Bender (protagonisto de la romano) gajigis kaj daŭre gajigas milionojn da legantoj. Kaj mi, ne dorlotita per amikeco de miaj kolegoj, aldonos pri Ilja Arnoldoviĉ kaj Evgenij Petroviĉ: bonaj amikoj estis ili.»

Ilja Erenburg (Ehrenburg, Ilya). El la aŭtobiografia romano "Homoj, jaroj, vivo".

Pri la romano

Temo de la humura romano estas ekstreme simpla: Ostap Bender ("la granda kombinanto") kaj Kisa Vorobjaninov (iama nobelar-gvidanto) serĉas valoraĵojn, kaŝitajn dum la revolucio en unu el seĝoj de ties aparta domo. Samon faras ilia konkurencano, patro Fjodor.

Sed:

Kial sur stacidoma kajo de urbo Ĥarkovo (Ukrainio) oni starigis monumenton al literatura heroo patro Fjodor?

Kial dumetra bronza Ostap Bender staras en urbo Elisto, ĉefurbo de rusia respubliko Kalmukio, pririgardante ŝakan ĉevalon kiun li tenas en la mano? (Aludo: prezidento de la respubliko, Kursan Ilumjinov, estas prezidanto de Tutmonda Ŝaka Federacio FIDE.)

Kial laŭ tiu ĉi romano estas kreitaj jam sepo da filmoj? (Du usonaj, 1945 kaj 1970; du sovetiaj, 1971 kaj 1976; franca-italia, 1970; kuba, 1962; kaj germania, 2004.)

Kial?

Parto unua

Stargoroda leono

Ĉapitro 1

Bezenĉuk kaj “Nimfoj”

En distrikta urbo No estis tiel multe da frizejoj kaj entombig-entreprenoj, ke ŝajnis ke loĝantoj de la urbo naskiĝas nur por esti razitaj, tonditaj, ŝprucitaj per parfumo, kaj por senprokraste morti post tio. Sed, se diri veron, homoj en distrikta urbo No naskiĝis, estis razitaj kaj mortis sufiĉe malofte. Vivo en urbo No estis trankvilega. Printempaj vesperoj estis ravegaj, la koto brilis sub luno kiel antracito, kaj ĉiuj junuloj de la urbo estis ĝis tiom enamiĝintaj sekretariinon de loka sindikato de urbeŝtaro, ke tio malhelpis al ŝi kolekti la membro-kotizojn.

Problemoj de amo kaj morto ne maltrankviligis **na**¹ Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov, kvankam pri tiuj ĉi problemoj li, pro speco de sia ofico, okupiĝis de la naŭa matene ĝis la kvina vespere ĉiutage, kun duonhora interrompo por la matenmanĝo.

Ĉiumatene, eltrinkinte el frosta kun fibroj glaso sian porcion da varmega lakto, kiun prezentis Klavdija Ivanovna, li eliris el sia duonmalluma dometo sur vastan, plenan per mirinda printempa lumo straton je nomo de kamarado Gubernskij. Tio estis plej simpatia el stratoj kiuj renkontiĝas en distrikta urbo. Maldekstre, trans ondaj verdetaj vitroj, arĝentis ĉerkoj de entombig-entrepreno

1. **na** Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov = Ipolit-**on** Matveeviĉ-**on** Vorobjaninov-**on**. (Vidu paĝon 395.).

“Nimfo”. Dekstre, trans etaj fenestroj kun elfalinta mastiko, malserene kaj pompe kuŝis kverkaj ĉerkoj de ĉerk-majstro Bezenĉuk. Ili estis polvaj kaj enuaj. Poste “Raz-majstro Pjer kaj Konstantin” promesis al siaj klientoj na “flegado de ungoj” kaj na “*ondulansion*”² ene de via hejmo”. Iom pli malproksime lokiĝis gastejo kun frizejo kaj, post ĝi, sur granda neuzita tereno staris pajlo-kolora bovido kiu tenere lekis rustiĝintan elpendaĵon, apogitan al sole staraĉanta pordego:

ENTOMBIG-ENTREPRENO “BONVENON”

Kvankam entombig-entrepreno estis multnombraj, klientaro de ili ne estis abunda. “Bonvenon” fiaskis tri jaroj antaŭ ol Ipolit Matveeviĉ ekloĝis en urbo No, kaj majstro Bezenĉuk drinkis alkoholisme, kaj foje penis eĉ enlombardigi sian plej bonan ekspozician ĉerkon.

Homoj en urbo No mortis malofte, kaj Ipolit Matveeviĉ sciis tion pli bone ol iu ajn alia, ĉar li servis en registrad-oficejo, kie li okupiĝis pri registro de mortoj kaj geedziĝoj.

Tablo, ĉe kiu laboris Ipolit Matveeviĉ, similis malnovan tomboplaton. Ĝia maldekstra angulo estis neniigita per ratoj. Ĝiaj feblaj piedetoj tremetis sub pezo de dikaj tabak-koloraj paperujoj kun enskriboj, el kiuj oni povis elĉerpi ĉiujn informojn pri deveno de la urbanoj, kaj pri la genealogiaj arboj, elkreskintaj sur la malabunda distrikta grundo.

Vendrede, la 15-an de aprilo de jaro 1927 Ipolit Matveeviĉ vekiĝis, kiel kutime, je la sepa kaj duono, kaj tuj enigis la nazon en la malnovmodan nazumon kun ora arketo. Branĉohavajn okulvitrojn li ne uzis. Foje, decidinte ke porti nazumon ne estas higieno, Ipolit Matveeviĉ vizitis op-

2. *ondulansion*: kursivo indikas ne-esperantaĵon.

tikiston, kaj aĉetis nekadritajn okulvitrojn kun orumitaj branĉoj. La okulvitroj ekplaĉis al li de unua rigardo, sed la edzino (tio okazis nelonge antaŭ ŝia morto) trovis ke en la okulvitroj li tre similas na **Milukov** ³, do li fordonis la okulvitrojn al la kortisto. La kortisto, kvankam ne estis miopa, kutimiĝis al la okulvitroj, kaj plezure portadis ilin.

– *Bonĵur!* – elkantis Ipolit Matveeviĉ al si mem, **sob**ante⁴ la piedojn de la lito. «*Bonĵur*» signifis ke Ipolit Matveeviĉ vekiĝis en bona humoro. «*Gut morgen*», dirita ĉe la vekiĝo, signifis kutime ke la hepato malordetas, ke la kvindek du jaroj ne estas ŝerco, kaj ke vetero hodiaŭ estas humida.

Ipolit Matveeviĉ enigis la malgrasajn krurojn en la antaŭrevolucian pantalonon, per la laĉoj alligis ilin ĉe la maleoloj, kaj eniĝis en la malaltajn molajn botojn kun malvastaj kvadrataj pintoj. Post kvin minutoj sur Ipolit Matveeviĉ pavis luna veŝto, ĉirkaŭŝutita per etaj arĝentaj steloj, kaj iriza brileta jako. Forsvinginte de siaj grizaĵoj roserojn, restintajn post la lavado, Ipolit Matveeviĉ bestece movis la lipharojn, nekonvinke tuŝis per la mano la raspetan mentonon, movis la broson sur la mallonge tonditaj aluminiaj haroj kaj, ĝentile ridetante, ekmoviĝis renkonten al la bopatrino, kiu eniris la ĉambron, al Klavdija Ivanovna.

– Eppole-et, – eltondris ŝi, – hodiaŭ mi vidis malbonaŭguran sonĝon.

Vorto “sonĝo” estis prononcita per franca akĉento.

Ipolit Matveeviĉ alrigardis la bopatrinon de supre. Lia staturo estis cent-okdek-kvin-centimetra, do de tiu ĉi alteco al li estis facile kaj oportune rilati la bopatrinon iom neglekte.

3. **Milukov**: antaŭrevolucia politikisto.

4. **sob** (PIV): malsupren.

Klavdija Ivanovna daŭrigis:

– Mi vidis la mortintan Mari kun la libere falantaj haroj, kaj en ora zontuko.

Pro kanonaj voĉsonoj de Klavdija Ivanovna tremis la krudfera kerosena lampo kun globo, plumbo-grajnoj, kaj kun polvaj vitraj pendaĵetoj.

– Mi tre maltrankvilas. Timas mi ke povas okazi io.

La lastaj vortoj estis prononcitaj kun tiu forto, ke harvicaro sur kapo de Ipolit Matveeviĉ balanciĝis diversdirekten. Li sulkgigis la vizaĝon, kaj distingeble diris:

– Nenio okazos, *maman*. Ĉu vi jam pripagis la akvon?

Evidentiĝis ke ne. Ankaŭ la galoŝoj ne estis lavitaj. Ipolit Matveeviĉ ne ŝatis sian bopatrinnon. Klavdija Ivanovna estis stulta, kaj ŝia maljuna aĝo ne permesis esperi ke iam ŝi saĝiĝos. Ŝi estis ekstreme avara, kaj nur malriĉeco de Ipolit Matveeviĉ ne donis disvastiĝi al tiu ĉi ŝia pasio. Ŝia voĉo estis tiel forta kaj densa, ke enius ŝin eĉ Rikardo Leonkoro mem, pro krio de kiu, kiel estas sciata, kaŭriĝis ĉevaloj. Kaj, krom tio, kio estis plej terura, Klavdija Ivanovna vidis sonĝojn. Ŝi vidis ilin ĉiam. Ŝi sonĝis junulinojn en zontukoj, ĉevalojn, borderitajn per flava dragona pasamento, kortistojn, ludantajn harpojn, anĝelojn en noktgardistaj ŝafpeltaĵoj, kiuj promenadis nokte kun frapiloj en la manoj, kaj trikilojn, kiuj memvole saltis tra la ĉambro, produktante ĉagrenigan sonoradon. Senenhava maljunulo estis Klavdija Ivanovna. Aldone al ĉio sub ŝia nazo elkreskis lipharoj, kiuj similis razpenikon.

Ipolit Matveeviĉ, iom incitita, eliris el la domo.

Ĉe eniro al sia neprizorgita entrepreno staris ĉerka majstro Bezenĉuk, kruciginta la manojn, kaj apoginta sin al la porda fosto. Pro sistemeca fiasko de siaj komercaj iniciatoj, kaj pro longtempa uzado de alkoholaĵoj, okuloj de la

majstro estis hel-flavaj, kiel ĉe kato, kaj brulis per neestingebla flamo.

– Estimon al la kara gasto! – elkriis li rapidparole, ekvidante na Ipolit Matveeviĉ. – Bonan matenon!

Ipolit Matveeviĉ ĝentile levetis la makulitan ĉapon.

– Kiel fartas la bopatrino, permesu ekscii?

– Mr-mr-mr, – nedifine respondis Ipolit Matveeviĉ, kaj, levinte la rektajn ŝultrojn, ekmarŝis pluen.

– Nu, donu Dio sanon al ŝi, – amare diris Bezenĉuk, – tiom da malprofitoj, je kukolo!

Kaj, kruciginte la brakojn sur la brusto, li denove apogis sin al la pordo.

Ĉe pordego de enterig-entrepreno “Nimfa” oni denove haltetis na Ipolit Matveeviĉ.

Mastroj de “Nimfo” estis triopaj. Ili akorde salutklinis sin antaŭ Ipolit Matveeviĉ, kaj ĥore demandis pri sanstato de la bopatrino.

– Sana, sana, – respondis Ipolit Matveeviĉ, – kio povas okazi al ŝi! Hodiaŭ oran junulinon ŝi vidis, liberharan. Tio venis sonĝe al ŝi.

La tri “nimfoj” interrigardis, kaj laŭte suspiris.

Ĉiuj ĉi konversacioj detenis na Ipolit Matveeviĉ sur ties vojo, kaj li, kontraŭ la kutimo, venis en la oficejon kiam horloĝo, pendanta sub slogano «Plenumis sian aferon – foriru», montris la naŭan kaj kvin minutojn.

Pro la alta staturo kaj, precipe, pro la lipharoj, oni moknomis na Ipolit Matveeviĉ “Macisto”, kvankam ĉe vera Macisto tute forestis lipharoj.

Elpreninte el la tabla kesto la bluan feltan kuseneton, Ipolit Matveeviĉ metis ĝin sur la seĝon, donis al la lipharoj ĝustan direkton (paralele al linio de la tablo), kaj eksidis sur la kuseneton, iom altiĝante super siaj tri kunlaborantoj.

Ipolit Matveeviĉ ne timis hemoroidon, li timis difekti sian pantalonon, tial li uzis la bluan felton.

Ĉiujn ĉi manipulojn de la sovetia oficisto singene observis paro da junaj homoj: viro kaj fraŭlino. La viro en drapa vatigita jako estis tute premita per la oficeja medio, perodoro de la alizarina inko, per la horloĝo, kiu spiris ofte kaj malfacile, kaj precipe per severa slogano “Plenumis sian aferon – foriru». Kvankam viro en la jako ankoraŭ eĉ ne komencis sian aferon, li jam sentis deziron foriri. Al li ŝajnis ke afero, pro kiu li venis, estas ĝis tiom sensignifa, ke estas honte maltrankviligi pro ĝi tiun ĉi imponan grizharan civitanon, kia estis Ipolit Matveeviĉ. Ankaŭ Ipolit Matveeviĉ komprenis ke afero de la veninto estas malgrava, ke ĝi povas atendi; tial, malferminte la paperujon numero du, kaj movetinte la vangon, li enprofundiĝis en la paperojn. La fraŭlino en longa jaketo, borderita per brila nigra rubando, interflustris kun la viro kaj, varmiĝante pro la ĝeno, komencis malrapide proksimiĝi al Ipolit Matveeviĉ.

– Kamarado, – diris ŝi, – kie ĉi tie...

La viro en la jako ĝoje enspiris kaj, neatendite por si mem, elkriis:

– Kuniĝi!

Ipolit Matveeviĉ atente alrigardis la balustradeton, post kiu staris la paro.

– Ĉu naskiĝo? Ĉu morto?

– Kuniĝi, – ripetis viro en la jako, kaj konfuzo ekrigardis ĉirkaŭen.

La fraŭlino rideksplodetis en la manon. La afero progresis. Ipolit Matveeviĉ kun lerteco de iluziisto komencis labori. Per maljunulina skribmaniero li enskribis nomojn de la novgeedzoj en la dikajn librojn, severe esplordemandis la atestantojn, por venigi kiujn la fianĉino kuris en la kor-

ton, longe kaj tenere spiris sur la kvadratajn stampilojn kaj, duonstare, premis ilin al la eluzitaj legitimiloj. Akceptinte de la novgeedzoj du rublojn, kaj doninte la kvitancon, Ipolit Matveeviĉ diris, ironie ridetante: «Por efektivigo de la sakramento», kaj leviĝis je tuta sia belega staturo, eliginte, kiel kutime, la bruston (iam li portadis korseton). Dikaj flavaj radioj de suno kuŝis sur liaj ŝultroj kiel epoletoj. Aspekto lia estis iom ridinda, sed eksterordinare solena. Dukonkavaj lensoj de la nazumo elradiis blankan projekciilan lumon. La novgeedzoj staris kiel ŝafidoj.

– Junaj homoj, – deklaris Ipolit Matveeviĉ bombaste, – permesu gratuli vin, kiel oni diradis antaŭe, pri la laŭleĝa geedziĝo. Estas tre, tre-e agrable vidi tiajn junajn homojn, estiel vi, kiuj, intertenante la manojn, iras atingi eternajn idealojn. Tre, tre-e agrable!

Dirinte tion, Ipolit Matveeviĉ premis manojn de la novgeedzoj, eksidis kaj, tre kontenta pri si, daŭrigis legadon de paperoj el paperujo numero du.

Oficistoj ĉe la najbaraj tabloj elgruntis en la inkujojn.

Komenciĝis trankvila fluo de la oficeja tago. Neniu maltrankviligis la registrad-tablon de mortoj kaj geedziĝoj. Tra la fenestro estis videble kiel civitanoj, kuntiriĝante pro la printempa malvarmeto, distiriĝis al siaj domoj. Ĝuste tagmeze en kooperativo “Plugilo kaj martelego” ekkriis koko. Neniu miris pri tio. Poste ekaŭdiĝis metala kvakado kaj kriĉo de motoro. El strato je nomo de kamarado Gubernskij elruliĝis nubo da densa violkolora fumo. La kriĉo plifortiĝis. El post la fumo aperis konturoj de distrikt-estrara aŭto “Ŝtat. num. 1” kun et-eta radiatoro kaj kun grandampleksa karoserio. La aŭto, baraktante en la koto, traveturis Staropanan placon kaj, balanciĝante, malaperis en la venena fumo. La oficistoj ankoraŭ longe staris ĉe la fenestro,

komentante la eventon, kaj ligante ĝin kun ebla redukto de la personaro. Post iom da tempo sur lignaj trotuaroj singarde preteriris majstro Bezenĉuk. Li tuttage vagadis en la urbo, pridemandante ĉu eble mortis iu.

La oficeja tago proksimiĝis al fino. Sur najbara flavet-blanka sonorilturo tutforte ekfrapis sonoriloj. Tremis la vitroj. De la sonorilturo deŝutiĝis monedoj; ili mitingetis super la placo, kaj forimpetis. La vespera ĉielo glaciigis super la malpleniĝinta placo.

Al Ipolit Matveeviĉ venis jam tempo foriri. Ĉio kio destinis ĉi-tage naskiĝi, jam naskiĝis, kaj estis registrita en dikajn librojn. Ĉiuj dezirantoj geedziĝi estis jam geedzigitaj, kaj ankaŭ registritaj en la dikajn librojn. Mankis nur, bankrotiĝe al ĉerkistoj, iu ajn morta okazo. Ipolit Matveeviĉ aranĝis la paperujojn, metis en la keston la feltan kuseneton, pufigis per la kombilo la lipharojn kaj, revante pri flamspiranta supo, intencis jam iri for, kiam pordo de la oficejo vaste malfermiĝis, kaj sur ĝia sojlo aperis ĉerka majstro Bezenĉuk.

– Saluton al la kara gasto, – ekridetis Ipolit Matveeviĉ.
– Kion vi diros?

Kvankam sovaĝa vizaĝaĉo de la majstro brilegis en la veninta krepusko, diri li sukcesis nenion.

– Nu? – demandis Ipolit Matveeviĉ pli severe.

– “Nimfa”, je kukolo ĝin, ĉu ĝi donas varon? – neklare prononcis la ĉerka majstro. – Ĉu ĝi kapablas kontentigi la aĉetanton? Ĉerko, ĝi nur da lignaĵo postulas tiom...

– Kio? – demandis Ipolit Matveeviĉ.

– Nu jen “Nimfa”... Ili tri-familie de nur unu vendadeto vivas. Ĉe ili materialo jam ne estas tia, kaj garnado malpli bonas, kaj kvasto ilia, je kukolo, estas maldensa. Sed mi

estas firmao malnova. Fondita en mil-naŭcent-sepa jaro. Ĉe mi ĉiu ĉerko – kukumo, selektita, por ŝatantoj...

– Ja kio vi, ĉu frenezigiĝis? – milde demandis Ipolit Matveeviĉ, kaj ekmoviĝis al la eliro. – Stultiĝos vi inter viaj ĉerkoj.

Bezenĉuk kompleze ŝiris la pordon, lasis na Ipolit Matveeviĉ iri antaŭen, kaj ekis postiri lin, tremante kvazaŭ de senpacienco.

– Kiam “Bonvenon” ankoraŭ funkciis, tiam jes! Kontraŭ ilia **brokaĵo**⁵ neniuj firmao, je kukolo, povis kontraŭstari, eĉ en urbo Tverj mem. Sed nun, mi diru rekte, pli bonan varon ol mia vi ne trovos. Eĉ ne serĉu.

Ipolit Matveeviĉ kolere turniĝis, sekundon rigardis na Bezenĉuk, kaj ekpaŝis iom pli rapide. Kvankam en la oficejo okazis hodiaŭ neniuj malagrablaĵoj, li eksentis sin sufiĉe aĉe.

Tri mastroj de “Nimfa” staris apud sia entrepreno en samaj pozoj en kiuj Ipolit Matveeviĉ lasis ilin matene. Ŝajnis ke de tiam ili diris unu al la alia eĉ ne unu vorton, sed okulfrapa ŝanĝo en iliaj vizaĝoj, mistera kontentiĝo, mallume flagranta en iliaj okuloj, montris ke al ili estas sciata io multsignifa.

Je vido de siaj komercaj malamikoj Bezenĉuk furioze svingis la manon, haltis, kaj ekflustris post Vorobjaninov:

– Mi cedos kontraŭ tridek du rubloj.

Ipolit Matveeviĉ sulkigis la vizaĝon, kaj plirapidigis la paŝojn.

– Eblas kredite, – aldonis Bezenĉuk.

5. **brokaĵo**: ŝtofo kun oraj kaj arĝentaj fadenoj (PIV).

Sed triopo da mastroj de “Nimfa” diris nenion. Ili silente ekimpetis post Vorobjaninov, senĉese demetante la kaskedojn, kaj ĝentile kliniĝante.

Ege kolerigita per la stultaj tedoj de la ĉerkistoj Ipolit Matveeviĉ pli rapide ol kutime surkuris la peroneton, incite degratis la koton per la ŝtupo kaj, sentante fortegajn atakojn de apetito, enpaŝis la enir-ĉambreton. Renkonte al li, el la ĉambro, eliris eliganta varmegon patro Fjodor, pastro el preĝejo je nomo de Frol kaj Lavr. Subtenante per la dekstra mano sian sutanon, kaj ne atentante na Ipolit Matveeviĉ, patro Fjodor preterimpetis al la eliro.

Tiam Ipolit Matveeviĉ rimarkis superfluan purecon, novan, pikantan la okulojn malordon en dispozicio de la nemultnombra meblaro, kaj eksentis tikladon en la nazo, kiun okazigis forta kuracilaodoro. En la unua ĉambro na Ipolit Matveeviĉ renkontis najbarino, agronom-edzino Kuznecova. Ŝi ekflustris kaj eksvingadis la manojn:

– Al ŝi estas pli malbone, ŝi ĵus pentokonfesis. Ne frapu per la botoj.

– Mi ne frapas, – humile respondis Ipolit Matveeviĉ. – Sed kio okazis?

SinJORINO Kuznecova kunpremis la lipojn, kaj montris per la mano pordon de la dua ĉambro:

– Fortega koratako.

Kaj, ripetante sendube malproprajn vortojn, kiuj plaĉis al ŝi per sia multsignifo, aldonis:

– Ne ekskluzivas ebleco de morta okazo. Hodiaŭ mi tutan tagon estas sur la piedoj. Venas mi matene por peti viandmuelilon, rigardas: la pordo estas malfermita, en la kuirejo – neniue, en tiu ĉi ĉambro ankaŭ; nu, pensas mi, Klavdija Ivanovna foriris aĉeti farunon por paskaj kukoj. Ŝi

intencis hieraŭ. Faruno nun, vi ja konas tion, se ne aĉeti ĝin antaŭe...

SinJORino Kuznecova ankoraŭ longe rakontus pri faruno, pri prez-alteco, kaj pri tio ke ŝi trovis na KlavdiJa Ivanovna kuŝanta ĉe la kahela forno en tute morta stato, sed ĝemo, aŭdiĝinta el la najbara ĉambro, dolore trafis orelojn de Ipolit Matveeviĉ. Li rapide krucsignis sin per la iom rigidiĝinta mano, kaj eniris ĉambron de la bopatrino.

Ĉapitro 2

Morto de madam Petuĥova

KlavdiJa Ivanovna kuŝis surdorse, ŝovinte unu manon sub la kapon. Sur ŝia kapo estis kufo de malhel-abrikota koloro, kiu estis moda en tiu jaro kiam sinJORinoJ vestis na “ĉantikler”, kaj oni nur komencis danci argentinan dancon “tango”.

Vizaĝo de KlavdiJa Ivanovna estis solena, sed esprimis tute nenion. La okuloj rigardis en la plafonon.

– KlavdiJa Ivanovna! – vokis Vorobjaninov.

La bopatrino rapide movis la lipojn, sed anstataŭ kutimaj al orelo de Ipolit Matveeviĉ sonoj li ekaŭdis ĝemon, mallaŭtan, altan, kaj ĝis tiom kompatigan, ke lia koro ek-tremetis. El ŝia okulo neatendite rapide elruliĝis larmo kaj, kvazaŭ hidrargo, glitetis sur la vizaĝo.

– KlavdiJa Ivanovna, – ripetis Vorobjaninov, – kio pri vi?

Sed li denove ne ricevis respondon. La maljunulino fermis la okulojn, kaj faletis flanken.

En la ĉambron mallaŭte eniris la agronomedzino, kaj forkondukis lin je la mano kiel knabon, kiun oni kondukas lavi sin.

– Ŝi ekdormis. La kuracisto ordonis ne maltrankviligi ŝin. Kaj jen kio, karulo, iru vi en la apotekon. Prenu la kvitancon kaj demandu kiom kostas vezikoj por glacio.

Ipolit Matveeviĉ pri ĉio humiliĝis al *madam* Kuzne-cova, sentante ŝian sendisputan superecon en tiuj ĉi aferoj.

La apoteko estis malproksima. Gimnaziane enpre-minte en la pugno la preskribon Ipolit Matveeviĉ haste eliris la straton.

Estis jam preskaŭ mallume. Sur fono de la konsumiĝ-anta vesperruĝo videblis malfortika figuro de ĉerka majstro Bezenĉuk kiu, apoginte sin al la abia pordego, manĝis panon kaj cepon. Samloke, proksime, kaŭre sidis tri "nim-foj" kiuj, ĉirkaŭlekante la kulerojn, manĝis fagopiran kaĉon el krudfera poteto. Ekvidinte na Ipolit Matveeviĉ la ĉerkistoj rektiĝis kiel soldatoj. Bezenĉuk ofendiĝe levis la ŝultrojn kaj, etendante la manon en flankon de la konkurenculoj, elgrumblis:

– Baraktadas, al kukolo ilin, ĉe miaj piedoj.

Meze de Staropana placo, ĉe busteto de poeto Ĵuk-ovskij, sur soklo de kiu estis elĉizita skribo: «Poezio estas Dio en sanktaj revoj de Tero», oni gvidis viglan diskuton, elvokitan per informo pri grava malsano de Klavdija Iva-novna. Ĝenerala opinio de la kuniĝintaj civitanoj resumiĝis en tio ke «ĉiuj ni estos tie», kaj ke «Dio donis, Dio prenis».

Frizisto "Pjer kaj Konstantin", kiu tamen volonte reagis al nomo Andrej Ivanoviĉ, ankaŭ ĉi tie ne preterlasis eble-con montri siajn sciojn en medicina sfero, kiujn li elĉerpis el moskva magazino "Ogonjok".

– Nuntempa scienco, – diris Andrej Ivanoviĉ, – venis ĝis io neebla. Ekzemple: ĉe kliento aperis akno sur la mentono. Antaŭe tio povis kaŭzi eĉ sang-venenigon, sed nun en Moskvo, onidire, ne scias mi ĉu veras tio, al ĉiu kliento aparta sterila razpeniko estas nun disponenda.

La civitanoj tire suspiris.

– Tion vi, Andrej, iom troigas...

– Kie estas vidate ke al ĉiu homo – apartan razpenikon? Jen kion li elpensis!

Iama proleto de pens-laboro, kaj nun kioskisto Prusis eĉ eknervozadis:

– Permesu, Andrej Ivanoviĉ, sed en Moskvo, laŭ lasta censo, estas pli ol du milionoj da loĝantoj, ĉu? Do estas bezonataj pli ol du milionoj da razpenikoj? Sufiĉe originale.

La konversacio komencis akcepti jam varman formon, kaj venigus diablo scias kien, se fine de Osipnaja-strato ne aperus Ipolit Matveeviĉ.

– Denove en apotekon li kuras. Malbonas do la afero.

– Mortos la maljunulino. Ne vane Bezenĉuk kuradas tra la urbo simila eĉ ne al si mem.

– Kaj kion diras la kuracisto?

– Kio kuracisto! Ĉu en la asekura kaso estas kuracistoj? Eĉ sanulon ili finkuracos!

”Pjer kaj Konstantin”, jam delonge penanta deklari medicin-teman informon, diris, singarde ĉirkaŭrigardante:

– Nun tuta forto estas en hemoglobino.

Dirinte tion, ”Pjer kaj Konstantin” eksilentis .

Eksilentis ankaŭ la urbanoj, pensante si-maniere pri enigmaj fortoj de hemoglobino.

Kiam leviĝis la luno, kaj ĝia menta lumo heligis miniaturan busteton de Ĵukovskij, sur ĝia kupra dorso ekeblis klare distingi mallongan maldecaĵon, skribitan per kreto.

Unue tiu surskribo aperis sur la busteto la 15-an de junio de jaro 1895, en nokto veninta tuj post inaŭguro de la monumento. Kaj malgraŭ ĉiuj penoj de cara, kaj poste soveta polico, la malaproba surskribo renoviĝis akurate ĉiutage.

En lignaj kun eksteraj ŝutroj dometoj jam kantis samovaroj. Estis horo de vespermanĝo. La civitanoj ĉesis vane perdi la tempon, kaj disiris. Ekblovis vento.

Dume Klavdija Ivanovna mortadis. Ŝi ĉu petis trinki, ĉu diris ke ŝi devas leviĝi kaj repreni el riparejo festenajn botetojn de Ipolit Matveeviĉ, ĉu plendis pri polvo, pro kiu, laŭ ŝiaj vortoj, oni povas sufokiĝi, ĉu petis funkciigi ĉiujn lampojn.

Ipolit Matveeviĉ, kiu laciĝis jam ekscitiĝi, iradis en la ĉambro. En lian kapon venadis malagrablaj mastrumaj pensoj. Li meditis pri tio ke necesas preni avancon en kaso de interhelpo, venigi la pastron, kaj respondadi al kondolencaj leteroj de la parencoj. Por deflankiĝi iom, Ipolit Matveeviĉ eliris sur la peroneton. En verda lumo de la luno staris ĉerka majstro Bezenĉuk.

– Do kion vi ordonos, sinjoro Vorobjaninov? – demandis la majstro, premante al la brusto sian kaskedon.

– Kio do, faru, – malserene respondis Ipolit Matveeviĉ.

– Sed “Nimfa”, al kukolo ĝin, ĉu ĝi donas la varon! – maltrankviliĝis Bezenĉuk.

– Iru al diablo! Tedas vi!

– Ne, mi nenio. Mi pri la kvastoj kaj pri la brokaĵo. Kiel mi faru, je kukolo? Ĉu plej altkvalite? Aŭ kiel?

– Sen iuj ajn kvastoj kaj brokaĵoj. Simpla ligna ĉerko. Pina. Ĉu vi komprenas?

Bezenĉuk almetis la fingron al la lipoj, montrante per tio ke li komprenas ĉion, turniĝis kaj, balanciĝante per la

kaskedo, sed malgraŭ tio ŝanceliĝante, ekiris for. Nur tiam Ipolit Matveeviĉ rimarkis ke li estas morte ebria.

Ipolit Matveeviĉ denove eksentis sin eksterordinare aĉe. Li ne povis imagi kiel li venados en la malpleniĝintan malordan loĝejon. Al li ŝajnis ke kune kun morto de la bopatrino malaperos tiuj etaj oportunaĵoj kaj kutimoj kiujn li pene kreis al si post la revolucio, kiu forrabis de li grandajn oportunaĵojn kaj vastajn kutimojn. «Ĉu edziĝi?» – pensis Ipolit Matveeviĉ. – «Sed kun kiu? Ĉu kun Varvara Stepanovna, nevino de la poliestro, fratino de Prusis? Aŭ, eble, dungi servistino? Sed ne! Ŝi tirados min en juĝejojn. Krom tio multekostas la afero.»

La vivo tuj nigriĝis en okuloj de Ipolit Matveeviĉ. Plena per indigno kaj abomeno al ĉio en la mondo li denove revenis hejmen.

Kladvija Ivanovna jam ne deliris. Alte kuŝante sur la kusenoj ŝi rigardis enirantan Ipolit Matveeviĉ tute senco-have kaj, kiel ŝajnis al li, eĉ rigore.

– Ipolit, – elflustris ŝi distingeble, – sidu apud mi. Mi devas rakonti al vi...

Ipolit Matveeviĉ senplezure eksidis, enrigardante magriĝintan lipharan vizaĝon de la bopatrino. Li penis rideti kaj diri ion kuraĝigan. Sed la rideto okazis sovaĝa, kaj kuraĝigajn vortojn li tute ne trovis. El gorĝo de Ipolit Matveeviĉ elŝiriĝis nur netaŭga sibletio.

– Ipolit, – ripetis la bopatrino, – ĉu vi memoras nian gastsalonan kompleton?

– Kiun? – demandis Ipolit Matveeviĉ kun komplezo, ebla nur rilate al tre malsanaj homoj.

– Tiun... tegitan per angla katuno...

– Ha, ĉu en mia domo?

– Jes, en Stargorod...

– Jes, mi memoras, bonege memoras... Sofo, dek-duo da seĝoj, kaj ronda tableto sur ses piedetoj. Mebloj estis perfektaj, far Hambs... Sed kial vi rememoris ilin?

Sed Klavdiĵa Ivanovna ne scipovis respondi. Ŝia vizaĝo komencis malrapide koloriĝi vitriole. Ankaŭ ĉe Ipolit Matveeviĉ ial deteniĝis la spirado. Li klare rememoris gastsalonon en sia sinjordomo, simetrie dismetitan nukslignan meblaron kun kurbaĵaj piedetoj, vaksigitan plankon, antikvan brunan horizontala-pianon, kaj ovalajn nigrajn kadretojn sur la muroj kun dagerotipoj de la altrangaj parencoj.

Tiam Klavdiĵa Ivanovna per ligna indiferenta voĉo diris:

– En sidaĵon de seĝo mi enkudris miajn brilantojn.

Ipolit Matveeviĉ strabe alrigardis la maljunulinon.

– Kiujn brilantojn? – demandis li mekanike, sed tuj atentiĝis. – Ĉu oni ne deprenis ilin tiam, dum la priserĉado?

– Mi kaŝis la brilantojn en la seĝon, – obstine ripetis la maljunulino.

Ipolit Matveeviĉ eksaltis kaj, rigardante lumigitan per la kerosena lampo ŝtonan vizaĝon de Klavdiĵa Ivanovna, komprenis ke ŝi ne deliras.

– Viajn brilantojn! – ekkriis li, timante fortecon de sia voĉo. – En seĝon! Kiu konsilis al vi tion? Kial vi ne donis ilin al mi?

– Kial mi donus al vi la brilantojn, se vi fordiboĉis bienon de mia filino? – trankvile kaj malice diris la maljunulino.

Ipolit Matveeviĉ eksidis kaj tuj denove ekstaris. Lia koro brue dissendis fluojn da sango tra la tuta korpo. En la kapo komenciĝis zumado.

– Sed vi elprenis ilin de tie, ĉu? Ĉu ili estas ĉi tie?

La maljunulino nee balancis la kapon.

– Mi ne sukcesis. Vi ja memoras kiel rapide kaj neatendite ni devis forkuri. Ili restis en seĝo kiu staris inter la terakota lampo kaj la kameno.

– Sed tio estas frenezaĵo! Ĝis kiom vi similas vian filinon! – kriis Ipolit Matveeviĉ plenvoĉe.

Kaj jam ne ĝenante pri tio ke li troviĝas ĉe lito de mortantino li brue deŝovis la seĝon, kaj ektrotis en la ĉambro. La maljunulino indiferente observis agojn de Ipolit Matveeviĉ.

– Sed ĉu vi apenaŭ imagas kien tiuj ĉi seĝoj povis trafi? Aŭ eble vi opinias ke ili trankvilege staras en la gast-salono de mia domo, kaj atendas kiam vi venos por depreni viajn reĝajn distingajojn?

La maljunulino respondis nenion.

Ĉe la registrad-oficisto, pro la malico, falis de la nazo lia nazumo kaj, preterbrilinte per sia ora arketo la genuojn, frapiĝis plankon.

– Kio? Enŝovi en seĝon brilantojn je sepdek mil! En seĝon sur kiu sidas neniu scias kiu!..

Ĉi tie Klavdija Ivanovna eligis plor-singultan sonon, kaj tutkorpe moviĝis al rando de la lito. Ŝia mano, desegnante duoncirklon, penis kapti na Ipolit Matveeviĉ, sed tuj falis sur la vatigitan violkoloran litkovrilon.

Ipolit Matveeviĉ, jelpante pro timo, ĵetiĝis al la najbarino.

– Ŝi mortas, ŝajne!

La agronom-edzino afereme krucsignis sin kaj, ne kaŝante la scivolemon, kune kun la edzo, barba agronomo, kuris en domon de Ipolit Matveeviĉ. Vorobjaninov konsterniĝe envagis la urban ĝardenon.

Dum la agronom-geedzoj kun sia servantino aranĝis ĉambron de la mortintino, Ipolit Matveeviĉ vagadis en la

ĝardeno, stumblante je la benkoj, kaj opiniante je arbustoj amajn parojn, ŝtoniĝintajn pro la frua printempa amo.

En kapo de Ipolit Matveeviĉ okazis diablo scias kio. Sonis ciganaj ĥoroj, grandmamaj inaj orkestroj senĉese plenumis na “tango-ampa”, imagis li moskvan vintron kaj nigran longan trot-ĉevalon, malrespekte gruntantan piedirantojn. Multon imagis Ipolit Matveeviĉ: kaj oranĝkolorajn ekstaze multekostajn kalsonojn, kaj lakean fidelecon, kaj eblan veturon en Kannon.

Ipolit Matveeviĉ ekpaŝis malpli rapide, kaj subite stumblis je korpo de ĉerka majstro Bezenĉuk. La majstro dormis, kuŝante en sia ŝafpeltaĵo transverse de la parka vojeto. Pro la puŝo li vekigis, ternis, kaj vikle ekstaris.

– Bonvolu ne maltrankviliĝi, sinjoro Vorobjaninov, – diris li arde, kvazaŭ daŭrigante antaŭnelonge komencitan konversacion. – Ĉerko, ĝi laboron ŝatas.

– Mortis Klavdija Ivanovna, – informis la kliento.

– Nu, ĉielregnon al ŝi, – konsentis Bezenĉuk. – Prezentiĝis do la maljunulino... Maljunulinoj, ili ĉiam prezentiĝas... Aŭ fordonas sian animon al Dio, – tio depende de kia maljunulino. Via, ekzemple, estas malalta kaj diketa, – do prezentiĝis ŝi. Sed, ekzemple, kiu estas pli alta kaj magra, pri tiu estas konsiderate ke ŝi fordonis sian animon al Dio.

– Kion tio signifas «estas konsiderate»? Ĉe kiu estas konsiderate?

– Ĉe ni. Ĉe majstroj. Jen vi, ekzemple, viro impona, altstatura, kvankam magra. Pri vi se, ne donu Dio, vi mortos, estas konsiderate ke vi enkestiĝis. Kaj kiu estas homo komerca, de iama negociista gildo, tiu do ordonis longe vivi. Kaj pri kiu rangas malpli, kortisto, ekzemple, aŭ iu el kamparanoj, pri tiu oni diras: «renversiĝis» aŭ «piedojn

etendis». Sed kiam plej fortegaj mortas, fervojaj konduktoroj, aŭ iu el estraro, estas konsiderate ke ili kverkiĝis. Tiel ja diras pri ili: «Kaj nia, ĉu vi aŭdis, kverkiĝis».

Konsternita pri tiu ĉi stranga klasifikado de homaj mortoj Ipolit Matveeviĉ demandis:

– Kaj vi, kion la majstroj diros pri vi kiam vi mortos?

– Mi estas eta homo. Oni diros «kurbiĝis Bezenĉuk». Kaj nenion pli. – Kaj severe aldonis: – Mi ne scipovas kverkiĝi aŭ enkestiĝi: korpa amplekso mia estas malgrava... Sed kio pri la ĉerko, sinjoro Vorobjaninov? Ĉu vere vi kontentiĝos pri foresto de brokaĵo kaj kvastoj?

Sed Ipolit Matveeviĉ, denove droninta en la blindigajn revojn, respondis nenion, kaj ekmoviĝis antaŭen. Bezenĉuk sekvis lin, kalkulante ion per la fingroj kaj, kiel kutime, murmurante.

La luno jam delonge malaperis. Estis vintre malvarme. La flakoj denove kovriĝis per rompiĝema vafla glacio. Sur strato je nomo de kamarado Gubernskij, kien eniris la kuni-rantoj, la vento interbatiĝis kun la elpendaĵoj. De Staropana placo, kun sonoj de faligata fera kurteno, elveturis per magraj ĉevaloj ĉararo de la estingistoj.

La fajrobrigadistoj, elpendiginte de la benketo la tolajn piedojn, svingis la kapojn en la kaskoj, kaj kantis per speciale malagrablaj voĉoj:

Al nia ĉefestingisto gloro,

Al nia kara kamarado Pumpilov glo-oro!..

– En edziĝfesto de Kola, filo de la ĉefestingisto festenis ili, – indiferente diris Bezenĉuk, kaj gratetis sub la ŝafpeltaĵo sian bruston. – Do ĉu vere sen brokaĵo kaj sen ĉio mi faru?

Ĝuste al tiu ĉi momento Ipolit Matveeviĉ decidis jam ĉion. «Veturu mi kaj trovu», – decidis li. – «Kaj poste vidos

mi». Pro la brilantaj revoj eĉ la mortinta bopatrino ekŝajnis al li pli aminda ol estis. Li turniĝis al Bezenĉuk:

– Al diablo vin! Faru! Brokaĵan! Kun kvastoj!

Ĉapitro 3

Parabolo de pekulo

Preninte konfeson de mortanta Klavdija Ivanovna, pastro de preĝejo je nomo de Frol kaj Lavr, patro Fjodor Vostrikov, eliris el domo de Vorobjaninov plena per entuziasmo, kaj tutan vojon ĝis sia loĝejo trairis li malatente rigardante la flankojn, kaj konfuze ridetante. Lia malatento venis ĝis tiu grado ke li preskaŭ trafis sub distrikt-estran aŭton “Ŝtat. num. 1”. Elgrimpinte el la violet-kolora nebulo, produktita per la infera maŝino, patro Vostrikov trafis en plenan malakordon, do, malgraŭ la respektinda rango kaj meza aĝo, restaĵon de la vojo li trairis per frivola duongalopo.

Patrino Katerina Aleksandrovna surtabligis la vespermanĝon. Patro Fjodor, en tagoj liberaj de malfrua servo, ŝatis vespermanĝi frue. Sed nun, demetinte la ĉapelon kaj la vatigitan sutanon, la patro rapide trasaltis en la dormoĉambron, al miro de la edzino ŝlosis sin tie, kaj per la obtuza voĉo komencis kanteti «Estas dece».

La patrino eksidis sur seĝon kaj time elflustris:

– Ion novan ekiniciatis li...

Impeta animo de patro Fjodor ne konis trankvilon. Ĝi konis ĝin neniam. Nek kiam li estis Fedja, edukito de rus-ortodoksa lernejo, nek kiam li estis Fjodor Ivanoviĉ liphara

studento de seminario. **Pe**-inte⁶ la seminarion, kaj lerninte tri jaroj en jura fakulto de universitato, Vostrikov, en jaro 1915, ektimis eblan milit-mobilizon, kaj denove revenis en eklezion. Komence li ricevis rangon de diakono, poste estis ordinata je rango de pastro, kaj sendita en distriktan urbon No. Kaj ĉiam, en ĉiuj ŝtupoj de sia eklezia aŭ civila kariero, patro Fjodor celis pliriĉiĝon.

Li revis pri propra kandela fabriko. Turmentata per bildigo de grandaj fabrikaj tamburoj, survolvantaj dikajn vaksajn ŝnuregojn, patro Fjodor inventadis diversajn projektojn, efektivigo de kiuj devis venigi al li bazan kaj spezan kapitalon por aĉeto de delonge pririgardita fabriketo en Samaro.

Ideo venadis al patro Fjodor neatendite, kaj li tuj ekis labori. Foje patro Fjodor entreprenis produktadon de marmor-aspekta sapo por lavi tolaĵojn; li faris multege da ĝi, sed la sapo, kvankam enhavis grandegan procenton da grasoj, ne ŝaŭmiĝis kaj, krom tio, kostis trioble pli ol tiu el "Plugilo kaj martelego". Poste la sapo longe malsekiĝis kaj malkomponiĝis en la enirejo, pro kio Katerina Aleksandrovna iam eĉ ploretis, preterirante ĝin. Kaj pli poste oni forĵetis la sapon en elĉerpan kavon.

Leginte en unu bestbredista gazeto ke viando de kunikloj estas delikata kiel tiu de kokidoj, ke reproduktiĝas ili grandkvante, kaj ke bredado da ili povas venigi al bona mastro sufiĉe altajn profitojn, patro Fjodor senprokraste ekposedis seson da generuloj, kaj jam post du monatoj hundino Nerka, timigita per neimagebla kvanto da grandorelaj estaĵoj, plenigintaj la korton kaj la domon, fuĝis neniue scias kien. Damnitaj loĝantoj de urbo No okazis ek-

6. **Pe**: prefikso kun signifo: kompleta plenumo de la ago (rigardu paĝon 394)

streame konservativaj, kaj kun malofta unuanimeco rifuzis aĉeti kuniklojn de Vostrikov. Tiam la patro, konsilinte kun la edzino, decidis plibeligi sian menuon per la kunikloj, vivando de kiuj superas laŭguste viandon de kokidoj. El la kunikloj estis preparitaj rostaĵoj, kotletoj; ili estis kuiritaj en supo, surtabligitaj al vespermanĝo en malvarma stato, kaj enbakitaj en paston. Tio rezultigis nenion. Patro Fjodor kalkulis ke, se la familio manĝos nenion alian ol la kuniklojn, ĝi povos formanĝi ne pli ol kvardekon da bestoj monate, dum ĉiumonata naskitaro enkalkulis naŭdek ekzemplerojn, kaj tiu ĉi nombro pligrandiĝis en geometria progresio.

Tiam la Vostrikov-familio decidis prezenti hejmajn tagmanĝojn. Tutan vesperon patro Fjodor skribis per neforviŝebla krajono sur akurate tranĉitaj folioj da aritmetika papero afiŝetojn pri bongustaj hejmaj tagmanĝoj, preparitaj ekskluzive kun freŝa butero. La afiŝeto komenciĝis per vortoj: "Malmultekoste kaj bonguste". La pastra edzino plenigis emajlitan kaseroleton per faruna gluaĵo, kaj patro Fjodor, malfruvespere, surgluis la afiŝetojn sur ĉiujn telegrafajn fostojn, kaj proksime al sovetiaj oficejoj.

La nova entrepreno akiris grandan sukceson. Jam sekvonttage venis sep personoj, inter ili oficisto de militkomisarejo Bendin, kaj estro de subfako pri urba plibonigo Virkaprov, pro penoj de kiu, antaŭnelonge, estis ruinigita sola en la urbo antikva monumento: triumfa arko el tempo de imperiestrino Elizaveta, kiu malhelpis, laŭ liaj vortoj, al la trafiko. La tagmanĝo plaĉis al ĉiuj. Sekvan tagon venis dek kvar personoj. Mankis eĉ tempo deŝiri felojn de la kunikloj. Tutan semajnon la afero iris bonege, kaj patro Fjodor pripensis jam malfermon de eta felista entrepreno sen motoro, kiam venis tute ne antaŭvidita okazaĵo.

Kooperativo “Plugilo kaj martelego”, kiu estis fermita jam tri semajnoj pro reregistrado de la varoj, malfermiĝis, kaj la vendej-laboristoj, anhelante pro la penoj, elruligis sur la malantaŭan korton, kiu estis komuna al tiu de patro Fjodor, barelon da putriĝinta brasiko, kiun ili forĵetis en la elĉerp-kavon. La kunikloj, allogitaj per la pikantaodoro, alkuris la kavon, kaj jam sekvontmatene inter la delikataj ronĝuloj komenciĝis elmortado. Ĝi furiozis nur tri horoj, sed faligis ducent-kvardekon da generuloj, kaj nekalkuleban idaron.

Konsternita patro Fjodor kvietiĝis por du plenaj monatoj, kaj entuziasmiĝis nur nun, reveninte el domo de Vorobjaninov, kaj ŝlosiĝinte, al miro de la patrino, en la dormoĉambro. Ĉio montris pri tio ke patro Fjodor estas ravita per nova ideo, kiu kaptis tutan lian animon.

Katerina Aleksandrovna frapetis per osteto de la fleksita fingro pordon de la dormoĉambro. Respondo ne venis, nur plifortiĝis la kantado. Post minuto la pordo duonmalfermiĝis, kaj en la fendo aperis vizaĝo de patro Fjodor, sur kiu ludis knabina vangruĝo.

– Donu al mi, patrino, la tondilon, kaj senprokraste, – diris patro Fjodor rapide.

– Kaj kio pri la vespermanĝo?

– Bone. Poste.

Patro Fjodor kaptis la tondilon, denove ŝlosiĝis, kaj venis al la mura spegulo en gratigita nigra kadro.

Apud la spegulo pendis antikva popola bildeto “Parabolo de pekulo”, presita de kupra tabulo kaj agrable kolorigita mane. Tiu ĉi “Parabolo de pekulo” signife konsolis patron Fjodor post malsukceso pri la kunikloj. La bildo klare montris malgravecon de ĉio tera. Supre viciĝis kvar desegnoj, subskribitaj multsignife kaj anim-trankvilige per

malnovslavaj literoj: «Ŝemo preĝadas, Ĥamo semadas, Jafeto regas. Morto ĉion posedas». La morto kunhavis falĉilon kaj sablan horloĝon kun flugiloj. Ĝi estis farita kvazaŭ el protezoj kaj ortopediaj partoj, kaj staris vaste dismetinte la piedojn sur dezerta monteta grundo. Ĝia aspekto klare diris ke malsukceso pri la kunikloj estas tute malgrava.

Nun al patro Fjodor plaĉis, pli ol iu alia bildeto «Jafeto regas». Korpulenta riĉa homo kun barbo sidis en eta halo sur la trono.

Patro Fjodor ridetis kaj, atente rigardante sin en la spegulo, komencis tondi sian respektoplenan barbon. La haroj ŝutiĝis sur la plankon, la tondilo knaris, kaj post kvin minutoj patro Fjodor konvinkiĝis ke li tute ne scipovas tondi la barbon. La barbo okazis oblikva, malrespekta, kaj eĉ suspektinda.

Penante ĉe la spegulo ankoraŭ iom da tempo, patro Fjodor koleriĝis, vokis la edzinon kaj, etendante al ŝi la tondilon, diris incite:

– Helpu, patrino. Neniel povas mi venki la haregojn.

La patrino eĉ manojn forigis malantaŭen.

– Ja kion vi faris pri vi? – diris ŝi fine.

– Nenion gravan. Tondiĝas mi. Bonvolu helpi. Ŝajnas ke ĉi tie iom oblikviĝis...

– Dio mia, – diris la patrino, atencante buklojn de patro Fjodor, – ĉu vere vi Fedja decidis al novigistoj transiri?

Patro Fjodor ĝojis al tiu ĉi turno de la konversacio.

– Sed kial, panjo, ne transiru mi al novigistoj? Ĉu novigistoj ne estas homoj?

– Homoj, certe homoj, – konsentis la patrino venene,

– kial ne: iluziejojn ili vizitas, alimentojn pagas...

– Do ankaŭ mi kurados en iluziejojn.

- Kuru, bonvolu.
- Do kuros mi.
- Ĝiskuros. Rigardu vi vin en la spegulo.

Kaj vere, el la spegulo patron Fjodor rigardis vigla nigraokula vizaĝo kun sovaĝa barbeta kaj absurde longaj lipharoj.

Ili komencis pritondi la lipharojn, por doni al ili proporciajn dimensiojn.

Kio okazis poste eĉ pli konsternis la patrinon. Patro Fjodor deklaris ke ĉi-vespere li devas forveturi pro unu afero, kaj postulis ke Katerina Aleksandrovna kuru al sia frato-bakisto, kaj prenu de li, por unu semajno, la palton kun ŝafida kolumo, kaj la brunan anasan kaskedon.

- Nenien mi iros! – deklaris la patrino, kaj ekploris.

Dum duonhoro paŝadis patro Fjodor en la ĉambro kaj, timigante la edzinon per sia ŝanĝita vizaĝo, murmuris sensencaĵojn. La patrino komprenis nur tion: patro Fjodor ial tondiĝis, kaj volas en la stulta kaskedo veturi neniu scias kien, sed ŝin li lasas.

– Ne lasas mi, – ripetadis patro Fjodor, – ne lasas, revenos mi post semajno. Ja povas okazi ke homo havas iun aferon. Povas aŭ ne?

- Ne povas, – diris la pastra edzino.

Patro Fjodor, kiu estis milda en rilatoj kun la proksimuloj, devis eĉ frapadi la tablon per la pugno. Kvankam frapadis li singarde kaj nescipove, ĉar neniam faris tion antaŭe, la edzino tre ektimis kaj, surĵetinte sur sin la kaptukon, kuris al sia frato por preni civilajn vestaĵojn.

Restinte sola patro Fjodor meditis minuton, diris: «Ankaŭ al virinoj estas malfacile», kaj eltiris el sub la lito kofreton, tegitan per lado. Tiajn kofretojn oni povas ofte vidi ĉe soldatoj. Ene ili estas ĉirkaŭgluitaj per striigitaj

tapetoj, super kiuj paradas portreto de generalo Budjonij aŭ kartonaĵo de cigared-skatoleteto “Plaĝo” kun tri belulinoj, kuŝantaj sur marbordo de Batumo, supersŭtita per rulŝtonetoj. Kofreto de Vostrikov familio, al malkontento de patro Fjodor, ankaŭ estis ĉirkaŭgluita per bildetoj, sed estis tie nek Budjonij, nek batumaj belulinoj. Tutan internon de la kofreto la pastra edzino ĉirkaŭgluis per fotografaĵoj el-tranĉitaj el magazino “Kroniko de milito de jaro 1914”. Ĉi tie estis kaj “Kapto de Peremiŝlo”, kaj “Disdono de varmaj vestaĵoj al malalt-ranguloj ĉe pozicioj”, kaj multe da aliaj bildetoj.

Metinte sur la plankon librojn kuŝintajn supre: komplet-ton de magazino “Rusa pilgrimo” de jaro 1903, dikegan “Historio de skismo”, kaj broŝuron “Ruso en Italio”, sur kov-rilo de kiu estis presita fumanta Vezuvio, patro Fjodor enigis la manon ĝis fundo mem de la kofreto, kaj eltiris malnovan eluzitan kuf-ĉapelon de la edzino. Ferminte la okulojn proodoro de naftaleno, kiu subite frapis el la kof-reto, patro Fjodor, disŝirante la punktojn kaj kunkudrojn, el-prenis el la kufĉapelo pezan tolan kolbaseton. La kol-baseto enhavis dudekon da oraj antaŭrevoluciaj dek-rub-laj moneroj: ĉion kio restis de komercaj aventuroj de patro Fjodor.

Per kutima movo de la mano li levis baskon de la su-tano, kaj enigis la kolbaseton en poŝon de sia striigita pan-talono. Poste li venis al la vestoŝranko, kaj prenis el la bombon-skatolo kvindek rublojn per tri- kaj kvinrublaĵoj. En la skatolo restis ankoraŭ dudek rubloj.

– Por la mastrumado sufiĉos, – decidis li.

Ĉapitro 4

Muzo de malproksimaj vojaĝoj

Unu horo antaŭ veno de vespera poŝta trajno patro Fjodor, en mallonga iom pli ol ĝis genuoj palto, kaj kun plektita korbo, staris en vico al la kaso, kaj time rigardetis la eniran pordon. Li timis ke la edzino, kontraŭ lia postulo, kuros la stacidomon por adiaŭi, kaj tiam kioskisto Prusis, sidanta en la bufedejo kaj regalanta per biero la financ-agen-ton, tuj rekonos lin. Patro Fjodor kun miro kaj honto rigardis sian strian pantalonon, malfermitan al rigardoj de ĉiuj laikuloj.

Eniro en la trajnon, lokoj de kiu ne estis rezervitaj, iris laŭ sia kutima skandala maniero. Pasaĝeroj, kurbiĝintaj sub pezo de la grandegaj sakoĵ, kuris de kapo de la trajno al ĝia vosto, kaj de la vosto al la kapo. Patro Fjodor konsterniĝe kuris kune kun ĉiuj aliaj. Same al ĉiuj li parolis kun la konduktoroj per flata voĉo, kaj same al ĉiuj timis ke la kasisto donis al li «malĝustan» bileton. Nur enlasita fine en la vagonon li revenis al sia kutima trankvilo, kaj eĉ pligajiĝis.

La lokomotivo kriis plenvoĉe, kaj la trajno ekmoviĝis, veturigante patron Fjodor en nekonatan malproksimon, al afero enigma sed promesanta, ŝajne, grandan profiton.

Interesa afero estas la **depremita ter-strio**⁷. Plej ordinara civitano, trafinta ĝin, sentas ene de si iun klopode-mon, kaj rapide transformiĝas en pasaĝeron, en kargorice-vanton, aŭ simple en senbiletan vagulon, kiu malserenigas

7. **Depremita ter-strio** ĉi tie: tero aĉetita aŭ rekviziita por konstruo de fer-vojo.

vivon kaj ofican agadon de konduktoraj brigadoj kaj kajaj kontrolistoj.

De tiu minuto kiam civitano enpaŝas la deprenitan terstrion, kiun ĝi diletante nomas stacidomo aŭ stacio, ĝia vivo abrupte ŝanĝiĝas. Ĝin tuj, rabiste, alsaltas valizportistoj en blankaj antaŭtukoj kun nikelizitaj insignoj sur la koroj, kaj kompleze kaptas la bagaĝon. De tiu ĉi minuto la civitano jam ne apartenas al si mem. Ĝi estas nun pasaĝero, kaj komencas plenumi ĉiujn devojn de pasaĝero. Tiuj ĉi devoj estas multflankaj sed agrablaj.

Pasaĝero manĝas tre multe. Ordinaraĵoj ne manĝas nokte, sed pasaĝero manĝas ankaŭ nokte. Ĝi manĝas rostitan kokidon, kiu estas multekosta por ĝi, kuiritajn ovojn, malutilajn por la stomako, kaj olivojn. Kiam la trajno traigas relkomutilojn, sur la benkoj tintadas multnombraj tekaldronoj kaj saltadas kokidoj, volvitaj en ĵurnalajn foliojn kaj senigitaj je piedetoj, kiujn kun la radikoj elŝiris la pasaĝeroj.

Sed pasaĝeroj rimarkas nenion ĉi tion. Ili rakontas anekdotojn. Regule post ĉiuj tri minutoj la tuta vagono eksplodas pro rido. Poste aperas silento, kaj velura voĉo raportas sekvan anekdoton:

– Mortas maljuna judo. Apude staras la edzino, la infanoj. «Ĉu Monja estas ĉi tie?» – pene demandas la judo. «Ĉi tie». – «Kaj ĉu venis onklino Brana? Mi ne vidas ŝin». – «Jen ŝi staras». – «Kaj Isak?» – «Ĉi tie li estas». – «Kaj la infanoj?» – «Jen estas ĉiuj infanoj». – «Do kiu restis en la vendejo?!».

Sammomente la tekaldronoj komencas tinti, kaj la kokidoj flugadas sur la supraj benkoj, maltrankviligitaj per la tondra rido. Sed pasaĝeroj ne rimarkas tion. Sur koro de ĉiu kuŝas intima anekdoto kiu skuigante atendas sian vi-

con. Nova plenumanto, puŝante la najbarojn per la kubuto kaj petege kriante: «Kaj jen kion oni rakontis al mi», – mal-facile akiras atenton kaj komencas:

– Unu judo venas hejmen, kaj kuŝas dormi apud sia edzino. Subite li aŭdas ke iu gratetas sub la lito. La judo mallevas la manon sub la liton, kaj demandas: «Ĉu tio estas vi, Ĝek?». Ĝek leketas lian manon kaj respondas: «Tio estas mi».

La pasaĝeroj mortas pro la rido, la nigra nokto kovras la kampojn, el la lokomotiva tubo elfugas turniĝantaj fajreroj, kaj maldikaj semaforoj en lumantaj verdaj okulvitroj skrupule preterhastas, rigardante super la trajno.

Interesa afero estas tiu ĉi deprenita ter-strio! En ĉiujn direktojn de la lando kuras longaj pezaj trajnoj de malproksima destino. Ĉie la vojo estas malfermita. Ĉie semaforas verda lumo: la vojo estas libera. Arktika ekspresa trajno leviĝas al Murmansk. De Kurska stacidomo, ĝibiĝinte kaj kliniĝante ĉe relkomutiloj, elsaltas «Unua – K», trabatanta vojon al Tifliso. Malproksim-orienta kuriero preterkuras lagon Bajkalo, plenrapide proksimiĝante al Paca oceano.

Muzo de malproksimaj vojaĝoj forlogas homojn. Jam elŝiris ĝi patron Fjodor el lia trankvila distrikta klostro, kaj ĵetis lin en neniun scias kiun gubernion. Ankaŭ Ipolit Matveviĉ Vorobjaninov, iama nobelar-gvidanto, kaj nun oficisto en registrad-oficejo, estas jam maltrankviligita en sia interno mem, kaj pe-meditis diablo scias kion.

Homoj estas portataj tra la tuta lando. Unu, post dek mil kilometroj de sia oficejo, trovas al si brilantan fianĉinon. Alia, persekutante trezorojn, lasas sian poŝt-telegrafan fakon kaj, kiel mezlernejano, kuras na **Aldan**⁸. Kaj tria

8. **Aldan**: urbo, rivero kaj regiono en Siberio, kie oni serĉadas oron.

restas en sia hejmo, ame karesante la maturiĝantan her-
nion, kaj legante verkojn de grafo Salias, aĉetitajn per kvin
kopekoj anstataŭ rublo.

Duan tagon post la enterigo, aranĝon de kiu afable
prenis sur sin ĉerka majstro Bezenĉuk, Ipolit Matveeviĉ vi-
zitis sian oficejon kaj, plenumante sian taskon, propa-
mane registris morton de Klavdija Ivanovna Petuĥova,
kvindek naŭ jaroj aĝa, dommastrino, **senpartia**⁹, loĝintino
de distrikta urbo No, deveninta el nobeloj de Stargorod-
gubernio. Poste Ipolit Matveeviĉ elpetis laŭleĝan duse-
majnan forpermeson, ricevis kvardek unu rublojn da for-
permesa mono kaj, adiaŭante la kunlaborantojn, direktiĝis
hejmen. Dum la vojo li eniris la apotekon.

Apotekisto Leopold Grigorjeviĉ, kiun hejmanoj kaj
amikoj nomis **Lipa**¹⁰, staris, ĉirkaŭigita per laktaj vazoj kun
venenoj, post la ruĝa lakigita vendotablo, kaj nervume
vendis al fratino de edzino de ĉefestingisto na «Kremo
Ango, kontraŭ sunbruneco kaj lentugoj, aldonas ekskluzi-
van blankecon al la haŭto». Tamen fratino de la ĉefesting-
ista edzino postulis na «Pudro Raŝel de oreta koloro, aldo-
nas al la korpo samnivelan, ne atingeblan naturmaniere
sunbrunecon». Sed en la apoteko estis nur kremoj Ango
kontraŭ sunbruneco, tial lukto de tiom kontraŭaj plaĉigaĵoj
daŭriĝis dum duonhoro. Malgraŭ ĉio venkis Lipa, vendinta
al fratino de la ĉefestingista edzino lipruĝon kaj cim-
ekstermilon, aparaton konstruitan samprincipe al samo-
varo, sed aspektanta kiel aspergilo.

9. **senpartia**: estis permesata nur unu partio.

10. **Lipa** (ruse): 1) virnomo. 2) tilio. 3) fuŝaĵo (lignaĵo de tilio, pro siaj kvali-
toj, estis uzata por produkti falsajn stampilojn).

– Kion vi deziras?
– Rimedon por haroj.
– Ĉu por kreskigo, neniigo, farbigo?
– Kiu ja kreskigo! – diris Ipolit Matveeviĉ. – Por farbigo.

– Por farbigo estas bonega rimedo «Titanik», ricevita de doganejo. Kontrabanda varo. Forlaviĝas nek per malvarma, nek per varma akvo, nek per sapa ŝaŭmo, nek per keroseno. Radikale nigra koloro. Flakono por duonjaro kostas tri rublojn dek du kopekojn. Mi rekomendas ĝin ĉar vi estas mia bona konato.

Ipolit Matveeviĉ turnadis en la manoj kvadratan flakonon de «Titanik», kun suspiro alrigardis la etiketon, kaj metis la monon sur la vendotablon.

Ipolit Matveeviĉ revenis hejmen, kaj kun abomeno komencis verŝi la kapon kaj la lipharojn per «Titanik». En la loĝejo disvastiĝis fetoro.

Post la tagmezo la fetoro malpliĝis, la lipharoj sekiĝis, kungluiĝis, kaj kombi ilin estis laboro tre pena. Okazis ke la radikala nigra koloro havas iom verdetan rebrilon, sed tempo por refarbi jam forestis.

Ipolit Matveeviĉ prenis el bopatrina kesteto antaŭe trovitan tie liston da valorajoj, rekalkulis la tutan kontantan monon, ŝlosis la loĝejon, kaŝis la ŝlosilon en la malantaŭan poŝon, eniris la plirapidigitan numero 7, kaj ekveturis na Stargorod.

Ĉapitro 5

La granda kombinanto

Je la dek-unua tridek, de nordokcidento, de flanko de vilaĝo Ĉmarovka, na Stargorod eniris juna homo ĉirkaŭ dudek ok jaroj aĝa. Post li kuris senhejma knabo.

– Onklo, – gaje kriis li, – donu dek kopekojn!

La juna homo elpoŝigis varmiĝintan pomon, kaj donis ĝin al la senhejmulo, sed tiu ne kontentiĝis. Tiam la piedi-ranto haltis, ironie alrigardis la knabon, kaj mallaŭte diris:

– Ĉu eble mi donu al vi ankaŭ ŝlosilon de la loĝejo, kie la mono kuŝas?

La tropostulema senhejmulo komprenis tutan senba-zigon de siaj pretendoj, kaj deiris.

La juna homo mensogis: li havis nek monon, nek loĝe-jon, en kiu ĝi povus kuŝi, kaj nek ŝlosilon, per kiu oni povus malŝlosi la loĝejon. Li ne havis eĉ palton. En la urbon la juna homo eniris en verda taliita kostumo. Lia herkula kolo estis kelkfoje volvita per malnova lana skarpo, sur la piedoj estis lakaj botetoj kun ŝama oranĝkolora supraĵo. Ŝtrumpe-toj en la botetoj forestis. En la mano la juna homo tenis as-trolabon.

«Ho bajadero, ti-ri-rim, ti-ri-ra!» – kantis li, alvenante la bazaron.

Ĉi tie li trovis multe da okupoj. Li penetris linion da vendantoj, starantaj antaŭ siaj kuŝantaj surtere varoj, eligis la astrolabon, kaj kun serioza aspekto komencis krii:

– Al kiu astrolabon? Malmultekoste vendiĝas astro-labo! Rabato al delegitaroj kaj al virin-organizaĵoj.

La neatendita propono longe ne generis postulon. Delegitaroj de dommastrinoj pli interesiĝis pri deficitaj varoj, kaj amasiĝis ĉe ŝtof-vendejoj. Preter vendanto de la

astrolabo jam dufoje preteriris agente de Stargorod-policejo. Sed, ĉar la astrolabo neniom similis tajpilon, forŝtelitan hieraŭ el kancelario de Butercentro, la agente ĉesis gipnoti la junan homon, kaj foriris.

Ĝis la tagmezo la astrolabo estis vendita per tri rubloj al seruristo.

– Ĝi mem mezuras, – diris la juna homo, transdonante la astrolabon al la aĉetanto, – gravas ke estu kion mezuri.

Liberiĝinte de tiu ĉi enigma instrumento, la gaja juna homo tagmanĝis en manĝejo “Anguleto de gusto”, kaj ekiris pririgardi la urbon. Li trairis straton Sovetia, eniris straton Ruĝarmea (Iama Grand-Puŝkin strato), transiris la Kooperativan, kaj denove okazis sur Sovetia. Sed tio estis ne tiu Sovetia kiun li trairis: en la urbo estis du Sovetiaj stratoj. Mirigita pri tiu ĉi cirkonstanco, la juna homo trovis sin sur strato de Ĉe-Lena-okazaĵoj (iama Denisovskaja). Apud bela duetaĝa izoldomo numero 28 kun elpendaĵo

SOVET-RUSIA DOMO DE STARGORODA GUBERNIA ASEKURO

la juna homo haltis preni fajron por la cigaredo de kortisto, kiu sidis ĉe la pordego sur ŝtona benketo.

– Kio, patro, – demandis la juna homo, enspirante la cigaredan fumon, – ĉu en via urbo estas fianĉinoj?

La maljuna kortisto neniom ekmiris.

– Estas al kiuj ĉevalino estas fianĉino, – respondis li, volonte enirante la konversacion.

– Pluajn demandojn mi ne havas, – rapide diris la juna homo.

Kaj tuj demandis denove:

– Ĉu en tia ĉi domo povas foresti fianĉinoj.?

– Niajn fianĉinojn, – oponis la kortisto, – oni jam de longe en alia mondo kun lanternoj serĉas. Ŝtata maljunulejo troviĝas ĉi tie: maljunulinoj loĝas ĉi tie pensione.

– Mi komprenas. Do kiuj naskiĝis ĝis historia materiismo¹¹, ĉu?

– Ĝuste tiel. Kiam ili naskiĝis, tiam naskiĝis.

– Kaj kio estis en tiu ĉi domo antaŭ historia materiismo?

– Kiam?

– Tiam, ĉe malnova reĝimo.

– Ha, ĉe malnova reĝimo mia mastro loĝis ĉi tie.

– Ĉu burĝo?

– Vi mem estas burĝo! Ja diras mi: nobelar-gvidanto.

– Do proleto, ĉu?

– Vi mem estas proleto! Ja estas dirite al vi: gvidanto.

La konversacio kun la saĝa kortisto, kiu ne tro bone orientiĝis en klasa strukturo de la socio, daŭriĝus Dio scias kiom, se la juna homo ne venus al la afero pli decide.

– Jen kio, aveto, – diris li, – ne malbone estus drinki vinon.

– Do regalu.

Por unu horo ili ambaŭ malaperis kaj, kiam revenis, la kortisto estis jam plej bona amiko de la juna homo.

– Do mi noktos ĉe vi, – diris la nova amiko.

– Laŭ mi eĉ tutan vivon loĝu, ĉar bona homo vi estas.

Atinginte tiel rapide sian celon, la gasto vigle sobiĝis en la kortistejon, demetis la oranĝ-kolorajn botetojn, kaj etendiĝis sur la benko, pripensante planon de agado por morgaŭ.

11. Historia materiismo: marksismo.

Nomo de la juna homo estis Ostap Bender. El sia biografio li kutime informis nur unu detalon: «Mia patro», – diris li, – «estis turka civitano». La filo de turka civitano ŝanĝis dum sia vivo multajn okupojn. Vigleco de la karaktero, malhelpanta al li dediĉi sin al iu ajn afero, konstante ĵetis lin en diversajn partojn de la lando, kaj nun venigis lin na Stargorod sen ŝtrumpetoj, sen ŝlosilo, sen loĝejo, kaj sen mono.

Kuŝante en la varma ĝis fetoreco kortist-loĝejo, Ostap Bender poluris pense du eblajn variantojn de sia kariero.

Eblas ekesti multedzinulo, kaj trankvile ŝanĝi la urbojn, tirante post si novan valizon kun valoraĵoj prenitaj de la deĵora edzino.

Kaj eblas eĉ morgaŭ iri en la urban infan-komisionon, kaj proponi al ili disvendadon de ankoraŭ ne pentrita, sed genie pripensita pentraĵo: “Bolŝevistoj verkas leteron al Ĉemberlen¹²”, laŭ populara pentraĵo de Repin “Dnepraj kozakoj verkas leteron al turka sultano”.

Tiu ĉi varianto, se ĝi sukcesus, povus alporti ĉirkaŭ kvarcent rublojn.

La ambaŭ variantoj estis elpensitaj per Ostap dum lia lasta troviĝado en Moskvo. Varianto kun multedzineco aperis sub influo de juĝeja raporto, legita en vespera ĵurnalo, el kiu sekvis ke unu multedzinulo ricevis nur du jarojn sen severa izolo. Varianto numero du naskiĝis en kapo de Bender kiam li, certe senbilete, pririgardis ekspozicion de Rusiaj Revoluciaj Pentristoj.

Tamen la ambaŭ projektoj havis mankojn. Komenci karieron de multedzinulo sen mirinda griza kun pomoj kostumo estis neeble. Krom tio estis bezonataj minimume dek

12. Ostin Ĉemberlen (Chamberlain, 1863-1937), brita ministro. En 1927 li iniciatis rompon de diplomatiaj rilatoj kun Sovetio.

rubloj por prezentado kaj delogado. Certe eblis edziĝi en la kamp-ira verda kostumo, ĉar vira forto kaj beleco de Bender estis tute ne kontraŭstaraj por provincaj edziĝpretaĵoj Margaritoj, sed tio estus, kiel diris Ostap «malalta kvalito, nepura laboro». Ankaŭ pri la pentraĵo ne ĉio estis glata: povis aperi pure teknikaj problemoj.

Ĉu estas dece pentri kamaradon Kalinin en astrakana ĉapo, kaj en blanka burko; kaj kamaradon Ĉiĉerin – nudan ĝis la zono? Certe eblis, iuokaze, pentri ĉiujn protagonis-tojn en ordinaraĵ kostumoj, sed tio ne estus jam sama afero.

– Forestos la bezonata efekto! – prononcis Ostap voĉe.

Tiam li rimarkis ke la kortisto jam delonge kaj varme parolas pri io. Evidentiĝis ke la kortisto rememoras iaman mastron de la domo:

– Policestro militiste salutis lin... Se venas mi, ekzemple, gratuli lin pri novjaro, tri-rublaĵon li donas... Ĉe Pasko, ekzemple, ankoraŭ tri-rublaĵon. Kaj, ekzemple, ĉe lia nomtago gratulas mi... Do nur gratulmono dum la jaro atingis dek kvin rublojn... Eĉ medalon promesis li prezenti al mi. «Mi», – diris li, – «volas ke kortisto ĉe mi estu kun medalo». Ĝuste tiel li diris: «Vi, Tiĥon, jam opiniu vin kun medalo...»

– Kaj kio, ĉu donis?

– Atendu vi... «Al mi», – diris li, – «ne estas bezonata kortisto sen medalo». En Peterburgon veturis li por la medalo. Jes, unuafoje, mi diru, ne sukcesis li. Sinjoroj ofi-cistoj ne volis. «Caro», – diris ili, – «eksterlanden forveturis, do ne eblas nun». Ordonis al mi la mastro atendi. «Vi», – diras, – «Tiĥon, atendu, sen medalo vi ne restos».

– Diru, ĉu vian mastron oni **frapetis**¹³? – subite demandis Ostap.

– Neniu frapetis. Li mem forveturis. Por kio li sidu ĉi tie kun soldataĉoj... Kaj nun, ĉu oni donas medalojn pro kortista servo?

– Jes, donas. Mi povas elklopodi por vi.

La kortisto estime alrigardis na Ostap.

– Mi sen medalo ne povas. Mia servo estas tia.

– Sed kien via mastro forveturis?

– Kiu scias! Homoj diris ke en Parizon.

– Ha!... «Blank-akacia balado, floroj de la elmigrado...» Do li estas elmigrinto?

– Vi mem estas elmigrinto... En Parizon, homoj diras, forveturis li. Kaj la domon oni por maljunulinoj forprenis... Ilin eĉ ĉiutage gratulu, sed oni eĉ ne monereton ricevos!... Ho! Kia mastro estis!..

Ĉi-momente super la pordo ekkonvulsiis la rustiĝinta sonorilo. La kortisto, grakĝemante, ektiriĝis al la pordo, malfermis ĝin, kaj retropaŝis en fortega konsterno.

Sur supra ŝtupo staris Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov, nigre-harara kaj nigre-liphara. Liaj okuloj, sub la nazumo, brilis per antaŭmilita brilo.

– Mastro! – pasie elmuĝis Tiĥon. – El Parizo!

Ipolit Matveeviĉ, ĝenita per tio ke en la kortista ejo troviĝas iu fremdulo, nudajn violkolorajn plandojn de kiu li nur nun ekvidis de post rando de la tablo, konfuziĝis, kaj volis jam forkuri, sed Ostap Bender vigle eksaltis, kaj profunde kliniĝis antaŭ Ipolit Matveeviĉ.

– Kvankam ĉe ni ne estas Parizo, tamen bonvenon al vi en nian kabaneton.

13. **Frapeti**: civit-milita slangaĵo – paf-ekzekuti.

– Saluton, Tiĥon, – endis diri Ipolit Matveeviĉ, – mi venis tute ne el Parizo. Kial tio venis en vian kapon?

Sed Ostap Bender, longa kaj nobla nazo de kiu klare sentis odoron de io eksterordinara, ne donis al la kortisto diri eĉ vorteton.

– Perfekte, – diris li, strabante la okulon, – vi venis ne el Parizo. Certe vi alveturis el Kologrivo viziti vian mortintan avinon.

Dirante tion li karese ĉirkaŭbrakis la senraciigintan kortiston, kaj transpordigis lin antaŭ ol tiu komprenis kio okazis; kaj kiam rekonsciiĝis, li komprenis nur ke el Parizo alveturis la mastro, ke oni forigis lin el la kortistejo, kaj ke en lia maldekstra mano estas premita papera rublo.

Zorge ŝlosinte la pordon post la kortisto Bender turniĝis al Vorobjaninov, ankoraŭ staranta meze de la ĉambro, kaj diris:

– Trankvilon! Ĉio estas en ordo. Mia familnomo estas Bender. Eble vi aŭdis?

– Ne aŭdis, – nervume respondis Ipolit Matveeviĉ.

– Jes, certe, kiel nomo de Ostap Bender povas esti konata en Parizo? Ĉu en Parizo estas nun varme? Bona urbo. Ĉe mi estas tie edziniĝinta kuzino. Antaŭnelonge mi ricevis de ŝi silkan tukon en rekomendita letero...

– Kia absurdaĵo! – kriis Ipolit Matveeviĉ. – Kiuuj tukoj? Mi venis ne el Parizo, sed el...

– Admirinde, admirinde! El Moroŝansko.

Ipolit Matveeviĉ ankoraŭ neniam havis aferojn kun tiom temperamenta juna homo kiel Bender, do li eksentis sin malbone.

– Nu, ĉu vi scias, mi iru, – diris li.

– Kien vi iros? Al vi ne estas kien rapidi. GPU¹⁴ mem venos al vi.

Ipolit Matveeviĉ ne trovis kion respondi, malbutonumis la palton kun iom kalviĝinta velura kolumo, kaj sidis sur la benkon, neamike rigardante na Bender.

– Mi ne komprenas vin, – diris li per falinta voĉo.

– Tio ne gravas. Vi tuj komprenos. Unu minuton.

Ostap vestis sur la nudajn piedojn la oranĝkolorajn botetojn, promenis en la ĉambro, kaj komencis:

– Trans kiu limo vi venis? Ĉu Pola? Finna? Rumania? Verŝajne tio estas multekosta plezuro. Unu mia konato transiris antaŭnelonge la limon, li loĝas en Slavuto, sur nia flanko, sed parencoj de lia edzino – sur flanko alia. Pro iu familia afero li malpaciĝis kun la edzino, ŝi devenas ja el ofendiĝema familio. Kraĉis ŝi en lian vizaĝaĉon, kaj forkuris trans la limon al la gepatroj. Tri tagoj sidis tiu ĉi konatulo sola kaj, vidas li, malbonas la afero: tagmanĝo forestas, la ĉambro malpuras, kaj decidis li paciĝi. Eliris li nokte por veni trans la limon al la bopatro. Sed tiam lin kaptis la limgardistoj, alkudris al li aferon, arestis je ses monatoj, kaj poste oni eksigis lin el anoj de la sindikato. La edzino, onidire, alkuris jam reen, stultulino, sed la edzo estas en malliberejo. Nun ŝi al li transdonaĵojn portadas... Kaj vi, ĉu ankaŭ vi transiris polan limon?

– Je mia vorto, – diris Ipolit Matveeviĉ, sentante subitan dependecon de la parolema juna homo, kiu ekstaris sur lia vojo al la brilantoj, – je mia vorto, mi estas civitano de Sovetio. Mi povas eĉ la pasporton montri...

– Produkti sovetian pasporton, ĉe nuntempa stato de okcidenta presad-afero, estas ĝis tiom simple, ke ridindas

14. GPU: sekurec-organizaĵo, parto de NKVD, kiu estis antaŭulo de KGB.

paroli pri tio... Unu mia konato venis ĝis tio ke presadis eĉ dolarojn. Ĉu vi scias ĝis kiom malfacilas falsi usonajn dolarojn? Ties papero, se vi scias, havas diverskolorajn haretojn. Bezonatas bona scio de la tekniko. Li sukcese forvendis ilin en moskva nigra merkato; poste okazis ke lia avo, konata valutisto, aĉetis ilin en Kievo, kaj plene bankrotiĝis, ĉar la dolaroj malgraŭ ĉio estis falsaj. Do ankaŭ vi, kun via pasporto, povas malsukcesi.

Ipolit Matveeviĉ, kolera pro tio ke anstataŭ energiaj serĉoj de la brilantoj li sidas en la fetora kortistejo kaj aŭskultas babiladon de iu juna impertinentulo pri maldecaj aferoj de ties konatuloj, tamen neniel povis decidiĝi pri la foriro. Penso pri tio ke la nekonata juna homo disbabilos tra la tuta urbo ke alveturis iama nobelar-gvidanto forte timigis lin. Tiam – fino al ĉio kaj, eble, oni eĉ arestos.

– Tamen bonvolu rakonti al neniu ke vi vidis min, – peteme diris Ipolit Matveeviĉ, – oni ja vere povas ekopinii ke mi estas elmigrinto.

– Jen! Jen! Belege! Jen la aktivo: ĉeestas elmigrinto, reveninta en la naskourbon. Pasivo: li timas ke GPU prenos lin.

– Sed mi jam milfoje diris al vi ke mi ne estas elmigrinto.

– Do kio vi estas? Por kio vi alveturis ĉi tien?

– Mi venis el urbo No pro afero.

– Pro kiu afero?

– Pro persona afero.

– Kaj post tio vi diras ke vi ne estas elmigrinto?.. Unu mia konato ankaŭ alveturis...

Ĉi tiam Ipolit Matveeviĉ, venigita al malespero per rakontoj de Bender pri ties konatuloj, kaj vidante ke ne eblas deigi lin de ties pozicio, humiliĝis.

– Bone, – diris li, – mi klarigos al vi ĉion.

«Fakte estas malfacile sen helpanto», – pensis Ipolit Matveeviĉ, – «kaj li, ŝajne, estas granda fripono. Tia povas okazi utila.»

Ĉapitro 6

Brilanta fumo

Ipolit Matveeviĉ demetis de la kapo la makulitan ĉape-lon, kombis la lipharojn, el kiuj dum kontakto kun la kom-bilo elflugis amika areto da elektraj fajreroj kaj, decide de-tusinte, rakontis al Ostap Bender, al unua renkontita per li aventuristo, ĉion kion li sciis pri la brilantoj el vortoj de la mortinta bopatrino.

Dum daŭro de la rakonto Ostap kelkfoje saltis kaj, tur-niĝante al la fera forno, entuziasme kriis:

– Glacio ekmoviĝis, sinjoroj ĵurianoj! Glacio ekmoviĝis.

Kaj jam post unu horo ili ambaŭ sidis ĉe la ŝanceliĝ-anta tableto kaj, interapogante la kapojn, legis longan lis-ton de la trezoraĵoj kiuj dekoris iam fingrojn, kolon, orelojn, bruston kaj harojn de la bopatrino. Ipolit Matveeviĉ, ĉiumi-nute aranĝante la ŝanceliĝantan nazumon, prononcis kun akcento:

– Tri fadenoj da perloj... Mi bone memoras ilin. Du kun kvardeko da pecoj, kaj unu granda: kun cent dek. Brilanta breloko... Klavdija Ivanovna diris ke ĝi kostas kvar mil, an-tikva laboro...

Poste iris ringoj: ne edziĝ-ringo, dikaj, stultaj kaj malmultekostaj, sed maldikaj, malpezaj, kun puraj lavitaj brilantoj enlutitaj en ilin; pezaj, blindigaj pendaĵoj, ĵetantaj diverskoloran lumon sur etan inan orelon; brakringoj forme de serpentoj kun smeraldaj skvamoj; koliero, por aĉeti kiun

estis eluzita rikolto de kvincent hektaroj; perla koliero, akiri kiun povus nur fama opereta primadono; kronis tion ĉi kvardek-mil-rubla diademo.

Ipolit Matveeviĉ ĉirkaŭrigardis. En mallumaj anguloj de la pestigita kortistejo trembrilis smeralda plintempa lumo. Brilanta fumo teniĝis ĉe la plafono. Perloj ruliĝis sur la tablo kaj saltetis sur la planko. Trezora miraĝo tremigis la ĉambron.

Ekscitita Ipolit Matveeviĉ rekonsciiĝis nur de voĉsono de Ostap.

– La elekto estas nemalbona. Ŝtonoj, mi vidas, estas elektitaj kun bona gusto. Kiom kostis tuta tiu ĉi muziko?

– Sepdek aŭ sepdek kvin mil.

– Hm... Do nun tio kostas cent kvindek mil.

– Ĉu vere tiom multe? – ĝoje demandis Vorobjaninov.

– Ne malpli. Sed jen kio, kara kamarado el Parizo, kraĉu vi sur ĉio ĉi.

– Kiel...

– Per salivo, – respondis Ostap, – same kiel oni kraĉis ĝis epoko de historia materiismo. Rezultos nenio.

– Kial?

– Jen kial. Kiom da seĝoj estis?

– Dek du. Gastsalona kompleto.

– Delonge, verŝajne, forbrulis via gastsalona kompleto en fornoj.

Vorobjaninov tiel ektimis ke eĉ ekstaris de sia loko.

– Trankvilon, trankvilon. Pri la afero okupiĝos mi. La kunsido daŭriĝas. Interalie, indas aranĝi etan kontrakton.

Ipolit Matveeviĉ, malfacile spirante, per klino de la kapo esprimis sian konsenton. Tiam Ostap Bender komencis prilabori la kondiĉojn.

– Okaze de realigo de la trezoro mi, estiel partoprenanto de la koncesio, kaj teknika ĝia gvidanto, ricevas sesdek procentojn; vi povas eĉ ne pripagi mian asekuron. Tio ne gravas al mi.

Vizaĝo de Ipolit Matveeviĉ griziĝis.

– Tio estas tagluma rabo.

– Sed kiom vi opiniis proponi al mi?

– N-n-nu, kvin procentojn, nu dek, fine. Komprenu, tio estas ja dekkvin mil rubloj!

– Ĉu vi volas ankoraŭ ion?

– N-ne.

– Ĉu eble vi volas ke mi laboru senpage, kaj eĉ donu al vi ŝlosilon de loĝejo kie kuŝas la mono?

– Tiukaze mi petas pardonon, – diris Vorobjaninov tra la nazo. – Mi havas ĉiujn rezonojn opinii ke ankaŭ sen vi mi sukcesos aranĝi tiun ĉi mian aferon.

– Ha! Tiukaze, pardonu min, – refutis brilega Ostap, – ĉe mi estas ne malpli da rezonoj, kiel diris **Endi Taker**¹⁵, opinii ke ankaŭ mi povas sola aranĝi vian aferon.

– Fripono! – kriis Ipolit Matveeviĉ, tremante.

Ostap estis malvarma.

– Aŭskultu vi, sinjoro el Parizo, ĉu vi scias ke viaj brilantoj troviĝas jam preskaŭ en mia poŝo! Do vi interesas min nur ĝis kiom mi volas prizorgi vian maljunecon.

Nur tiam Ipolit Matveeviĉ komprenis kiaj feraj manegoj kaptis lin je la gorgo.

– Dudek procentoj, – diris li malserene.

– Kun miaj nutraĵoj? – moke demandis Ostap.

– Dudek kvin.

– Kaj ŝlosilon de la loĝejo?

15. **Endi Taker**: (Andy Tucker) - protagonisto el rakontoj de O. Henry.

- Sed tio estas tridek sep kaj duono da miloj!
- Por kio tiu ĉi precizeco? Nu bone, kvindek procentoj.

Duono – via, duono – mia.

La marĉando daŭriĝis. Ostap cedis ankoraŭ iom. Li, pro estimo al personeco de Vorobjaninov, konsentis labori je kvardek procentoj.

– Sesdek mil! – kriis Vorobjaninov.

– Vi estas sufiĉe vulgara persono, – oponis Bender, – vi ŝatas monon pli ol tio endas.

– Kaj vi, ĉu vi ne ŝatas monon? – elhurlis Ipolit Matveeviĉ per voĉo de fluto.

– Ne ŝatas.

– Do por kio vi volas tiujn ĉi sesdek mil?

– El principo!

Ipolit Matveeviĉ nur retrovis la spiron.

– Nu kio, ĉu ekmoviĝis la glacio? – batadis Ostap.

Vorobjaninov ekanhelis, kaj diris humile:

– Ekmoviĝis.

– Nu, premu ni la manojn, distrikta estro de *komanĉoj*! Glacio ekmoviĝis! Glacio ekmoviĝis, sinjoroj ĵurianoj!

Post kiam Ipolit Matveeviĉ, ofendita pro la moknomo «estro de *komanĉoj*», postulis pardonpeton, kaj Ostap, dirinte la pardonpeton nomis lin kamp-marŝalo, ili komencis pridiskuti la dispozicion.

Meznokte kortisto Tiĥon treniĝis al sia kelo, kaptante per la manoj ĉiujn dumvojajn bariletojn, kaj por longe premiĝante al fostoĵ. Al lia misfortuno la nokto estis novluna.

– Ha! Proleto de penslaboro! Balail-laboristo! – eksklamaciis Ostap, vidante la kortiston, kurbiĝintan rade.

La kortisto ekmuĝis per pasia kaj basa voĉo, per kiu subite, dum nokta silento, varme kaj klopode komencas iam murmuri **necesabo**¹⁶.

– Tio estas eksterordinare, – informis Ostap na Ipolit Matveeviĉ, – ĉar via kortisto estas sufiĉe granda vulgarulo. Ĉu oni povas esti ĝis tiom ebria per unu rublo?

– P-p-ovas, – diris la kortisto neatendite.

– Aŭskultu, Tiĥon, – komencis Ipolit Matveeviĉ, – ĉu vi scias, amiketo, kio okazis pri mia meblaro?

Ostap singarde subtenis na Tiĥon, por ke parolo povu libere flui el ties vaste malfermita buŝo. Ipolit Matveeviĉ streĉe atendis. Sed el buŝo de la kortisto, en kiu forestis ĉiu dua dento, elŝiriĝis orelbora krio:

Gaje-e-egaj tagoj e-estis ja...

La kortistejo pleniĝis per tondro kaj tintado. La kortisto laboreme kaj pene plenumis la kanton, ellasante eĉ ne unu vorton. Li muĝis, moviĝante en la ĉambro, jen plonĝante senkonscie sub la tablon, jen batante sian kaskedon je cilindro pezaĵo de la horloĝo, jen sobiĝante sur unu genuon. Al li estis terure ĝoje.

Ipolit Matveeviĉ tute perdiĝis.

– Do lasu ni pridemandon de la atestantoj ĝis la mateno, diris Ostap. – Dormu ni.

La kortiston, pezan en la dormo kiel ŝranko, ili translokigis sur la benkon.

Vorobjaninov kaj Ostap decidis kuŝi duope sur lito de la kortisto. Ĉe Ostap, sub la jako, okazis ĉemizo “vakero” kun nigraj kaj ruĝaj kvadratoj. Sub la ĉemizo estis jam nenio. Tamen ĉe Ipolit Matveeviĉ sub la luna veŝto, konata

16. **Necesabo**: neceseja seĝo (vidu na “Praktika Bildvortaro de Esperanto”, Oksford University Press. 1979).

jam al la leganto, okazis ankoraŭ unu: mola, lana, hele blua.

– La veŝto kiel por vendado, – envie diris Ostap, – al mi ĝi estos tre konvena. Vendu.

Ipolit Matveeviĉ ĝenis rifuzi al sia nova kunulo kaj senpera partoprenanto de la koncesio.

Sulkiginte la vizaĝon li konsentis vendi la veŝton per ĝia prezo: ok rubloj.

– La monon – post realigo de nia trezoro, – deklaris Bender, akceptante de Vorobjaninov la ankoraŭ varman veŝton.

– Ne, tiel mi ne povas, – diris Ipolit Matveeviĉ ruĝiĝante. – Bonvolu redoni la veŝton.

Delikata naturo de Ostap indigniĝis.

– Sed tio estas butikista konduto! – kriis li. Komenci cent-kvindek-milan aferon kaj malpaciĝi pro ok rubloj! Lerne vivi vaste!

Ipolit Matveeviĉ ruĝiĝis eĉ pli, elprenis etan notlibron, kaj enskribis kaligrafie:

24. 04. 1927. Donita al k. Bender R: 8.

Ostap enrigardis la libreton.

– Hej! Se vi jam malfermas konton por mi, do minimume gvidu ĝin ĝuste. Aranĝu debeton kaj krediton. En la debeton ne forgesu enigi sesdek mil rublojn, kiujn vi ŝuldas al mi, kaj en la krediton – la veŝton. Mia saldo: kvindek naŭ mil naŭcent naŭdek du rubloj. Ne malbone, ĉu?

Post tio Ostap ekdormis senbrue kaj infane. Ipolit Matveeviĉ demetis de si lanajn surpulaĵojn, baronajn botojn kaj, restinte en flikita ĉasista tolaĵo, nazosiblante pe-grimpis sub la litkovrilon. Al li estis tre maloportune. De ekstera flanko, kie ne sufiĉis la litkovrilo, estis malvarme,

sed de alia flanko lin bruligis juna, plena per vibrantaj ideoj korpo de la granda kombinanto.

Ĉiuj tri songis.

Vorobjaninov vidis nigrajn songojn: mikrobojn, krimulserĉistojn, velurajn tolstoĵ-jakojn, kaj ĉerkan majstron Bezenĉuk en smokingo, sed nerazitan.

Ostap vidis Fuji-vulkanon, estron de Buter-trusto, kaj na **Taras Bulba**¹⁷, vendanta poŝtkartojn kun vidaĵo de konstrua tereno de **Dnepra elektro-centralo**¹⁸.

Kaj la kortisto songis ke el la ĉevalejo foriris la ĉevalino. En la songo li serĉis ĝin ĝis la mateno mem kaj, ne trovinte, vekiĝis laca kaj malserena. Longe kaj mire rigardis li la homojn dormantajn en lia lito. Kompreninte nenion li prenis la balailon, kaj direktiĝis sur la straton plenumi siajn bazajn devojn: depreni ĉevalajn pomojn, kaj alkriaĉi la loĝantinojn-maljunulinojn.

Ĉapitro 7

Spuroj de “Titanik”

Ipolit Matveeviĉ vekiĝis laŭkutime en la sepa kaj duono, elmurmuris «*gut morgen*», kaj direktiĝis al la lavabo. Li lavis sin kun delico: elkraĉis la akvon, murmuris, kaj skuis la kapon, por liberiĝi de akvo trafinta la orelojn. Viŝi sin estis agrable sed, demetinte de sia vizaĝo la viŝtukon, Ipolit Matveeviĉ ekvidis ke ĝi estas malpurigita per tiu radikale nigra farbo per kiu, de hieraŭa tago, estis farbitaj liaj horizontalaj lipharoj. Koro de Ipolit Matveeviĉ

17. **Taras Bulba**: kozako, protagonisto de samnoma verko far Gogol.

18. Digo de la **centralo** estis konstruata tiam ĉe insulo kie iam troviĝis tendaro de dnepraj kozakoj.

estingiĝis. Li ĵetiĝis al sia poŝa speguleto. En la speguleto reflektiĝis lia granda nazo kaj verda, kiel juna herbeto, maldekstra parto de la lipharoj. Ipolit Matveeviĉ haste movis la speguleton dekstren. La dekstra parto estis de sama aĉa koloro. Klininte la kapon, kvazaŭ dezirante kornobati la speguleton, la malfeliĉulo ekvidis ke la radikala nigra koloro daŭre regas en la centro, sed ĉe la flankoj ĝi estas ĉirkaŭigita per sama herba bordero.

Tuta memo de Ipolit Matveeviĉ eligis ĝis tiom laŭtan ĝemon, ke Ostap Bender malfermis la okulojn.

– Vi frezeziĝis! – kriis Bender, kaj tuj fermis la dormemajn palpebrojn.

– Kamarado Bender, – petege flustris viktimo de “Titanik”.

Ostap vekigis post multaj puŝoj kaj petoj. Li atente alrigardis na Ipolit Matveeviĉ, kaj ĝoje ekridis. La ĉefa gvidanto de la laboroj kaj teknika direktoro konvulsiis, deturniĝinte de direktoro-fondinto de la koncesio. Li kaptis dorson de la lito, kriis: «Mi ne povas!», kaj furiozis denove.

– De via flanko tio estas nebone, kamarado Bender, – diris Ipolit Matveeviĉ, treme movante la verdajn lipharojn.

Tio donis freŝajn fortojn al jam laciĝinta Ostap. Lia sinceranima rido daŭriĝis ankoraŭ ĉirkaŭ dek minutoj. Trankviliginte la spiradon li tuj ekestis tre serioza.

– Kial vi rigardas min same malice kiel soldato pedikon? Vi rigardu vin mem!

– Sed la apotekisto diris al mi ke tio estos radikale nigra koloro. Ĝi forlaviĝas nek per malvarma, nek per varma akvo, nek per sapa ŝaŭmo, nek per keroseno... Kontra-banda varo.

– Ĉu kontrabanda? Tutan kontrabandon oni produktas en Odeso, sur Malaja Arnautskaja strato. Montru la flakonon... Rigardu. Ĉu vi legis tion?

– Legis.

– Kaj tion ĉi, etlitere? Ja ĉi tie estas klare skribite ke post lavo per malvarma kaj varma akvo, aŭ per sapa ŝaŭmo, aŭ per keroseno oni devas ne viŝi la harojn, sed sekigi ilin sub suno aŭ ĉe primuso... Kial vi ne sekigis? Kien vi iros nun kun tiu ĉi verdaĵo?

Ipolit Matveeviĉ estis premita. Eniris Tiĥon. Ekvidinte la mastron kun la verdaj lipharoj li krucsignis sin, kaj petis monon por la post-ebrieco.

– Donu rublon al la labor-heroo, kaj bonvolu ne enskribi al mia konto. Tio estas via intima afero kun via iama kunlaboranto... Atendu, patro, ne foriru, estas afereto.

Ostap komencis konversacii kun la kortisto pri la mebloj, kaj post kvin minutoj la koncesiuloj sciis jam ĉion. La tutan meblaron oni, en jaro 1919 forveturigis en la loĝejan fakon, krom unu gast-salona seĝo, kiu antaŭe troviĝis en posedo de Tiĥon, kaj poste estis forprenita de li per mas-trumisto de la dua domo de sociala provizo.

– Do ĝi estas ĉi tie, en la domo?

– Jes, tie ĝi staras.

– Kaj diru, amiketo, – rigidiĝante demandis Vorobjaninov, – ĉu vi... riparis la seĝon kiam ĝi estis ĉe vi?

– Ne eblis ripari ĝin. Dum antaŭa tempo laboro estis bonega. Tia seĝo povas elteni ankoraŭ tridek jarojn.

– Do iru, amiketo, prenu ankoraŭ rublon, kaj al neniuj diru pri mia alveturo.

– Tombo, civitano Vorobjaninov.

Forsendinte la kortiston, kaj kriinte: «Glacio ekmoviĝis», Ostap Bender denove turniĝis al lipharoj de Ipolit Matveviĉ.

– Endas denove farbi ilin. Donu la monon, mi iru en apotekon. Via “Titanik” taŭgas al nenio, nur hundojn farbi... Sed en antaŭa tempo, jes, tiam estis farbeto!.. Al mi unu ĉevalkonkura profesoro rakontis ekscitigan historion. Ĉu vi interesiĝis pri ĉevalkonkuroj? Ne? Bedaŭrinde. Ekscitiga afero. Do jen... Estis ja fama kombinanto, grafo Druckij. Li malgajnis en ĉevalkonkuroj kvincent milojn. Reĝo de malgajnoj! Kaj jen, kiam ĉe li restis nenio krom ŝuldoj, kaj la grafo pensis jam pri sinmortigo, unu friponeto donis al li, per kvindek rubloj, bonegan konsilon. La grafo forveturis, kaj post unu jaro revenis kun orlov-rasa trotulo-trijarulo. Post tio la grafo ne nur regajnis sian monon, sed eĉ gajnis ankoraŭ ĉirkaŭ tricent mil. Lia orlov-rasulo “Maklero”, kun perfekta atestilo, ĉiam venis unua. Dum unu grava ĉevala vetkurado ĝi je tuta korpo devancis na “Mak-Magon”. Tondro! Sed tiam Kuroĉkin (ĉu vi aŭdis?) rimarkas ke ĉiuj orlov-rasuloj komencas jam ŝanĝi la koloron, kaj nur “Makler” ne ŝanĝas ĝin. Skandalo estis eksterordinara! Al la grafo oni aljuĝis tri jarojn. Okazis ke “Maklero” estas ne orlov-rasulo, sed alikolorigita miksrasulo, kaj miksrasuloj estas multe pli viglaj ol orlov-rasuloj. Ilin al tiuj eĉ al kilometro ne alproksimigas. Nu, kiel?.. Tio vere estis farbeto! Ne tio kio sur viaj lipharoj!..

– Sed atestilo? Ĉe ĝi estis perfekta atestilo, ĉu?

– Sama atestilo kiel etikedo sur via “Titanik”: Falsa! Donu la monon por aĉeti farbon.

Ostap revenis kun nova miksturo.

– “Najado”. Eblas ke ĝi estas pli bona ol via “Titanik”. Demetu la jakon!

Komenciĝis ceremonio de rekolorigo. Sed “Mirinde kaŝtana koloro, aldonanta al la haroj teneron kaj pufecon”, miksiĝinte kun verdaĵo de “Titanik”, neatendite farbis kapon kaj lipharojn de Ipolit Matveeviĉ en kolorojn de suna spektro.

Vorobjaninov, ankoraŭ nenion manĝinta de la mateno, malice insultis ĉiujn parfum-varajn fabrikojn, kiel ŝtatajn tiel kontraŭleĝajn, troviĝantajn en Odeso sur Malaja Arnautskaja strato.

– Tiaj lipharoj forestas, verŝajne eĉ ĉe **Aristid Brian**¹⁹, – energie rimarkis Ostap, – sed vivi kun tiuj ultraviolaj haroj en Sovetia Rusio ne estas rekomendite. Necesas derazi ilin.

– Mi ne povas, – funebre respondis Ipolit Matveeviĉ, – tio ne eblas.

– Ĉu la lipharoj valoras al vi estiel memoraĵo?

– Mi ne povas, – ripetis Vorobjaninov, klininte la kapon.

– Tiam sidu vi tutan vian vivon en la kortistejo, kaj mi iru por preni la seĝojn. Bonokaze, la unua troviĝas super niaj kapoj.

– Razu!

Trovinte tondilon Bender momente deigis la lipharojn, kaj ili senbrue falis sur la plankon. Pe-inte la tondadon, la teknika direktoro prenis el la poŝo flaviĝintan razilon “Ĵilet” (Gillette), kaj el la monbiletujo – rezervan klingon, kaj komencis razi preskaŭ plorantan Ipolit Matveeviĉ.

– Lastan klingon mi eluzas por vi. Ne forgesu enskribi al mia debeto du rublojn pro la razado kaj tondado.

19. **Aristid Brian**: (Briand, 1862-1932), multfoja ĉefministro de Francio.

Konvulsiante pro la ĉagreno Ipolit Matveeviĉ tamen demandis:

– Kial tiel multekoste? Ĉie tio kostas kvardek kopekojn!

– Pro la sekreteco, kamarado kamp-marŝalo, – rapide respondis Bender.

Suferoj de homo, kapon de kiu oni razas per sendanĝera razilo, estas neimageblaj. Ipolit Matveeviĉ komprenis tion dum komenco mem de la operacio.

Sed fino, kio okazas al ĉio ajn, venis.

– Prete. La kunsido daŭriĝas! Nervemulojn oni petas ne rigardi! Nun vi similas faman kanzoniston Boborikin.

Ipolit Matveeviĉ deskuis de si abomenajn tufojn, kiuj antaŭ tiel nelonge estis belaj grizaĵoj, lavis sin kaj, sentante sur la tuta kapo fortan bruladon, jam centan fojon hodiaŭ fiksas la okulojn en la spegulon. Tio kion li ekvidis subite ekplaĉis al li. Lin rigardis deformita pro la suferoj, sed sufiĉe juna vizaĝo de senlabora aktoro.

– Nu, marŝu ni antaŭen, la trumpeto vokas! – kriis Ostap. – Mi – en la loĝejan fakon aŭ, pli ĝuste, en la domon kie ĝi troviĝis, kaj vi – al la maljunulinoj!

– Mi ne povas, – diris Ipolit Matveeviĉ, – al mi estos tre malfacile eniri la propran domon.

– Ha, jes!.. Emociiga historio! Barono-elpelito. Bone. Iru vi en la loĝejan fakon, kaj ĉi tie laborados mi. Kuniĝa punkto – en la kortistejo. Taĉmento, marŝ!

Ĉapitro 8

Blua ŝtelisteto

Mastrumisto de Stargoroda 2-a domo de social-provizo estis sinĝena ŝtelegulo. Tuta lia esenco protestis kontraŭ ŝteloj, sed li ne povis ne ŝteli. Li ŝtelis kaj hontis. Ŝtelis li konstante, konstante hontis, tial liaj bone razitaj vangetoj ĉiam brulis per vangoruĝo de sinĝeno, honto kaj konfuzo. Nomo de la mastrumisto estis Aleksandr Jakovleviĉ, kaj tiu de lia edzino – Aleksandra Jakovlevna. Li nomis ŝin Saŝen, ŝi nomis lin Alĥen. Mondo ankoraŭ ne vidis tian bluan ŝtelisteton kiel Aleksandr Jakovleviĉ.

Li estis ne nur mastrumisto, sed ankaŭ estro. Antaŭan estron oni eksigis, pro la kruda rilato al la edukitinoj, kaj sendis esti dirigente de simfonia orkestro. Alĥen per nenio memorigis sian needukitan estron. Por pli bona uzo de la labora tago li prenis sur sin estradon de la domo. La pensionulinojn li rilatis ege ĝentile, enigante gravajn reformojn kaj novigojn.

Ostap Bender tiris pezan kverkan pordon de izoldomo de Vorobjaninov, kaj ekestis en la vestiblo. Ĉi tie sentiĝisodoro de iom bruligita kaĉo. El supraj ejoj aŭdiĝis diversvoĉado, simila al malproksima «hura»en batal-linio. Ĉi tie estis neniu, kaj neniu aperis. Supren gvidis duparta kverka ŝtuparo kun iam lakitaj ŝtupoj. Nun el ili elstaris nur ringoj, sed kupraj vergoj, iam premantaj tapiŝon al la ŝtupoj, jam forestis.

«La gvidanto de *komanĉoj* vivis, tamen, en vulgara lukso», – pensis Ostap, irante supren.

En unua jam ĉambro, luma kaj vasta, sidis ronde ĉirkaŭ dek kvin grizetaj maljunulinoj en roboj el plej malmultekosta mus-kolora kalikoto. Streĉe etendante la kolojn,

kaj rigardante starantan en la centro florantan viron, la maljunulinoj kantis:

Jen aŭdeblas tintad' malproksima:
de ĉevala triopo arpeĝ'.
Kaj ĉirkaŭe vastiĝas senfine
mortotuk' fajretanta de l' neĝ'...

Estro de la koruso, en griza tolstoĵ-jako el sama kalikoto, kaj en kalikota pantalono, montris la takton per la ambaŭ manoj, kaj turniĝante alkriadis:

– Sopranulinoj, malpli laŭte! Kukuŝkina, malpli forte!

Li ekvidis na Ostap, sed, ne sukcesante halti movojn de siaj manoj, nur neamike alrigardis la enveninton, kaj daŭrigis. La ĥoro pene tondris, kvazaŭ tra kuseno:

Ta-ta-ta, ta-ta-ta, ta-ta-ta.
To-ro-rom, tu-ru-rum, tu-ru-rum...

– Diru, kie oni povas vidi ĉi tie kamaradon mastrumiston? – diris Ostap, uzinte plej proksiman paŭzon.

– Pri kio temas, kamarado?

Ostap donis al la ĥor-gvidanto la manon, kaj amike demandis:

– Ĉu diverspopolaj kantoj? Tre interese. Mi estas incendi-inspektisto.

La mastrumisto ekhontis.

– Jes, jes, – diris li, konfuziĝante, – tre bonokaze. Mi eĉ raporton intencis verki.

– Vi tute ne devas maltrankviliĝi, – bonanime deklaris Ostap, – mi mem verkos la raporton. Nu, komencu ni priirigardi la ejojn.

Alĥen per movo de la mano liberigis la ĥoron, kaj la maljunulinoj foriris per ĝojaj paŝetoj.

– Bonvolu postsekvi min, – invitis la mastrumisto.

Antaŭ ol iri pluen Ostap fiksas la rigardon sur meblojn de la unua ĉambro. En la ĉambro staris: tablo, du parkaj benkoj kun feraj piedoj (sur dorso de unu el ili estis profunde tranĉita virnomo “Kola»), kaj rufa frapharmoniko.

– En tiu ĉi ĉambro oni ne bruligas primusojn, ĉu? Por-tempaj fornoj kaj tiel plu?

– Ne, ne. Ĉi tie ĉe ni funkcias rondetoj: ĥora, drama, de plastikaj artoj, kaj muzika...

Veninte al vorto “muzika”, Aleksandr Jakovleviĉ ruĝiĝis. Komence ekbrulis la mentono, poste la frunto kaj la vangoj. Alĥen sentis egan honton. Li jam delonge vendis ĉiujn blov-muzikilojn. Tutegale malfortaj pulmoj de la mal-junulinoj sukcesis elblovi el ili nur hundidan jelpon. Estis ridinde vidi tiun ĉi amason da metalo en ĝis tiom senhelpa stato. Alĥen ne povis deteni sin de ŝtelo de la muzikiloj. Tial li sentis nun egan honton.

Sur la muro, vastiĝinte de fenestro al fenestro, pendis slogano, plenumita per blankaj literoj sur peco de mus-kolora kalikoto:

«Blovorkestro – vojo al kolektiva kreado».

– Tre bone, – diris Ostap, – ĉambro por rondetaj okupoj prezentas neniun danĝeron de incendia vidpunkto. Iru ni pluen.

Trairante rapidpaŝe fasadajn ĉambrojn de izoldomo de Vorobjaninov Ostap nenie rimarkis nukslignan seĝon kun kurbaj piedetoj, tegitan per angla flordesegnita katuno. Sur muroj el glatigita marmoro estis disgluitaj ordonoj por loĝantoj de domo numero du de stargoroda social-provizo. Ostap legis ilin, tempo de tempo energie demandante: «Ĉu fumajn tubojn oni purigas regule? Ĉu la fornoj estas en ordo?». Ricevante detalajn respondojn li moviĝis pluen.

La inspektisto de incendi-gardado pene serĉis en la domo eĉ unu anguleton, prezentantan danĝeron de incendio vidpunkto, sed ĉi-rilate ĉio estis bonstata. Tamen la serĉado estis senfrukta. Ostap eniris la dormejojn. La maljunulinoj dum lia apero leviĝadis kaj profunde kliniĝis antaŭ li. Ĉi tie staris litoj, kovritaj per litkovriloj, vil-surfacaj kiel hunda felo. Sur unu flanko de ili estis teksita, fabrik-maniere, vorto “Piedoj”. Sub la litoj staris kofretoj, elŝovitaj, laŭ iniciato de Aleksandr Jakovleviĉ, kiu ŝatis militan ordon, ĝuste je triono.

Ĉio en la domo numero du mirigis per sia superflua modesteco: kaj la meblaro, konsistanta ekskluzive el parkaj benkoj, alveturitaj el Aleksandrov-bulvardo, nun bulvardo je nomo de Proletaj **labor-sabatoj**²⁰, el bazaraj kerosenaj lampoj, kaj el la litkovriloj kun timiga vorto “Piedoj”. Nur unu afero en la domo estis farita fortike kaj pompe: tio estis pordaj risortoj.

Pordaj aparatoj estis pasio de Aleksandr Jakovleviĉ. Pene laborante li provizis ĉiujn senescepte pordojn per risortoj de plej diversaj sistemoj kaj fasonoj. Ĉi tie estis simplaj fer-stangaj risortoj. Estis risortoj aerpremaj kun kupraj cilindraj pumpiloj. Estis aparatoj blokaj, kun sobiĝantaj pezaj saketoj, plenigitaj per plumbograjnoj. Estis ankaŭ risortoj konstrukciitaj tiel komplike, ke social-proviza seruristo nur mire balancis la kapon. Ĉiuj ĉi cilindroj, risortoj kaj pezaĵoj posedis herkulon forton. La pordoj frapiĝis same impete kiel pordetoj de muskaptiloj. La tuta domo tremis pro laboro de tiuj ĉi mekanismoj. La maljunulinoj kun malgaja kvivito saviĝis de la atakantaj ilin pordoj, sed oni ne ĉiam sukcesis forkuri. La pordoj atingis la forkuran-

20. **Labor-sabatoj**: senpaga, kvazaŭvolontula laboro dum ripoztagoj.

tinojn, puŝis ilin je la dorso, kaj de supre kun obtuza grako jam falis la pezaĵo, preterfluganta la tempion kiel kuglego.

Kiam Bender kaj la mastrumisto iris en la domo, la pordoj salutis ilin per teruraj frapoj.

Sed post tiu ĉi fortikeja lukso kaŝiĝis nenio: la seĝo forestis. Serĉante incendian danĝeron la inspektisto trafis la kuirejon. Tie en granda kaldrono por boligo de tolaĵoj kuiriĝis kaĉo, odoron de kiu la granda kombinanto sentis jam en la vestiblo. Ostap turnadis la nazon kaj diris:

– Kio, ĉu kun lubrika oleo?

– Je Dio, kun pura butero! – diris Alĥen, ruĝiĝante ĝis larmoj. – Ni en farmo aĉetas.

Al li estis ege honte.

– Tamen tio ne prezentas incendian danĝeron, rimarkis Ostap.

La seĝo forestis ankaŭ en la kuirejo. Tie estis nur tabureto, sur kiu sidis kuiristo en antaŭtuko, kaj en kuirista ĉapo el kalikoto.

– Kial ĉiuj vestaĵoj ĉe vi estas grizaj, kaj la ŝtofo estas tia, ke oni per ĝi fenestrojn viŝu?

La hontema Alĥen eĉ pli mallevis la okulojn.

– Oni kreditas nesufiĉe.

Li estis abomena al si mem.

Ostap dube alrigardis lin kaj diris:

– Al kontraŭ-incendia gardado, kiun mi ĉi-momente prezentas, tio ne rilatas.

Alĥen ektimis.

– Kontraŭ incendio, – deklaris li, – ni aranĝis ĉiujn rimedojn. Estas eĉ ŝaŭma estingilo “Ekler”.

La inspektisto, enrigardante laŭvoje la kameretojn, nevolonte ekiris al la estingilo. La ruĝa lada konuso, kvankam tio estis sola aĵo en la domo kiu rilatis al kontraŭ-

incendia gardado, elvokis en la inspektisto specifan agacon.

– Ĉu vi aĉetis ĝin en pulbazarro?

Kaj, ne atendente respondo de kiel per fulmo trafita Aleksandr Jakovleviĉ, li deprenis na “Ekler” de la rustiĝinta najlo, senaverte disbatis la kapsulon, kaj rapide turnis la konuson supren. Sed anstataŭ atendita ŝaŭma elŝpruco la konuso eligis el si altan siblon, memorigantan antikvan melodion «Ĝis kiom glora estas nia Mastro en Ciono».

– Certe en pulbazarro, – konfirmis Ostap sian antaŭan opinion, kaj pendigis la daŭrigantan kanti fajroestingilon sur ĝian lokon.

Akompanataj per la siblado ili ekiris pluen.

«Kie ĝi povas esti?» – pensis Ostap. – «Tio komencas jam ne plaĉi al mi». Kaj li decidis ne lasi la kalikotan palacon ĝis li ekscios ĉion.

Dum la inspektisto kaj la mastrumisto grimpis en la subtegmentejojn, enirante ĉiujn detalojn de la kontraŭincendia gardado, kaj dispozicion de la fumkondukiloj, la 2-a domo de stargoroda social-provizo vivis sian ĉiutagan vivon.

La tagmanĝo estis jam preta. Odoro de iom bruligita kaĉo signife plifortiĝis, kaj superis ĉiujn aliajn acidajn odorojn, vivantajn en la domo. En la koridoroj ekaŭdiĝis susuro. La maljunulinoj, per ambaŭ manoj portante antaŭ si ladajn teleretojn kun la kaĉo, singarde eliris el la kuirejo, kaj eksidis tagmanĝi ĉe la komuna tablo, penante ne rigardi sloganojn dispendigitajn en la manĝoĉambro, verkittajn persone far Aleksandr Jakovleviĉ, kaj arte plenumittajn far Aleksandra Jakovlevna. La sloganoj tekstis:

«NUTRAJO ESTAS FONTO DE SANO»

**«UNU OVO ENHAVAS SAMAN KVANTON DA GRASOJ
KIEL KVARONKILOGRAMO DA VIANDO»**

**«ZORGEME MAĈANTE LA NUTRAJOJN
VI HELPAS AL SOCIO»**

kaj:

«VIANDO MALUTILAS»

Ĉiuj ĉi sanktaj vortoj vekis en la maljunulinoj rememorojn pri malaperintaj ankoraŭ ĝis revolucio dentoj, pri ovoĵ, kiuj malaperis proksimume dum sama tempo, pri viando, kiu cedas per kvanto da grasoj al ovoĵ, kaj, eble, pri socio, al kiu ili ne havas eblecon helpi, zorgeme maĉante la manĝaĵojn.

Krom la maljunulinoj ĉe la tablo sidis Isidor Jakovleviĉ, Afanasij Jakovleviĉ, Oleg Jakovleviĉ kaj Paŝa Emileviĉ. Tiuj ĉi junaj homoj harmoniis kun taskoj de sociala provizo nek per la aĝo, nek per la sekso, tamen la kvar Jakovleviĉoj estis junaj fratoj de Alĥen, kaj Paŝa Emileviĉ – kuza nepo de Aleksandra Jakovlevna. La junaj homoj, plej aĝa el kiuj estis 32-jara Paŝa Emileviĉ, ne opiniis sian troviĝon en la domo de sociala provizo estiel io nenormala. Ili loĝis en la domo samrajte al la maljunulinoj, ankaŭ ĉe ili estis fiskaj lit-tolaĵoj kun la litkovriloj, sur kiuj estis skribite “Piedoj”. Vestitaj ili estis, same al la maljunulinoj, en musan kalikoton. Sed, danke al siaj juneco kaj forto, ili nutris sin pli bone ol la edukitinoj. Ili ŝtelis en la domo ĉion kion ne sukcesis forŝteli Alĥen. Paŝa Emileviĉ sola scipovis formanĝi unufoje du kilogramojn da peklitaj fiŝetoj, kion li foje faris, lasinte la tutan domon sen la tagmanĝo.

Dum la maljunulinoj ankoraŭ ne sukcesis detale gustumi la kaĉon, ĉiuj Jakovleviĉoj kune kun Emileviĉ, pe-

glutinte siajn porciojn, kaj brue eligante tra la gorĝoj la gasojn, lasis la tablon, kaj iris en la kuirejon serĉi ion digesteblan.

La tagmanĝo daŭriĝis. La maljunulinoj ekbruais:

– Nun manĝegos ili, kaj komencos kantojn elkriaĉi!

– Kaj Paŝa Emileviĉ, hodiaŭ matene, el **ruĝa anguleto**²¹ la seĝon forvendis. Tra neparada eniro elportis li ĝin al aĉetanto.

– Vidos vi, hodiaŭ ebria li venos...

Tiuminute konversacio de la edukitinoj estis ĉesigita per trumpeta nazpurigado, kiu superis eĉ daŭrigantan kantadon de la estingilo, kaj bovina voĉo komencis:

– ... invent...

La maljunulinoj kliniĝinte, kaj ne retrorigardante la **laŭtparolilon**²², starantan en angulo sur la lavita pargeto, daŭrigis la manĝadon, esperante ke tiu ĉi malagrablaĵo preterpasos ilin. Sed la laŭtparolilo vigle daŭrigis:

– Evokrrraĥĥĥ viduso... valora inventaĵo. Voj-majstro de Murmanska fervojo kamarado Sokuckij: Samara, Orjol, Kleopatro, Ustinja, Caricin, Klementij, Ifigenio, Jork, – Sokuc-kij...

La tubo raŭke enigis en sin aeron kaj, per nazkatara voĉo, renovigis la elsendon:

– ...inventis luman signaladon por neĝ-purigaj vagonoj. La invento estas aprobita per Dorizul: Darja, Onega, Rajmond...

La maljunulinoj kiel grizaj anasinoj naĝis en siajn ĉambrojn. La tubo, saltante pro sia fortego, daŭrigis furiozi en la malplena ĉambro:

21. **Ruĝa anguleto**: loko destinita por propagandaĵoj.

22. **Laŭtparolilo**: oni komencis jam unu-stacian per-dratan radioelsendadon.

...Kaj nun aŭskultu Novgorodajn popol-kanzonetojn...

Ege malproksime, en centro de Tero mem, iu tuŝis kordojn de balalajko, kaj hum-grunda Battistini ekkantis:

Sur la muro cimoj loĝis,
sidis kaj promenis.
Ekvidinte inspektiston
ĉiuj ili svenis.

En centro de Tero tiu ĉi kanzono elvokis tempestan aktivecon. El la tubo aŭdiĝis terure forta murmuro. Tio estis ĉu tondraj aplaŭdoj, ĉu agado de subteraj vulkanoj.

Dume la malsereniĝinta inspektisto de incendia gardado sobiĝis dorse per subtegmenta ŝtupetaro kaj, denove okazinte en la kuirejo, ekvidis kvinon da civitanoj, kiuj senpere per siaj manoj elfosis el la barelo peklitan brasikon kaj manĝegis ĝin. Ili manĝis silente. Nur Paŝa Emileviĉ gurmane turnadis la kapon kaj, demetante de la lipharoj brasikajn algojn, pene diris:

– Estas peke manĝi tian brasikon sen vodko.

– Ĉu nova grupo da maljunulinoj? – demandis Ostap.

– Tio estas orfoj, – respondis Alĥen, per la ŝultro elpremante la inspektiston el la kuirejo, kaj nerimarke minacante al la orfoj per la pugno.

– Ĉu infanoj el **ĉe-volga**²³ regiono?

Alĥen konfuziĝis.

– Ĉu malfacila heredo de cara reĝimo?

Alĥen disigis la manojn, kvazaŭ li volis diri: «sed kion oni povas fari se ekzistas tiu ĉi heredo».

– Ĉu komuna edukado de ambaŭ seksoj per kompleksa metodo?

23. **ĉe-volga** regiono: regiono kiun, en jaro 1921, trafis severa malsato.

Konfuziĝema Aleksandr Jakovleviĉ surloke, senprokraste, invitis la incendi-inspektiston tagmanĝi kion Dio sendis.

Ĉi-tage Dio sendis al tagmanĝo de Aleksandr Jakovleviĉ botelon da brando, fungetojn de hejma peklado, pladon de hakita haringo, ukrainan barĉon kun viando de plej alta kvalito, kokinon kun rizo, kaj kompoton el sekigitaj pomoj.

– Saŝhen, – diris Aleksandr Jakovleviĉ, – konatiĝu kun la kamarado el gubernia incendi-gardejo.

Ostap aktore kliniĝis antaŭ estrino de la hejmo, kaj deklaris al ŝi tiel longegan kaj dusencan komplimenton, ke eĉ ne sukcesis pe-i ĝin. Saŝhen, altkreska virino, simpatieco de kiu estis iom malbeligita per vangobarboj en stilo de caro Nikolao, mallaŭte ekridis, kaj drinkis kune kun la viroj.

– Mi drinkas je via komunuma mastrumejo! – eksklamaciiis Ostap.

La tagmanĝo pasis gaje, kaj nur ĉe la kompoto Ostap rememoris pri celo de sia vizito.

– Kial, – demandis li, – inventaro en via laktaĵ-entrepreno estas tiel malabunda?

– Kial ja, – eknervozigis Alĥen, – kaj la frapharmoniko?

– Ja scias mi, scias, *voks humanum*. Sed estas absolute neeble plezure sidadi ĉe vi. Nur parkaj lignaĵoj.

– En la ruĝa anguleto estas seĝo, – ofendiĝis Alĥen, – angla seĝo. Onidire de iama meblaro ĝi restis.

– Kaj mi, bonokaze, ne vidis vian ruĝan anguleton. Kiel ĝi, en senco de incendia gardado? Ĉu danĝeras? Indas rigardi ĝin.

– Bonvenon.

Ostap dankis la mastrinon pro la tagmanĝo, kaj ek-moviĝis.

En la ruĝa anguleto oni ne bruligis primusojn, portempaj fornoj tie forestis, la fumkondukiloj estis bonordaj, kaj estis purigataj regule, sed la seĝo, al ega miro de Alĥen, forestis. Oni ĵetiĝis serĉi la seĝon: enrigardis sub la litojn kaj sub la benkojn, deŝovis por io la frapharmonikon, pridemandis la maljunulinojn, kiuj time rigardis na Paŝa Emileviĉ, sed la seĝon oni ne trovis. Paŝa Emileviĉ elmontris grandan penadon en serĉado de la seĝo. Ĉiuj jam trankviliĝis, sed Paŝa Emileviĉ daŭre vagis tra la ĉambroj, rigardis sub karafojn, deŝovadis ladajn teajn kruĉojn, kaj murmuris:

– Sed kie ĝi povas esti? Hodiaŭ ĝi estis, ja per propraj okuloj mi vidis ĝin! Tio ridindas eĉ.

– Estas malgaje, fraŭlinoj, – per glacia voĉo diris Ostap.

– Tio eĉ ridindas! – impertinente ripetis Paŝa Emileviĉ.

Sed tiam ŝaŭmo-ĵetilo “Ekler”, daŭriganta la kantadon, prenis plej altan tonon fa, kiun scipovas nur popola aktorino de rusa respubliko Neĵdanova, eksilentis por momento kaj, kriante, eligis sian unuan ŝaŭman elŝprucon, kiu superverŝis la plafonon, kaj forbatis de kapo de la kuiristo ties kalikotan kuiristan ĉapon. Post la unua elŝpruco la ŝaŭmoestingilo elĵetis duan ŝprucon de kalikota koloro, kiu faligis neplenaĝan Isidor Jakovleviĉ. Post tio tiu ĉi “Ekler” ekfunkciis senprobleme.

Al loko de la okazaĵo ĵetiĝis Paŝa Emileviĉ, Alĥen, kaj ĉiuj nedifektitaj Jakovleviĉ-oj.

– Brila laboro! – diris Ostap. Elpensado de idioto!

La maljunulinoj, restintaj kun Ostap sole, sen la estraro, tuj komencis deklari siajn pretendojn:

– La parencojn enloĝigis li en la domon. Manĝegas ili.
– La porkidojn per lakto li nutras, sed al ni kaĉon ŝovas.

– Ĉion el la domo forportis li.
– Trankvilon, fraŭlinoj, – diris Ostap depaŝante, – por tio oni venos al vi el labor-inspekcio. Senato ne rajtigis min pri tio.

Sed la maljunulinoj ne aŭskultis.

– Kaj Paŝa Mileviĉ, tio estas li kiu forportis kaj vendis hodiaŭ tiun ĉi seĝon. Mi mem vidis.

– Al kiu? – kriis Ostap.

– Vendis kaj ĉio. Mian litkovrilon li volis vendi.

En la koridoro daŭriĝis senkompata batalo kontraŭ la fajroestingilo. Fine la homa genio venkis, kaj la ŝaŭmo-elĵetilo, platigita per feraj piedoj de Paŝa Emileviĉ, eligis lastan velkan elŝprucon, kaj eksilentis por ĉiam.

La maljunulinojn oni sendis lavi la plankon. La inspektisto pri kontraŭ-incendia gardado klinis la kapon kaj, iom balancigante la koksojn, venis al Paŝa Emileviĉ.

– Unu mia konato, – diris Ostap konvinke, – ankaŭ vendis fiskajn meblojn. Nun li ekestis monaĥo: sidas en malliberejo.

– Al mi strangas tiuj ĉi viaj senbazaj akuzoj, – rimarkis Paŝa Emileviĉ, de kiu disvastiĝis fortaodoro de la ŝaŭmaj elŝprucoj.

– Al kiu ci vendis la seĝon? – demandis Ostap per sonoranta flustro.

Tiam Paŝa Emileviĉ, kiu posedis eksterordinaran intuicion, komprenis ke oni tuj batos lin, eblas eĉ ke per piedoj.

– Al brokantisto, – respondis li.

– Adreso?

– Mi vidis lin unuan fojon en la vivo.
– Ĉu unuan fojon en la vivo?
– Je Dio.
– Batus mi cian muzelaĉon, – reveme informis Ostap,
– sed Zoroastro ne permesas. Nu, iru vi al diabla patrino.
Paŝa Emileviĉ flateme ekridetis, kaj komencis deiri.
– Hej, ci, viktimo de aborto, – malhumile diris Ostap, –
haltu, ne debordiĝu. Ĉu la brokantisto estas blondulo,
brunulo?

Paŝa Emileviĉ komencis detale klarigi. Ostap atente
aŭskultis lin, kaj finis la intervjuon per la vortoj:

– Sendube tio tute ne rilatas kontraŭ-incendian garda-
don.

En la koridoro al foriranta Bender venis hontema
Alĥen, kaj donis al li dekrublaĵon.

– Tio estas cent-dek-kvara paragrafo de krima
kodekso, – diris Ostap, – subaĉeto de ofica persono dum
plenumo per tiu de siaj oficaĵ devoj.

Sed la monon li prenis kaj, ne adiaŭante na Aleksandr
Jakovleviĉ, direktiĝis al la eliro. La pordo, provizita per for-
tega aparato, pene malfermiĝis, kaj donis al Ostap duon-
tunan puŝon je la postaĵon.

– La frapo efektiviĝis, – diris Ostap, frotante la batitan
lokon, – la kunsido daŭriĝas!

Ĉapitro 9

Sed kie estas viaj bukloj?

Dum Ostap pririgardis 2-an domon de stargoroda social-provizo, Ipolit Matveeviĉ, elirinta el la kortistejo, kaj sentanta malvarmon per la razita kapo, iris sur la stratoj de la intima urbo.

Sur la pavimo fluis klara printempa akvo. Aŭdiĝis senĉesa krakado kaj frapetado de brilantaj gutoj, falantaj de tegmentoj. Paseroj ĉasis ĉevalajn elĵetaĵojn. La suno sidis sur ĉiuj tegmentoj. Oraj ĉevalegoj speciale laŭte ton-drís per siaj hufoj sur nudiĝinta pavimo kaj, mallevante la orelojn, plezure aŭskultis sian propran frapadon. Sur malsekaj telegrafaj fostoĵ kunpremiĝis malsekaj anoncetoĵ kun disfluitaj literoj: «Instruas ludi gitaron per cifera metodo» kaj «Kurso de komunum-scienco por preparantaj sin al popola konservatorio». Plotono da ruĝarmeanoj en vintraj kapvestoj trairis flakon, kiu komenciĝis ĉe vendejo de Stargiko kaj daŭriĝis ĝis konstruaĵo de gubernia planadejo, frontono de kiu estis kronita per gipsaj tigroj, diinoj de venko, kaj kobroj. Ipolit Matveeviĉ iris, kun intereso pririgardante renkontajn kaj transversajn paŝantojn. Li, kiu dum tuta sia vivo kaj dum la revolucio vivis en Rusio, ekvidis nun kiel rompiĝas, renversiĝas kaj ŝanĝiĝas la ĉiutageco. Li jam alkitimiĝis al tio, sed okazis ke li alkitimiĝis nur en unu punkto de Tero: en distrikta urbo No. Enveturinte la intiman urbon li ekvidis ke komprenas nenion. Li sentis sin maloportune kaj strange, kvazaŭ li vere estas elmigrinto nur nun veninta el Parizo. En iama tempo, traveturende la urbon en kaleŝo, li nepre renkontis konatulojn aŭ laŭvizaĝe konatajn homojn. Nun li trairis jam kvar blokojn sur strato de Ĉe-Lena-okazaĵoj, sed konatuloj ne

renkontiĝis. Ili malaperis aŭ, eble, maljuniĝis tiel ke oni ne povis rekoni ilin, aŭ, povas esti, iĝis nereconeblaj, ĉar portis aliajn vestojn, aliajn ĉapelojn. Eblas ke ili ŝanĝis la irmanieron. Sed fakto estas ke ili forestis.

Ipolit Matveeviĉ iris pala, malvarma, perdita. Li tute forgesis ke li devas serĉi loĝej-oficejon. Li transiris de trotuaro sur trotuaron, kaj turnis sin en stratetojn, kie senbridiĝintaj ĉevaloj jam tute speciale frapadis per la hufoj. En stratetoj estis pli da vintro kaj, kelkloke renkontiĝis pu-triĝanta glacio. La tuta urbo ŝanĝis la koloron. Bluaj domoj ekestis verdaj, flavgrizaj; de la fajrobrigadista turo malaperis la signalaĵoj, sur ĝia supro ne paŝadis jam fajrobrigadisto, kaj sur la stratoj estis pli brue, ol tio memoriĝis al Ipolit Matveeviĉ.

Sur Granda Puŝkin-strato na Ipolit Matveeviĉ mirigis neniam viditaj en Stargorod tramaj reloj kaj fostoj kun dra-toj. Ipolit Matveeviĉ ne legis ĵurnalojn, kaj ne sciis ke al la unua de majo oni intencas lanĉi en Stargorod du tramajn liniojn: Fervojestacian kaj Bazaran. Jen ŝajnis al Ipolit Matveeviĉ ke li neniam lasis na Stargorod, jen Stargorod prezentiĝis al li estiel loko tute nekonata.

Pensante tiel li venis ĝis strato Marks kaj Engels. Ĉi-loke al li revenis infana sento ke jen, el post angulo de du-etaĝa domo kun longa balkono, nepre devas eliri konatulo. Ipolit Matveeviĉ eĉ haltis, atendente. Sed konatulo ne eliris. Komence el post la angulo aperis vitristo kun skatolo da vitro kaj bulo da kupro-kolora mastiko. Elŝoviĝis dando en ŝama kaskedo kun leda flava viziero. Post li elkuris infanoj, unuagradaj lernantoj kun rimenigitaj libroj.

Subite Ipolit Matveeviĉ eksentis varmegon en la plan-doĵ, kaj malvarmeton en la ventro. Rekte sur lin iris ne-konata civitano kun bonanima vizaĝo, tenante seĝon,

kvazaŭ tio estis violonĉelo. Ipolit Matveeviĉ, kiun neaten-
dite ekposedis hikado, enrigardis, kaj tuj rekonis sian
seĝon.

Jes! Tio estis seĝo far majstro Hambs, tegita per
angla flordeseĝnita katuno malheliĝinta en revoluciaj tem-
pestoj, tio estis la nuksa seĝo kun kurbaj piedetoj. Ipolit
Matveeviĉ eksentis sin tiel kvazaŭ oni pafis apud lia orelo.

– Akrigi tranĉilojn, tondilojn kaj razilojn! – kriis prok-
sime baritona baso.

Kaj tuj ekaŭdiĝis alta eĥo:

– Luti, ripari!...

– Moskva ĵurnalo “Novaĵoj”, gazeto “Ridulo”, “Ruĝa
kamparo”!..

Ile supre oni kun tintado elrompis vitron. Preterveturis,
tremigante la urbon, kamiono de Muelej-konstruo. Fajfis
policisto. Vivo bolis kaj verŝiĝis trans la randojn. Oni ne
povis perdi la tempon.

Ipolit Matveeviĉ per leoparda salto proksimiĝis al la
indigniga nekonato, kaj silente ektiris la seĝon al si. La ne-
konato ektiris la seĝon reen. Tiam Ipolit Matveeviĉ, tenante
la piedeton per la maldekstra mano, komencis forte deŝiri
de la seĝo dikajn fingrojn de la nekonato.

– Rabo, – flustre diris la nekonato, tenante la seĝon
pli forte.

– Permesu, permesu, – murmuris Ipolit Matveeviĉ,
daŭre forgluante fingrojn de la nekonato.

Ekis kolektiĝi homamaso. Tri, proksimume, homoj sta-
ris jam proksime, kun vigla intereso observante disvolviĝon
de la konflikto.

Tiam ili ambaŭ retrorigardis time kaj, ne rigardante
unu la alian, sed ne ellasante la seĝon el la kroĉaj manoj,
rapide ekiris antaŭen, kvazaŭ okazis tute nenio.

«Sed kio estas tio?» – furioze pensis Ipolit Matveeviĉ.

Kion pensis la nekonato oni ne povis kompreni, sed irmaniero lia estis plej decida.

Ili iris pli kaj pli rapide kaj, ekvidinte en senhoma interstrateto neuzitan terenon, supersutitan per gruzo kaj konstrumaterialoj, samtempe turniĝis tien. Ĉi tie fortoj de Ipolit Matveeviĉ kvarobliĝis.

– Permesu ja! – kriis li jam senĝene.

– Po-li-ico! – preskaŭ neaŭdeble kriis la nekonato.

Kaj ĉar manoj de ili ambaŭ estis okupataj per la seĝo, ili komencis bati unu la alian per la piedoj. Botoj de la nekonato estis provizitaj per feraĵetoj kaj, komence, al Ipolit Matveeviĉ ekestis sufiĉe malbone. Sed li rapide adaptiĝis kaj, saltante ĉu dekstren ĉu maldekstren, kvazaŭ dancante, evitis batojn de la kontraŭulo, kaj penis trafi ventron de la malamiko. Trafi la ventron li ne sukcesis, ĉar la seĝo malhelpis al li, sed kompanse li trafis genuan oston de la kontraŭulo, post kio tiu ekpovis kalcitri nur per la maldekstra piedo.

– Ho Dio! – flustris la nekonato.

Kaj tiam Ipolit Matveeviĉ ekvidis ke la nekonato, kiu per plej indigna maniero forŝtelis lian seĝon, estas neniuj alia ol pastro de preĝejo je nomo de Flor kaj Lavr: patro Fjodor Vostrikov.

Ipolit Matveeviĉ konsterniĝis.

– Patro! – kriis li, pro la miro demetante la manojn de la seĝo.

Patro Vostrikov viol-koloriĝis kaj, fine, malstreĉis la fingrojn. La seĝo, per neniuj subtenata, falis sur la rompitajn brikojn.

– Kie estas viaj lipharoj, estimata Ipolit Matveeviĉ? – kun plej ebla sarkasmo demandis la eklezia persono.

– Kaj viaj bukloj, kie ili estas? Ja vi havis buklojn, ĉu?

Neeltenebla malestimo aŭdiĝis en vortoj de Ipolit Matveviĉ. Li superversis patron Fjodor per rigardo de eksterordinara nobleco kaj, prenintela la seĝon sub la brakon, turniĝis por foriri. Sed patro Fjodor, liberiĝinta jam de la konfuziĝo, ne donis al Vorobjaninov venki tiel facile. Kun krio: «Ne, mi petas vin», li denove kaptiĝis je la seĝo. Restaŭriĝis la antaŭa pozicio. La malamikoj staris, kaptinte la seĝan piedetojn kiel katoj aŭ boksistoj; ili mezuris unu la alian per la rigardoj, paŝante de flanko al flanko.

La koron kaptanta paŭzo daŭriĝis tutan minuton.

– Do tio estas vi, sankta patro, – elgrincis Ipolit Matveviĉ, – kiu ĉasas mian havaĵon?

Kun tiuj ĉi vortoj Ipolit Matveviĉ kalcitris la sanktan patron per la piedo en la femuron.

Patro Fjodor lertiĝis, kaj malice piedbatis la gvidanton en ties femuron tiel, ke tiu fleksiĝis.

– Tio estas ne via havaĵo.

– Do kies?

– Ne via.

– Sed kies?

– Ne via, ne via.

– Sed kies ja?

– Ne via.

Siblante tiel ili furioze interkalcitris.

– Sed kies ĝi estas, la havaĵo, – eksklamaciis la gvidanto, enigantela piedon en ventron de la sankta patro.

Superante la doloron, la sankta patro firme diris:

– Tio estas naciigita havaĵo.

– Ĉu naciigita?

– Jes-s, jes-s, naciigita.

Ili parolis kun ĝis tiom nekutima rapideco, ke la vortoj kunfandiĝis.

– Per kiu naciigita?

– Per sovetia reĝimo! Sovetia reĝimo!

– Kiu reĝimo?

– Reĝimo de laboruloj.

– A-a-a!.. – diris Ipolit Matveeviĉ, glaciigante. – Per reĝimo de laboristoj kaj kamparanoj?

– Je-s-s!

– M-m-m!.. Do povas okazi ke vi, sankta patro, estas ano de la partio?

– P-povas esti!

Ĉi tie Ipolit Matveeviĉ ne eltenis kaj, kriante «povas esti!» plezure kraĉis bonaniman vizaĝon de patro Fjodor. Patro Fjodor senprokraste kraĉis vizaĝon de Ipolit Matveeviĉ, kaj ankaŭ trafis. Viŝi la salivon ne eblis: la manoj estis okupataj per la seĝo. Ipolit Matveeviĉ eldonis sonon de malfermanta pordo, kaj el ĉiuj fortoj puŝis la malamikon per la seĝo. La malamiko falis, tirante post si anhelantan Vorobjaninov. La lukto daŭriĝis en partero.

Subite ekaŭdiĝis krako, kaj samtempe derompiĝis la ambaŭ antaŭaj piedetoj. Forgesinte unu la alian la kontraŭuloj komencis disŝiri la nuksan trezorujon. Kun malgaja krio de mevo disŝiriĝis la angla floret-desegnita katuno. La dorso defalis, forĵetita per la fortega impeto. La trezors-erĉantoj forŝiris la bast-maton kune kun la kupraj butonetoj kaj, vundiĝante je la risortoj, enigis la fingrojn en la lanan remburadon. La maltrankviligitaj risortoj kantis. Post kvin minutoj la seĝo ekestis pe-rongiĝita. De ĝi restis nur kornetoj kaj hufetoj. Ĉiuflanken ruliĝis la risortoj. Trans la neuzita tereno vento portis la putriĝintan lanon. Kurbaĵ piedetoj kuŝis en la kavo. Brilantoj forestis.

– Nu kio, ĉu vi trovis? – demandis Ipolit Matveeviĉ su-
fokiĝante.

Patro Fjodor, tuta kovrita per faskoj da lano, spiregis
kaj silentis.

– Vi estas fiaferulo! – kriis Ipolit Matveeviĉ. – Mi batos
vian vizaĝaĉon, patro Fjodor!

– La manoj mallongas, – respondis la patro.

– Kien vi iros, tuta en la lanugo?

– Sed kial tio koncernas vin?

– Hontu, patro! Vi simple estas ŝtelisto!

– Mi nenion ŝtelis de vi!

– Sed kiel vi eksciis pri tio? Ĉu vi eluzis en propra in-
tereso sekreton de la konfes-preno? Tre bone! Tre bele!

Ipolit Matveeviĉ kun indigna «fi» lasis la neuzitan ter-
enon kaj, purigante dum la iro manikojn de la palto, direk-
tiĝis hejmen. Sur angulo de strato de Ĉe-Lena-okazaĵoj kaj
Jerofeev-strateto Vorobjaninov ekvidis sian kompanianon.
La teknika direktoro kaj ĉefa gvidanto de la koncesio staris
duonturniĝe, levante la maldekstran piedon. Oni purigis
ŝaman supron de liaj botetoj per kanari-kolora kremaĵo.
Ipolit Matveeviĉ alkuris lin. La direktoro senzorge murmuris
dancmelodion “Vobli”:

Iam tion faris dromadero.

Iam tion dancis en Tanĝero.

Nun ĉi tiun vobli dancas tu-ta mondo...

– Nu, kio pri la loĝeja fako? – demandis li afereme, kaj
tuj aldonis: –Atendu, ne rakontu, vi estas tro ekscitita, mal-
varmiĝu.

Donante al la purigisto sep kopekojn, Ostap prenis na
Vorobjaninov je sub la brako, kaj ektiris lin sur la strato.
Ĉion kion rakontis ekscitita Ipolit Matveeviĉ, Ostap aŭskul-
tis kun granda atento.

– Ha! Negranda nigra barbeto, ĉu? Jes! Palto kun ŝafida kolumo? Mi komprenas. Tio estas seĝo el la maljunulejo. Ĝi estas aĉetita hodiaŭ matene per tri rubloj.

– Ja atendu vi...

Kaj Ipolit Matveeviĉ informis la ĉefan koncesiulon pri ĉiuj malnobraĵoj de patro Fjodor.

Ostap malsereniĝis.

– Acida afero, – diris li, – Mistera rivalo. Ni devas devanci lin; sed ne bati: vizaĝaĉon lian ni sukcesos pripalpi iam ajn.

Dum la amikoj manĝetis en bierejo “Stepan Razin”, kaj Ostap Bender informiĝis en kiu domo troviĝis antaŭe la loĝeja fako, kaj kiu oficejo troviĝas en ĝi nun, la tago finiĝis.

Oraj ĉevalegoj denove ekestis brunaj. Brilantaj gutoj malvarmiĝis falante, kaj frapiĝis sur la teron. En bierejoj kaj en restoracio “Fenikso” oni altigis prezon de biero: venis vespero. Sur Granda Puŝkina strato lumiĝis elektraĵoj lampoj, kaj kun tambura piedfrapado preteriris taĉmento da infan-komunistoj, revenanta hejmen de la unua printempa promonado.

Tigroj, venk-diinoj kaj kobroj sur la gubernia planadejo mistere lumiĝis sub la luno, kiu envenadis la urbon.

Irante hejmen kun Ostap, kiu subite eksilentis, Ipolit Matveeviĉ rigardis la gubernia-planadejajn tigrojn kaj kobrojn. En lia tempo ĉi tie lokiĝis gubernia zemstvo, kaj civitanoj tre fieris pri la kobroj, opiniante ilin rimarkindaĵo de Stargorod.

«Trovos mi», – pensis Ipolit Matveeviĉ, pririgardante la gipsan venkdiinon.

La tigroj karese svingis la vostojn, la kobroj ĝoje kliniĝis, kaj animo de Ipolit Matveeviĉ pleniĝis per certeco.

Ĉapitro 10

Seruristo, papago, kaj divenistino

Domo numero 7 en Pereleŝinskij strateto ne apartenis al plej bonaj konstruaĵoj de Stargorod. Du ĝiaj etaĝoj, konstruitaj en stilo de Dua imperio, estis plibeligitaj per rompitaj leonaj muzeloj, ege similaj al vizaĝo de siatempe konata verkisto Arcibaŝev. Arcibaŝev-vizaĝoj estis ĝuste okopaj, laŭ nombro da fenestroj, rigardantaj la strateton. Tiuj ĉi leonaj muzelaĉoj troviĝis sur la fenestraj ĉefŝtonoj.

Sur la domo estis ankoraŭ du plibeligaĵoj, sed jam de pure komerca speco. Sur la unua flanko troviĝis blua elpendaĵo:

ODESA RINGOPANA METI-KOLEKTIVO **«MOSKVAJ SEKRINGETOJ»**

Sur la elpendaĵo estis figurita juna homo kun kravato kaj en mallonga franca pantalono. En unu elturnigita mano li tenis fabelan abundokornon, el kiu elamasigis ruĝetaj moskvaj sekringetoj, kiujn oni laŭbezzone povis prezenti estiel odesaj ringopanoj. Dum tio la juna homo volupteme ridetis. Sur la dua flanko entrepreno “Rapidpakado” informis pri si estimatajn civitanojn-klientojn per nigra elpendaĵo kun rondaj oraj literoj.

Malgraŭ signifa diverseco de la elpendaĵoj, kaj grandeco de la cirkula kapitalo, tiuj ĉi heterogenaj entreprenoj okupiĝis pri sama afero: ili spekuladis per ŝtofoj de ĉiuj specoj: krudlanaj, fajnlanaj, katunaj kaj, se trafiĝis silko de bona koloro kaj desegno, do ankaŭ per silko.

Trairante la pordegon, verŝitan per tunela obskuro kaj akvo, kaj turniĝinte dekstren, en la korton kun cementa puto, oni povis vidi du pordojn sen peronetoj, rigardantajn rekte sur akrajn ŝtonojn de la korto.

Sur dekstra pordo troviĝis plateto el malhela kupro kun skrib-litere gravurita familnomo:

B. M. POLESOV

La maldekstra pordo estis provizita per blanketa lade-taĉo:

MODOJ KAJ ĈAPELOJ

Ankaŭ tio estis nura ŝajnaĵo.

Interne de la moda kaj ĉapela metiejo troviĝis nek **espart-plektaĵoj**²⁴, nek garnaĵoj, nek senkapaj manekenoj kun oficira staturo, nek kapaj ŝtipoj por elegantaj inaj ĉape-loj. Anstataŭ tiuj ĉi falsaj belaĵoj en la triĉambra loĝejo loĝis **papago**²⁵, senpeke blanka, en ruĝa pantalono. La pa-pagon tedis puloj, sed plendi pri ili ĝi povis al neniu, ĉar ĝi ne parolis home. Tutajn tagojn la papago ronĝis sunflorajn semojn, kaj sputis la ŝelojn sur la tapiŝon tra vergetojn de sia tura kaĝo. Al li mankis nur tirharmoniko kaj novaj fajfantaj galoŝoj por simili ebrietan metiiston-solulon. Sur la fenestroj balanciĝis malhelaj brunaj kurtenoj. En la loĝejo regis malhel-brunaj koloroj. Super piano pendis subvitra reprodukto de pentraĵo far Beklin (Boecklin) “Insulo de mortintoj” en kadro el fantazi-stila malhel-verda polurita kverko. Unu angulo de la vitro delonge elfalis, kaj nudigita parto de la pentraĵo estis ĝis tiom prilaborita per muŝoj, ke

24. **espart-plektaĵoj**: plektaĵoj faritaj el fortikaj herboj nomataj esparto (PIV).

25. **papago**: Do la “metiejo” celis gardi, de ebla rekvizicio, “superfluaĵn” ĉambrojn de la mastrino.

ĝi tute samkoloris al la kadro. Do estis jam neeble ekscii kio okazas en tiu ĉi parto de la insulo.

En la dormoĉambro, sur la lito, sidis la mastrino mem kiu, apogante la kubutojn sur la okangulan tableton, kovritan per nepura brodita tablotuko, dismetis kartojn. Antaŭ ŝi sidis vidvino Gricacujeva en pufa ŝalo.

– Mi devas averti vin, fraŭlino, ke pro seanco mi prenas ne malpli ol kvindek kopekojn, – diris la mastrino.

La vidvino, ne scianta barojn en sia strebo trovi novan edzon, konsentis pagi la fiksitan prezon.

– Sed vi, bonvolu, ankaŭ pri la estonto, – plende petis ŝi.

– Pri vi oni devas diveni per trefa damo.

La vidvino refutis:

– Mi ĉiam estis kera damo.

La mastrino indiferente konsentis, kaj komencis kombini la kartojn.

Malneta difino de la vidvina sorto estis donita jam post kelkaj minutoj. La vidvinon atendis grandaj kaj etaj malagrablaĵoj, kaj sur ŝia koro kuŝis trefa reĝo, kun kiu amikadis karoa damo.

Nete oni divenis laŭ la mano. Man-linioj de vidvino Gricacujeva estis puraj, fortegaj kaj senmankaj. Linio de la vivo daŭrigis tiom malproksimen, ke venis ĝis la pulso. Do, se la linio diris veron, la vidvino ĝisvivis mondfinan juĝon. La linioj de menso kaj artoj donis rajton esperi ke la vidvino lasos la nutraĵ-vendadon, kaj donacos al homaro nesupereblajn majstroverkojn en iu ajn sfero de arto, scienco aŭ sociaj esploroj. Elstaraĵoj de Venero ĉe la vidvino similis holmojn de Manĉurio, kaj evidentigis mirindajn rezervojn da amo kaj tenero.

Ĉion ĉi la divenistino klarigis al la vidvino, uzante vortojn kaj terminojn kutimajn en medio de grafologoj, kiro-mancianoj, kaj ĉeval-spekulistoj.

– Koran dankon al vi, sinjorineto, – diris la vidvino. Nun mi scias jam kiu estas la trefa reĝo. Ankaŭ la kara damo estas ege konata al mi. Sed la reĝo, ĉu li estas edziniĝinda?

– Edziniĝinda, fraŭlino.

La feliĉigita vidvino ekpaŝis hejmen. Kaj la divenistino, deĵetinte la kartojn en la keston, oscedis, montrante buŝegon de kvindekjara virino, kaj venis la kuirejon. Tie ŝi okupiĝis pri la tagmanĝo, kiu varmiĝis sur la meĉa kerosen-varmigilo, per la antaŭtuko kuiristin-maniere ŝi viŝis la manojn, prenis la sitelon kun derompita kelkloke emajlo, kaj eliris en la korton por preni akvon.

Ŝi iris en la korto, peze moviĝante sur siaj plataj planadoj. Ŝiaj duonruiniĝintaj mamoj velke saltis en la rekolorigita bluzeto. Sur la kapo kreskis aŭreoleto da grizantaj haroj. Ŝi estis maljunulino, estis malpureta, ĉiujn rigardis suspekto, kaj ŝatis dolĉaĵojn. Se Ipolit Matveeviĉ ekvidus ŝin nun, li certe ne rekonus na Elena Bour, sian iaman amatinon, pri kiu sekretario de la juĝejo diris iam per versoj, ke ŝi estas «tia ege subtila, al kisadoj vokanta». Ĉe la putito sunjorino Bour estis salutita per la najbaro Viktor Miĥajloviĉ Polesov, kiu estis seruristo-intelektulo. Li plenigis per akvo ladskatolon de benzino. Ĉe Polesov estis vizaĝo de opera diablo, kiun oni zorge ŝmiris per fulgo antaŭ ol ellasi sur la scenejon.

Interŝanĝinte la salutojn, la najbaroj ekparolis pri afero kiu okupadis tutan Stargorod.

– Kion ĝisvivis ni, – ironie diris Polesov, – hieraŭ mi ĉirkaŭkuris la tutan urbon, sed akiri ŝraŭbigilon tri okonoj

de colo ne sukcesis. Forestas. Tute! Sed ili intencas tramlinion lanĉi.

Elena Stanislavovna, kiu pri ŝraŭbigiloj tri okonoj de colo havis ĝuste saman imagon kiun pri agrokulturo havas vizitantino de baleta kurso je nomo de Leonardo da Vinĉi, kiu supozas ke sekvinberojn oni akiras el kukoj. Sed malgraŭ tio ŝi kunsentis:

– Ĉu nun estas vendejoj! Vicoj estas nun, sed ne vendejoj. Kaj nomoj de tiuj ĉi vendejoj estas plej teruraj. Stargiko!..

– Sed ne, Elena Stanislavovna, ne nur tio problemas! Ĉe ili restis nur kvar motoroj de “Komuna Elektra Kompanio”. Jes, ili pli-malpli funkcios, kvankam la karoserioj estas ĝis ti-iom ruinigitaj!.. La vitroj ne estas provizataj per kaŭĉuko. Mi mem vidis. Tintados ĉio... Teruro! Kaj aliaj motoroj estas produktaĵo de Ĥarkov. Tute ne valoras. Eĉ kilometron ili ne eltenos. Mi pririgardis ilin...

La seruristo ekscite eksilentis. Lia nigra vizaĝo brilis sub la suno. Okulgloboj liaj estis flavetaj. Inter metiistoj kun motoro, kiuj svarmis en Stargorod, Viktor Miĥajloviĉ Polesov estis plej malvigla, kaj pli ofte ol iu alia trafis en embarasojn. Tion kaŭzis lia tro bolanta naturo. Li estis bolanta maldiligentulo. Li konstante vezikiĝis. En sia propra metiistejo, kiu troviĝis en dua korto de domo numero 7 en Pereleŝinskij strateto, tute ne eblis trovi lin. La estinginta transportebla fand-forno orfe staris meze de la brika remizo, en anguloj de kiu amasiĝis trapikitaj pneŭoj, disŝiritaj pneŭo-ŝirmiloj de firmao “Triangulo”, rufaj seruroj, ĝis tiom grandaj ke per ili oni povus ŝlosi urbojn, molaj benzinuoj kun surskriboj “Indian” kaj “Vanderer”, bebarisorta kaleŝeto, por ĉiam silentiĝinta generatoro, putriĝintaj rimenoj, oleigita stupo, eluzita smerga papero, aŭstria

bajoneto, kaj multego da disŝirita, kurbita kaj dispremita fatraso. Klientoj ne trovis na Viktor Miĥajloviĉ. Viktor Miĥajloviĉ jam ordonadis ie. Li ne havis tempon por labori. Li ne povis trankvile spekti ŝarĝitan ĉaron, enveturantan en lian aŭ en ies korton. Polesov tuj eliris la korton kaj, metinte la manojn post la dorso, malestime observis agojn de la ŝarĝ-ĉaristo. Fine lia koro ne eltenis.

– Ja kiu enveturas tiel? – kriis li teruriĝinte. Turnu!

La timigita ĉaristo turnis.

– Ja kien vi turnas, vizaĝaĉo? – suferis Viktor Miĥajloviĉ, ĵetante sin sur la ĉevalon. – Kaptus vi en antaŭa tempo vangofrapojn, tiam vi sciis turni.

Ordonante tiel ĉirkaŭ duonhoro Polesov estis jam preta reveni en la riparejon, kie atendis lin neriparita bicikla pumpilo, sed tiam kutime trankvila vivo de la urbo denove okazis rompita per iu malakordaĵo. Jen ĉaroj kroĉiĝis surstrate per la aksoj, kaj Viktor Miĥajloviĉ montris kiel pli bone kaj pli rapide diskroĉi ilin, jen oni ŝanĝis telegrafan foston, kaj Polesov kontrolis ĝian perpendiklecon al la tero per propra plumboŝnuro, speciale elportita el la riparejo; jen, fine, preterveturis fajrobrigada ĉararo, kaj Polesov, ekscitita per sonoj de la trumpeto kaj cindrigata per fajro de la maltrankvilo, kuris post la ĉararo.

Tamen estis periodoj kiam na Viktor Miĥajloviĉ kaptis muzo de realaj agoj. Por kelkaj tagoj li malaperis en la riparejo kaj silente laboris. Infanoj libere kuris en la korto kaj kriis kion ili volis, ŝarĝĉaroj desegnis en la korto iujn ajn kurbaĵojn, surstrataj ĉaroj tute ĉesis interkroĉiĝi, fajrobriĝadoj kaj katafalkoj sole ruliĝis al brulego; Viktor Miĥajloviĉ laboris. Foje, post unu el tiuj ĉi atakoj li je la kornoj, kiel ŝafon, elkondukis en la korton motorciklon, muntitan el pecetoj de aŭtoj, estingiloj, bicikloj kaj tajpmaŝinoj. Motoro je

forto unu kaj duono estis el Vanderer-firmao, radoj devenis el firmao Davidson, kaj aliaj gravaj partoj jam delonge perdis sian firmaon. De la selo pendis kartona afiŝo "Probo". Amasiĝis homoj. Viktor Miĥajloviĉ, rigardante neniun, ekturnis per la mano la pedalon. Sparko forestis dum ĉirkaŭ dek minutoj. Poste eksonis fera maĉado, la aparato ektermis kaj envolviĝis per malpura fumo. Viktor Miĥajloviĉ ĵetiĝis en la selon, kaj la motorciklo frenez-rapide elportis lin tra la tunelo sur mezon de la pavimo, kaj tuj haltis, kvazaŭ mortpafita. Viktor Miĥajloviĉ intencis jam lasi la selon kaj pririgardi sian enigman maŝinon, sed ĝi subite ekveturis retren kaj, portinte sian kreanton tra sama tunelo, haltis sur loko de la ekveturo, meze de la korto. Ĉi tie ĝi grumble aĥ-is kaj eksplodis. Viktor Miĥajloviĉ restis viva mirakle, kaj el rompaĵoj de la motorciklo, en sekvontan labor-atakon, li faris surlokan motoron kiu estis ege simila al vera, sed ne funkciis.

Krono de akademia agado de la seruristo-intelektulo estis epopeo pri pordego de najbara domo numero kvin. Kooperativo de tiu domo kontraktis kun Viktor Miĥajloviĉ riparon de la fera pordego. Laŭ tiu ĉi kontrakto Polesov devigiĝis venigi la feran pordegon en perfektan ordon, kaj farbi ĝin en iun praktikan koloron laŭ sia opinio. La kooperativo, de sia flanko, devigiĝis pagi al V. M. Polesov, post akcepto de la laboro per speciala komisiono, dudek unu rublojn sepdek kvin kopekojn. Fiskajn markojn devis pripagi plenumanto de la laboro.

Viktor Miĥajloviĉ forportis la pordegon kiel Ŝimŝono. En la riparejo li eklaboris entuziasme. Du tagoj prenis disnitigo de la pordego. Ĝi estis dismuntita je apartaj pecoj. Krudferaj spiralaĵoj kuŝis en la infanĉareto; feraj stangoj kaj lancoj estis metitaj sub la stablon. Ankoraŭ kelkaj

tagoj estis uzataj por pririgardo de difektoj. Sed poste en la urbo okazis granda malagrablaĵo: sur Ŝtipar-strato krevis ĉefa akvokondukilo, kaj Viktor Miĥajloviĉ pasigis sur loko de la averio reston de la semajno, ironie ridetante, alkriante la laboristojn, kaj ĉiuminute enrigardante la foskavegon.

Kiam la organiziga vervo de Viktor Miĥajloviĉ iom malpliigis, li denove revenis al la pordego, sed estis malfrue: per la krudferaj spiralaĵoj kaj lancoj de tiu ĉi pordego jam ludis enkortaj infanoj. Ekvidinte la koleriĝintan seruriston la infanoj time forĵetis la ludilojn kaj forkuris. Duono de la spiralaĵoj forestis, kaj trovi ilin okazis neeble. Post tio Viktor Miĥajloviĉ tute ĉesis interesiĝi pri la pordego.

Kaj en domo numero kvin, kiu ekestis plene malfermita, okazis teruraĵoj. El la subtegmentejo oni ŝtelis malsekajn tolaĵojn, kaj foje oni forportis vespere eĉ bolantan sur la korto samovaron. Viktor Miĥajloviĉ persone partoprenis persekuton de la ŝtelisto. Sed la ŝtelisto, kvankam en etenditaj antaŭen manoj li portis la bolantan samovaron, el lada tubo de kiu elŝiriĝis flamo, kuris tre vigle kaj, retrorigardante, insultis antaŭ ĉiu kurantan Viktor Miĥajloviĉ per maldecaj vortoj. Sed pli ol iu alia viktimiĝis kortisto de domo numero kvin. Li perdis ĉiunoktan enspezon: la pordego forestis, do estis nenio por malfermi, kaj malfru-promenuloj havis neniun kaŭzon fordoni siajn dekkopekajn monerojn. Komence la kortisto venadis demandi kiam la pordego estos muntita, poste li petegis humile, menciante Dion, sed, fine, li komencis eligi neklarajn minacojn. La kooperativo sendis al Viktor Miĥajloviĉ skribajn memorigojn. La afero minacis per juĝesploro. La situacio streĉiĝis pli kaj pli.

Starante ĉe la puto la divenistino kaj la seruristo-entuziasmulo daŭrigis la konversacion.

– Pro foresto de ĉeesto de saturitaj ŝpaloj, – kriis Viktor Miĥajloviĉ por la tuta korto, – tio estos ne tramo sed malfeliĉo!

– Kiam tio finiĝos! – diris Elena Stanislavovna. – Kiel sovaĝuloj ni vivas.

– Senfinas la afero... Ha! Ĉu vi scias kiun mi vidis hodiaŭ? Na Vorobjaninov.

Elena Stanislavovna apogis sin je la puto, pro miro daŭrigante teni en la etendita mano plenan sitelon da akvo.

– Eniras mi en la urbestaron, por daŭrigi luan kontrakton pri la riparejo, iras mi sur la koridoro. Subite alvenas min duopo. Mi rigardas: iu konata. La vizaĝo, ŝajne, de Vorobjaninov. Kaj ili demandas min: «Bonvolu diri, kiu oficejo estis en tiu ĉi konstruaĵo antaŭe?» Mi diras ke antaŭe ĉi tie estis ina gimnazio, kaj poste loĝej-oficejo. «Sed por kio vi?» – mi demandis. Sed ili diras «dankon» kaj iras pluen. Kaj tiam mi klare ekvidis ke tio estas Vorobjaninov mem, sed sen lipharoj. De kie li aperis ĉi tie? Kaj tiu alia, lia kunulo, estas belulo-viro. Certe iama oficiro. Kaj tiam mi ekpensis...

Ĉi-minute Viktor Miĥajloviĉ rimarkis ion malagrablan. Ĉesinte la paroladon li kaptis sian ladan ujon, kaj rapide kaŝiĝis post la fatras-kesto. En la korton malrapide eniris kortisto de domo numero kvin. Li haltis apud la puto, kaj komencis ĉirkaŭrigardi la enkortajn konstruaĵojn. Rimarkinte nenie na Viktor Miĥajloviĉ li malgajiĝis.

– Ĉu Viktoraĉo-seruristo denove forestas? – demandis li na Elena Stanislavovna.

– Aĥ, nenion mi scias, – diris la divenistino, – nenion mi scias.

Kaj, nekutime emociiginta, ŝi haste foriris en sian loĝejon, elplaŭdante la akvon el la sitelo.

La kortisto karesis cementan blokon de la puto, kaj ekiris al la riparejo. Du paŝoj post elpendaĵo:

ENIRO EN LA SERURISTAN RIPAREJON

beliĝis elpendaĵo:

SERURISTEJO KAJ RIPARO DE PRIMUSOJ

sub kiu pendis peza seruro. La kortisto batis la seruron per la piedo, kaj malame diris:

– U-u, gangreno!

La kortisto staris apud la riparejo ankoraŭ du-tri minutoj, pleniĝante per plej venenaj sentoj. Poste li kun frapobruo deŝiris la elpendaĵon, portis ĝin en mezon de la korto, al la puto, kaj, starante sur ĝi per la ambaŭ piedoj komencis skandali.

– Ŝtelistaĉoj loĝas en via domo numero sep! – kriegis la kortisto. – Aĉularo diversspeca! Vipuro sep-patra! Mezan klerecon li havas!.. Mi ne rigardos la mezan klerecon!.. Gangreno malbenita!..

Dum tio la sep-patra vipuro kun meza klereco angoris, sidante post la fatrasa kesto sur la lada ujo.

Krake malfermiĝis klapoj de fenestroj, kaj elrigardis gajaj loĝantoj. De la strato en la korton nerapide eniradis scivoluloj. Pro vido de la spektantaro la kortisto eĉ pli ekvarmiĝis.

– Seruristo-mekanikisto! – kriis la kortisto. – Aristokrato hunda!

Siajn parlamentajn esprimojn la kortisto riĉe intermiksis per necenzuraj vortoj, al kiuj li donis preferon. Inoj,

dense okupantaj la fenestrajn bretojn, ege indigniĝis pri la kortisto, sed de la fenestroj ne deiris.

– Vizaĝaĉon disbatos mi! – furiozis la kortisto. Edukito!

Kiam la skandalo estis en zenito, aperis policisto, kaj komencis silente tiri la skandalulon en la policejon. Al la policisto helpis bravuloj el "Rapidpakado".

La kortisto humile ĉirkaŭbrakis kolon de la policisto, kaj ekploris.

La danĝero pasis.

Tiam el post la fatrasa kesto elsaltis suferinta Viktor Miĥajloviĉ. La spektantaro ekbruis.

– Ĥamido! – kriis Viktor Miĥajloviĉ al la forirantoj. – Ĥamido! Mi montros al vi! Fiulo!

La ploreanta kortisto aŭdis nenion. Oni portis lin sur manoj en la policejon. Tien, estiel atestilo, oni entiris ankaŭ elpendaĵon "Seruristejo, kaj riparo de primusoj".

Ankoraŭ longe post tio kuraĝadis Viktor Miĥajloviĉ.

– Hundinidoj, – diris li, rilatante al la spektantoj, – ekopiniis pri si! Ĥamidoj!

– Sufiĉas, Viktor Miĥajloviĉ! – kriis el la fenestro Elena Stanislavovna. – Eniru al mi por nelonge.

Ŝi metis antaŭ Viktor Miĥajloviĉ subtason da kompoto kaj, promenante en la ĉambro, komencis pridemandi.

– Sed mi diras al vi ke tio estas li, sen lipharoj, sed li, – kiel kutime kriis Viktor Miĥajloviĉ, – jes, mi konas lin perfekte! Vorobjaninov, sendube li!

– Pli mallaŭte, ho Dio! Por kio, laŭ vi, li alveturis?

Sur nigra vizaĝo de Viktor Miĥajloviĉ aperis ironia rideto.

– Kaj vi, kion vi opinias?

Li ekridetis kun eĉ pli da ironio.

– Certe ne por subskribi kontraktojn kun komunistoj.

– Ĉu vi opinias ke li endanĝerigas sin?

Rezervoj da ironio, kiujn Viktor Miĥajloviĉ akumulis dum dek postrevoluciaj jaroj estis neelĉerpeblaj. Sur lia vizaĝo ludis serioj da diversfortaj kaj divers-skeptikaj ridetoj.

– Kiu en Sovetia Rusio ne endanĝeriĝas, des pli homo en stato de Vorobjaninov? Lipharojn, Elena Stanislavovna, oni ne forrazas senkaŭze.

– Ĉu li estas sendita el eksterlando? – demandis Elena Stanislavovna, preskaŭ sufokiĝinte.

– Sendube, – respondis la genia seruristo.

– Do kiucele li venis?

– Ne estu infano.

– Tutegale. Mi devas vidi lin.

– Sed ĉu vi scias per kio vi riskas?

– Aĥ, tutegale! Post dek jaroj da disiĝo mi devas vidi na Ipolit Matveeviĉ.

Al ŝi vere ŝajnis ke sorto disigis ilin kiam ili amis unu la alian.

– Mi petegas vin, trovu lin! Eksciu kie li estas! Vi ja vizitas multajn lokojn! Al vi ne estos malfacile! Transdonu ke mi volas vidi lin. Ĉu vi aŭdas?

La papago en la ruĝa pantalone, dormetanta sur la stangeto, ektimis la bruan konversacion, turniĝis per la kapo soben, kaj rigidiĝis en tiu ĉi pozicio.

– Elena Stanislavovna, – diris la seruristo-maŝinisto, starante kaj premante la manojn al la brusto, – mi trovos kaj kontaktos lin.

– Ĉu vi, eble, volas ankoraŭ iom da kompoto? – kortuŝiĝis la divenistino.

Viktor Miĥajloviĉ formanĝis la kompton, prezentis malican lekcion pri malbona konstruo de la papaga kaĝo,

kaj adiaŭis na Elena Stanislavovna, rekomendinte al ŝi teni ĉion en plena sekreto.

Ĉapitro 11

Alfabetumo “Spegulo de vivo”

En dua tago al la partneroj ekestis klare ke loĝi en la kortistejo ne estas jam oportune. Tiĥon, tute stultiĝinta post kiam li ekvidis la mastron komence kun nigraj lipharoj, poste kun la verdaj, kaj fine tute sen ili, malkontente murmuris. Ne estis sur kio dormi. En la kortistejo starisodoro de putranta ĉevala fekaĵo, kiun disvastigis novaj peltaj botoj de Tiĥon. La malnovaj peltaj botoj staris en angulo, kaj ankaŭ ne ozonigis la aeron.

– Vesperon de la rememoroj – diris Ostap, – mi proponas opinii fermita, – endas translokiĝi en gastejon.

Ipolit Matveeviĉ ekstremitis.

– Tio ne eblas.

– Kial ja?

– Tie endas registriĝi.

– Ĉu la pasporto malordas?

– Ne, la pasporto enordas, sed mia familnomo estas bone konata en la urbo. Oni parolos pri tio.

La koncesiuloj pripense eksilentis.

– Ĉu plaĉas al vi familnomo Miĥelson? – subite demandis brilega Ostap.

– Kiu Miĥelson? Ĉu senatano?

– Ne. Ano de sindikato de sovetiaj vendej-laboristoj.

– Mi ne komprenas vin.

– Tio pro foresto de teknikaj kutimoj. Ne estu naivulo.

Bender elprenis el la verda jako sindikatan membrokarton kaj donis ĝin al Ipolit Matveeviĉ.

– Konrad Karloviĉ Miĥelson, kvardek-ok-jara, senpartia, fraŭlo, ano de la sindikato de 1921-a jaro, ekstreme morala persono, mia bona konato, ŝajnas ke li estas amiko de infanoj... Sed vi povas ne amikiĝi kun infanoj: tion polico ne postulos de vi.

Ipolit Matveeviĉ ruĝiĝis.

– Ĉu tio konvenas?

– Kompare kun nia koncesio tiu ĉi ago, kvankam antaŭvidita per kriminala kodo, aspektas same senpeka kiel infana ludo je rato.

Malgraŭ tio Vorobjaninov, hezitis.

– Vi estas idealisto, Konrad Karloviĉ. Ĉu vi ne vidas ke prosperis al vi; alie, imagu, vi devus esti iu Papa-Hristozopulo aŭ Fiodorulov.

Sekvis rapida konsento, kaj la koncesiuloj, ne adiaŭante na Tiĥon, eliris en la straton.

Ili ekloĝis en meblitaj ĉambroj de “Sorbono”. Ostap tumultigis tutan negrandan personaron de la gasteja servistaro. Komence li pririgardis seprublajn ĉambrojn, sed restis malkontenta pri ilia mebligo. Kvinrublaj ĉambroj plaĉis al li iom pli, sed la tapiŝoj estis iaj senharaj, kaj indignis tieaodoro. En trirublaj ĉambroj ĉio estis bona krom pentraĵoj.

– Mi ne povas loĝi en sama ĉambro kun pejzaĝoj, – diris Ostap.

Do ili endis loĝi en ĉambro per rublo okdek. Tie estis nek pejzaĝoj, nek tapiŝoj, kaj la meblaro estis severe konsekvenca: du litoj kaj nokta tableto.

– Stilo de ŝtona epoko, – aprobe rimarkis Ostap. – Ĉu enestas en la matracoj antaŭhistoriaj bestoj?

– Depende de sezono, – respondis la ruzeta servisto, – se, ekzemple, okazas iu gubernia kongreso, do certe ne, ĉar tiam loĝantoj estas multaj, kaj antaŭ ili estas aranĝata granda purigado. Sed en alia tempo vere okazas ke alku-radas ili. El najbara gastejo “Livadija”.

Samtage la koncesiuloj vizitis Stargorodan urbestra-ron, kie ili ricevis ĉiujn bezonatajn informojn. Okazis ke la loĝeja fako estis nuligita en jaro 1921, kaj ke ĝia granda arkivo estis kunigita kun arkivo de la urbestro.

Pri la afero ekokupiĝis la granda kombinanto. Ĝis la vespero la partneroj konis jam hejman adreson de arkiv-estro, nomo de kiu estis Varfolomej Korobejnikov, ĝisrevo-lucie oficisto en kancelario de la urbestro, nun laboranto de kontora fako.

Ostap survestis la mol-lanan veŝton, malpolvigis sian jakon, batante ĝin je la lita dorso, elpostulis de Ipolit Mat-veeviĉ rublon dudek kopekojn por la reprezentado, kaj iris viziti la arkiviston. Ipolit Matveeviĉ restis en “Sorbono”, kaj nervume iradis en fendo inter la du litoj. Ene de tiu ĉi ves-pero, verda kaj malvarma, decidiĝis sorto de la tuta entre-preno. Se prosperus akiro de mandat-kopioj, laŭ kiuj oni distribuis la meblojn, konfiskitajn el vorobjaninov-izoldomo, la aferon oni povus opinii duone sukcesinta. Poste, certe, antaŭvideblis malfacilaĵoj neimageblaj, sed la fadeno estus jam en la manoj.

– Ho, se sukcesus akiro de la mandatoj, – flustris Ipo-lit Matveeviĉ, kuŝante sur la lito, – nur la mandatojn!...

Risortoj de la rompita matraco mordis lin kiel puloj. Li ne sentis tion. Li ankoraŭ ne klare imagis kio sekvos post ricevo de la mandatoj, sed estis certa ke tiam ĉio iros glate, oleigite: «Kaj butero» – ial turniĝis en lia kapo – «kaĉon ne difektas».

Sed dume kuirigis vere granda kaĉo. Ipolit Matveeviĉ, posedata per la rozkolora revo, turnigis sur la lito de flanko al flanko. Risortoj sub li ŝafblekadis.

Ostap devis trairi la tutan urbon. Korobejnikov loĝis en Gusisĉe: limkvartalo de Stargorod.

Plimulto da tieaj loĝantoj estis fervojistoj. Iam super la domoj, sur taluso, barigita per maldika betona muro, retroiris siblanta vaporlokomotivo. Tegmentoj de la domoj por sekundo lumiĝis per flamo de la lokomotiva fornego. Iam ruliĝis malplenaj vagonoj, iam eksplodis petardoj. Inter la domaĉoj kaj portempaj barakoj etendiĝis longaj briakaj konstruaĵoj de ankoraŭ malsekaj kooperativaj domoj.

Ostap preteriris lumantan insulon – fervojistan klubon, per la papero kontrolis la adreson, kaj haltis ĉe dometo de la arkivisto. li turnis sonorilon kun konveksaj literoj “Turnu”.

Post longaj pridemandoj «al kiu» kaj «por kio», oni malfermis, kaj li ekestis en malluma vestiblo, okupata per ŝrankoj. En la mallumo iu spiris na Ostap, sed diris nenion.

– Kie estas civitano Korobejnikov? – demandis Bender.

La spiranta homo prenis na Ostap je la brako kaj enkondukis lin en la manĝoĉambron, lumigitan per pendanta kerosena lampo. Ostap ekvidis antaŭ si etan oldulon: pureculon kun nekutime elasta dorso. Ne estis dubo ke tiu ĉi oldulo estas civitano Korobejnikov mem. Ostap sen invito alŝovis al si seĝon, kaj sidis.

La olduleto sentime rigardis la impertinentulon, kaj silentis. Do Ostap ĝentile komencis la konversacion unua:

– Mi venis al vi pro afero. Vi servas en arkivo de Stargoroda urbestro, ĉu?

Dorso de la oldulo ekmoviĝis kaj konfirme kurbiĝis.

– Kaj antaŭe vi servis en loĝeja fako, ĉu?

– Mi ĉie servis, – diris la oldulo gaje.

– Eĉ en kancelario de ĝisrevolucia urbestro?

Dirante tion Ostap gracie ridetis. Dorso de la oldulo longe serpentiĝis, kaj fine haltis en pozicio kiu atestis ke servo ĉe la iama urbestro estas afero jam delonge pasinta, kaj ke memori ĉion estas absolute ne eble.

– Sed tamen permesu ekscii pri celo de via vizito – diris la mastro, kun intereso rigardante la gaston.

– Mi permesos, – respondis la gasto. – Mi estas filo de Vorobjaninov.

– De kiu? Ĉu de la gvidanto?

– Jes, de li.

– Kaj li, ĉu li vivas?

– Mortis li, civitano Korobejnikov.

– Jes, – sen aparta malĝojo diris la oldulo, – malgaja okazaĵo. Sed, ŝajne, ĉe li forestis infanoj, ĉu?

– Forestis, – ĝentile konfirmis Ostap.

– Do kiel?...

– Neniul. Mi – de la morganata geedziĝo.

– Ĉu de Elena Stanislavovna estas vi filo?

– Jes. Ĝuste.

– Kaj ŝi, kiel ŝi fartas?

– La panjo jam delonge estas entombigita.

– Tiel do, aĥ, kiel malgaje!

Kaj ankoraŭ longe la oldulo rigardis na Ostap kun larmoj de kompato, kvankam ne pli ol hodiaŭ li vidis na Elena Stanislavovna en vianda linio de la bazaro.

– Ĉiuj mortas, – diris li. – Sed tamen permesu ekscii pri kiu afero, estimata, vian nomon, pardonu, mi ne konas...

– Valdemar, – rapide informis Ostap.

– Valdemar Ipolitoviĉ? Tre bone. Mi aŭskultas vin, Valdemar Ipolitoviĉ.

La olduleto alsidis la tablon, kovritan per ornamita laktolo, kaj enrigardis okulojn mem de Ostap.

Ostap per selektitaj vortoj esprimis sian malĝojon pri la gepatroj. Li tre bedaŭras ke tiel malfrue invadis loĝejon de la profunde estimata arkivisto, kaj kaŭzis al li maltrankvilon per sia vizito, sed li esperas ke la profunde estimata arkivisto pardonos, kiam ekscios, kiu sento venigis lin al tio.

– Mi volus, – kun neesprimebla fila amo finis Ostap, – trovi ion el mebloj de la paĉjo, por konservi memoron pri li. Ĉu scias vi al kiu estas transdonitaj mebloj el domo de la paĉjo?

– Komplikas la afero, – respondis la oldulo, pensinte, – tion povas permesi al si nur homo bonstata... Kaj vi, pardonu, pri kio vi okupiĝas?

– Libera profesio. Propra metikolektiva viand-buĉejfridejo en Samaro.

La maljunulo dube alrigardis la verdajn kirasojn de juna Vorobjaninov, sed ne oponis.

«Energia juna homo», – pensis li.

Ostap, kiu tiumomente pe-is siajn observojn pri Korobejnikov, decidis ke «la oldulo estas tipa kanajlo».

– Do tiel, – diris Ostap.

– Do tiel, – diris la arkivisto, – malfacile, sed eblas...

– Ĉu vi pri elspezoj? – helpis havanto de viand-buĉejfridejo.

– Negranda sumo...

– Pli proksime al la afero, kiel diras Mopasan (Moupassant). La informoj estos pripagataj.

– Do bone, sepdek rublojn bonvolu.

– Kial tiom multe? Ĉu **aveno multekostas**²⁶?

La oldulo ete ektintadis, svingante la spinon.

– Vi ŝerci bonvolas...

– Mi konsentas, paĉjo. Mono kontraŭ la mandatoj.
Kiam mi venu al vi?

– Ĉu vi kunhavas la monon?

Ostap pretece frapetis sian poŝon.

– Tiam bonvolu eĉ nun, – solene diris Korobejnikov.

Li bruligis kandelon, kaj enkondukis na Ostap en la najbaran ĉambron. Tie krom lito, sur kiu verŝajne dormis la mastro de la domo, staris skribotablo, superŝutita per librotenistaj kajeroj, kaj longa kancelaria ŝranko kun malfermaj bretoj. Al randoj de la bretoj estis algluitaj presitaj literoj A, Bo, Co, kaj tiel plu, ĝis ariera litero Zo. Sur la bretoj kuŝis pakajoj da mandatoj, ĉirkaŭligitaj per freŝa ŝnureto.

– Hej! – diris ravita Ostap. – Plena arkivo hejme!

– Perfekte plena, – modeste respondis la arkivisto. – Mi, ĉu vi scias, por iu ajn okazo... Al la urbestro ĝi ne bezonatas, sed al mi, por la maljunaj jaroj, povas ekesti utila... Vivas ni, vi ja scias, kvazaŭ ĉe vulkano... ĉio povas okazi... Ĵetiĝos tiam homoj serĉi siajn meblojn, sed kie ili estas? Jen kie! Ĉi tie ili estas! En la ŝranko. Kaj kiu konservis, kiu gardis? Korobejnikov. Do tiam gesinjoroj diros dankon al la maljunulo, helpos al liaj maljunaj jaroj... Kaj mi ne bezonas multe: se oni eĉ dekrublaĵon kontraŭ mandato donos, ankaŭ pro tio dankon... Alie provu, serĉu venton en kamparo. Sen mi ili ne trovos!

Ostap rave rigardis la oldulon.

– Mirinda kancelario, – diris li, – plena mekanikigo. Vi estas vera labor-heroo!

26. **aveno multekostas**: aludo al marĉando kun fiakristo.

La flatita arkivisto komencis konatigi la gaston kun detaloj de sia ŝatata afero. Li malfermis dikajn librojn de registro kaj distribuo.

– Ĉio estas ĉi tie, – diris li, – tuta Stargorod! Tuta meblaro! De kiu kaj kiam prenita, kiam al kiu donita. Kaj tio estas la alfabetumo, spegulo de vivo. Al vi pri kies meblaro? Ĉu de unuaranga komercisto Angelov? Bonvolu. Rigardu literon A. Litero A, Ak, Am, An, Angelov... Numero? Jen 82742. Nun prenu ni libron de registrado. Paĝo 142. Kie estas Angelov? Jen Angelov. De Angelov, la 18-an de decembro estas prenitaj: piano “Bekker” numero 97012, tabureto al ĝi mola, komodoj du, vestoŝrankoj kvar (du el ruĝa ligno), libroŝranko unu, kaj tiel plu... Kaj al kiu donita?.. Rigardu ni libron de distribuo. Sama numero 82742... Donita... Libroŝranko –en la urban militkomisarejon, vestoŝrankoj tri – en pensionlernejon “Alaŭdo”... Kaj ankoraŭ unu vestoŝrankon – en personan uzon de sekretario de Stargoroda proviant-distribuejo. Kaj la piano kien trafis? Trafis ĝi en duan domon de socprovizo. Ĝis nun staras ĝi tie...

«Ial ne vidis mi tie tiun ĉi pianon», – ekpensis Ostap, rememorinte konfuziĝeman vizaĝeton de Alĥen.

– Aŭ, ekzemple de Murin, estro de kancelario de la urbestro... Literon Mo, sekve, oni devas serĉi. Ĉio estas ĉi tie. La tuta urbo. Pianoj estas ĉi tie, seĝetoj diversaj, speguloj, brakseĝoj, sofoj, lustroj... Eĉ manĝilaroj estas...

– Nu, – diris Ostap, – oni devas al vi monumenton starigi. Sed pli proksimen al la afero. Prenu ni, ekzemple, literon Vo.

– Estas litero Vo, – volonde reeĥis Korobejnikov. – Nun. Vo-mo, Vono, Voriickij, numero 48238 Vorobjaninov, Ipolit Matveeviĉ, patro via, reĝlondon ĉielan al li, gran-

danima homo li estis... Piano “Bekker” numero 54809, vazoj ĉinaj, markitaj – kvar, far franca fabriko “Sevr” (Sèvres), tapiŝoj diversdimensiaj – ok, gobelino “Paŝtistino», gobelino “Paŝtisto”, pajlo-ŝtopita urso kun plado – unu, dormoĉambra kompleto – dek du pecoj, manĝoĉambra kompleto – dek-ses-peca, gastsalona kompleto – dek kvar pecoj, nukso, far majstro Hambro...

– Kaj al kiu donita? – senpacience demandis Ostap.

– Tion ni tuj. Pajlo-ŝtopita urso – en duan policejon. Gobelino “Paŝtisto” – en fonduson de artaĵoj. Gobelino “Paŝtistino” – en klubon de riveristoj. Kompleto dorma – en asocion de ĉasistoj, kompleto manĝeja – en Stargorodan filion de firmao Teo. Kompleto gastsalona nukso –poparte. Tablon rondan kaj unu seĝon – en duan domon de socia provizo, sofon kun kurbita dorso – en loĝejan fakon (ĝis nun en akceptejo ĝi staras, tutan tegaĵon oni oleigis, bastardoj), kaj ankoraŭ unu seĝon – al kamarado Gricacujev, invalido de imperiisma milito, laŭ ties skriba peto kaj rezolucio de fakestro kamarado Burkin. Dek seĝojn en Moskvon, en muzeon de mebla majstreco, laŭ postul-letero el Komisarejo de klereco... Vazoj ĉinaj, markitaj...

– Mi laŭdas, – diris Ostap jubile, – geniaĵo! Estus bone ankaŭ la mandatojn spekti.

– Bone, nun ankaŭ ĝis mandatoj ni venu. Numero 48238, litero Bo.

La arkivisto venis al la ŝranko kaj, starante sur la piedfingroj, elprenis necesan pakaĵon.

– Jen. Tuta meblaro de via paĉjo estas ĉi tie. Ĉu vi bezonas ĉiujn mandatojn?

– Ne, por kio ĉiujn... Tiel... Infanaj rememoroj. Gastsalona kompleto... Ludadis, memoras mi, en la gastsalono, rigardante gobelinon “Paŝtistino”... Bona estis tempo, ora

infaneco!.. Do ni limigu nin per la gastsalona kompleto, paĉjo.

La arkivisto komencis ame rektigi la pakaĵon de la mandatoj, kaj serĉi tie mandatojn bezonatajn. Korobejnikov elprenis kvin pecojn: Unu mandaton por dek seĝoj, du – po unu seĝo, unu – por ronda tablo, kaj unu por gobelino “Paŝtistino”.

– Bonvolu rigardi. Ĉio estas en ordo. Kie kio troviĝas – ĉio estas sciate. Sur la deŝireblaj partoj ĉiuj adresoj estas indikitaj, kun propramana subskribo de la ricevinto. Tial neniu, se estos bezonate, neniu scipovos nei. Eble vi deziras kompletan de general-vidvino Popova? Tre bona. Ankaŭ laboro de Hambs.

Sed Ostap, movata ekskluzive per amo al la gepatroj, kaptis la mandatojn, enŝovis ilin en fundon mem de la flanko poŝo, sed de kompleto de la generalvidvino li rifuzis.

– Ĉu mi povas skribi la kvitanceton? – informiĝis la arkivisto, lerte kurbiĝante.

– Vi povas, – ĝentile diris Bender, – skribu, batalanto pri la ideo.

– Do mi skribos.

– Faru!

Ili revenis en la unuan ĉambron. Korobejnikov kaligrafie skribis kvitancon kaj, ridetante, transdonis ĝin al la gasto. La ĉefa koncesiulo ege ĝentile, per du fingroj de la dekstra mano, prenis la papereton, kaj enmetis ĝin en saman poŝon kie jam kuŝis la valoregaj mandatoj.

– Nu, ĝis, – diris li duonfermite la okulojn, – ŝajne mi signife rompis vian trankvilecon. Do mi ne kuraĝas plu tedi vin per mia ĉeesto. Vian manon, estro de la kancelario.

La konsternita arkivisto apatie premis etenditan al li manon.

– Ĝis, – ripetis Ostap.

Li ekmoviĝis al la eliro.

Korobejnikon komprenis nenion. Li eĉ ekrigardis sur la tablon, ĉu la gasto lasis la monon tie, sed ankaŭ sur la tablo la mono forestis. Tiam la arkivisto tre mallaŭte demandis:

– Kaj la mono?

– Kiu mono? – demandis Ostap, malfermante la pordon. – Vi, ŝajne, demandis pri iu mono?

– Jes, certe! Pro la mebloj! Pro la mandatoj!

– Kolombeto, – elkantis Ostap, – je Dio, per honoro de mia mortinta paĉjo mi ĵuras. Mi estus ĝoja tutanime, sed ne havas, forgesis mi depreni monon de la cirkula konto.

La oldulo ektremis, kaj etendis antaŭen sian malfortan maneton, dezirante halti la noktan vizitanton.

– Trankvilon, stultulo, – diris Ostap minace, – oni per rusa lingvo diras al vi: morgaŭ. Do morgaŭ. Nu, ĝis! Skribu leterojn!..

La pordo krake fermiĝis. Korobejnikov denove malfermis ĝin, kaj elkuris sur la straton, sed Ostap jam forestis. Li rapide iris preter la ponto. Vapor-lokomotivo, veturanta sur la viadukto, lumigis lin, kaj kovris per la fumo.

– Glacio ekmoviĝis! – kriis Ostap al la maŝinisto. Glacio ekmoviĝis, sinjoroj ĵurianoj!

La maŝinisto ne aŭdis, svingis la manon; radoj de la maŝino pli forte ektiris la ŝtalajn kubutojn de la kulisaj kranks, kaj la lokomotivo forimpetis.

Minuton aŭ du staris Korobejnikov en glacia venteto kaj, aĉe blasfemante revenis en sian dometon. Neeltenebla amaro kaptis lin. Li ekstaris meze de la ĉambro, kaj komencis furioze piedbati la tablon. Saltis la cindrujo, farita

galoŝ-forme kun ruĝa surskribo “Triangulo”, la glaso tostis la karafon.

Ankoraŭ neniam Varfolomej Korobejnikov estis trompita tiel malnoble. Li scipovis trompi iun ajn, sed ĉi tie oni trompis lin kun tiel genia simpleco, ke li ankoraŭ longe staris, frapante dikajn piedetojn de la manĝotablo.

En regiono Gusisĉe oni nomis na Korobejnikov: Varfolomeiĉ. Oni sin turnis al li nur okaze de ekstrema bezono. Varfolomeiĉ prenis lombarde aĵojn, kaj fiksis kani-balajn procentojn. Li okupiĝis pri tio jam kelkajn jarojn, sed ankoraŭ eĉ ne unufoje estis kaptita. Sed nun li malgajnis ĉe sia plej bona komerca entrepreno, de kiu li atendis grandajn gajnojn kaj bonstatan maljunecon.

– Ĉu tio estas ŝerco?! – kriis li, rememorante la pereintajn mandatojn. – De nun – nur antaŭpage. Sed kiel mi eraris? Per propraj manoj fordonis mi tiun ĉi nuksan gast-salonan kompleton!.. Ja sole gobelino”Paŝtistino” valoregas senmezure! Permana laboro!..

La sonorilon “Turnu” delonge jam turnis iu necerta mano, kaj ne sukcesis Varfolomeiĉ rememori ke la enirpordo restis neŝlosita, kiam en la vestiblo ekaŭdiĝis peza frapobruo, kaj voĉo de homo, komplikiĝinta en labirinto de la ŝrankoj, kriis:

– Kien ĉi tie eniri?

Varfolomeiĉ eniris la vestiblon, tiris al si ies palton (palpe – drapo), kaj enigis en la manĝoĉambron patron Fjodor.

– Grandanime pardonu min, – diris patro Fjodor.

Post dek minutoj de ambaŭflankaj duonklarigoj kaj ruzaĵoj evidentiĝis ke civitano Korobejnikov vere havas iujn-ajn informojn pri meblaro de Vorobjaninov, kaj ke patro Fjodor ne rifuzas tiujn ĉi informojn pripagi. Krom tio, al tre

vigla plezuro de la arkivisto, okazis ke la vizitanto estas nasko-frato de iama gvidanto, kaj pasie dezirus konservi memoron pli li, akirante la nuksan gastsalonan kompleton. Frato de Vorobjaninov havis plej varmajn rememorojn pri la juneco, ligitajn kun tiu ĉi kompleto.

Varfolomeiĉ petis cent rublojn. La vizitanto aprezis memoron pri sia frato signife malpli, je tridek proksimume rubloj. Ili interkonsentis pri kvindek.

– Mi petus antaŭpagi, – deklaris la arkivisto, – tio estas mia regulo.

– Kio se mi pagos per oraj dekrublaĵoj? – ekrapidis patro Fjodor, disŝirante subŝtofon de la jako.

– Mi ricevos laŭ kurzo. Je naŭ kaj duono. Hodiaŭa kurzo.

Vostrikov elŝutis el la kolbaseto kvinon da flavaĵoj, alŝutis al ili du rublojn kaj duonon per arĝento, kaj alŝovis la tutan monteton al la arkivisto. Varfolomeiĉ dufoje rekalkulis la monerojn, enŝutis ilin en sian manon, petis la gaston atendi minuton, kaj eliris por preni la mandatojn. En sia sekreta kancelario Varfolomeiĉ meditis ne longe, malfermis alfabetuman spegulon de vivo je litero Po, rapide trovis la bezonatan nombron, kaj prenis de la breto pakaĵon kun mandatoj de general-vidvino Popova. Disfosante la pakaĵon, Varfolomeiĉ elprenis el ĝi mandaton por dek du nuksaj seĝoj far fabriko de Hambs, donitajn al kamarado Bruns loĝanta sur strato Vinogradnaja 34. Mirigante pri sia lerteco kaj kapablo elturniĝi, la arkivisto ekridetis, kaj prezentis la mandatojn al la aĉetanto.

– Ĉu ĉio en sama loko? – kriis la aĉetanto.

– Unu apud la alia. Ili ĉiuj staras tie. Perfektas la kompleto. Delico. Tamen kial mi klarigas, vi mem konas tion!

Patro Fjodor longe kaj rave skuis manon de la arkivisto kaj, batiĝinte multfoje je la ŝrankoj en la vestiblo, forkuris en la noktan mallumon.

Varfolomeiĉ ankoraŭ longe priridis la trompitan aĉetinton. La orajn monerojn li metis vice sur la tablon, kaj longe sidis dormeme rigardante la kvinon da helaj disketoj.

«Sed kio tiris ilin al mebloj de Vorobjaninov?» – pensis li. – «Frenezigi ili».

Li senvestiĝis, neatente preĝis al Dio, enkuŝis la mal-larĝan fraŭlinan liteton, kaj zorgoplene ekdormis.

Ĉapitro 12

Pasia virino – revo de poeto

Dum tiu ĉi nokto la malvarmo okazis formanĝita senrezerve. Estis tiel varme, ke ĉe fruaj pasantoj doloretis la piedoj. Paseroj elĉirpis iujn stultaĵojn. Eĉ kokino, elirinta el la kuirejo en la gastejan korton, eksentis freŝajn fortojn, kaj penis ekflugi. La ĉielo estis kovrita per etaj nubaj pastbuloj, fatrasa kesto eligis odoron de violoj kaj de supo *pejzan*. Vento svenis sub la kornico. La katoj komforte kuŝaĉis sur la tegmento kaj, degne duonfermante la okulojn, rigardis la korton, tra kiu kuris ĉambristo Aleksandro kun pakajeto da malpuraj tolaĵoj.

En koridoroj de “Sorbono” oni ekbruis. Por malfermo de la tramlinio kunveturis divers-distriktaĵaj delegitoj. El gasteja benĉaro, kun elpendaĵo “Sorbono», eliris amaso da ili.

La suno varmigis plenforte. Feraj ondigitaj kurtenoj de vendejoj ekflugis supren. Sovetiaj oficistoj, elirintaj en vigitaj paltoj, sufokiĝis, malbutoniĝis, sentante pezon de la printempo.

Sur Kooperativa strato rompiĝis risorto de troŝarĝita kamiono de Muelej-konstruado, kaj Viktor Miĥajloviĉ Polesov, veninta al loko de la okazintaĵo, donadis konsilojn.

En la ĉambro, meblita kun aferema lukso (du litoj kaj nokta tableto), aŭdiĝis ĉevala ronkado kaj henado: Ipolit Matveeviĉ gaje lavis sin kaj purigis la nazon. La granda kombinanto kuŝis en la lito, pririgardante difektojn de la botetoj.

– Bonokaze, – diris li, – mi petas likvidi la ŝuldon.

Ipolit Matveeviĉ elplonĝis el la viŝtuko, kaj ekrigardis la partneron per konveksaj, sen la nazumo, okuloj.

– Kial vi rigardas min kiel soldato pedikon? Kio mirigis vin? Ĉu la ŝuldo? Jes! Vi ŝuldas al mi monon. Hieraŭ mi forgesis diri al vi ke por la mandatoj mi pagis, kun via permeso, sepdek rublojn. Jen la kvitanco. Do transĵetu ĉi tien tridek kvin rublojn. La koncesiuloj, mi esperas, partoprenas la elspezojn sur bazo de egaleco, ĉu?

Ipolit Matveeviĉ surmetis la nazumon, pe-legis la kvitancon kaj, angorante, fordonis la monon. Sed eĉ tio ne povis malpliigi lian ĝojon. La riĉaĵoj troviĝis jam en la manoj. Do la tridekrubla polvo malaperis en brilo de la brilanta monto.

Radie ridetante Ipolit Matveeviĉ eliris en la koridoron, kaj komencis promeni. Planoj de nova vivo, konstruita sur la trezora fundamento, gajigis lin. «Kaj la sankta patro?» – mense kaŭstikis li. – «Perdis li, stultulo. Ne vidos li la seĝojn kiel sian barbon».

Veninte ĝis fino de la koridoro Vorobjaninov returnis. Blanka kun fendoj pordo numero dek tri malfermiĝis, kaj renkonten al li eliris patro Fjodor en blua ĉemizo, zonigita per eluzita nigra ŝnureto kun pompa kvasteto. Lia bonkora vizaĝo digelis pro la feliĉo. Ankaŭ li eliris en la koridoron

por promeni. La konkurantoj kelkfoje renkontiĝis kaj, venke rigardante unu la alian, sekvis pluen. Fine de la koridoro ili ambaŭ turniĝis samtempe, kaj denove proksimiĝis... En brusto de Ipolit Matveeviĉ bolis jubilo. Sama sento posedis ankaŭ patron Fjodor. Ili ambaŭ sentis kompaton al la venkita kontraŭulo. Fine, dum kvina turno, Ipolit Matveeviĉ ne eltenis.

– Mi salutas vin, patro, – diris li kun neesprimebla dolĉeco.

Patro Fjodor kolektis tutan sian sarkasmon, ricevitan de Dio, kaj respondis:

– Bonan matenon, Ipolit Matveeviĉ.

La malamikoj disiris. Kiam iliaj vojoj kuniĝis denove, Vorobjaninov diris:

– Ĉu mi ne vundetis vin dum nia lasta renkonto?

– Ne, kial, estis tre agrable renkontiĝi, – respondis jubilanta patro Fjodor.

Ili denove ekestis disigitaj. Vizaĝo de patro Fjodor komencis indigni na Ipolit Matveeviĉ.

– Tagpreĝon vi, ŝajne, jam ne priservas? – demandis li dum la sekva renkonto.

– Kial ja servi! La paroĥanoj en urbojn diskuris, trezorojn ili serĉas.

– Rimarku: siajn trezoron! Siajn!

– Al mi ne estas sciate kies, sed ili serĉas.

Ipolit Matveeviĉ volis diri iun aĉaĵon, kaj eĉ malfermis por tio la buŝon, sed sukcesis elpensi nenion, kaj kolere eniris sian ĉambron. Post minuto de tie eliris, en blua veŝto, filo de turka civitano Ostap Bender kaj, surpaŝante laĉojn de siaj ŝuoj, direktiĝis al Vostrikov. Rozoj sur vangoj de patro Fjodor velkis kaj aliformiĝis je cindro.

– Ĉu vi aĉetas malnovajn aĵojn? – demandis Ostap minace. – Ĉu seĝojn? Tripaĵojn? Skatoletojn de ciro?

– Kion vi volas? – elflustris patro Fjodor.

– Mi volas vendi al vi malnovan pantalonon.

La pastro glaciigis kaj deŝoviĝis.

– Kial vi silentas, kvazaŭ episkopo dum la akceptado?

Patro Fjodor malrapide direktiĝis al sia ĉambro.

– Malnovajn aĵojn aĉetas, novajn – ŝtelas! – kriis Ostap en lian dorson.

Vostrikov mallevis la kapon kaj haltis ĉe sia pordo. Ostap daŭrigis la mokadon:

– Do kio pri la pantalono, multestimata kult-servanto? Ĉu vi prenas? Estas ankaŭ manikoj de veŝto, interno de ringa kuko, kaj oreloj de morta azeno. Ope estos pli ĉipe. Kaj ili ne estas serĉendaj: ili ne kuŝas en seĝoj! Ĉu?!

Pordo post la servanto de kulto fermiĝis.

Kontentiĝinta Ostap, frapante la tapiŝon per la laĉoj, malrapide ekiris reen. Kiam lia ampleksa figuro deiris sufiĉe malproksimen, patro Fjodor rapide elŝovis la kapon el post la pordo, kaj kun longe detenata indigno elpepis:

– Ci mem estas stultulo!

– Kio? – kriis Ostap, ĵetinte sin reen, sed la pordo estis jam fermita, nur la seruro klakis.

Ostap kliniĝis al la ŝlosil-truo, tube aligis la plandon al la buŝo, kaj distingeble diris:

– Kiom kostas **opio por popolo**²⁷?

Post la pordo regis silento.

– Paĉjo, vi estas vulgara homo! – kriis Ostap.

Sammomente el la ŝlosila truo elsaltis kaj ekmoviĝis krajono, per pinto de kiu patro Fjodor penis serpente piki la

27. **opio por popolo**: religio.

malamikon. La koncesiulo ĝustatempe desaltis, kaj kaptis la krajonon. La malamikoj, dividitaj per la pordo, komencis silente tiri la krajonon al si. Venkis la juneco, kaj la kraĵono, kontraŭanta kiel splito, malrapide elrampis el la ŝlosila truo. Kun tiu ĉi trofeo Ostap revenis en sian ĉambron. La partneroj eĉ pli gajiĝis.

– La malamiko kuras, kuras, kuras! – kantis Ostap.

Sur faco de la kraĵono li gravuris per poŝtrancileto ofendan vorton, enkuris la koridoron kaj, eniginte la kraĵonon en la ŝlosilan embrazon, tuj revenis.

La amikoj eltiris al la lumo la verdajn deŝirajn partojn de la mandatoj, kaj komencis detale pristudi ilin.

– Mandato por gobelino “Paŝtistino”, – reve diris Ipolit Matveeviĉ. – Tiun ĉi gobelinon mi aĉetis ĉe peterburga antikvaĵisto.

– Al diablo la paŝtistinon! – kriis Ostap, disŝirante la mandaton je nudeloj.

– Tablo ronda... Ŝajne de la kompleto...

– Donu al mi la tableton. Al diabla patrino tiun ĉi tableton!

Restis du mandatoj: unu – por dek seĝoj, senditaj en muzeon de mebla majstreco en Moskvo, alia – por unu seĝo, al kamarado Gricacujev, en Stargorod, strato Pleĥanov 15.

– Preparu la monon, – diris Ostap, – eble ni endos veturi en Moskvon.

– Sed ankaŭ ĉi tie estas seĝo, ĉu?

– Unu ŝanco kontraŭ dek. Pura matematiko. Kaj ankaŭ tio kondiĉe ke civitano Gricacujev ne eluzis ĝin en sia **burgaĵo**²⁸.

28. **Burg-aĵo**: tiel oni nomis, ironie, portempajn ladajn enĉambrajn fornetojn.

– Ne ŝercu tiel, ne decas.

– Ne gravas, ne gravas, *liber fater* Konrad Karloviĉ Miĥelson, trovos ni! Sankta afero! Batistajn piedtukojn ni portos, kremajon Margo manĝados ni.

– Ial ŝajnas al mi, – rimarkis Ipolit Matveeviĉ, – ke la valoraroj devas esti ĝuste en tiu ĉi seĝo.

– Ha! Ĉu vere ŝajnas? Kaj kio ankoraŭ al vi ŝajnas? Ĉu nenio? Nu, bone. Ni laboru marksisme. Ĉielon ni lasu al birdoj, kaj nin mem ni turnu al la seĝoj. Min turmentas deziro kiom eble rapide renkonti invalidon de imperiisma milito, civitanon Gricacujev, strato Pleĥanov, domo dek kvin. Ne malantaŭiĝu, Konrad Karloviĉ. La planon ni el-laboru dumvoje.

Preterirante pordon de patro Fjodor la venĝema filo de turka civitano frapis ĝin per la piedo. El la ĉambro elaŭdiĝis malforta muĝo de la pe-persekutita konkurenculo.

– Nur ne postiru li nin! – ektimis Ipolit Matveeviĉ.

– Post hodiaŭa renkonto de la ministroj sur la jakto eblas jam neniu proksimiĝo. Li timas min.

La amikoj revenis nur antaŭvespere. Ipolit Matveeviĉ estis zorgema. Ostap brilis. Sur li estis novaj frambokoloraj botetoj, al kalkanumoj de kiuj estis alŝraŭbitaj rondaj kaŭĉukaĵoj, ŝakludaj ŝtrumpoj kun verdaj kaj nigraj kvadratetoj, kremkolora kaskedo, kaj duonsilka skarpo de rumana subtono.

– Jes, ĝi vere estas tie, – diris Ipolit Matveeviĉ, rememorante viziton al vidvino Gricacujeva, – sed kiel akiri tiun ĉi seĝon? Ĉu aĉeti?

– Certe ne, – respondis Ostap, – se ne paroli eĉ pri tiu ĉi tute senutila elspezo, tio elvokos paroladojn. Kial unu seĝon? Kial ĝuste tiun ĉi seĝon...?

– Do kion fari?

Ostap ame pririgardis malantaŭan parton de la novaj botetoj.

– Ŝik-moderno, – diris li. – Kion fari? Ne zorgu, prezidanto, mi prenas la operacion sur min. Al tiuj ĉi botetoj cedos ĉiu ajn seĝo.

– Ĉu vi scias, – vigligis Ipolit Matveeviĉ, – kiam vi konversaciis kun sinjorino Gricacujeva pri inundo, mi ekzidis nian seĝon kaj, je mia vorto, mi sentis sub mi ion malmolan. Ili estas tie, je Dio, tie... Mi ja sentas tion.

– Ne emociiĝu, civitano Miĥelson.

– Ni devas elŝteli ĝin nokte! Je Dio, elŝteli!

– Tamen por gvidanto de nobelaro via skalo estas tro primitiva. Ĉu vi konas teknikon de la afero? Eble en via valizo estas kaŝita vojaĝa kompleto de ŝtelŝlosiloj? Forĵetu tion el via kapo! Rabi sendefendan vidvinon estas tipa dandaĉaĵo.

Ipolit Matveeviĉ rekonsciiĝis.

– Ja estas deziro plirapidigi, – diris li pete.

– Rapide nur katidoj naskiĝas, – edife diris Ostap. – Mi edzinigu ŝin.

– Kiun?

– Na *madam* Gricacujeva.

– Por kio ja?

– Por trankvile kaj senbrue prifosi ŝian seĝon.

– Sed vi ligas vin por la tuta vivo!

– Por bono de la koncesio mi pretas fari ĉion!

– Por la tuta vivo! – elflustris Ipolit Matveeviĉ.

Pro la ekstrema miro Ipolit Matveeviĉ dissvingis la brakojn. Buŝo sur lia razita pastra vizaĝo malfermiĝis, kaj ekvideblis la bluaj dentoj, ne purigitaj de forveturo el urbo No.

– Por la tuta vivo! – elflustris Ipolit Matveeviĉ. – Tio estas grava ofero.

– Vivo! – diris Ostap. – Ofero! Kion vi scias pri vivo kaj pri oferoj? Ĉu vi opinias ke post kiam oni elloĝigis vin el via izoldomo vi scias kio estas vivo? Kaj se oni rekviziciis de vi falsan ĉinan vazon, tio estas ofero? Vivo, sinjoroj ĵurianoj, estas afero komplika, sed, sinjoroj ĵurianoj, tiu ĉi komplika afero malfermiĝas simple, kiel kesto. Oni devas nur scipovi malfermi ĝin. Kiu ne scipovas, tiu pereas. Ĉu vi aŭdis pri husaro-ermito?

Ipolit Matveeviĉ ne aŭdis.

– Bulanov! Ne aŭdis? Heroo de aristokrata Peterburgo, ĉu? Nun vi aŭdos.

Kaj Bender rakontis al Ipolit Matveeviĉ historion, mirinda komenco de kiu incitis tutan monduman Peterburgon, kaj kies fino, eĉ pli mirinda, okazis rimarkita dum lastaj jaroj per absolute neniu.

RAKONTO PRI HUSARO-ERMITO

Brila husaro grafo Aleksej Bulanov, kiel ĝuste informis Bender, vere estis heroo de aristokrata Peterburgo. Ceremoniemaj loĝantoj de kasteloj sur Angla bord-strato, kaj paĝoj de monduma kroniko, senĉese parolis pri tiu ĉi brila rajdisto kaj diboĉulo. Tre ofte sur paĝoj de ilustritaj gazetoj aperis fotografa portreto de la belulo-husaro: riĉe brodita jako, borderita per grajna astrakano, altaj glatfiksitaj tempioj, kaj mallonga venka nazo.

Post grafo Bulanov ruliĝis famo de partoprenanto en multaj sekretaj dueloj, kiuj havis tragikajn sekvojn, de aper-

taj amaferoj kun plej belaj kaj plej neatingeblaj damoj de la mondumo, de frenezaj agoj kontraŭ estimataj en la komunumo personoj, kaj de rafinitaj diboĉadoj, senevite finiĝantaj per batado de filistroj.

La grafo estis bela, juna, riĉa, feliĉa en amo, feliĉa en karto kaj en heredoj. Liaj parencoj mortis ofte, kaj iliaj heredaĵoj pligrandigis ankaŭ sen tio grandegan havaĵon de la husaro.

Li estis aroganta kaj kuraĝa. Li helpis al abisena neguso Meneliko dum ties milito kontraŭ italoj. Li sidis sub grandaj abisenaj steloj, volviĝinte en blankan burnuson, kaj rigardante tri-verstan mapon de la loko. Lumo de la torĉoj ĵetis ŝanceliĝantajn ombrojn sur glatfiksitajn tempietojn de la grafo. Ĉe liaj piedoj sidis lia nova amiko, abisena knabo Vasja.

Frakasinte armeon de itala reĝo, la grafo revenis en Peterburgon kune kun abiseno Vasja. Peterburgo renkontis la heroon per floroj kaj ĉampagno. Grafo Aleksej denove, kiel oni skribas en mondumaj romanoj, enprofundiĝis senzorgan abismon de delicoj. Oni daŭrigis paroli pri li kun duobla ravo. Virinoj veneniĝis pro li, viroj enviis. Sur malantaŭa ŝtupeto de grafa kaleŝo, trafluganta Milionstraton, senŝanĝe staris la abiseno, elvokanta miron de pasantoj per sia nigreco kaj la eleganta staturo.

Kaj subite ĉio finiĝis. Grafo Aleksej Bulanov malaperis. Princino Belorus-Balta, lasta amatino de la grafo, estis senkonsola. Malapero de la grafo okazigis multe da bruo. Ĵurnaloj estis plenaj per konjektoj. Detektivoj elprovis ĉion. Sed ĉio estis senrezulta. Spuroj de la grafo perdiĝis.

Kiam la bruo jam malpliigis, el Averkiev-monaĥejo venis letero, klariganta ĉion. La brila grafo, heroo de aristokrata Peterburgo, Belŝacaro de 19-a jarcento, iĝis ermito.

Oni transdonis terurajn detalojn. Oni diris ke la grafo-monaĥo portas ĉenojn pezo de kiuj estas ĉirkaŭ kvindek kilogramoj, ke li, kutimiĝinta al delikata franca manĝ-maniero, nutras sin nur per terpomaj ŝeloj. Aperis vortico da supozoj. Oni diris ke al la grafo venis sonĝe lia patrino. Virinoj ploris. Ĉe domo de princino Belorus-Balta staris vi-coj da kaleŝoj. La princino kaj ŝia edzo akceptis la kondol-lencojn. Naskiĝis novaj onidiroj. Oni atendis revenon de la grafo, kaj diris ke tio estas portempa religia frenezigo. Oni asertis ke la grafo fuĝis de la ŝuldoj, kaj oni transdonis ke la okazaĵon kaŭzis malfeliĉa amafero.

Sed, fakte, la husaro iris esti monaĥo por percepti vi-von. Li ne revenis. Iom post iom oni forgesis pri li. Princino Balta konatiĝis kun itala kantisto, kaj abiseno Vasja re-venis en la patrolandon.

Grafo Aleksej Bulanov, preninta en la monaĥejo no-mon Evpl, senfortigis sin per majestaj heroaĵoj. Li vere por-tis la ĉenojn, sed al li ŝajnis ke tio ne sufiĉas por percepti vivon. Tiam li inventis por si specifan monaĥan veston: ka-puĉon kun vertikala viziero, kovranta la vizaĝon, kaj la su-tanon, limigantan liajn movojn. Kun permeso de la monaĥej-estro li komencis portadi tiujn ĉi vestaĵojn. Sed ankaŭ tio ŝajnis al li nesufiĉa. Posedata per fiereco li foriris en arbaran terkabanon, kaj komencis vivi en kverka ĉerko.

Heroaĵoj de ermito Evpl plenigis la monaĥejon per miro. Li manĝis nur krakenojn, stokon da kiuj oni renovigis post ĉiuj tri monatoj.

Tiel pasis dudek jaroj. Evpl opiniis sian vivon saĝega, korekta, kaj sole ĝusta. Vivo lia estis nekutime facila, liaj pensoj estis kristalaj. Li pe-perceptis vivon, kaj komprenis ke vivi alie ne eblas.

Foje li mire rimarkis ke sur loko, kie li dum dudek jaroj kutimis trovi krakenojn, estas nenio. Li ne manĝis kvar tagoj. En kvina tago venis nekonata al li maljunulo en bastoŝuoj, kaj diris ke komunistoj elloĝigis la monaĥojn, kaj aranĝis en la monaĥejo sovĥozon. Lasinte iom da krakenoj la maljunulo, plorante, foriris. La ermito ne komprenis la maljunulon. Luma kaj trankvila kuŝis li en la ĉerko, kaj ĝojis al percepto de la vivo. La maljuna kamparano daŭre alportis krakenojn.

Tiel pasis ankoraŭ kelkaj, per neniu maltrankviligitaj jaroj.

Nur foje pordo de la terkabano malfermiĝis, kaj kelkaj homoj, kliniĝinte, eniris ĝin. Ili venis al la ĉerko, kaj komencis silente rigardi la maljunulon. Tio estis altstaturaj homoj en botoj kun spronoj, en grandegaj rajdistaj pantaloneoj, kaj kun *mauzer*-pistojoj en lignaj poluritaj skatoloj. La maljunulo kuŝis en la ĉerko, kaj rigardis la venintojn per la lumantaj okuloj. Lia longa kaj malpeza griza barbo kovris duonon de la ĉerko. La nekonatoj tintis per la spronoj, levis la ŝultrojn, kaj foriris, akurate ferminte post si la pordon.

Pasis tempo. La vivo malfermiĝis antaŭ la ermito en tuta sia pleneco kaj dolĉeco. Dum nokto, kiu venis post tago kiam la ermito definitive komprenis ke ĉio en lia percepto estas luma, li subite vekiĝis. Tio mirigis lin. Li neniam vekiĝis nokte. Meditante pri kio vekigis lin, li denove ekdormis, kaj tuj vekiĝis, sentante fortan brulon sur la dorso. Pripensante kaŭzon de tiu ĉi brulado li penis ekdormi, sed ne sukcesis. Io malhelpis al li. Li ne dormis ĝis la mateno. Sekvontnokte lin denove vekis io. Li turniĝis ĝis la mateno, mallaŭte ĝemante, kaj nerimarke al si mem, gratante la brakojn.

Tage, leviĝinte, li hazarde enrigardis la ĉerkon. Tiam li komprenis ĉion: en anguloj de lia malserena kuŝejo rapide kuradis ĉerizkoloraj cimoj. La ermito eksentis abomenon.

Samtage venis la maljunulo kun la krakenoj. Kaj jen la ermito, silentanta dudek kvin jaroj, ekparolis. Li petis alporti iom da keroseno. Aŭdinte parolon de la granda silentulo la kamparano konsterniĝis. Tamen, ĝenante kaj kaŝante la boteleton, li alportis la kerosenon. Tuj kiam la maljunulo foriris, la ermito per la tremanta mano ŝmiris ĉiujn interspacojn kaj juntojn de la ĉerko. Unue dum la tri tagoj Evpl dormis trankvile. Nenio maltrankviligis lin. Ankaŭ sekvontajn tagojn li ŝmiris la ĉerkon per la keroseno. Sed post du monatoj li komprenis ke per keroseno oni ne povas liberiĝi de cimoj. Dum noktoj li rapide turniĝis kaj laŭte preĝis, sed la preĝoj helpis eĉ malpli ol keroseno.

Pasis duonjaro en nepriskribeblaj turmentoj antaŭ ol la ermito denove alparolis la maljunulon. Dua peto eĉ pli konsternis la maljunulon. La ermito petis alveturigi al li, el urbo, pulvoron “Aragac” kontraŭ cimoj. Sed ankaŭ “Aragac” ne helpis. La cimoj plimultiĝis neimageble rapide. Fortega sano de la ermito, kiun ne povis rompi dudek-kvin-jara fastado, videble malboniĝis. Komenciĝis malluma, malespera vivo. La ĉerko komencis ŝajni al ermito Evpl aĉa kaj maloportuna. Nokte, laŭ konsilo de la kamparano, li bruligis la cimojn per brulantaj lignaĵoj. La cimoj mortis sed ne cedis.

Estis elprovita lasta rimedo: produktaĵo de fratoj Glik: rozkolora likvaĵo kunodoro de venenita persiko, nomata “Cimino”. Sed ankaŭ tio ne helpis. La situacio malboniĝis. Kiam pasis du jaroj de la granda batalo, la ermito hazarde rimarkis ke li tute ĉesis pensi pri senco de vivo, ĉar tage kaj nokte li okupiĝas pri neniigo de la cimoj.

Tiam li komprenis ke eraris. Vivo, same kiel antaŭ dudek kvin jaroj, estis malluma kaj enigma. Foriri de ĉiutaga maltrankvilo li ne sukcesis. Vivi per la korpo surtere kaj per la animo ĉiele okazis neeble.

Tiam la maljunulo leviĝis, kaj vigle eliris el la terkabano. Li staris ene de malhela verda arbaro. Estis frua seka aŭtuno. Ĉe la terkabano mem elteriĝis familio da blankaj fungoj-grandventruloj. Nekonata birdo sidis sur branĉo kaj kantis solon. Aŭdiĝis bruo de preteriranta trajno. La tero ekstrems. Vivo estis belega. La maljunulo ne retrorigardante iris antaŭen.

Nun li servas estiel veturigisto en ĉeval-transportejo de moskva urbestro.

Rakontinte al Ipolit Matveeviĉ tiun ĉi altgrade edifan historion, Ostap per maniko de la jako purigis siajn frambkolorajn ŝuojn, elludis per siaj lipoj fanfar-melodion, kaj foriris.

Antaŭmatene li enrompiĝis en la ĉambron, demetis la piedvestojn, metis la frambkolorajn botetojn sur la noktan tablon, kaj komencis karesi la briletan haŭton, kun tenera pasio alparolante:

– Miaj etaj amikoj.

– Kie vi estis? – demandis Ipolit Matveeviĉ duondorme.

– Ĉe la vidvino, – obtuze respondis Ostap.

– Nu?

Ipolit Matveeviĉ apogis sin je la kubuto.

– Ĉu vi edzinigos ŝin?

Okuloj de Ostap ekbrilis.

– Estiel honesta homo nun mi jam devas edziĝi.

Ipolit Matveeviĉ konfuze gruntis.

– Pasia virino – diris Ostap, – revo de poeto. Provinca naiveco. En centro tiaj ĉi subtropikoj jam delonge forestas, sed en periferio ili ankoraŭ renkontiĝas.

– Kaj kiam la edziĝfesto?

– Postmorgaŭ. Morgaŭ ne eblas: la unua de majo, ĉio estas fermita.

– Sed kio pri nia afero? Vi edziĝos... Kaj ni, eble, devos veturi en Moskvon.

– Kial vi maltrankviliĝas? La kunsido daŭriĝas.

– Kaj la edzino?

– La edzino? La brilanta vidvineto? Lasta problemo! Subita forveturo pro voko el la centro. Negranda raporto en Eta Sovetia Popolkomisarejo. Adiaŭa sceno kun porvojaĝa kokido. Ni veturos komforte. Dormu. Morgaŭ ĉe ni estas libera tago.

Ĉapitro 13

Spiru profunde: vi estas emociigita

Matene de la unua de majo Viktor Miĥajloviĉ Polesov elsaltis en la straton, konsumita per sia kutima agadoŝifo, kaj ekimpetis en la centron. Komence liaj multflankaj talentoj ne povis trovi al si taŭgan aplikon, ĉar homoj ankoraŭ estis malmultaj, kaj festaj tribunoj, gardataj per rajdpolicistoj, estis malplenaj. Sed, ĉirkaŭ la naŭa, en ĉiuj partoj de la urbo ekmurmuris, eksiblis kaj ekfajfis blovorkestroj. El pordegoj elkuradis dommastrinoj.

Kolono de muzik-laboruloj, en molkolumaj ĉemizoj, ial trafis mezon de procesio de fervojistoj, barante al ili vojon kaj ĝenante ĉiujn.

Kamiono, sur kiun estis metita verda krucligna vapor-lokomotivo de serio “Ĉo”, ataketis la muzikistojn de malantaŭe. Dum tio el ventro de la lokomotivo mem oni kriis al la laboruloj de hobojo kaj fluto:

– Kie estas via administranto? Ĉu vere vi devas iri sur Ruĝarmea strato?! Ĉu vi ne vidas ke vi enrampis kaj kaŭzas ŝtopiĝon!

Tiam, malfeliĉe al la muziklaboruloj, en la aferon enmiksiĝis Viktor Miĥajloviĉ.

– Certe, vi devas turniĝi ĉi tien, en la sakstraton! Eĉ feston ili ne scipovas aranĝi! – plenvoĉe kriis Polesov. – Ĉi tien! Ĉi tien! Mirinda malordaĉo!

Kamionoj de stargoroda urbestro kaj de Muelej-konstruo veturigis infanojn. Plej etaj staris ĉe bordoj de la kamionoj, kaj pli altstaturaj – en la centro. La neplenaĝa militistaro skuis la paperajn flagetojn kaj gajis senmezure.

Frapadis la infankomunistaj tamburoj. Antaŭarmeaj junuloj elfleksis la brustojn kaj penis iri takte. Estis premiĝe, brue kaj varmege. Ĉiuminute okazis kaj tuj dissolviĝis ŝtopiĝoj. Por pasigi la tempon dum la ŝtopiĝoj oni suprenĵetis maljunulojn kaj aktivulojn. La maljunuloj plendadis per inaj voĉoj. Aktivuloj flugadis silente, kun seriozaj vizaĝoj. En unu gaja kolono oni opiniis ke Viktor Miĥajloviĉ, kiu penis trapuŝiĝi en alian stratflankon, ankaŭ estas administranto, kaj komencis suprenĵeti lin. Polesov konvulsiis la krurojn kiel pajaco.

Oni preterportis pajloŝtopaĵon prezentantan anglan ministron Ĉemberlen, cilindran ĉapelon de kiu per kartona martelego batadis laboristo kun anatomia muskolaro. Preterveturis en aŭto tri junkomunistoj en frakoj kaj blankaj gantoj. Ili konfuze rigardadis la homamason.

– Vaska! – oni kriis de la trotuaro. – Burĝo! Fordonu la ŝelkojn!

Junulinoj kantis. En amaso da servantoj de sociala provizo iris Alĥen kun granda ruĝa banto sur la brusto, kaj pripense nazvoĉadis:

Sciu bonege, burĝa kohorto:

Ruĝa Armeo estas plej forta!..

Sportistoj laŭkomande kriis ion nedistingeblan.

Ĉio iris, veturis kaj marŝis al nova tram-ejo, el kiu ĝuste en la dektria devis elveturi unua en Stargorod vagono de elektra tramo.

Neniu scias ĝuste kiam oni komencis konstrui stargorodan tramon.

Iam, en dudekaj jaroj, kiam komenciĝis volontulaj sabbatlaboroj, fervojistoj kaj ŝnuregistoj ekiris kun muziko en Gusisĉe, kaj la tutan tagon fosis iujn kavojn.

Ili elfosis tre multe da profundaj kaj grandaj kavoj.

Inter la laborantoj kuradis kamarado en inĝeniera kaskedo. Post li iris grupestroj kun diverskoloraj fostetoj. Dum sekvonta sabato oni laboris en sama loko. Du kavoj, fositaj en malĝustaj lokoj, okazis supersutendaj. La kamarado en la inĝeniera kaskedo atakis la grupestrojn, kaj postulis klarigojn. La novajn kavojn oni fosis eĉ pli profunde kaj vaste.

Poste oni altransportis brikojn, kaj aperis veraj konstru-laboristoj. Ili komencis masoni la fundamenton. Poste ĉio silentiĝis. La kamarado en la inĝeniera kaskedo ankoraŭ venadis iam en la malpleniĝintan konstruejon, kaj longe paŝadis en la masonigita kavaĵo, murmurante:

– Ekonomiisma mastrumado.

Li frapadis la fundamenton per la bastoneto, kaj kuris hejmen, en la urbon, fermante per la manoj la malvarmiĝintajn orelojn.

Familnomo de la inĝeniero estis Triorelov.

La trama stacio, konstruo de kiu haltiĝis ĉe la fundamento, estis pripensita far Triorelov jam delonge, ankoraŭ en jaro 1912, sed la urbestraro kontestis la projekton. Post du jaroj Triorelov rekomencis sturmon de la urbestraro, sed malhelpis la **milito**²⁹. Post la milito malhelpis la revolucio. Nun malhelpis NEP, ekonomiisma mastrumado, profitdona entreprenado. Somere la fundamento superkreskis per floroj, kaj vintre infanoj aranĝis tie glaciajn montetojn.

Triorelov revis pri granda afero. Al li estis enue servi en pliboniga fako de stargoroda urbestraro, ripari randojn de trotuaroj kaj kompili antaŭkalkulojn por instalado de afiŝtabuloj. Sed granda afero forestis. Projekto de tramo, denove prezentita por pritakso, baraktis en altaj guberniaj rondoj, estis aprokata, neaprokata, transiris por pridiskuto en centron, sed, sendepende de aprobo aŭ malaprobo, ĝi kovriĝis per polvo ĉar, ĉe ambaŭ kazoj, monon oni ne donis.

29. Ĉi tie, ŝajne, estus utila ioma priskribo de tiama situacio. **Milito**: temas pri Unua Mondmilito (1914-1918). En Rusio ĝin sekvis unue kontraŭcara (1917), kaj poste (samjare) komunista revolucioj.

Dum jaroj 1918-1921 en Sovetio regis "Milita komunismo": provianta diktaturo (vendado de manĝeblaĵoj estis punata per ekzekuto), totala naciigo de laborlokoj, deviga laboro por ĉiuj, ŝtat-distribuo de ĉio. Militan komunismon sekvis NEP.

NEP ("Nova ekonomia politiko") kuraĝigis privatan entreprenemon. Sed ĝis jaro 1930, per poiome plifortigata impost-premado de privatuloj, NEP estis plene neniigita.

La romano, kiel vi jam scias, priskribas jaron 1927.

– Tio estas barbarismo! – kriis Triorelov al sia edzino.
– Forestas mono, ĉu? Sed por tropagi al ĉaristoj kiuj transportas varojn de la fervojstacio la mono estas, ĉu? Fiakristoj en Stargorod ŝiras de vivulo kaj mortulo! Certe, tio estas monopolo de maroderoj! Provu ja iri kun bagaĝo piede kvin kilometroj ĝis la stacio! La tramo profitiĝos dum ses jaroj!

Liaj malbrilaj lipharoj kolere pendadis. La platnaza vi-
zaĝo moviĝis. Li prenis el la tablo desegnaĵojn, kopiitajn
blumaniere, kaj milan jam fojon kolere montris ilin al la
edzino. Ĉi tie estis planoj de stacio, kaj tramejo por dek du
tramaj linioj.

– Al diablo dek du liniojn. Sed tri, tri linioj! Sen ili Star-
gorod sufokiĝos.

Triorelov snufis, kaj iris en la kuirejon segi la hejt-
lignon.

Ĉiujn mastrumajn laborojn en la domo li plenumis
mem. Li konstrukiis kaj konstruis lulilon por la bebo, kaj
lavmaŝinon. Komence li mem lavis la tolaĵojn, klarigante al
la edzino kiel oni uzu la maŝinon. Minimume kvinonon de
la salajro Triorelov elspezis por abono de eksterlandaj tek-
nikaj eldonaĵoj.

Por egaligi el- kaj en-spezojn li ĉesis fumi.

Sian projekton li alportis ankaŭ al nova stargoroda ur-
bestro Gavrilin, kiun oni alsendis na Stargorod el Samar-
kand. La nova estro, nigriĝinta sub uzbekia suno, longe
sed ne tro atente aŭskultis na Triorelov, supraĵe trarigardis
ĉiujn desegnaĵojn, kaj fine diris:

– Sed en Samarkand oni bezonas neniun tramon. Tie
ĉiuj rajdas sur azenoj. Azeno kostas ege malmulte: tri ru-
blojn. Sed ĝi kapablas porti ĝis ĉirkaŭ cent kvindek kilo-
gramoj!.. Eta tia azeneto, mirinde eĉ!

– Jen, ĝuste tio estas Azio! – kolere diris Triorelov. Azeno kostas tri rublojn, sed formanĝas ĝi tridek rublojn jare.

– Sed ĉu per tridek rubloj vi multe veturados sur via tramo? Tricentfoje. Eĉ ne ĉiutage dum jaro.

– Do mendu vi viajn azenojn! – kriis Triorelov, kaj elkuris el la kabineto, frapinte la pordon.

De tiam ĉe la nova estro aperis kutimo demandi ironie na Triorelov, dum renkonto kun li:

– Nu, kio, ĉu ni mendu azenojn aŭ tramon konstruu?

Vizaĝo de Gavrilin similis glate senŝeligitan napon. La okuloj ruzetis.

Post ĉirkaŭ du monatoj Gavrilin vokis al si la inĝenieron, kaj serioze diris al li:

– Ĉe mi ĉi tie projekteto ekestis celata. Estas klare al mi ke mono forestas, sed tramo ne estas azeno, per trirublaĵo oni ĝin ne aĉetos. Ĉi tie endas materialan bazon subigi. Praktika solvo estas kiu? Akcia societo! Kaj ankoraŭ kiu? Pruntoj! Kun procentoj. Post kiom da jaroj la tramo devas profitiĝi?

– Post ses jaroj de ekspluatad-komenco de tri unuavi-caj linioj.

– Nu, opinii ni ke post dek. Nun pri akcia societo. Kiu eniros ĝin? Provianta trusto, Butercentro. Ĉu la ŝnuregistroj bezonas la tramon? Bezonas! Ni al la stacidomo ŝarĝvagonojn sendados. Do ŝnuregistroj! Eblas ke Fervoja komisarejo donos iomete. Nu, gubernia komitato donos. Tio ja certas. Kaj, kiam komencos ni, la ŝtata kaj komunuma bankoj donos al ni pruntojn. Tia ja estas mia planeto. Ĵaŭde en prezidejo de la gubernia partia komitato okazos priparolado. Se decidiĝos ni, tiam estos via vico agadi.

Ĝis malfrua nokto Triorelov nervume lavis tolaĵojn kaj klarigis al la edzino avantaĝojn de trama transporto antaŭ ĉevala.

Ĵaŭde la afero solviĝis pozitive. Kaj komenciĝis turmentoj. La akcian societon oni kunigadis kun granda peno. Transport-komisarejo jen eniris aron de la akciuloj, jen ne. Provianta trusto penis anstataŭ 15% de la akcioj preni nur dek. Fine tuta pakaĵo de la akcioj ekestis distribuita, kvankam ne sen kunpuŝiĝoj. Pro la premado oni vokis na Gavrilin en Gubernian partian komitaton. Tamen ĉio pasis bonstate. Venis tempo ekagi.

– Nu, kamarado Triorelov, – diris Gavrilin, – komencu. Ĉu vi sentas ke scipovas vi? Jen kio. Tio ja ne estas azenaĉetado.

Triorelov dronis en la laboro. Venis tempo de grandega afero, pri kiu li revis multajn jarojn. Oni verkis antaŭkalkulojn, konstrukciis planojn de la konstruado, faris mendojn. Malfacilaĵoj aperis kie oni tute ne atendis ilin. Okazis ke en la urbo forestas specialuloj-betonistoj, tial estis bezonate mendi ilin el Leningrado. Gavrilin rapidigis, sed la uzinoj promesis doni la maŝinojn nur post jaro kaj duono. Sed ili estis bezonataj maksimume post jaro. Efikis nur minaco mendi la maŝinojn eksterlande. Poste venis malagrablaĵoj pli etaj. Jen ne eblis trovi profiligitan feron de bezonata dimensio, jen anstataŭ saturitaj ŝpaloj oni proponis nesaturitajn. Fine oni donis kion estis bezonata, sed Triorelov, veninta mem en la ŝpal-saturigan fabrikon, malakceptis 60 procentojn de la ŝpaloj. En krudferaj partoj estis difektaj malplenaĵoj. Lignaĵo estis malseka. Reloj estis bonaj, sed ili komencis veni kun monata malfruo. Gavrilin ofte vizitis la konstruan terenon de la stacio en malnova

malvarmumita "fiato". Ĉi tie inter li kaj Triorelov ekflamadis kvereloj.

Dum oni konstruis kaj muntis la traman stacion kaj la remizon, stargorodanoj reagis nur per ŝercetoj.

En "Stargoroda vero" pri la trama problemo okupiĝis konata al la tuta urbo felietonisto Princo Danlanda, nun verkanta sub pseŭdonimo "Inerci-rado". Ne malpli ol tri foje semajne Inercirado eligis grandan priskribon de la konstru-progresado. Tria kolumno de la ĵurnalo, kiu antaŭe abundis per artikoletoj sub skeptikaj titoloj: "Malmulte odoras per klubo", "Sur la malfortajn punktojn", "Jes, oni devas priirigardi, sed kial tiu ĉi brilo kaj longaj vicoj", "Bone kaj... malbone", "Al kio ni ĝojas kaj al kio ne", "Alpremadu ni sabotulojn de klerigado" kaj "Venis tempo por likvidi paperan maron", komencis donaci al la legantoj sunajn kaj energiajn artikolojn de Inercirado: "Kiel ni konstruas, kiel ni vivas", "Post nelonge la giganto ekfunkcios". "Modesta konstruisto", kaj tiel plu.

Triorelov tremante malfermis la ĵurnalon kaj, sentante abomenon al la fratoj-verkistoj, legis pri sia persono energiajn liniojn:

«Mi supreniras per skafaldo. La vento bruas en la oreloj.

Supre – li, tiu ĉi modestaspekta konstruanto de nia potenca trama stacio, tiu ĉi magra ekstere, platinaza homo en eluzita kaskedo kun marteletoj.

Mi rememoras:

«Sur bordo de dezertaj ondoj

li staris, plena per meditoj».

Mi alvenas. Neniu venteto. La skafaldo ne moviĝetas.

Mi demandas:

– Kiel progresas la laboroj?

Malbela vizaĝo de la konstruisto, de inĝeniero Triorelov vigliĝas...

Li premas mian manon. Li diras:

– Sepdek procentoj de la laboroj estas jam plenumitaj...»

La artikolo finiĝis tiel:

«Li premas adiaŭe mian manon... Post mi zumas la skafaldo.

Tie kaj tie vantas laboristoj.

Kiu povas forgesi tiun ĉi boladon de la laborista konstruado, tiun ĉi nebelan figuron de nia konstruanto?

INERCIRADO».

Savis na Triorelov nur tio ke li ne havis tempon por legi la ĵurnalon; do iam li sukcesis preterlasi verkojn de kamarado Inercirado.

Foje Triorelov ne eltenis kaj sendis bone pripensitan sarkasman refuton.

«Certe», – skribis li, – «oni povas nomi boltojn “transmisio”, sed faras tion homoj komprenantaj nenion en konstrua afero. Krom tio mi volus rimarki al kamarado Inercirado ke skafaldoj zumas nur antaŭ disfali. Paroli tiel pri skafaldoj estas same kiel aserti ke violonĉelo naskas infanojn. Akceptu k.t.p».

Post tio nehaltebla Princo ĉesis aperi en la konstruejo, sed liaj verkoj kiel antaŭe plibeligis la trian kolumnon, kontraste distingigante sur fono de aliaj artikoloj: “15 000 rubloj rustiĝas”, “Loĝejaj pecetoj”, “La ŝtofo ploras” kaj “Kuriozaĵo kaj larmoj”.

La konstruado pe-iĝadis. La relojn oni kunveldis termit-maniere, kaj ili etendiĝis sen interspacoj de la stacidomo mem ĝis la buĉejo, kaj de la nutraĵbazo ĝis la tombejo.

Komence oni intencis koincidigi malfermon de la tramo al naŭa datreveno de la revolucio, sed la vagonkonstrua uzino, sub preteksto pri "armaturo", ne liveris ĝustatempe la vagonojn. Tial oni prokrastis la malfermon ĝis la unua majo. Al tiu ĉi tago absolute ĉio estis jam preta.

La koncesiuloj, promenantе, venis kun la demonstraĉioj ĝis Gusiŝĉe. Tie kolektiĝis tuta Stargorod. Novan konstruaĵon de la tram-remizo ĉirkaŭigis koniferaj arkoj, frapadis la flagoj, la vento kuris inter la sloganoj. Rajda policisto galopadis post unua glaciaĵ-vendisto, Dio scias kiel trafinta en la malplenan cirkлон, ĉirkaŭigitan per tramistoj. Inter du pordegoj de la remizo altiĝis malfortika, ankoraŭ malplena tribuno kun mikrofono-amplifilo. Al la tribuno venis delegitoj. Komuna orkestro de la urbestro kaj la ŝnuregistroj provis forton de siaj pulmoj. La tamburo kuŝis sur la tero.

Ene de luma halo de la tram-remizo, en kiu staris deko da helverdaj vagonoj, numeritaj de 701 ĝis 710, vagadis moskva korespondanto en vila kaskedo. Sur lia brusto pendis refleks-fotografilo, en kiun li ofte kaj zorgeme enrigardis. La korespondanto serĉis la ĉefan inĝenieron por fari kelkajn tram-temajn demandojn. Kvankam raporto pri malfermo de la tram-linioj, kune kun tekstoj de ankoraŭ ne elparolitaj paroladoj estis jam preta en kapo de la korespondanto, li konsciencie daŭrigis la serĉojn, trovante mankon nur en foresto de bufedejo.

En la homamaso oni kantis, kriis, kaj ronĝis sunflorajn semojn, atendente funkciigon de la tramoj.

Sur la tribunon leviĝis prezidantaro de la gubernia partia komitato. Princo Danlanda, balbutante, interŝanĝis frazojn kun sia plum-frato. Oni atendis alveturon de moskvaj filmistoj.

– Kamaradoj! – diris Gavrilin, – permesu opinii la solenan mitingon, okaze de funkciigo de stargoroda tramo, malfermita.

Kupraj tuboj ekmoviĝis, suspiris, kaj trifoje plenumis na “Internacio”.

– La preleg-rajto prezentiĝas al kamarado Gavrilin! – kriis Gavrilin.

Princo Danlanda – Inercirado kaj la moskva gasto, enskribis, sen interkonsento, en siajn notlibrojn: «Solena mitingo malfermiĝis per prelego de urbestro kamarado Gavrilin. La homamaso atente aŭskultis.»

La du korespondantoj estis homoj tute diversaj. La moskva korespondanto estis fraŭla kaj juna. Princo-Inercirado, havanta grandan familion, jam delonge postlasis kvaran jardekon. Unu el ili ĉiam loĝis en Moskvo, alia neniam estis en Moskvo. La Moskvano ŝatis bieron, Inercirado-Danlanda drinkis nenion krom vodko. Sed malgraŭ tiu ĉi diverseco en la karakteroj, aĝoj, kutimoj kaj edukado, impresoj de la ĵurnalistoj estis esprimataj per ĝuste samaj eluzitaj polvaj frazoj. Iliaj kraĵoj ekmoviĝis, kaj en la notlibroj aperis novaj linioj: «Stratoj de Stargorod, en tago de la festo, ekestis kvazaŭ pli vastaj...»

Gavrilin komencis sian paroladon bone kaj simple:

– Konstruo de tramo, – diris li, – tio ne estas aĉeto de azeno.

En la homamaso ekaŭdiĝis subite laŭta rido de Ostap Bender. Li aprezis la frazon. Gavrilin, kuraĝigita per la akcepto, mem ne komprenante kial ekparolis subite pri internaci-politika situacio. Li kelkfoje penis venigi la paroladon sur la tramajn relojn sed, terurigante, rimarkis ke ne scipovas fari tion. Vortoj mem, kontraŭ volo de la parolanto, okazis iaj pri-internaciaj. Post Ĉemberlen, al kiu

Gavrilin dediĉis duonhoron, sur internacian arenon eliris usona senatano Bora (Borah). La homamaso moliĝis. La korespondantoj tuj enskribis: «En pitoreskaj frazoj la parolanto priskribis internacian situacion de nia Sovetio...». Varmiĝinta Gavrilin malbone aprezis rumaniajn bojarojn, kaj transiris al Musolini (Mussolini). Kaj nur antaŭ fino de sia parolado li venkis sian duan internaci-politikan naturon, kaj ekparolis per bonaj aferemaj vortoj:

– Mi tiel opinias, kamaradoj: tiu ĉi tramo, kiu nun eliros el la remizo, danke al kiu ĝi estas konstruita? Certe, kamaradoj, danke al vi, danke al ĉiuj laboristoj, kiuj laboris vere plenkonscie. Kaj ankoraŭ, kamaradoj, danke al honesta sovetia specialulo, ĉefinĝeniero Triorelov. Ankaŭ al li dankon!...

Oni komencis serĉi na Triorelov, sed ne trovis lin. Reprezentanto de Butercentro, kiu jam delonge atendis sian vicon, trapuŝiĝis al parapeto de la tribuno, svingis la manon, kaj laŭte ekparolis pri la internacia politiko. Post fino de lia parolado la ambaŭ korespondantoj, aŭskultante malmultajn aplaŭdojn, rapide enskribis: «Bruaj aplaŭdoj, transformiĝintaj en ovacion...». Poste ili ekpensis pri tio ke «transformiĝintaj en ovacion...» estos, ŝajne, troigo. La moskvano decidis, kaj forstrekis la ovacion. Inercirado suspiris, sed lasis.

La suno rapide ruliĝis sur la oblikva surfaco. De la tribuno oni elparoladis salutojn. La orkestro ĉiuminute ludis fanfarmelodion. Lume ekbluis la vespero, sed la mitingo daŭriĝis. La parolantoj, same al la aŭskultantoj, jam delonge sentis ke okazas io malĝusta, ke la mitingo daŭriĝas jam tro longe, ke oni devas kiel eble rapide transiri al eliro de la tramoj. Sed ĉiuj tiel alkutimiĝis paroladi, ke ne scipo-vis halti.

Finfine oni trovis na Triorelov. Li estis malpurigita, kaj antaŭ veni sur la podion longe lavis en la kontoro la vizaĝon kaj la manojn.

– La parolrajton ni donas al ĉefa inĝeniero, kamarado Triorelov! – gaje informis Gavrilin. – Nu, parolu, ĉar mi tute ne pri tio paroladis, – aldonis li flustre.

Triorelov volis diri multon. Kaj pri libervolaj sabatoj, kaj pri la malfacila laboro, pri ĉio kio estas farita kaj pri tio kion ankoraŭ oni povas fari. Kaj fari oni povas multon: oni povas liberigi la urbon de la infekta provianta bazaro, kaj instaligi tegmentitajn vitrajn konstruaĵojn, indas konstrui konstantan ponton anstataŭ la portempa, ĉiujare ruinigata per glaci-iro, oni povas, fine, efektivigi projekton de grandega frid-buĉejo. Triorelov malfermis la buŝon kaj, post halteto, ekparolis:

– Kamaradoj! Internacia situacio de nia ŝtato...

Kaj poste li ekmurmuris tiujn primitivajn veraĵojn, ke la homamaso, aŭskultanta jam sesan lekcion pri internaciaj aferoj, malvarmiĝis. Nur finiĝinte Triorelov komprenis, ke li eĉ ne unu vorton diris pri la tramo. «Jen kiel ofende», – pensis li, – «ni absolute ne scipovas paroli, absolute».

Kaj li ekmemoris parolaĵon de franca komunisto, kiun li aŭskultis en kunveno en Moskvo. La franco parolis pri burĝa gazetaro. «Tiuj akrobatoj de plumo», – eksklamaciis li – «tiuj virtuozaĵoj de farso, tiuj ŝakaloj de rotaciaj maŝinoj...» Unuan parton de la parolado la franco prononcis en tono la, la duan – en tono do, kaj lastan, patosan, – en tono mi. Liaj gestoj estis sufiĉaj kaj belaj. «Kaj ni nur malklaraĵon produktas», – decidis Triorelov, – «pli bone silentus ni».

Estis jam tute mallume kiam gubernia partiestro distranĉis per la tondilo ruĝan rubandon, ŝlosantan eliron el la

remizo. Laboristoj kaj reprezentantoj de komunumaj organizaĵoj komencis, kun bruo, preni lokojn en la vagonoj. Frapis alttonaj sonoriletoj, kaj unua trama vagono, kiun gvidis Triorelov, elruliĝis el la remizo sub surdigaj krioj de la homamaso kaj suspiroj de la orkestro. La lumigitaj vagonoj ŝajnis eĉ pli blindigaj ol tage. Ĉiuj ili unu post la alia floris tra Gusisĉe; subirinte la fervojan ponton ili facile supreniĝis en la urbon, kaj turniĝis sur Grandan Puŝkin-straton. En dua vagono veturis orkestro kaj, eligante la blovmuzikilojn el la fenestroj, ludis marŝon.

Gavrilin, en konduktora uniforma jako, kun biletuja saketo, pendanta sur la ŝultro, saltante el vagono en vagonon karese ridetis, sonoretis senbezzone, kaj enmanigis al la pasaĝeroj invitbiletojn.

La 1-an de majo je la 9-a vespere

SOLENA FESTENO

Kiu okazos en klubo de la urbestro laŭ tiu ĉi programo:

1. Prelego de kamarado Mosin.

2. Enmanigo de honor-atestiloj.

3. Neoficiala parto:

Granda koncerto

kaj familia vespermanĝo kun bufedo.

Sur placeto de lasta vagono staris Viktor Miĥajloviĉ, neniu scias kiel trafinta en liston de honoraj gastoj. Li pri-flaris la motoron. Al ekstrema miro de Polesov la motoro aspektis perfekta kaj, ŝajne, funkciis senmanke. La vitroj ne tintadis. Atente pririgardante ilin, Viktor Miĥajloviĉ evidentiĝis ke, malgraŭ ĉio, ili estas ĉirkaŭigitaj per kaŭĉuko. Li jam faris kelkajn rimarkojn al la kondukisto, kaj estis opiniata en la publiko spertulo pri Okcidenta trama afero.

– La pneŭmata bremsilo funkcias ne tre bone, – deklaris Polesov, venke rigardante la pasaĝerojn, – ne ensuĉas ĝi.

– Oni vin ne demandis – respondis la vagongvidisto, – eblas ke ensuĉos.

Pe-inte la festenan veturon tra la urbo la vagonoj revenis en la remizon, kie ilin atendis la homamaso. Na Triorelov oni ĵetis supren jam ĉe plena lumo de elektraĵlampoj. Oni suprenĵetis ankaŭ na Gavrilin, sed, ĉar li pezis ĉirkaŭ cent kilogramoj, oni post nelonge lasis lin. Oni suprenĵetis kamaradon Mosin, teknikistojn kaj laboristojn. Duan fojon ĉi-tage oni suprenĵetis na Viktor Miĥajloviĉ. Nun li jam ne konvulsiis la krurojn, sed rigore kaj serioze rigardante la stelplenan ĉielon suprenflugis kaj ŝvebis en la nokta mallumo. Glisinte lastfoje, Polesov rimarkis ke je la kruro lin, aĉe ridante, tenas neniuj aliaj ol iama gvidanto de la nobelaro Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov. Polesov ĝentile liberiĝis, deiris iomete flanken, kaj jam ne lasis la gvidanton el la vido. Rimarkinte ke Ipolit Matveeviĉ kune kun la juna nekonato, certe iama oficiro, foriras, Viktor Miĥajloviĉ singarde eksekvis ilin.

Post kiam ĉio jam finiĝis, kaj Gavrilin en sia violkoloreta “fiat” atendis disdonantan lastajn ordonojn Triorelov, por veturi kun li en la klubon, al pordego de la remizo alveturis duonkamiono kun la filmistoj. Unua el la aŭto lerte elsaltis viro en dek-du-angulaj kornaj okulvitroj, kaj en eleganta leda kaftano sen manikoj. Pika longa barbo de la viro kreskis el la gorĝo mem. Dua viro tiris filmaparaton, komplikiĝante en sia longa skarpo de tiu stilo kiun Ostap Bender nomis kutime «ŝik-modern». Poste el la kamioneto elgrimpis asistantoj, lumigistoj kaj junulinoj.

La tuta grupo kun krioj ĵetiĝis en la remizon.

– Atenton! – kriis la barbula kaftan-havanto. – Kola, metu la lumigilojn!

Triorelov ruĝiĝis kaj moviĝis al la noktaj vizitantoj.

– Ĉu tio vi estas filmistoj? – demandis li. – Kial vi ne alveturis tage?

– Kiam oni planas lanĉi la tramon?

– Ĝi estas jam lanĉita.

– Jes, jes, ni iom malfruiĝis. Subite aperis bona naturo. Multege da laboro. Sunsubiro! Tamen ni plenumos la laboron. Kola! Donu lumon! Turniĝanta rado! Grandmezure! Moviĝantaj piedojn de la homamaso! Grandmezure. Luda, karulinjo! Iru! Kola, komencu! Komencu. Ekiru! Iru,iru, iru... Sufiĉas. Dankon. Nun ni filmu la konstruanton. Kamarado Triorelov? Estu bonvola, kamarado Triorelov. Ne, ne tiel. En tri kvaronoj... Jen tiel, pli originale, sur fono de la tramo... Kola! Komencu! Parolu vi ion!..

– Sed vere, mi tiel ĝenas!..

– Brile!.. Bone!.. Ankoraŭ parolu!.. Nun vi konversacias kun unua pasaĝero de la tramo... Luda! Eniru la kadron. Tiel. Spiru profunde: vi emociiĝas!.. Kola! Krurojn grandmezure!.. Komencu!.. Tiel, tiel... Koran dankon... Halt!..

El la delonge tremanta “fiat” peze eliris Gavrilin kaj venis voki la postrestintan amikon. La reĝisoro kun harkovrita gorĝo vigliĝis.

– Kola! Ĉi tien! Perfekta tipo. Laboristo! Pasaĝero de la tramo! Spiru profunde. Vi emociiĝas. Vi neniam antaŭe veturis per tramo. Komencu! Spiru!

Gavrilin malame eknazosiblis.

– Perfekte!.. Karulino!.. Venu ĉi tien! Saluton de jun-komunistaro!.. Spiru profunde: vi emociiĝas... Tiel... Bonege. Kola, fino.

– Ĉu vi ne filmos la tramon? – ĝene demandis Triorelov.

– Ĉu vi scias, – elmuĝis la leda reĝisoro, lumaj kondiĉoj ne permesas. Bezonatas alfilmi en Moskvo. Kisojn!

La filmistoj fulmrapide malaperis.

– Nu, veturu ni, amiketo, ripozi, – diris Gavrilin. – Kio, ĉu vi ekfumis?

– Ekfumis, – konfesis Triorelov, – ne eltenis mi.

Dum la familia festeno malsata, satfumiĝinta Triorelov eldrinkis tri pokaletojn da vodko, kaj plene ebriiĝis. Li kisis ĉiujn kaj ĉiuj kisis lin. Li volis diri ion bonkoran al sia edzino, sed nur ekridis. Poste li longe skuis manon de Gavrilin kaj diris:

– Strangulo vi estas! Vi devas pe-lerni konstruktadon de fervojaj pontoj! Tio estas rimarkinda scienco. Kaj, grave, absolute simpla. Ponto trans Gudzono...

Post duonhoro li ebriiĝis definitive, kaj elparolis filipikon, direktitan kontraŭ burĝa gazetaro:

– Tiuj akrobatoj de farso, tiuj hienoj de plumo, tiuj virtuzoj de rotaciaj maŝinoj, – kriis li.

La edzino forveturigis lin hejmen per fiakro.

– Mi volas per tramo, – diris li al la edzino, – nu kial vi ne komprenas tion? Se estas tramo, do oni devas veturi per ĝi!.. Kial? Unue tio estas profite...

Polesov iris post la koncesiuloj, longe detenis sin kaj, pe-atendinte kiam ĉirkaŭe estu neniu, alvenis na Vorobjaninov.

– Bonan vesperon, sinjoro Ipolit Matveeviĉ, – diris li estime.

Vorobjaninov eksentis maltrankvilon.

– Mi ne havas honoron, – elmurmuris li.

Ostap eligis la dekstran ŝultron, kaj venis al la seruristo-intelektulo:

– Hej, – diris li, – kion vi volas diri al mia amiko?

– Vi ne devas maltrankviliĝi, – flustris Polesov, ĉirkaŭrigardante. – Mi – de Elena Stanislavovna...

– Kio? Ĉu ŝi estas ĉi tie?

– Ĉi tie. Kaj tre volas vidi vin.

– Por kio? – demandis Ostap. – Kio vi estas?

– Mi... Vi, Ipolit Matveeviĉ, ne pensu pri io tio. Vi min ne konas, sed mi vin memoras tre bone.

– Mi volus eniri al Elena Stanislavovna, – nekonvinke diris Vorobjaninov.

– Ŝi ege petis vin veni.

– Jes, sed de kie ŝi eksciis?..

– Mi renkontis vin en koridoro de la urbestro, kaj longe pensis: konata vizaĝo. Poste mi rememoris. Vi, Ipolit Matveeviĉ, ne maltrankviliĝu! Ĉio estos absolute sekrete.

– Ĉu konata virino? – demandis Ostap afereme.

– M-jes, malnova konatino...

– Tiam, eble, eniru ni, vespermanĝu ĉe la malnova konatino, ĉu? Mi, ekzemple, freneze volas manĝi, sed ĉio estas fermata.

– Kial ne.

– Tial ni iru. Konduku nin, mistera nekonato.

Kaj Viktor Miĥajloviĉ, ĉiuminute ĉirkaŭrigardante, ekkondukis la partnerojn per trairaj kortoj al domo de la divenistino en Pereleŝinskij-interstrateto.

Ĉapitro 14

«Alianco de glavo kaj plugilo»

Kiam virino maljuniĝas, ŝin povas trafi multaj malagrablaĵoj: povas elfali la dentoj, griziĝi kaj maldensiĝi la haroj, aperi anhelado, povas ataki dikeco, povas venki ekstrema malgrasiĝo, sed voĉo ŝia ne ŝanĝiĝos. Ĝi restos sama kia ĝi estis ĉe gimnaziino, fianĉino, aŭ amatino de juna diboĉulo.

Tial kiam Polesov frapetis la pordon, kaj Elena Stanislavovna demandis: «Kiu estas tie?», Vorobjaninov ektremetis. Voĉo de lia amatino estis sama kiel en jaro 1899, antaŭ malfermo de pariza ekspoziciego. Sed, enirante la ĉambron kaj kunpremante la palpebrojn pro la lumo, Ipolit Matveeviĉ ekvidis ke restis eĉ ne spuro de ŝia iama beleco.

– Kiel vi ŝanĝiĝis! – diris li pretervole.

La oldulino ĵetiĝis sur lian kolon.

– Dankon, diris ŝi. – Mi scias per kio vi riskis, venante al mi. Vi estas sama grandanima kavaliro. Mi ne demandas vin por kio vi alveturis el Parizo. Vi ja vidas ke mi ne estas scivolema.

– Sed mi alveturis tute ne el Parizo, embarase diris Vorobjaninov.

– Mi kaj mia kolego venis el Berlino, – korektis Ostap, premante kubuton de Ipolit Matveeviĉ, – sed pri tio ne konsilindas paroli plenvoĉe.

– Ho, kiel mi ĝojas vidi vin! – kriis la divenistino. – Eniru ĉi tien, en tiun ĉi ĉambron... Kaj vi, Viktor Miĥajloviĉ, pardonu min, ĉu vi povas eniri post duonhoro?

– Ho! – rimarkis Ostap. – Unua renkontiĝo! Malfacilaj minutoj! Permesu ankaŭ al mi malproksimiĝi. Ĉu vi permesos kun vi, afablega Viktor Miĥajloviĉ?

La seruristo ektremis pro la ĝojo. Ili ambaŭ foriris en loĝejon de Polesov, kie Ostap, sidante sur rompaĵoj de pordego de domo numero 5 sur Pereleŝinskij-strateto, komencis disvolvi antaŭ la konsternita metiisto-solulo kun motoro fantasmagoriajn ideojn pri savo de la patrujo.

Post unu horo ili revenis, kaj trovis la maljunulojn tute digeliĝintajn.

– Ĉu vi memoras, Elena Stanislavovna? – diris Ipolit Matveeviĉ.

– Ĉu vi memoras, Ipolit Matveeviĉ? – diris Elena Stanislavovna.

«Ŝajnas ke venis psikologia momento por la vespermanĝo», – pensis Ostap. Kaj, interrompinte na Ipolit Matveeviĉ, rememorantan elektojn en la urban gvidantaron, li diris:

– En Berlino estas tre stranga kutimo: tie oni manĝas tiel malfrue, ke ne eblas kompreni ĉu tio estas frua vesperaŭ malfrua tag-manĝo.

Elena Stanislavovna rekonsciiĝis, demetis la kuniklan rigardon de Vorobjaninov, kaj ektiriĝis en la kuirejon.

– Kaj nun agi, agikaj agi! – diris Ostap, mallaŭtiginte la voĉon ĝis plena konspiro.

Li prenis na Polesov je la brako.

– Ĉu la maljunulino ne cedos? Ĉu ŝi estas fidinda virino?

Polesov preĝe kunigis la manojn.

– Via politika kredo?

– Ĉiam! – entuziasme respondis Polesov.

– Vi, mi esperas, estas kirilov-ano, ĉu?

– Jes, sinjoro.

Polesov rektiĝis soldate.

– Rusio vin ne forgesos! – elmuĝis Ostap.

Ipolit Matveeviĉ, tenante en la mano dolĉan kuketon, embarase aŭskultis na Ostap. Sed tiu ne estis retenebla. Lin portegis. La granda kombinanto sentis inspiron, la ravan staton antaŭ pli-ol-meza ĉantaĝo. Li trairis la ĉambron kiel pantero.

En tiu ĉi ekscitiĝa stato trovis lin Elena Stanislavovna, malfacile trenanta el la kuirejo la samovaron. Ostap ĝentile alsaltis ŝin, reprenis dumire la samovaron, kaj metis ĝin sur la tablon. La samovaro ekfajfis. Ostap decidis agi.

– Sinjorino, – diris li, – ni estas feliĉaj vidi en vi...

Li ne sciis, kiun li estis feliĉa vidi en Elena Stanislavovna. Endis do komenci denove. El ĉiuj bombastaj frazoj de cara reĝimo en lia kapo turniĝis nur iu «favore ordoni bonvolis». Sed tio ne estis ĝustaloka. Tial li komencis afere:

– Plena diskreteco! Ŝtata sekreto!

Ostap montris na Vorobjaninov:

– Kio, laŭ vi, estas tiu ĉi potencega maljunulo? Ne diru, vi ne povas scii tion. Tio estas giganto de penso, patro de rusa demokratio, kaj persono proksima al la imperiestro.

Ipolit Matveeviĉ ekstaris plenstature, montrante sian belegan altecon, kaj konsternite ekrigardis flankojn. Li komprenis nenion, sed silentis, sciante el sia sperto ke Ostap Bender neniam parolas sencele. En Polesov ĉio okazanta elvokis tremon. Li staris, levante la mentonon al la plafono, en pozo de homo kiu estas preta ekiri per ceremonia marŝo. Elena Stanislavovna eksidis sur la seĝon, time rigardante na Ostap.

– Ĉu niaj homoj multas en la urbo? – demandis Ostap rekte. – Kia estas la humoro?

– Pro foresto de ĉeesto... – diris Viktor Miĥajloviĉ, kaj komencis komplikiĝe klarigi siajn problemojn. Ĉi tie estis kaj kortisto de domo numero kvin, kiu estas nura vulgarulo, kaj ŝraŭbigilo tri okonoj da colo, kaj la tramo, kaj ceteraj aferoj.

– Bone! – elmuĝis Ostap. – Elena Stanislavovna! Kun via helpo ni volas kontakti plej bonajn homojn de la urbo, kiujn la severa sorto enpelis en subterejojn. Kiun oni povas inviti al vi?

– Kiun ja oni povas inviti! Ĉu na Maksim Petroviĉ kun la edzino?

– Sen la edzino, – korektis Ostap, – sen la edzino! Vi estos sola agrabla escepto. Kiun ankoraŭ?

Dum la diskuto, al kiu ageme aliĝis ankaŭ Viktor Miĥajloviĉ, evidentiĝis ke oni povas inviti saman Maksim Petroviĉ Ĉaruŝnikov, kiu antaŭrevolucie estis ano de la urba konsilio, kaj nun mirind-maniere enkalkuliĝis vicojn de sovetiaj oficistoj; mastron de “Rapidpakado” Djadjev, prezidanton de «Odesa ringopana meti-kolektivo “Moskvaj sekringetoj”» Kislarskij, kaj du junajn homojn sen familnomoj, sed tute fidindajn.

– Ĉi-okaze mi petas tuj inviti ilin al eta konsiliĝo. Strikte sekrete.

Ekparolis Polesov:

– Mi kuru al Maksim Petroviĉ, al Nikeŝa kaj Vladja, kaj vi, Elena Stanislavovna bonvolu viziti na “Rapidpakado” kaj na Kislarskij.

Polesov forimpetis. La divenistino preĝestime ekrigardis na Ipolit Matveeviĉ, kaj ankaŭ foriris.

– Kion tio ĉi signifas? – demandis Ipolit Matveeviĉ.

– Tio signifas, – respondis Ostap, – ke vi estas postrestinta homo.

– Kial?

– Ĉar! Pardonu min pro la demando: kiom da mono vi havas?

– Da kiu mono?

– Da ĉiu. Inkluzive eĉ kupraĵojn.

– Tridek kvin rublojn.

– Kaj per tiu ĉi mono vi intencas pripagi ĉiujn elspezojn de nia entrepreno?

Ipolit Matveeviĉ silentis.

– Jen kio, kara estro. Ŝajnas ke vi komprenas min. Dum unu horo vi estu giganto de penso kaj persono proksima al la imperiestro.

– Por kio?

– Pro tio ke ni bezonas spezan kapitalon. Morgaŭ estas mia edziĝfestoj. Mi ne estas almozpetanto. En tiu ĉi notinda tago mi volas festeni.

– Do kion mi devas fari? – suspiris Ipolit Matveeviĉ.

– Vi devas silenti. Iam, por graveco, disblovu la vangojn.

– Sed tio ja estas... trompo.

– Sed kiu elparolas tion? Ĉu tion elparolas grafo Tolstoj? Aŭ Darvino? Ne. Mi aŭdas tion el buŝo de homo kiu nur hieraŭ intencis engrimpi nokte loĝejon de Gricacujeva, kaj forŝteli de la malfeliĉa vidvino ŝian meblon. Ne enpen-siĝu. Silentu. Kaj ne forgesu disblovi la vangojn.

– Sed por kio enmiksiĝi tiun ĉi danĝeran aferon? Ja oni povas denunci.

– Pri tio vi ne maltrankviliĝu. Per malbonaj ŝancoj mi ne kaptadas. La afero estos aranĝita tiel ke oni komprenos nenion. Komencu ni trinki la teon.

Dum la koncesiuloj trinkis kaj manĝis, kaj la papago krakadis ŝelojn de la sunfloraj semoj, en la loĝejon eniris la gastoj.

Nikeŝa kaj Vladja venis kune kun Polesov. Viktor Miĥajloviĉ ne kuraĝis prezenti la junajn homojn al la giganto de penso. Ili eksidis en angulo, kaj komencis observi kiel la patro de rusia demokratio manĝas malvarman bovidaĵon. Nikeŝa kaj Vladja estis tute maturiĝintaj gapuloj. Ili estis iom malpli ol tridekjaruloj kaj, ŝajne, tre kontentis ke oni invitis ilin al la kunsido.

Iama ano de la urba konsilio Ĉaruŝnikov, dika maljunulo, longe skuis manon de Ipolit Matveeviĉ, kaj enrigardis liajn okulojn. Sub observo de Ostap la urbaj malnovloĝantoj komencis interŝanĝi rememorojn. Doninte al ili plivigli la konversacion, Ostap turnis sin al Ĉaruŝnikov:

– En kiu regimento vi servis?

Ĉaruŝnikov ekanhelis.

– Mi... mi, tiel dirite, tute ne servis, ĉar, estinte rajtigita per kredo de la komunumo, mi estis elektita.

– Ĉu vi estas nobelo?

– Jes. Estis.

– Vi, mi esperas, restis tia ankaŭ nun, ĉu? Eltenu. Estos bezonata via helpo. Ĉu Polesov diris al vi? Eksterlando helpas al ni. Bremsetas nur komuna opinio. Plena sekreteco de la organizaĵo. Atenton!

Ostap depelis na Polesov de Nikeŝa kaj Vladja, kaj kun senfalsa severeco demandis ilin:

– En kiu regimento vi servis? Necesos servi al la patrolando. Ĉu vi estas nobeloj? Tre bone. Okcidento helpas al ni. Tenu vin. Plena sekreteco de la deponaĵoj. Tio estas, de la organizaĵo. Atenton.

Na Ostap ekposedis impeto. La afero ŝajne ordiĝis. Prezentita per Elena Stanislavovna al mastro de «Rapidpakado», Ostap forkondukis lin flanken, proponis al li teni sin, informiĝis en kiu regimento li servis, kaj promesis helpi de eksterlando kaj plenan sekretecon. Unua sento de mastro de «Rapidpakado» estis deziro kiel eble rapide forkuri el la konspirejo. Li opiniis sian firmaon tro solida por partopreni riskan aferon. Sed, pririgardante lertan figuron de Ostap, li ekŝanceliĝis, kaj komencis mediti: «Sed kio se!.. Cetere ĉio dependas de tio sub kiu saŭco oni prezentos tion».

Amika konversacio ĉe la tea tablo vigliĝis. La iniciuloj sankte konservis la sekreton, kaj konversaciis pri la urbaj novaĵoj.

Lasta venis civitano Kislarskij kiu, ne estante nobelo kaj neniam servinta en gvardiaj regimentoj, el mallonga konversacio kun Ostap tuj komprenis staton de la aferoj.

– Tenu vin, – diris Ostap edife.

Kislarskij promesis.

– Vi, estiel reprezentanto de privata kapitalo, ne povas resti surda al ĝemoj de la popolo.

Kislarskij kompate ekmalgajis.

– Ĉu vi scias kiu li estas? – demandis Ostap, montrante sidantan Ipolit Matveeviĉ.

– Kial ne, – respondis Kislarskij, – tio estas sinjoro Vorobjaninov.

– Tio, – diris Ostap, – estas giganto de penso, patro de rusa demokratio, persono proksima al la imperiestro.

«En plej bona okazo – du jarojn kun severa izolo», – pensis Kislarskij, komencante tremi. – «Kial mi venis ĉi tien?»

– Sekreta alianco de glavo kaj plugilo! – malbonaŭgure elflustris Ostap. «Dek jaroj», – preterkuris penso ĉe Kislarskij.

– Cetere, vi povas foriri, sed ĉe ni, mi avertas vin, estas longaj manoj.

«Mi montros al vi, kanajlo», – pensis Ostap. – «Sen cent rubloj mi vin ne ellasos».

Kislarskij ekestis marmora. Ankoraŭ hodiaŭ li tiel bon-guste kaj trankvile tagmanĝis, manĝis kokinajn umbilike-tojn, buljonon kun nuksetoj, kaj sciis nenion pri la terura “Alianco de glavo kaj plugilo”. Sed li restis: «longaj manoj» efikis lin malagrabla.

– Civitanoj! – diris Ostap, malfermante la kunsidon. – Vivo diktas siajn leĝojn, siajn kruelajn leĝojn. Mi ne parolos pri celo de nia kunveno: ĝi estas konata al vi. Tio estas sankta celo. De ĉiuj flankoj ni aŭdas ĝemojn. De ĉiuj flankoj de nia vasta lando oni petegas pri helpo. Ni devas etendi manon de helpo, kaj ni etendos ĝin. Kelkaj el vi servadas, kaj manĝas panon kun butero, aliaj okupiĝas pri komerco kaj manĝas buterpanon kun kaviaro. Kaj tiuj kaj la aliaj dormas en siaj litoj sub varmaj litkovriloj. Nur etaj senhejmaj infanoj restas sen prizorgo. Tiuj ĉi floroj de stratoj, aŭ, kiel diras proletoj de mensa laboro, floroj sur asfalto, meritas pli bonan sorton. Ni, sinjoroj ĵurianoj, devas helpi. Kaj ni, sinjoroj ĵurianoj, helpas al ili.

Parolo de la granda kombinanto elvokis inter la aŭskultantoj diversajn sentojn.

Polesov ne komprenis sian novan amikon, la junan gvardianon.

«Kiu infanoj?» – pensis li. – «Kial infanoj?»

Ipolit Matveeviĉ eĉ ne penis kompreni. Li jam delonge rifuzis pri tio, kaj sidis silente, dispuante la vangojn.

Elena Stanislavovna ekmalgajis.

Nikeŝa kaj Vladja sindone rigardis bluan veŝton de Ostap.

Posedanto de “Rapidpakado” estis ege kontenta.

«Bele aranĝite», – decidis li, – «sub tiu ĉi saŭco eblas doni monon. Okaze de sukceso – estimego! Okaze de malsukceso – ne mia la afero. Mi helpis al infanoj. Nur.»

Ĉaruŝnikov interŝanĝis signifajn rigardojn kun Djadjev kaj, alte aprezante konspiran lertecon de la preleganto, daŭrigis ruligi sur la tablo panajn kugletojn.

Kislarskij estis feliĉa.

«Ora kapo», – pensis li. Al li ŝajnis ke ankoraŭ neniam amis li senhejmajn infanojn tiel forte kiel ĉi-vespere.

– Kamaradoj! – daŭrigis Ostap. – Bezonatas senprokrasta helpo. Ni devas elŝiri la infanojn el kroĉaj manegoj de strato, kaj ni elŝiros ilin de tie. Ni helpu al infanoj. Ni memoru ke infanoj estas floroj de vivo. Mi invitas vin tuj fari viajn monoferojn, kaj helpi al infanoj. Nur al infanoj kaj al neniuj aliaj. Ĉu vi komprenas min?

Ostap elprenis el la flanko poŝo kvitancon libron.

– Mi petas fari la monoferojn. Ipolit Matveeviĉ konfirmos mian plenrajtecon.

Ipolit Matveeviĉ serioziĝis kaj klinis la kapon. Ĉi tie eĉ ne tro saĝaj Nikeŝa kaj Vladja, kaj la klopodema seruristo komprenis sekretan sencon de alegorio de Ostap.

– Laŭorde laŭ aĝo, gesinjoroj, – diris Ostap, – ni komencu de estimata Maksim Petroviĉ.

Maksim Petroviĉ ekmoviĝis surloke, kaj donis ne pli ol tridek rublojn.

– En pli bona tempo mi donos pli! – deklaris li.

– Pli bonaj tempoj post nelonge venos, – diris Ostap.
– Cetere senhejmajn infanojn, kiujn mi ĉi-momente reprezentas, tio ne koncernas.

Ok rublojn donis Nikeŝa kun Vladja.

– Malmulte, junaj homoj.

Junaj homoj ruĝiĝis.

Polesov kuris hejmen kaj alportis la kvindekon.

– Bravo, husaro! – diris Ostap. – Por husaro-solulo kun motoro tio, dume, sufiĉas. Kion diros la komercularo?

Djadjev kaj Kislarskij longe marĉandis, kaj plendis pri la egaliga imposto. Sed Ostap estis senkompata:

– En ĉeesto de Ipolit Matveeviĉ mem mi opinias tiujn ĉi parolojn nekonvenaj.

Ipolit Matveeviĉ klinis la kapon. La komercistoj oferis por bono de infanetoj po ducent rubloj.

– Sume, – deklaris Ostap, – kvarcent okdek ok rubloj. Domaĝe: mankas dek du rubloj por ronda nombro.

Elena Stanislavovna, kiu longe detenis sin, foriris en la dormoĉambron, kaj alportis en la mansaketo mankantajn dek du rublojn.

Restinta parto de la kunsido estis deformita, kaj malpli solena. Ostap komencis petoladi. Elena Stanislavovna jam tute moliĝis. La gastoj poiome foriris, estime adiaŭante la organizantojn.

– Pri tago de sekvonta kunsido vi estos informataj aparte, – diris Ostap adiaŭe, – plej severa diskreto. Afero de helpo al infanoj devas esti strikte sekreta... Tio, cetere, koincidas kun viaj propraj intereso.

Post tiuj vortoj Kislarskij volis doni ankoraŭ kvindek rublojn, sed veni jam al neniuj kunsidoj. Li pene detenis sin de tiu ĉi impeto.

– Nu, – diris Ostap, – ni iru. Vi, Ipolit Matveeviĉ, mi esperas, uzos gastemon de Elena Stanislavovna kaj noktos ĉe ŝi. Ankaŭ por la sekreteco estas utile al ni disiĝi por tempe. Kaj mi iru.

Ipolit Matveeviĉ plenforte okulumis al Ostap, sed tiu aspektigis ke ne rimarkas tion, kaj eliris surstraten.

Trairinte blokon li rememoris ke en lia poŝo kuŝas kvincento da honeste perlaboritaj rubloj.

– Fiakristo! – kriis li. – Veturigu al “Fenikso”!

– Tio eblas, – diris la fiakristo.

Li nerapide alveturigis na Ostap al la fermita restorcio.

– Kio estas tio? Ĉu fermite?

– Okaze de Unua majo.

– Ah, diable! Tiom multe da mono, sed forestas ebleco diboĉi! Tial veturigu al strato Pleĥanov. Ĉu vi scias? Ostap decidis veturi al sia fianĉino.

– Sed kiel tiu ĉi strato nomiĝis antaŭe? – demandis la fiakristo.

– Mi ne scias.

– Do kien veturi? Ankaŭ mi ne scias.

Tamen Ostap ordonis veturi kaj serĉi.

Dum horo kaj duono veturadis ili tra la nokta malplena urbo, demandante noktajn gardistojn kaj policistojn. Unu policisto longe penadis, kaj informis fine ke Pleĥanov-strato estas neniue alia ol iama Guberniestra.

– Ha, Guberniestra! Tiun ĉi straton mi konas bone. Dudek kvin jaroj veturigas mi al Guberniestra.

– Do veturigu!

Ili venis al Guberniestra-strato, sed okazis ke ĝi estas ne Pleĥanov, sed Karl Markso.

Kolerigita Ostap rekomencis serĉadon de la perdita strato je nomo de Pleĥanov. Sed ne trovis ĝin.

La mateniĝo pale lumigis vizaĝon de la riĉa suferanto, kiu do ne sukcesis distriĝi.

– Veturigu al “Sorbono”! – kriis li. – Kia ja veturigisto vi estas! Straton de Pleĥanov ne konas!

Palaco de vidvino Gricacujeva brilegis. Ĉefloke de la edziĝfesta tablo sidis la filo de turka civitano. Li estis eleganta kaj ebria. La gastoj bruas.

La fianĉino estis jam ne juna. Ŝi aĝis ne malpli ol tridek kvin jaroj. Naturo donacis al ŝi malavare. Ĉi tie estis ĉio: akvomelonaj mamoj, grandega nazo, ruĝkoloraj vangoj, kaj potenca nuko. La novan edzon ŝi adoris kaj tre timis. Tial ŝi nomis lin ne per la nomo, kaj eĉ ne per la patronomo, kiun ŝi eksciis fakte neniam, sed familnome: kamarado Bender.

Ipolit Matveeviĉ denove sidis sur la revata seĝo. Dum tuta edziĝfesta vespermanĝo li saltadis sur ĝi, por eksenti firmaĵon. Iam tio sukcesis. Tiam ĉiuj partoprenantoj plaĉis al li, kaj li laŭte kriis «kisiĝu!».

Ostap senĉese prononcis parolojn kaj tostojn. La ĉeestantoj drinkis je popola klerigado kaj irigacio de Uzbekio. Post tio la gastoj komencis disiri. Ipolit Matveeviĉ haltetis ĉe la enirejo kaj flustris al Bender:

– Do ne prokrastu vi. Ili estas tie.

– Vi estas mon-akumululo, – respondis ebria Ostap, – atendu min en la gastejo. Foriru nenien. Mi povas veni ĉi-umminute. Pripagu la gastejon. Por ke ĉio estu preta. Adiaŭ, kampmarŝalo! Deziru al mi bonan nokton.

Ipolit Matveeviĉ deziris, kaj ekiris na “Sorbono” mal-trankviliĝi.

Je la kvina matene aperis Ostap kun la seĝo. Ipolit Matveeviĉ konsterniĝis. Ostap metis la seĝon meze de la ĉambro, kaj sidis.

– Kiel tio sukcesis al vi? – diris fine Vorobjaninov.

– Tre simple, familie. La vidvino dormas kaj vidas sonĝon. Domaĝis vekti. «Mateniĝe ne veku vi ŝin». Kion fari! Do mi devis lasi al la amatino skribaĵeton: «Mi forveturas kun raporto na Novoĥopersk. Al tagmanĝo ne atendu. Via zizelo». Kaj la seĝon mi kunprenis el la manĝoĉambro. Tramoj dum tiuj ĉi matenaj horoj ne funkcias, do mi ripozis dumvoje sur la seĝo.

Ipolit Matveeviĉ kun murmura sono ĵetiĝis al la seĝo.

– Trankvile, – diris Ostap, – oni devas agi senbrue.

Li elpoŝigis plattenajlon, kaj la laboro ekbolis.

– Ĉu vi ŝlosis la pordon? – demandis Ostap.

Forpuŝante senpaciencon Vorobjaninov, Ostap akurate dissekis la seĝon, penante ne difekti la anglan katu-non kun la floretoj.

– Tia ŝtofo forestas nun, do oni devas konservi ĝin. Kion fari: vara malsato.

Ĉio ĉi venigis na Ipolit Matveeviĉ al ekstrema ekscito.

– Prete, – diris Ostap mallaŭte.

Li levis la kovraĵojn, kaj per la ambaŭ manoj komencis serĉi inter la risortoj. Sur lia frunto ekvideblis vejna litero vo.

– Nu? – ripetis Ipolit Matveeviĉ diversvoĉe. – Nu? Nu?

– Nu kaj nu, – respondis Ostap ekscite, – unu ŝanco kontraŭ dekunu. Kaj tiu ĉi ŝanco...

Li bone priserĉis la seĝon kaj finis:

– Kaj tiu ĉi ŝanco dume ne estas nia.

Li leviĝis plenstature, kaj komencis purigi la genuojn. Ipolit Matveeviĉ ĵetiĝis al la seĝo.

La brilantoj forestis. Ĉe Ipolit Matveeviĉ malleviĝis la manoj. Sed Ostap estis vigla kiel antaŭe.

– Nun niaj ŝancoj pligrandiĝis.

Li iradis en la ĉambro.

– Ne gravas! Tiu ĉi seĝo kostis al la vidvino pli ol al ni.

Ostap prenis el flanka poŝo oran broĉon kun etaj vitraĉoj, disblovitan oran braceleton, seson da orumitaj kuleretoj kaj te-kribrileton.

Ipolit Matveeviĉ, pro la ĉagreno, eĉ ne komprenis ke li ekestis partoprenanto de ordinara ŝtelo.

– Vulgara afero, – rimarkis Ostap, – sed konsentu ke mi ne povis forlasi la amatinon, lasinte pri ŝi neniun memoraĵon. Tamen ni ne perdu la tempon. Tio estas nur komenco. Fino estos en Moskvo. Kaj la mebla muzeo, – tio ne vidvino: tie estos pli malfacile!

La partneroj enŝovis la rompaĵojn sub liton kaj, kalkulinte la monon (ĉe ili, kune kun oferoj al infanoj, okazis kvincent tridek kvin rubloj), ekveturis en stacidomon, al moskva trajno.

Ili devis veturi per fiakro tra la tuta urbo.

Sur Kooperativa ili ekvidis na Polesov, kiu kuris sur trotuaro kiel timema antilopo. Lin persekutis kortisto de domo numero kvin sur Pereleŝinskij-strateto. La koncesiujoj, turniĝante post angulon, sukcesis rimarki ke la kortisto atingis na Viktor Miĥajloviĉ, kaj komencis bati lin. Polesov kriis «savu!» kaj «vulgarulo!»

Ĝis foriro de la trajno ili sidis en la necesejo, por eviti renkonton kun la amata ino.

La trajno portis la amikojn en la bruan centron. Ili rigardis en la fenestron.

La vagonoj flugis super Gusion.

Subite Ostap ekmuĝis, kaj kaptis na Vorobjaninov je la bicepso.

– Rigardu, rigardu! – kriis li. – Rapide! Alĥen, hundina filo!..

Ipolit Matveeviĉ ekrigardis soben. Ĉe la taluso fortega lipharulo tiris ĉaron, ŝarĝitan per ruĝflava frapharmoniko kaj per kvin fenestraj klapoj. La ĉaron alpuŝis honte aspek-tanta civitano en mus-kolora tolstoĵ-jaketo.

La suno trabatiĝis tra la pluvnuboj. Brilis krucoj de la preĝejoj.

Ostap, ridegante, elŝoviĝis el la fenestro kaj kriegis:

– Paŝa! Ĉu al pulbazaro vi veturas?

Paŝa Emileviĉ levis la kapon, ekvidis nur bufrojn de lasta vagono, kaj eĉ pli forte eklaboris per la piedoj.

– Ĉu vi vidis? – ĝoje demandis Ostap. – Belege! Jen kiel homoj laboras!

Ostap frapetis melankoliĝintan Vorobjaninov je la dorso.

– Ne gravas, paĉjo! Ne malĝoju! La kunsido daŭriĝas. Morgaŭ vespere ni estos en Moskvo!

Parto dua En Moskvo

Ĉapitro 15 En oceano da seĝoj

Statistiko scias ĉion.

Estas ĝuste registrita kvanto da plugebla grundo de Sovetio kun subdivido je humo, argilo kaj leŭso. Ĉiuj civitanoj de ambaŭ seksoj estas registritaj en akuratajn dikajn librojn, tiel bone konatajn al Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov: en librojn de registrad-oficejoj. Estas sciate kiom kaj kiun nutraĵon konsumas meza civitano de la respubliko. Estas sciate kiom da vodko drinkas tiu ĉi meza civitano, kun proksimuma indiko de uzata postmanĝeto. Scias kiom da ĉasistoj, baletistinoj, frezmaŝinoj, ĉiuspecaj hundoj, bicikloj, monumentoj, fraŭlinoj, lumturoj kaj kudraj maŝinoj estas en la lando.

Kiom da vivo, plena da vervo, pasio kaj pensoj, rigardas nin de statistikaj tabeloj!

Kiu li estas, tiu ĉi ruĝvanga individuo, sidanta ĉe tablo kun la buŝtuko, kaj apetite neniiganta la vaporantan proviaĵon? Ĉirkaŭ li kuŝas gregoj da miniaturaj bovoj. Grasaj porkoj amasiĝas en angulo de la tabelo. En speciala statistika baseno plaŭdas sennombraj sturgoj, lojtoj kaj fiŝo *ĉeĥon*. Sur ŝultroj, brakoj kaj kapo de la individuo sidas kokinoj. En plumsimilaj nuboj flugas hejmaj anseroj, anasoj kaj meleagroj. Sub la tablo kaŝiĝas du kunikloj. Sur horizonto altiĝas piramidoj kaj babilonoj da bakita pano. Negrandan fortikejon el konfitaĵo ĉirkaŭfluas lakta rivero. Kukumo, granda kiel piza turo, staras ĉe horizonto. Post

remparoj el salo kaj pipro marŝas duonplotone vinoj, vodkaĵoj kaj likvoroj. En ariergardo mizergrupete tiriĝas senalkoholaj trinkaĵoj: neatalulaj mineralaj akvoĵoj, limonaĵoj, kaj sifonoj en la drataĵoj retoj.

Kiu ja estas tiu ĉi individuo-manĝegulo, drinkulo kaj dolĉaĵ-ŝatanto? Ĉu Gargantuo, reĝo de dipsodoj ? Ĉu Silaf Foss? Ĉu legenda soldato Jaŝka Ruĝ-ĉemizulo? Ĉu Lukul (Lucullus)?

Ne, tio ne estas Lukul. Tio estas Ivan Ivanoviĉ Sidorov aŭ Sidor Sidoroviĉ Ivanov: meza civitano, formanĝanta dum sia vivo tutan prezentitan sur la tabelo proviaĵon. Tio estas normala uzanto de kalorioj kaj vitaminoj, trankvila kvardekjara fraŭlo, servanta en ŝtata vendejo pri galanterio kaj trikotaĵo.

Oni ne povas kaŝi sin de statistiko. Ĝi havas precizajn informojn ne nur pri kvanto da dentkuracistoj, kolbas-plenigiloj, kortistoj, kinoreĝisoroj, putinoj, pajlaj tegmentoj, vidvinoj, fiakristoj kaj preĝejaĵ sonoriloj, ĝi scias eĉ kiom da statististoj estas en la lando.

Nur solan aferon ĝi ne scias.

Ĝi ne scias kiom da seĝoj estas en Sovetio.

Seĝoj estas tre multaj. Lasta statistika esploro difinis loĝantaron de Sovetio je cent kvardek milionoj da homoj. Se forĵeti naŭdek milionoj da kamparanoj, preferantaj al seĝoj sid-benkojn, dormobenkojn, ekster-murajn sidtaluŝetojn, kaj en Orienta parto – eluzitajn tapiŝojn kaj tapiŝetojn, ankaŭ tiam restas kvindek milionoj da homoj, en hejma vivo de kiuj seĝoj estas aĵoj nepre necesaj. Se akcepti eblecon de kalkuleraroj, kaj kutimon de kelkaj civitanoj de Sovetio sidi inter du seĝoj, do, prenante iu ajn kaze duonon de la nombro, ni trovos ke kvanto da seĝoj en la lando devas esti ne malpli ol dudek ses kaj duono da mil-

ionoj. Por certeco ni rifuzu ankoraŭ de ses kaj duono da milionoj. Restintaj dudek milionoj estos nombro minimuma.

Ene de tiu ĉi oceano da seĝoj, faritaj el nukso, kverko, frakseno, palisandro, mahagono kaj karela betulo, inter seĝoj abiaj kaj pinaj, herooj de la romano devas trovi nuk-san hambsan seĝon kun kurbaj piedetoj, kaŝantan en sia ventro, tegita per angla katuno, trezorojn de *madam* Petuĥova.

La koncesiuloj kuŝis sur supraj litbenkoj, kaj ankoraŭ dormis kiam la trajno singarde transiris riveron Oka kaj, plirapidiĝine, komencis proksimiĝi al Moskvo.

Ĉapitro 16

Komunloĝejo je nomo de monaĥo Bertold Ŝvarc

Ipolit Matveeviĉ kaj Ostap, premante sin unu al la alia, staris ĉe malfermita fenestro de duaklasa vagono, kaj atente rigardis bovinojn, malrapide descendantajn de la taluso, koniferpinglan verdaĵon, tabulajn somerumajn kaĵojn.

Ĉiuj vojaj anekdotoj estis jam rakontitaj. Marda “Stargoroda vero” – pe-legita ĝis anoncoj, kaj buter-makulita. Ĉiuj kokidoj, ovoj kaj olivoj – formanĝitaj.

Restis plej enuiga parto de la vojo: lasta horo antaŭ Moskvo.

El maldensaj arbaretoj kaj boskoj la taluson alsaltis gajetaj somerdometoj.

Estis inter ili lignaj palacoj, brilantaj per vitroj de la verandoj kaj per freŝe farbitaj ladaj tegmentoj. Estis ankaŭ

simplaj lignaj trabaĵoj kun kvadrataj fenestretoj, veraj kaptiloj por somerumantoj.

Dum pasaĝeroj, penantaj aspekti spertuloj, pririgardis la horizonton kaj, konfuzante kio ankoraŭ restis en la memoroj pri batalo ĉe Kalka, rakontis unu al alia estinton kaj estanton de Moskvo, Ipolit Matveeviĉ persiste penis imagi al si muzeon de mebloj. La muzeo imagiĝis al li estiel multkilometra koridoro, ĉe flankoj de kiu staras seĝoj. Vorobjaninov vidis sin rapide iranta inter ili.

– Kio okazos pri muzeo de mebloj, tute ne estas sciata. Ĉu ni sukcesos? – maltrankvile diris li.

– Vi, gvidanto, jam delonge bezonas esti kuracata per elektro. Ne faru antaŭtempnan histerion. Se vi ne sukcesas trankviliĝi, maltrankviliĝu silente.

La trajno saltis sur relkomutiloj. Rigardante ĝin, semaforoj malfermegis la buŝojn. Trakoj pliiĝis. Sentiĝis proksimiĝo de grandega fervojkruciĝo. Herbo malaperis. Ĝin anstataŭigis karbocindro. Fajfis aranĝaj lokomotivoj, trumpetis relkomutistoj. Subite la frapobruo plifortiĝis. La trajno enruliĝis koridoron inter malplenaj vagonaroj kaj, klakante kiel enira turno-kruco, komencis kalkuladi la vagonojn.

Trakoj duobliĝadis.

La trajno elsaltis el la koridoro. Ekfrapis suno. Malalte, sur la tero mem, diskuris relkomutilaj lanternoj, similaj al hakiletoj. Elamasiĝis fumo. Lokomotivo, spiregante, eligis neĝblankajn vangobarbojn. Ĉe turnoplato aŭdiĝis krioj. La remizanoj enpelis lokomotivon.

Pro la energia bremsado ekkrakis la trajnaj artikoj. Ĉio ekjelpis, kaj al Ipolit Matveeviĉ ekŝajnis ke li trafis regnon de dentodoloroj. La trajno albordiĝis al asfalta kajo.

Tio estis Moskvo. Tio estis Rjazana stacidomo, plej freŝa kaj nova el ĉiuj moskvaj stacidomoj.

Neniu el ok aliaj stacidomoj de Moskvo havas tiel vastajn kaj altajn halojn kiel la Rjazana. Tuta Jaroslava stacidomo, kun ĝiaj pseŭdorusaj krestetoj kaj heraldikaj kokinoj, povas facile trovi lokon en granda bufedrestoracio de stacidomo Rjazana.

Moskvaj stacidomoj estas pordegoj de la urbo. Ĉiutage ili enlasas kaj ellasas tridek mil pasaĝerojn. Tra Aleksandra stacidomo eniras moskvon alilandano sur kaŭĉukaj plandoj, en kostumo “golfo” (pufpantalono, kaj dikaj lanaj ŝtrumpoj eksteren). De la Kurska Moskvon trafas kaŭkazano en bruna ŝafa ĉapo kun aerumaj truetoj, kaj altkreska loĝanto de rivero Volgo, en kanaba barbo. De Oktobra – elsaltas duonrespondeca oficisto kun teko el mirinda porka led. Li venis el Leningrado por kunligi, akordigi kaj konkretigi. Reprezentantoj de Kievo kaj Odeso enpenetras la ĉefurbon tra Brjanskij stacidomo. Jam ĉe stacio Tiĥonova pustin kievanoj komencas malrespekte rideti. Ili perfekte scias ke Kresĉatik estas plej bona strato sur la Tero. Odesanoj tiras kun si korbojn kaj platajn skatolojn kun fumajita skombro. Ankaŭ ili konas plej bonan straton en la mondo. Sed tio, certe, ne estas Kresĉatik, tio estas strato Lasal, estinta Deribasovskaja. El Saratov, Atkarsk, Tambov, Rtiŝĉev kaj Kozlov oni venas Moskvon de Paveleckij stacidomo. Plej malsignifa kvanto da homoj venas Moskvon tra stacidomo Savelovskij. Tio estas ŝuistoj el Taldomo, loĝantoj de urbo Dmitrov, laboristoj de Jaĥromsk-fabriko, aŭ malĝoja somerumanto, loĝanta vintre kaj somere ĉe stacio Ĥlebnikovo. Ĉi tie vojo en Moskvon estas proksima. Plej longa distanco sur tiu ĉi linio estas cent tridek kilometroj. De Jaroslava stacidomo la ĉefurbon trafas homoj alveturintaj el Vladivostok, Ĥabarovsk, Ĉita, do el urboj malproksimaj kaj grandaj.

Tamen plej mirindaj pasaĝeroj troviĝas en Rjazana stacidomo. Tio estas uzbekoj en blankaj muslinaj turbanoj kaj multkoloraj roboj, ruĝbarbaj taĝikoj, turkmenoj, ĥivanoj kaj buĥaranoj, super respublikoj de kiuj brilas ĉiama suno.

La koncesiuloj malfacile tratabiĝis al la eliro, kaj trovis sin sur Kalanĉevskaja-placo. Dekstre de ili altiĝis heraldikaj kokinoj de Jaroslava stacidomo. Rekte kontraŭ ili malhele briletis Oktobra stacidomo, farbita per olea farbo je du koloroj. Horloĝo sur ĝi montris la dekan kaj kvin minutoj. Sur horloĝo de Jaroslava stacidomo horloĝo montris ĝuste la dekan. Kaj, rigardante sur malhelbluan, plibeligitan per signoj de zodiako ciferplaton de Rjazana stacidomo, la vojaĝantoj rimarkis ke la horloĝo montras kvin minutoj antaŭ la deka.

– Tre oportune por rendezuoj! – diris Ostap. Ĉiam estas rezervaj dek minutoj.

La fiakristo eligis per la lipoj kisan sonon. Ili subveturis la ponton, kaj antaŭ la vojaĝantoj disvastiĝis majesta panoramo de la ĉefurbo.

– Tamen kien ni veturas? – demandis Ipolit Matveeviĉ.

– Al bonaj homoj, – respondis Ostap, – ili abundas en Moskvo. Kaj ĉiuj ili estas miaj konatoj.

– Kaj ni loĝos ĉe ili, ĉu?

– Tio estas komunloĝejo. Se ne ĉe unu, tiam ĉe alia ĉiam troviĝos loko.

En strato Oĥotnij Rjad estis tumulto. Dise, kun kolportajoj sur la kapoj kuris, kiel anseroj, senlicencaj kolportistoj. Post ili pigre trotis policisto. Senhejmaj infanoj sidis apud asfalta kaldronego, kaj delice enspiris odoron de la bolanta bitumo.

La fiakro enveturis Arbatov-placon, traveturis Preĉistenskij-bulvardon kaj, turniĝinte dekstren, haltis sur Sivcev Vraĵek.

– Kiu domo estas tio? – demandis Ipolit Matveeviĉ.

Ostap alrigardis la rozkoloran dometon kun meza alkonstruaĵo, kaj respondis:

– Komunloĝejo de studentoj pri kemio je nomo de monaĥo Bertold Ŝvarc.

– Ĉu vere je nomo de monaĥo?

– Ne, tio estas ŝerco, je nomo de Semaŝko.

Kiel decas pri ordinara studenta komunloĝejo en Moskvo, la domo de studentoj pri kemio jam delonge estis enloĝata per homoj havantaj al kemio sufiĉe malproksiman rilaton. La studentoj disrampis. Parto el ili pe-lernis kaj disveturis en destinitajn al ili lokojn, parto estis eksigita pro lerna malsukceso. Ĝuste tiu ĉi parto, kreskanta ĉiujare, aranĝis en la rozkolora dometo ion mezan inter loĝeja kooperativo kaj feŭda vilaĝo. Vicoj da novaj studentoj vane penis enrompiĝi la komunloĝejon. Eks-kemiistoj estis neku-time inventemaj, kaj rebatis ĉiujn atakojn. Fine oni perdis esperon pri la dometo. Ĝi ekestis opiniata sovaĝa, kaj malaperis el ĉiuj planoj. Ĝi kvazaŭ ne ekzistis jam. Tamen ĝi ekzistis, kaj en ĝi loĝis homoj.

La koncesiuloj leviĝis per ŝtuparo duan etaĝon, kaj turniĝis en tute malluman koridoron.

– Lumo kaj aero, – diris Ostap.

Subite en la mallumo, ĉe kubuto mem de Ipolit Matveeviĉ, iu snufis.

– Ne timu, – rimarkis Ostap, – tio ne en la koridoro. Tio el post la muro. Krucligno, kiel estas sciate el fiziko, estas plej bona kondukilo de sonoj. Singarde! Tenu vin ĉe mi! Ie ĉi tie devas esti fera gardo-ŝranko.

Krio, kiun tuj eligis Vorobjaninov, batiĝinta per la brusto je pinta fera angulo, montris ke la ŝranko vere estas ie ĉi tie.

– Kio, ĉu doloras? – informiĝis Ostap. – Tio ankoraŭ ne tiel gravas. Tio estas fizikaj turmentoj. Tamen kiom da moralaj turmentoj estis ĉi tie, – teruras rememori. Ĉi tie, apude, staris skeleto, propraĵo de studento Ivanopulo. Li aĉetis ĝin en Suhareva pul-bazaro, sed teni ĝin en la ĉambro li timis. Do la vizitantoj batiĝis komence je la ŝranko, kaj poste sur ilin falis la skeleto. Gravedaj virinoj estis tre malkontentaj.

Per la ŝtuparo, iranta ŝraŭbe, la partneroj leviĝis en la mezan alkonstruaĵon. Granda ĉambro de la alkonstruaĵo estis distranĉita per kruclignaj muretoj je longajn pecojn, larĝajn je unu kaj duonmetro ĉiu. La ĉambroj estis similaj al ujoj por skribiloj, kun tiu nur diferenco, ke krom kraĵoj kaj plum-ingoĵ ĉi tie estis ankaŭ homoj kaj primusoj.

– Ĉu vi estas hejme, Kola? – mallaŭte demandis Ostap, haltinta ĉe la meza pordo.

Responde al tio en ĉiuj kvin skribiluĵoj oni ekmoviĝis kaj ekparolis.

– Hejme, – ekaŭdiĝis el post la pordo.

– Denove al tiu ĉi stultulo venis frumatenaj gastoj! – flustris ina voĉo el ekstrem-maldekstra skribiluĵo.

– Sed donu al la homo dormi! – elgrumblis skribiluĵo numero du.

En tria skribiluĵo oni ĝoje eksiblis:

– Al Kola oni el polico venis. Pro hieraŭa vitro.

En kvina skribiluĵo oni silentis. Tie jenis primuso kaj aŭdiĝis sonoj de interkisoj.

Ostap puŝis la pordon per la piedo. La tuta krucligna konstruaĵo ekstremsis, kaj la koncesiuloj penetris en fendejon

de Kola. La vidaĵo kiu prezentiĝis al rigardo de Ostap estis terura, kvankam de ekstere ĝi aspektis tute ĉasta. En la ĉambro troviĝis nur unu meblaĵo: tio estis matraco, striigita ruĝe, kaj kuŝanta sur kvar brikoj. Sed ne tio maltrankviligis na Ostap. Meblaron de Kola li konis jam de longe. Ne miris lin ankaŭ Kola mem, sidanta kun la piedoj sur la matraco. Sed apude sidis ĝis tiom ĉiela estaĵo, ke Ostap tuj malsereniĝis. Tiaj junulonoj neniam estas aferaj konatinoj: por tio iliaj okuloj estas tro bluaj, kaj tro puraj estas iliaj koloj. Tio estas amatinoj aŭ, eĉ pli malbone, tio estas edzinoj, amataj edzinoj. Kaj vere, Kola nomis la kreaĵon Liza, diris al ŝi «ci», kaj montris al ŝi kornetojn.

Ipolit Matveeviĉ demetis sian ĉapon. Ostap elvokis na Kola en la koridoron. Tie ili longe interflustris.

– Kiel bonega estas la mateno, sinjorino, – diris Ipolit Matveeviĉ.

La bluokula sinjorino ekridis kaj, sen iu videbla ligo kun rimarko de Ipolit Matveeviĉ, ekparolis pri tio ĝis kiom stultaj homoj loĝas en najbara skribilujo.

– Ili speciale funkciigas la primuson por oni ne aŭdu ilian interkisadon. Sed, vi komprenu, tio stultas. Ni aŭdas ĉion. Sed ili vere aŭdas jam nenion pro sia primuso. Ĉu vi volas ke mi montru al vi tion? Aŭskultu!

Kaj edzino de Kola, ellerninta ĉiujn sekretojn de la primuso, laŭte diris:

– Zverev-oj estas stultuloj!

Post la muro aŭdiĝis infera kantado de la primuso kaj sonoj de kisoj.

– Ĉu vi vidas? Ili aŭdas nenion. – Zverev-oj estas stultuloj, idiotoj kaj maniuloj. – Ĉu vi vidas!..

– Jes, – diris Ipolit Matveeviĉ.

– Sed ni ne tenas primuson. Por kio? Ni tagmanĝas en vegetara manĝejo, kvankam mi estas kontraŭ vegetaraj manĝejoj. Sed kiam mi kaj Kola geedziĝis, li revis pri tio ke ni kune vizitos vegetaran manĝejon. Do ni vizitas ĝin. Mi tre ŝatas viandon. Sed tie – kotletoj el nudeloj. Sed vi bonvolu nenion diri al Kola...

Dum tio revenis Kola kun Ostap.

– Nu kion fari, se ĉe vi tute ne eblas resti, ni iru al Pantelej.

– Ĝuste, knaboj! – kriis Kola. – Iru al Ivanopulo. Tio estas nia bubo.

– Venu gastoj ĉe ni, – diris edzino de Kola, – mi kaj la edzo estos tre ĝojaj al vi.

– Denove ili vokas gastojn! – indigniĝis la lasta skribilujo. – Ne sufiĉas gastoj al ili!

– Sed vi estas stultuloj, idiotoj, psikuloj, kaj tio estas ne via afero! – diris edzino de Kola, ne altigante la voĉon.

– Ĉu vi aŭdas, Ivan Andreeviĉ, – ekmaltrankviliĝis oni en la lasta skribilujo, – oni insultas vian edzinon, sed vi silentas.

Ekaŭdigis siajn voĉojn nevideblaj komentantoj ankaŭ el aliaj skribilujoj. La parola konflikto disvastiĝis. La partneroj foriris soben, al Ivanopulo.

La studento ne estis hejme. Ipolit Matveeviĉ strekis alumeton. Sur la pordo pendis skribaĵeto: «Mi venos ne pli frue ol je la naŭa. Pantelej».

– Ne gravas, – diris Ostap, – mi scias kie estas la ŝlosilo.

Li palpis sub la garda ŝranko, trovis la ŝlosilon, kaj malfermis la pordon.

Ĉambro de studento Ivanopulo estis ĝuste samgranda al tiu de Kola, sed ĉeangula. Unu ĝia muro estis brika, per

kio la studento tre fieris. Ipolit Matveeviĉ ĉagrene rimarkis ke ĉe la studento forestas eĉ matraco.

– Ni lokiĝos bonege, – diris Ostap, – la spaco estas akceptebla por Moskvo. Se ni kuŝos ĉiuj tri sur la planko, tiam eĉ restos iom da loko. Sed Pantelej, filo de hundino! Kien li forigis la matracon, volus mi scii?

La fenestro rigardis interstrateton. Tie promenis policisto. Kontraŭe, en dometo konstruita simile al gotika turo, troviĝis ambasadejo de iu eta regno. Post fera krado oni ludis tenison. Flugis blanka pilko. Aŭdiĝis kurtaj elkrioj.

– Ekster, – diris Ostap, – ne alta klaso de ludo. Tamen mi proponas ripozi.

La koncesiuloj sternis sur la plankon ĵurnalojn. Ipolit Matveeviĉ elprenis kuseneton, kiun li kunprenis en la vojaĝon.

Ostap falis sur la telegramojn kaj ekdormis. Ipolit Matveeviĉ dormis jam delonge.

Ĉapitro 17

Estimu matracojn, civitanoj

- Liza, iru ni tagmanĝi!
 - Mi ne volas. Mi jam tagmanĝis hieraŭ.
 - Mi ne komprenas cin.
 - Mi ne iros manĝi falsan leporon.
 - Sed tio stultas!
 - Mi ne povas esti nutrata per vegetaraj kolbasetoj.
 - Hodiaŭ ci manĝos poman bakaĵon.
 - Ial mi ne volas.
 - Parolu mallaŭte. Ĉio aŭdeblas.
- Kaj la junaj geedzoj transiris al drama flustrado.

Post du minutoj Kola unuafoje dum tri monatoj de la geedza vivo komprenis ke la amata virino ŝatas karotajn, terpomajn kaj pizajn kolbasetojn signife malpli ol li.

– Do ci preferas hundaĵon al dieta nutrado? – kriis Kola, pro la eksciteco forgesinte pri la aŭskultantaj najbaroj.

– Ja parolu ci mallaŭte! – laŭte kriis Liza. – Krom tio ci malbone rilatas min. Jes! Mi ŝatas viandon! Iam. Kio malbona estas en tio?

Kola mirege eksilentis. Tiu ĉi turno estis tute neaten-dita por li. Viando trabatus en buĝeto de Kola grandegan, neripareblan breĉon. Promenante laŭ la matraco sur kiu, kuntiriĝinte node sidis ruĝiĝinta Liza, la juna edzo senespere kalkuladis.

Kopiado sur paŭsan paperon en desegna buroo “Teknoforto” donis al Kola Kalaĉov eĉ en plej sukcesaj monatoj ne pli ol kvardek rublojn. Por la loĝejo Kola ne pagis. En la sovaĝa loĝarejo ne estis domestraro, kaj loĝeja pago estis tie termino abstrakta. Dek rubloj foriris al instruo de Liza al tajlo kaj kudro en kursoj samrajtaj al konstrua teknikumo. Tagmanĝo por du (unuopa unua plado: barĉo monaĥeja, kaj unuopa dua: falsa leporo aŭ veraj nudeloj), formanĝataj per la duopo honeste, duone, en vegetara manĝejo “Ne ŝtelu”, elŝiris el buĝeto de la geedzoj dek tri rublojn monate. Restinta mono disflosis neniuj scias kien. Tio pli ol io alia konsternis na Kola. «Kien foriras la mono?» – enpensiĝis li, tirante per tuĉstrekilo longan kaj maldikan linion sur ĉielkolora paŭsa papero. Transiri dum tiuj kondiĉoj al viandmanĝado signifus pereon. Do Kola arde ekparolis:

– Imagu ci, manĝegi kadavrojn de mortigitaj animaloj! Kanibalismo sub masko de kulturo! Ĉiuj malsanoj devenas de viando.

– Certe, – kun ĝena ironio diris Liza, – ekzemple angino.

– Jes, jes, ankaŭ angino! Kion ci opinias? Organismo, malfortigita per konstanta uzo de viando ne kapablas jam kontraŭstari infekcion.

– Ĝis kiom tio ĉi stultas!

– Ne, ne stultas. Stulta estas tiu kiu penas plenigi sian stomakon ne zorgante pri kvanto da vitaminoj.

Subite Kola eksilentis. Antaŭ lia interna okulo, pli kaj pli ŝirmante fonon el sengustaj kaj velkaj nudelaĵoj kaj terpomaj stultaĵoj, aperis vasta porka kotleto. Ŝajne ĝi ĵus desaltis de la pato. Ĝi ankoraŭ siblis, gluglis, kaj eligis la spican fumon. Osto el la kotleto elstaris kiel duela pistolo.

– Sed komprenu ci, – kriis Kola, iu porka kotleto forprenas de homo semajnon da vivo!

– Forprenu ĝi! – diris Liza. – Falsa leporo forprenas duonjaron. Hieraŭ, kiam ni formanĝis karotan rostaĵon, mi eksentis ke mi mortas. Mi ne volis diri al ci pri tio.

– Kial ci ne volis diri?

– Mi ne havis fortojn. Mi timis ekplori.

– Kaj nun ci ne timas?

– Nun estas tutegale al mi.

Liza ekplorete.

– Leo Tolstoj, – diris Kola per tremanta voĉo, – ankaŭ ne manĝis viandon.

– Je-es, – respondis Liza, singultante pro la larmoj, – la grafo manĝis asparagon.

– Asparago ne estas viando.

– Sed kiam li verkis na “Milito kaj paco”, li manĝis viandon! Manĝis, manĝis! Kaj kiam li verkis “Ana Karenina”, li voris, voris, voris ĝin!

– Ja eksilentu ci!

– Voris! Voris! Voris!

– Kaj kiam li verkis na “Sonato de Krejcer (Kreutzer)”, ĉu ankaŭ tiam li voris? – venene demandis Kola.

– “Sonato de Krejcer” estas mallonga. Provu li verki na “Milito kaj paco”, nutrante sin per vegetaraj kolbasetoj!

– Tamen kial ci kroĉiĝis al mi kun via Tolstoj?

– Ĉu tio estas mi kiu alkroĉiĝis al ci pri Tolstoj? Ĉu mi? Ĉu mi alkroĉiĝis al vi pri Tolstoj?

Ankaŭ Kola transiris al “vi”. En skribiluĵoj oni laŭte jubilis. Liza haste, de nuko sur la frunton, surtiris la bluan trikitan ĉapeton.

Kien ci iras?

– Lasu min. Mi iras okupiĝi pri unu afero.

Kaj Liza forkuris.

«Kien ŝi povas iri?» – pensis Kola. Li aŭskultis.

– Multe da libero estas donita al via sekso ĉe sovetia reĝimo, – oni diris en lasta maldekstra skribiluĵo.

– Droniĝos! – decidis oni en tria skribiluĵo.

Kvina skribiluĵo funkciis la primuson, kaj okupiĝis pri la kutimaj interkisoj.

Liza ekscite kuris sur la stratoj.

Estis tiu horo de dimanĉo kiam sur strato Arbat feliĉuloj transportas de bazaro matracojn.

Ĉefaj aĉetantoj de risortaj matracoj estas junaj geedzoj kaj sovetiaj mezprosperuloj. Ili veturigas ilin stare, kaj

brakumas ilin per la ambaŭ manoj. Kaj kial ili ne ĉirkaŭbrakumu la bluan, kun briletantaj floretoj bazon de sia feliĉo!

Civitanoj! Estimuj vi risortan matracon kun bluaj floretoj! Tio estas familia fajrujo, alfo kaj omego de meblaro, esenco de hejma komforto, bazo de amoro, patro de primuso! Kiom dolĉa estas dormo ĉe demokratia sonoro de ĝiaj risortoj! Kiujn belajn sonĝojn spektas homo, dormanta sur ĝia blua sakŝtofo! Kiun estimon akiras ĉiu matrachavanto.

Homo kiu ne havas matracon estas mizera. Li ne ekzistas. Li ne pagas impostojn, ne havas edzinon, konatoj ne pruntedonas al li monon «ĝis la vendredo», ŝoforoj de taksioj ĵetas en lian dorson ofendajn vortojn, junulinoj priridas lin: ili ne ŝatas idealistojn.

Homo senigita je matraco verkas kutime versaĵojn:

Ĉe son' tik-taka de l' horloĝ'
agrablas sidi en brakseĝo.
Monedoj flugas ĉe l'balkon'
kaj, kiel revoj, ŝvebas neĝo.

Verkas li ĉe alta skrib-pupitro de telegrafejo, rabante tempon de agemaj matrachavantoj, venintaj sendi telegramojn.

Matraco rompas vivon de homo. En ĝiaj tegaĵo kaj risortoj kaŝiĝas iu forto, alloga, kaj ĝis nun ne esplorita. Al voka sono de ĝiaj risortoj alfluas homoj kaj aĵoj. Venas financagento kaj junulinoj. Ili volas esti amikaj kun matrachavanto. Financ-agento faras tion en fiskaj celoj, zorgane pri ŝtata utilo, kaj junulinoj – senprofite, obeante leĝojn de naturo.

Komenciĝas florado de juneco. Financagento, kolektinte impostojn same al abio, kiu kolektas printempan mielon, kun ĝoja zumado forflugas en sian distriktan abele-

jon. Kaj for-ondiĝintajn junulinojn ŝanĝas edzino kaj primuso “Juvel numero unu”.

Matraco estas nesatigebla. Ĝi postulas oferojn. Nokte ĝi eligas sonon de falanta pilko. Ĝi bezonas etaĝeron. Ĝi bezonas tablon sur stulta kestaro. Klakante per la risortoj ĝi postulas fenestrajn kurtenetojn, pordan kurtenon kaj kuirejan potaron. Ĝi puŝas la homon kaj diras al li:

– Iru! Aĉetu lignan gladil-paron!

– Mi hontas pri vi, homo, ĉe vi ĝis nun forestas tapiŝo!

– Laboru! Post nelonge mi alportos al vi infanojn! Vi bezonas monon por vindotukoj kaj kaleŝeto.

Matraco memoras ĉion kaj ĉion faras laŭ siaj decidoj.

Eĉ poeto ne povas eviti komunan sorton. Jen li veturigas de bazaro matracon, kun teruro premiĝante al ĝia mola ventrego.

– Mi rompos vian sistemon, poeto, – diras la matraco. – Vi jam ne devos plu kuri en telegrafejon por verki versaĵojn. Kaj, entute, ĉu valoras verki ilin? Oficu! Kaj saldo ĉiam estos pozitiva por vi. Pensu pri la edzino kaj pri la infanoj.

– Mi ne havas edzinon! – krias la poeto, forŝanceliĝante de la risorta instruisto.

– Ŝi venos. Kaj mi ne garanias ke tio estos plej bela junulino en la mondo. Mi ne scias eĉ ĉu ŝi estos bonkora. Estu preta al ĉio. Ĉe vi naskiĝos infanoj.

– Mi ne ŝatas infanojn!

– Vi amos ilin!

– Vi timigas min, civitano matraco!

– Silentu, stultulo! Vi ankoraŭ ne konas ĉion! Vi prenos en Mos-ligno krediton por aĉeti meblaron.

– Mi murdos vin, matraco!

– Hundido! Se vi kuraĝos fari tion, la najbaroj denuncos pri vi en la dom-administrejon.

Tiel ĉiudimanĉe, ĉe ĝoja sonoro de matracoj, vagas en Moskvo feliĉuloj.

Tamen ne nur per tio rimarkindas moskva dimanĉo. Dimanĉo estas ankaŭ muzea tago.

Estas en Moskvo specifa kategorio de homoj. Ĝi komprenas nenion pri pentroarto, ne interesiĝas pri arkitekturo, kaj ne ŝatas monumentojn de antikveco. Tiu ĉi kategorio vizitas muzeojn ekskluzive pro tio ke ili troviĝas en bonegaj konstruaĵoj. Tiuj ĉi homoj vagas en blindigaj haloj, envie pririgardas pentritajn plafonojn, tuŝas per la manoj tion kion estas malpermesate tuŝi, kaj senĉese murmuras:

– Ho! Jen kiel homoj vivis!

Al ili ne gravas ke la murojn pentris franco Pjuvi de Ŝavan (Puvis deChavannes), al ili gravas scii kiom tio kostis al estinta posedanto de la sinjorlando. Ili leviĝas per ŝtuparo kun marmoraj skulptaĵoj sur la interplacetoj, kaj imagas al si kiom da lakeoj staris ĉi tie, kiom da salajro kaj trinkmono ricevis ĉiu el la lakeoj. Sur kameno staras porcelano, sed ili, ne atentante ĝin, decidas ke kameno estas afero malprofita: tro da hejtligno ĝi uzas. En manĝejo, tegita per kverka panelo, ili ne rigardas la rimarkindan lignan gravuraĵon. Ilin turmentas nur unu penso: kion manĝis ĉi tie la iama mastro-komercisto, kaj kiom tio kostus ĉe nuna multekosteco?

En ĉiu muzeo oni povas trovi tiujn ĉi homojn. Dum ekskursanoj vige marŝas de unu majstroverko al alia, tia homo staras ene de la halo kaj, rigardante nenion, muĝas angore:

Ho! Jen kiel homoj vivis!

Liza kuris sur strato, glutante la larmojn. La pensoj alpelis ŝin. Ŝi pensis pri sia feliĉa kaj malriĉa vivo.

«Se ni havus tablon kaj du seĝojn, estus tute bone. Kaj primuson, finfine, oni devas akiri. Ja devas ni iel ordiĝi».

Ŝi ekiris malpli rapide, ĉar subite rememoris pri malpaciĝo kun Kola. Krom tio ŝi tre volis manĝi. Subite en ŝi ekflamis malamo al la edzo.

– Tio estas maldecaĵo! – laŭte diris ŝi.

Ŝi ekmalsatis eĉ pli ol antaŭe.

– Do bone. Mi mem scias kion mi faru.

Kaj Liza, ruĝiĝante, aĉetis ĉe vendistino sandviĉon kun kuirita kolbaso.

Kvankam ŝi estis tre malsata, manĝi surstrate ŝajnis al ŝi nekonvene. Tiel aŭ aliel, sed ŝi estis matracposedantino, kaj detale orientiĝis en vivordo. Ŝi ĉirkaŭrigardis, kaj eniris pordon de duetaĝa izoldomo. Tie, sentante grandan delicon, ŝi ekokupiĝis pri la sandviĉo. La kolbaso estis deloga. Granda ekskurso eniris la pordon. Preterirante na Liza, starantan ĉe la muro, la ekskursanoj rigardetis ŝin.

«Rigardu ja!» – decidis kolerigita Liza.

Ĉapitro 18

Muzeo de mebloj

Liza purigis la buŝon per la poŝtuketo, kaj deskuis la pecetojn. Ekestis pli gaje. Ŝi staris antaŭ elpendaĵo:

MUZEO DE MEBLA ARTO

Reveni hejmen estis ĝene. Forestis konatoj, al kiuj ŝi povus iri. En la poŝeto kuŝis dudek kopekoj. Do Liza decidis komenci la memstaran vivon per vizito en la muzeon. Kontrolinte la monon, Liza eniris la vestiblon.

Tie ŝi tuj stumblis je homo en eluzita barbo, kiu, apogante sian pezan rigardon sur la malakitan kolonon, filtris tra la lipharoj:

– Riĉe vivis la homoj!

Liza estime ekrigardis la kolonon kaj ekiris supren.

En etaj kvadrataj ĉambroj kun tiel malaltaj plafonoj ke ĉiu eniranta tien ŝajnis giganto, Liza vagis dek, proksimume, minutoj.

Tio estis ĉambroj meblitaj per empirio de reĝo Pavel: ruĝa ligno kaj karelia betulo; meblaro severa, mirakla kaj militema. Du kvadrataj ŝrankoj, vitraj pordetoj de kiuj estis krucstrekitaj per lancoj, staris kontraŭ skriba tablo. La tablo estis senlima. Sidi ĉe ĝi estis samo kiel sidi ĉe Teatra placo, dum Granda teatro kun ĝia kolonado kaj kvaroj da bronzaĵoj, portantaj Apolonon al unua prezentado de “Ruĝa papavo”, ŝajnus esti nura skribilaro sur tiu ĉi tablo. Tiel ŝajnis al Liza, kiu estis edukita per karotoj, kiel iu kuniklo. Ĉe la anguloj staris brakseĝoj kun altaj dorsetoj, suproj de kiuj estis fleksitaj same al virŝafaj kornoj. La suno kuŝis sur persika tegaĵo de la brakseĝoj.

Aperis deziro tuj sidi sur tiun ĉi brakseĝon, sed sidi sur ĝi estis malpermesate.

Liza imagis kiel aspektus la brakseĝo de valorega Pavel-empiro apud ŝia matraco kun ruĝaj strioj. Rezultis ke – sufiĉe bone. Ŝi pe-legis sur la muro avizon kun scienca kaj ideologia priskribo de Pavel-empiro kaj, bedaŭrante pri tio ke ŝi kaj Kola ne havas ĉambron en tiu ĉi palaco, eniris neatenditan koridoron.

Maldekstre de ŝi, de la planko mem, iris malaltaj duonrondaj fenestroj. Tra ili, sub la piedoj, Liza ekvidis gigantan blankan duluman halon kun kolonoj. Ankaŭ en la halo staris mebloj kaj vagadis vizitantoj. Liza haltis. Ankorau neniam ŝi vidis halon sub siaj piedoj.

Mirigante kaj ravante ŝi longe rigardis soben. Subite ŝi rimarkis ke tie, de brakseĝoj al skribotablo, iras ŝiaj hodiaŭaj konatoj: Bender kaj lia kunulo, kaprazita altstatura maljunulo.

– Jen kiel bone! – diris Liza. – Estos ne tiel enue.

Ŝi tre ekĝojis, kuris soben, kaj tuj perdis la vojon. Ŝi trafis ruĝan gastoĉambron, en kiu staris ĉirkaŭ kvardek pecoj. Tio estis noksaj mebloj sur kurbaj piedetoj. Eliro el la gastoĉambro forestis. Okazis necese kuri reen tra ronda ĉambro, lumigita desupre, kaj meblita, ŝajne, nur per floretaj kusenoj.

Ŝi kuris preter brokaĵaj brakseĝoj de itala Renesanco, preter nederlandaj ŝrankoj, preter granda gotika lito kun baldakeno sur nigraj spiralaj kolonoj. Homo sur tiu ĉi lito ŝajnus ne pli granda ol nukso.

Fine Liza ekaŭdis zumon de ekskursanoj, neatente aŭskultantaj la gvidanton, kiu demaskis imperiismajn intencojn de Ekaterino la 2-a rilate al ŝato de la mortinta jam imperiestrino al mebloj en stilo de Lui-Sez.

Tio estis sama granda duluma halo kun kolonoj. Liza venis kontraŭan flankon de ĝi, kie konata al ŝi kamarado Bender varme konversaciis kun sia kaprazita kunulo.

Alvenante, Liza aŭdis la sonoritan voĉon:

– Mebloj en stilo ŝik-moderno. Sed ŝajne tio ne estas kion ni bezonas.

– Jes, sed ĉi tie, verŝajne, estas ankaŭ aliaj haloj. Ni devas detale pririgardi ĉion.

– Saluton, – diris Liza.

Ili ambaŭ returnis kaj tuj grimaciĝis.

– Saluton, kamarado Bender. Bone ke mi trovis vin. Ĉar sole estas enue. Rigardu ni kune.

La koncesiuloj interrigardis. Ipolit Matveeviĉ prenis pozon, kvankam al li estis malagrabla ke Liza povas bremsi ilin en grava afero de serĉo de la brilanta meblo.

– Ni estas tipaj provinculoj, – diris Bender senpaci-ence, – sed kiel trafis ĉi tien vi, moskvanino?

– Tute hazarde. Mi malpaciĝis kun Kola.

– Jen kiel? – rimarkis Ipolit Matveeviĉ.

– Lasu ni tiun ĉi halon, – diris Ostap.

– Sed mi ankoraŭ ne pririgardis ĝin. Ĝi estas tiel be-leta.

– Komenciĝas! – flustretis Ostap en orelon de Ipolit Matveeviĉ. Kaj, turnante sin al Liza, aldonis: – Ĉi tie estas tute nenio spektebla. Stilo de dekadenco. Epoko de Kerenskij.

– Ie ĉi tie, oni diris al mi, estas mebloj de majstro Hambs, – informis Ipolit Matveeviĉ, – iru ni tien.

Liza konsentis kaj, preninte brakon de Vorobjaninov (li ŝajnis al ŝi mirinde simpatia reprezentanto de scienco), direktiĝis al la eliro. Malgraŭ tuta seriozeco de la situacio, kaj veninta jam decida momento en serĉo de la trezoroj,

Bender, irante post la paro, ludeme ridis. Lin ridigis gvidanto de *komanĉoj* en rolo de flirtulo.

Liza tre ĝenis la koncesiulojn. Dum ili unurigarde difinis ke en la ĉambro la necesa meblo forestas, kaj nevole logiĝis en sekvontan halon, Liza por longe restis en ĉiu ĉambro. Ŝi legis plenvoĉe ĉiujn presitajn recenzojn pri la meblo, faris pikajn rimarkojn pri la vizitantoj, kaj longe staris ĉe ĉiu eksponaĵo. Nevole, kaj tute nerimarke por si ŝi adaptis la vidatajn meblojn al siaj bezonoj, kaj al sia ĉambro. Gotika lito tute ne plaĉis al ŝi. La lito estis tro granda. Eĉ se Kola mirakle sukcesus ricevi ĉambron je ses kvadrataj metroj, ankaŭ tiam forestus loko por tiu ĉi mezepoka kuŝejo. Tamen Liza longe ĉirkaŭiris la liton, mezurante per la paŝetoj ĝian veran dimension. Al Liza estis tre gaje. Ŝi ne rimarkis acidajn mienojn de siaj kunuloj, kavaliraj karakteroj de kiuj ne permesis al ili tuj ĵetiĝi en ĉambron de majstro Hambs.

– Toleru ni, – flustris Ostap – la meblo ne foriros, sed vi, gvidanto, ne premu la knabinon. Mi ĵaluzas.

Vorobjaninov memkontente ridetis.

La haloj tiriĝis malrapide. Ili estis senfinaj. Mebloj de epoko de caro Aleksandro estis prezentitaj per multnombraj kompletoj. Relative negrandaj, ili ekravis na Liza.

– Rigardu, rigardu! – konfide kriis ŝi, kaptante na Vorobjaninov je la maniko. – Ĉu vi vidas tiun tablon? Ĝi mirinde taŭgus al nia ĉambro. Ĉu vere?

– Ĉarmaj mebloj! – kolere diris Ostap. Sed ili estas dekadencaj.

– Kaj ĉi tie mi jam estis, – diris Liza, enirante ruĝan gastoĉambron, – ĉi tie, mi opinias, ne valoras halti.

Sed la akompanantoj, indiferentaj al mebloj, rigidiĝis ĉe la pordo, al ŝia miro, kiel gardistoj.

– Kial vi ekstaris? Iru ni. Mi jam laciĝis.

– Atendu, – diris Ipolit Matveeviĉ, liberigante de ŝia mano, – unu minuton.

La granda ĉambro estis troŝargita per mebloj. Seĝoj de Hambs lokiĝis laŭ la muro kaj ĉirkaŭ la tablo. Sofon en la angulo ankaŭ ĉirkaŭigis seĝoj. Iliaj kurbaĵoj kaj piedetoj kaj oportunaj dorsetoj estis fascine konataj al Ipolit Matveeviĉ. Ostap ekzamine rigardis lin. Ipolit Matveeviĉ estis ruĝa.

– Vi laciĝis, fraŭlino, – diris li al Liza, – sidu vi ĉi tie kaj ripozu, kaj ni iom iradu. Ŝajnas ke tio estas interesa halo.

Ili sidigis na Liza.

La koncesiuloj deiris al la fenestro.

– Ĉu ili? – demandis Ostap.

– Ŝajnas ke ili. Necesas pli detale pririgardi.

– Ĉu ili ĉiuj estas ĉi tie?

– Nun mi kalkulos. Atendu, atendu...

Vorobjaninov komencis movi la rigardon de seĝo al seĝo.

– Permesu ja, – diris li fine, – dudek seĝoj. Tio ne povas esti. Ili devas esti nur dekopaj.

– Sed pririgardu vi bone. Verŝajne tio estas aliaj seĝoj.

Ili komencis iradi inter la seĝoj.

– Nu? – rapidigis Ostap.

– Ŝajnas ke dorseto estas iel ne tia, kiel ĉe miaj.

– Do, ne tiuj?

– Jes, ne tiuj.

– Ŝajnas ke mi vane ligiĝis kun vi.

Ipolit Matveeviĉ estis tute premita.

– Bone, – diris Ostap, – la kunsido daŭriĝas. Seĝo – ne kudrilo. Troviĝos ĝi. Donu al mi la mandatojn. Estas ne-

cesa malagrabla kontakto kun administraro de la muzeo. Sidu apud la knabino kaj atendu. Mi tuj revenos.

– Kial vi estas tiel malgaja? – diris Liza. Ĉu vi laciĝis? Ipolit Matveeviĉ preferis silenti.

– Ĉu ĉe vi doloras kapo?

– Jes, iom. Zorgoj, ĉu vi scias. Manko de inaj karesoj influas la vivordon.

Liza komence miris, sed poste, ekrigardante sian kaprazitan konversaciulon, vere ekbedaŭris lin. Okuloj de Vorobjaninov estis tiuj de turmentito. La nazumo ne kaŝis klare videblajn saketojn. Rapida transiro de trankvila vivo de oficisto en distrikta registrad-oficejo al neoportuna kaj klopoda ĉiutaga vivo de aventuristo kaj ĉasisto post brilantoj ne pasis senpure. Ipolit Matveeviĉ signife maldikiĝis, kaj ĉe li komencis doloretati la hepato. Sub severa pririgardo de Bender Ipolit Matveeviĉ perdis sian personecon, kaj rapide dissolviĝis en titana intelekto de la filo de turka civitano. Nun, kiam li por minuto restis duopa kun ĉarma civitanino Kalaĉova, li volis rakonti al ŝi pri ĉiuj malagrablaĵoj kaj ekscitecoj, sed li ne kuraĝis fari tion.

– Jes, – diris li, tenere rigardante la konversaciantinon, tiaj aferoj. Sed kiel vi fartas, Elizaveta...

– Petrovna. Kaj kio estas via nomo?

Ili diris la nomojn kaj patronomojn.

«Fabelo de amo karega», – pensis Ipolit Matveeviĉ, enrigardante simpletan vizaĝon de Liza. Tiel pasie, tiel neeviteme ekvolis la maljuna gvidanto inajn karesojn, manko de kiuj peze influas la vivordon, ke li tuj prenis maneton de Liza en siajn sulkajn manojn, kaj varme ekparolis pri Parizo. Li volis esti riĉa, malŝparema kaj nekontraŭstarebla. Li volis pasiigi, kaj ĉe bruo de orkestro drinki en aparta ĉambro ĉampagnon kun belulino el ina orkestro. Pri

kio estis paroli kun tiu ĉi knabino, kiu sendube konas nenion pri apartaj ĉambroj kaj inaj orkestroj, kaj kiu, pro sia naturo, eĉ ne povas aprezi tutan ĉarmon de tiu ĉi ĝenro. Sed li tiel volis esti nekontraŭstarebla! Do Ipolit Matveeviĉ delogis na Liza per rakontoj pri Parizo.

– Ĉu vi estas sciencisto? – demandis Liza.

– Jes, iusence, – respondis Ipolit Matveeviĉ, sentante ke de post konatiĝo kun Bender li denove akiris sian impertinenton, malaperintan dum lastaj jaroj.

– Sed kio estas via aĝo, pardonu pri la demando?

– Al la scienco, reprezentanto de kiu mi ĉi-momente estas, tio havas neniun rilaton.

Liza estis konkerita per tiu ĉi rapida kaj trafa respondo.

– Tamen kiom? Tridek? Kvardek? Kvindek?

– Preskaŭ. Tridek ok.

– Ho! Vi aspektas signife pli juna.

Ipolit Matveeviĉ sentis sin feliĉa.

– Kiam vi prezentos al mi feliĉon denove ekvidi vin? – demandis Ipolit Matveeviĉ tra la nazo.

Liza tre ekhontis. Ŝi ekmoviĝis en la brakseĝo kaj ekangoris.

– Sed kien malaperis kamarado Bender? – diris ŝi per alteta voĉo.

– Do kiam? – demandis Vorobjaninov senpacience. – Kiam kaj kie ni renkontiĝos?

– Sed mi ne scias. Kiam vi volas.

– Ĉu eblas hodiaŭ?

– Ĉu hodiaŭ?

– Mi petegas vin.

– Nu bone. Estu hodiaŭ. Venu al ni.

– Ne, renkontiĝu ni ĉe aero. Nun estas tiel bonaj veteroj. Ĉu vi konasla versaĵon: «Tio majo-flirtul’, tio majo-sorĉist’ blovas per la freŝig-ventumilo».

– Ĉu tio estas versaĵo de Ĵarov?

– M-m... Ŝajne. Do hodiaŭ? Sed kie?

– Kiel stranga vi estas! Ja kie vi volas. Ĉu ĉe la gar-doŝranko? Ĉu vi konas? Kiam mallumiĝos...

Apenaŭ Ipolit Matveeviĉ sukcesis kisi manon de Liza, kion li faris tre solene, tri-parte, revenis Ostap. Ostap estis tre aferema.

– Pardonu, fraŭlino, – diris li rapide, sed mi kaj mia amiko ne povos akompani vin. Aperis ne granda sed tre grava afereto. Ni devas urĝe iri en unu lokon.

Ĉe Ipolit Matveeviĉ kaptiĝis la spirado.

– Ĝis revido, Elizaveta Petrovna, – diris li haste, – pardonu, pardonu, pardonu, sed ni terure rapidas.

Kaj la partneroj forkuris, lasinte mirigitan Liza en la ĉambro, abunde lokigita per mebloj de Hambs.

– Se ne mi, – diris Ostap, kiam ili malleviĝis per la ŝtuparo, – nenio sukcesus. Preĝu je mi! Preĝu, preĝu, ne timu, la kapo ne defalos! Aŭskultu! Via meblaro ne havas muzean signifon. Ĝia loko estas ne en muzeo, sed en barako de puna bataliono. Ĉu vi kontentiĝas pri tiu ĉi situacio?

– Tio estas mokado! – kriis Vorobjaninov, ŝajne komencanta liberiĝi el sub premo de titana intelekto de la turk-civitana filo.

– Silento, – malvarme diris Ostap, – vi ne scias kio okazas. Se ni tuj ne kaptos nian meblon – fino. Neniam ni vidos ĝin. Ĵus mi havis malfacilan konversacion kun administranto de tiu ĉi historia rubaĵejo.

– Kaj kio? – kriis Ipolit Matveeviĉ. Kion diris al vi la administranto?

– Li diris ĉion kio bezonatas. Ne maltrankviliĝu. «Diru», – demandis mi lin, – «per kio klariĝas foresto de la mebloj kiuj, laŭmandate, estis senditaj al vi el Stargorod?». – Certe mi demandis tion ĝentile, kamarade. «Kiu mebloj estas tio?» – demandas li. – «Ĉe mi en la muzeo tiuj ĉi faktoj ne estis rimarkataj». Mi tuj alŝovis al li la mandatojn. Li engrimpis la librojn.

Serĉis li duonhore, kaj fine revenis. Kion vi imagas? Kie estas la mebloj?

– Ĉu venditaj? – elpepis Vorobjaninov.

– Imagu al vi ke ne. Imagu al vi ke ili saviĝis en tiu ĉi konfuzejo. Kiel mi jam diris al vi, ili ne havas muzean valoron. Oni ĵetis ilin en tenejon, kaj nur hieraŭ, rimarku, hieraŭ, post sep jaroj (ili kuŝis en la tenejo dum sep jaroj!), ili estis senditaj en aŭkciojn por vendado. Aŭkcio de Ĉefscienco. Kaj, se oni ne aĉetis ilin hieraŭ aŭ hodiaŭ matene, ili estas niaj! Ĉu vi estas kontentigita?

– Rapide! – kriis Ipolit Matveeviĉ.

– Fiakristo! – kriaĉis Ostap.

Ili ensidis ne marĉandante.

– Preĝu je mi, preĝu! Ne timu, marŝalo! Vino, inoj kaj kartoĵoj estas garantiitaj al ni. Tiam ni kvitiĝos ankaŭ pri la blua veŝto.

En arkadejon sur Petrovka, kie troviĝas la aŭkcia halo, la koncesiuloj enkuris viglaj, kiel virĉevaloj.

En unua jam ĉambro de la aŭkcio ili ekvidis tion kion tiel longe serĉis. Ĉiuj dek seĝoj de Ipolit Matveeviĉ staris apud la muro sur siaj kurbaj piedetoj. Eĉ tegaĵo ilia ne malheliĝis, ne senkoloriĝis, ne difektiĝis. La seĝoj estis

freŝaj kaj puraj, kvazaŭ ili ĵus eliris el sub prizorgo de ordema Klavdija Ivanovna.

– Ĉu ili? – demandis Ostap.

– Dio mia, Dio mia, – ripetis Ipolit Matveeviĉ, – ili, ili. Ĝuste ili. Ĉi foje – neniu duboj.

– Por iu ajn okazo ni kontrolu, – diris Ostap, penante esti trankvila.

Li venis al la vendisto.

– Diru, tiuj ĉi seĝoj, ŝajne, estas el mebla muzeo, ĉu?

– Ĉu tiuj? Tiuj – jes.

– Ĉu ili aĉeteblas?

– Aĉeteblas.

– Kio estas la prezo?

– La prezo ankoraŭ forestas. Ili vendiĝos per aŭkcio.

– Bone. Ĉu hodiaŭ?

– Ne. Hodiaŭ la vendado jam finiĝis. Morgaŭ de la kvina.

– Eble ili povas esti vendataj nun?

– Ne. Morgaŭ de la kvina.

Sed ne eblis deiri de la seĝoj tuj, tiel simple.

– Permesu, – murmuris Ipolit Matveeviĉ, – pririgardi. Ĉu?

La koncesiuloj longe pririgardis la seĝojn, sidis sur ili, rigardis, por ŝajnigi, ankaŭ aliajn aĵojn. Vorobjaninov nazo-siblis, kaj ĉiam puŝetis na Ostap per la kubuto.

– Preĝu je mi! – flustris Ostap. – Preĝu, gvidanto.

Ipolit Matveeviĉ estis preta ne nur preĝi je Ostap, sed eĉ kisi plandojn de liaj frambokoloraj botetoj.

– Morgaŭ, – diris li, – morgaŭ, morgaŭ, morgaŭ.

Li volis kanti...

Ĉapitro 19

Eŭrop-stila balotado

Dum la amikoj vivis kultur-edife, vizitis muzeojn kaj interesiĝis pri junulinoj, en Stargorod, sur strato Pleĥanov, duobla vidvino Gricacujeva, ino dika kaj malforta, konsiliĝis kaj konspiradis kun siaj najbarinoj. Ĉiuj kune pririgardis la skribaĵeton, lasitan per Bender, kaj eĉ spektis ĝin kontraŭ lumo. Sed akvomarkoj sur ĝi forestis kaj, se ili eĉ estus, ankaŭ tiam misteraj skribaĉoj de brilega Ostap ne estus pli klaraj.

Pasis tri tagoj. Horizonto restis pura. Revenis nek Bender, nek la tea kribrileto, nek la disblovita braceleto, nek la seĝo. Ĉio tio, viva kaj ne viva, malaperis per maniero plej mirinda.

Tiam la vidvino entreprenis radikalajn paŝojn. Ŝi venis en kontoron de “Stargoroda vero”, kaj tie oni rapide verkaĉis por ŝi anoncon:

MI PETEGAS

Personojn, konantajn lokiĝon.

Foriris el la domo kamarado Bender, ĉirkaŭ 25-30. Vestita en verdan kostumon, flavajn duonbotojn, kaj bluan veŝton. Nigraharulo.

Mi pet. sciantojn, kontr. deca rekompenc. informi.

Str. Pleĥanov 15, al Gricacujeva.

– Ĉu tio estas via filo? – oni kompate demandis ŝin en la kontoro.

– Edzo li estas al mi! – respondis la suferantino, kaŝante la vizaĝon per la tuko.

– Ho, edzo!

– Laŭleĝa. Sed kio?

– Nenio ja. Pli bone estus se vi turnu vin en policon.

La vidvino ektimis. Polico timigis ŝin. Ŝi foriris akompanata per strangaj rigardoj.

Trifoje sonis la alvoko de paĝoj de “Stargoroda vero”. Sed la grandega lando silentis. Homoj, konantaj lokiĝon de nigraharulo en flavaj duonbotoj, forestis. Neniu venis preni la decan rekompencan.

Vizaĝo de la vidvino nebuliĝis ĉiutage pli kaj pli. Stranga afero: la edzo preterbriletis kiel raketo, forportante kun si en nigran ĉielon la bonan seĝon kaj la familian kribrileton, sed la vidvino daŭre amis lin. Kiu kapablas kompreni koron de ino, precipe de ino vidva?

En Stargorod oni jam kutimiĝis al tramo, kaj eniris ĝin sentime. Konduktoroj kriis per freŝaj voĉoj «Lokoj for-estas!», kaj ĉio iris kvazaŭ la tramo funkciis ĉi tie eĉ de tempo de duko Vladimir la Ruĝa Suneto. Invalidoj de ĉiuj kategorioj, inoj kun infanoj, kaj Viktor Miĥajloviĉ Polesov, eniris la vagonojn de antaŭa pordo. Responde al krio «Ricevu la biletojn!» Polesov grave diris: «Tutjara», kaj restis ĉe la kondukisto. Tutjaran bileton li ne havis kaj ne povis havi.

Estado de Vorobjaninov kaj de la granda kombinanto lasis en la urbo profundan spuron.

La konspirantoj severe gardis la konfiditan al ili sekreton. Silentis eĉ Viktor Miĥajloviĉ, kiu ege volus eligi la ekscitantajn lin sekretojn al iu ajn renkontulo. Tamen, memorante titanajn ŝultrojn de Ostap, Polesov retenis sin. Konsolis lin nur konversacioj kun la divenistino.

– Kiel vi opinias, Elena Stanislavovna, – diris li, – per kio oni povas klarigi foreston de niaj gvidantoj?

Ankaŭ Elena Stanislavovna vigle interesiĝis pri tio, sed ŝi havis neniujn informojn.

– Kaj ĉu ne opinias vi, Elena Stanislavovna, – daŭrigis la senpacienca seruristo, – ke ili plenumas nun iun specifan taskon?

La divenistino estis konvinkita ke estas ĝuste tiel. Saman opinion havis, ŝajne, ankaŭ la papago en la ruĝa pantalone. Ĝi rigardis na Polesov per sia ronda intelekta okulo kvazaŭ dirante: «Donu al mi sunflorajn semojn, kaj mi tuj rakontos al vi ĉion. Vi, Viktor, estos guberniestro. Al vi estos subigitaj ĉiuj seruristoj. Sed kortisto de domo numero kvin restos sama kortisto, do troopinianta pri si vulgarulo».

– Ĉu ne opinias vi, Elena Stanislavovna, ke ni devas daŭrigi la laboron? Tiel aŭ aliel, sed ni ne rajtas sidi farante nenion, ĉu?

La divenistino konsentis kaj rimarkis:

– Sed Ipolit Matveeviĉ estas heroo!

– Heroo, Elena Stanislavovna! Certe. Kaj tiu batala oficiro kiu estis kun li? Agema homo li estas! Kiel vi volas, Elena Stanislavovna, sed la afero ne povas esti prokrastata. Decide ne povas.

Kaj Polesov komencis agi. Li faris regulajn vizitojn al ĉiuj anoj de sekreta komunumo “Glavo kaj plugilo”, precipe turmentante singardan mastron de “Odesa ringopana metikolektivo ‘Moskvaj sekringetoj’”, civitanon Kislarskij. Ĉe vido de Polesov Kislarskij nigriĝis. Kaj vortoj pri bezono agi venigis la timeman sekringiston ĝis deliro.

Fine de la semajno ĉiuj kolektiĝis ĉe Elena Stanislavovna en ĉambro kun la papago. Polesov bolis.

– Vi, Viktor, ne murmuradu, – diris al li meditema Djadjev, – kial vi tutajn tagojn tra la urbo kuradas?

– Oni devas agi! – kriis Polesov.

– Jes, oni devas agi, sed oni tute ne devas kii. Mi, gesinjoroj, tiel imagas al mi ĉion ĉi. Se Ipolit Matveeviĉ diris, tio estas sankta afero. Kaj oni povas opinii ke tute nelonge restis al ni atendi. Kiel ĉio tio okazos, ni eĉ ne devas scii: por tio estas militaj homoj. Sed ni estas parto civila, reprezentantoj de la urba intelektularo kaj komercistaro. Kio gravas por ni? Esti pretaj. Ĉu estas ĉe ni io ajn? Ĉu estas ĉe ni centro? Ne estas. Kiu estros la urbon? Neniu. Sed tio, gesinjoroj, estas plej grava. Ŝajnas, gesinjoroj, ke angloj ne ceremonios plu kun bolŝevistoj. Tio estas unua signo al ni. Ĉio ŝanĝiĝos, gesinjoroj, kaj ege rapide. Mi certigas vin.

– Nu, pri tio ni ne dubas, – diris Ĉaruŝnikov, disbloviĝante.

– Do estas bonege ke vi ne dubas. Kio estas via opinio, sinjoro Kislarskij? Kaj via, junaj homoj?

Nikeŝa kaj Vladja per tuta sia aspekto montris certecon pri rapida ŝanĝo. Kaj Kislarskij, kompreninta el vortoj de estro de venda firmao “Rapid-pakado” ke li mem ne devos partopreni en armitaj kunpuŝiĝoj, ĝoje ekjesis.

– Do kion ni faru nun? – maltrankvile demandis Viktor Miĥajloviĉ.

– Atendu, – diris Djadjev, – prenu vi ekzemplon de kunulo de sinjoro Vorobjaninov. Kia lerteco! Kia singardo! Ĉu vi rimarkis kiel rapide li transigis la aferon al helpo por senhejmaj infanoj? Same devas agi ankaŭ ni. Ni nur helpas al infanoj. Do, gesinjoroj, proponu ni kandidatojn!

– Na Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov ni proponas en gvidanton de la nobelaro! – kriis junaj homoj Nikeŝa kaj Vladja.

Ĉaruŝnikov indulge ektusetis.

– Kien ja! Li estos ne malpli ol ministro. Aŭ eĉ pli alte: diktatoro!

– Ja pri kio vi, gesinjoroj, – diris Djadjev, – nobelargvidanto, tio estas afero ne tro grava! Ni devas pripensi ne la gvidanton sed guberniestron. Komencu ni de guberniestro. Mi opinias...

– Sinjoron Djadjev! – rave kriis Polesov. – Kiu alia prenu sur sin regadon de la tuta gubernio?

– Mi estas tre tuŝita per la konfido... – komencis Djadjev.

Sed tiam elpaŝis subite ruĝiĝinta Ĉaruŝnikov.

– Tiun ĉi problemon, – gesinjoroj, – diris li per premiĝa voĉo, – oni devas preparoli.

Sur Djadjev li penis ne rigardi.

Mastro de “Rapid-pakado” fiere pririgardis siajn botojn, al kiuj gluiĝis lignaj rabotaĵoj.

– Mi ne kontraŭas, – diris li, – balotu ni. – Ĉu per publika aŭ sekreta baloto?

– Ni ne devas agi sovetie, – ofende diris Ĉaruŝnikov, – balotu ni honeste, eŭrope, sekrete.

Oni balotis per paperetoj. Por Djadjev estis kvar skribaĵetoj. Por Ĉaruŝnikov – du. Iu sindetenis. Laŭ vizaĝo de Kislarskij videblis ke tio estas li. Li ne volis difektigi rilatojn kun estonta guberniestro, ne gravas kiu li estos.

Kiam tremanta Polesov deklaris rezultojn de la honesta eŭropa balotado, en la ĉambro ekregis prema silento. Oni penis ne rigardi na Ĉaruŝnikov. Nesukcesa kandidato en guberniestro sidis kvazaŭ prikraĉita.

Elena Stanislavovna tre bedaŭris lin. Tio estis ŝi kiu balotis por li.

Alia voĉo apartenis al sperta en balotaj aferoj Ĉaruŝnikov, kiu balotis por si. Bonkora Elena Stanislavovna tuj diris:

– Kaj por urbestro mi, malgraŭ ĉio, proponas elekti sinjoron Ĉaruŝnikov.

– Kial malgraŭ ĉio? – diris la grandanima guberniestro. – Ne malgraŭ ĉio, sed ĝuste lin kaj neniun alian. Komunuma agado de sinjoro Ĉaruŝnikov estas bone konata al ni.

– Ni petas, petas! – kriis ĉiuj.

– Do ni opiniu la elekton konfirmita, ĉu?

Pikraĉita Ĉaruŝnikov reviviĝis, kaj eĉ ekkontraŭis:

– Ne, ne, gesinjoroj, mi petas baloti. Estas eĉ pli grave baloti pri urbestro ol pri guberniestro. Se vi, gesinjoroj, volas konfidi min, tiam, mi tre petas vin, bonvolu baloti!

En malplenan sukerujon eksŭtiĝis paperetoj.

– Ses voĉoj pro, – diris Polesov, – kaj unu detenis sin.

– Mi gratulas vin, sinjoro urbestro! – diris Kislarŝkij, laŭ vizaĝo de kiu videblis ke ankaŭ ĉi-foje detenis li. – Mi gratulas vin!

Ĉaruŝnikov disfloris.

– Restis refreŝiĝi, via ekscelenco, – diris li al Djadjev. – Flugu vi, Polesov en “Oktobro”. Ĉu vi havas monon?

Polesov faris per la mano enigman geston kaj forkuris. La balotojn oni portempe prokrastis, kaj daŭrigis ilin dum la vespermanĝo.

Estiel prizorganton de la lerneja distrikto oni ekplanis iaman direktoron de nobela gimnazio, nunan librobrokantiston Raspopov. Oni tre laŭdis lin. Nur Vladja, eldrinkinta tri glasetojn da vodko, subite ekkontraŭis:

– Oni ne povas elekti lin. Dum elira ekzameno li donis al mi malbonan poenton pri logiko.

Oni atakis na Vladja.

– En tiel decida horo, – oni kriis al li, – ne decas pensi pri sia bono! Pensu pri la patrolando!

Oni tiel rapide agitis na Vladja, ke eĉ li mem voĉdonis pro sia turmentinto.

Raspopov estis elektita per ĉiuj voĉoj ĉe unu detenita.

Al Kislarskij oni proponis postenon de prezidanto de la borsa komitato. Li ne kontraŭis, sed dum la balotado por iu ajn okazo detenis sin.

Serĉante inter la konatuloj kaj parencoj oni elektis: estron de polico, administranton pri titoloj kaj mezuroj, akcizan doganan kaj fabrikan inspektistojn; estis plenigitaj vakaj postenoj de regiona prokuroro, de prezidanto kaj anoj de la juĝejo; estis pripensitaj prezidantoj de zemstvo kaj de negociista estraro, kaj de infanprizorga konsilantaro; kaj, fine, de prezidanto de konsilio de etburĝoj. Elena Stanislavovna estis elektita al posteno de prizorgantino de societoj “Guto da lakto” kaj “Blanka floro”. Nikeŝa kaj Vladja estis postenigitaj, pro sia juneco, oficistoj pri specifaj taskoj ĉe guberniestro.

– Perme-esu! – kriis subite Ĉaruŝnikov. Al guberniestro eĉ du oficistoj! Sed al mi?

– Al urbestro, – mole diris la guberniestro, – oficisto pri specifaj taskoj ne estas antaŭvidita laŭ etato.

– Do sekretarion.

Djadjev konsentis. Vigliĝis ankaŭ Elena Stanislavovna.

– Se eblas, – diris ŝi timide, – konas mi unu junan homon, li estas tre simpatia kaj edukita knabo. Filo de *madam Ĉerkesova*... Tre, tre simpatia, tre kapabla... Nun li

estas senlaborulo. Li estas registrita en dunga oficejo. Eĉ karton li havas tie. Oni promesis post kelkaj tagoj sindikat-anigi lin... Ĉu povus vi preni lin al si? La patrino estos tre dankema.

– Kial ne, diris favore Ĉarušnikov, – kion vi opinias pri tio, sinjoroj? Bone. Entute mi opinias ke tio eblas.

– Do, – rimarkis Džadjev, – ŝajnas ke, ĝenerale... ĉiuj? Ŝajnas ke ĉiuj, ĉu?

– Kaj mi? – aŭdiĝis subite alta, ekscitita voĉo.

Ĉiuj returnis. En la angulo, apud la papago, staris plene afliktita Polesov. Sur liaj nigraj okulharoj bolis larmoj. Ĉiuj eksentis honton. La gastoj subite rememoris ke ili drinkas vodkon de Polesov, kaj ke entute li estas unu el ĉefaj organizantoj de stargoroda filio de “Glavo kaj plugilo”.

Elena Stanislavovna kaptis la tempiojn kaj time elkrietis.

– Viktor Miĥajloviĉ! – ĝemis ĉiuj. – Kara nia! Simpatia! Ĉu ne estas honte al vi? Kial vi staras en la angulo? Iru ĉi tien, tuj!

Polesov proksimiĝis. Li suferis. Li ne atendis de kamaradoj je “Glavo kaj plugilo” tian senkompaton.

Elena Stanislavovna ne eltenis.

– Sinjoroj, – diris ŝi, – tio estas terure! Kiel vi povis forgesi na Viktor Miĥajloviĉ, karan al ni ĉiuj?

Ŝi leviĝis kaj kisis seruriston-aristokraton je la fulgetitan frunton.

– Gesinjoroj, ĉu vere Viktor Miĥajloviĉ ne povas esti digna prizorganto de la lerneja distrikto aŭ poliestro?

– Ĉu, Viktor Miĥajloviĉ? – demandis la guberniestro. – Ĉu vi volas esti prizorganto?

– Certe ja, li estos perfekta, humana prizorganto! – subtenis lin la urbestro, glutante peklitan fungeton kaj grimacante.

– Sed Raspo-opov? – ofende eltiris Viktor Miĥajloviĉ.

– Vi ja postenigis na Raspopov, ĉu?

– Jes, vere, kien ni ŝovu na Raspopov?

– Ĉu en ĉefestingisto?...

– Ĉefestingisto? – ekscitiĝis subite Viktor Miĥajloviĉ.

Antaŭ li momente aperis fajrobrigadistaj ĉaroj, sonoj de trumpetoj kaj tamburfrapetado. Ekbrilis hakiloj, ekbalanciĝis torĉoj, la tero disiĝis, kaj nigraj drakoj ekportis lin al incendio de la urba teatro.

– Ĉefestingisto? Mi volas estis ĉefestingisto!

– Jen kiel bonege! Mi gratulas vin. De nun vi estas ĉefestingisto.

– Je disfloro de la fajrobrigadista taĉmento! – ironie diris prezidanto de la borsa komitato.

Ĉiuj ĵetiĝis sur Kislarskij:

– Ĉiam vi estis maldekstrulo! Konas ni vin!

– Gesinjoroj, sed mi ne estas maldekstrulo!

– Konas ni, konas!...

– Maldekstrulo!

– Ĉiuj judoj estas maldekstruloj!

– Sed je Dio, gesinjoroj, mi ne komprenas tiujn ĉi ŝercojn.

– Maldekstrulo, maldekstrulo, ne kaŝu vi tion!

– Nokte li dormas kaj sonĝas pri Milukov!

– **Kadeto**³⁰! Kadeto!

– Kadetoj Finnlandon vendis, – elmuĝis subite Ĉaruŝnikov, – ili de japanoj monon prenis! Armenojn bredadis.

30. **kadetoj** (ĝisrevolucie): konstituciaj demokratoj.

Kislarskij ne eltenis torenton de la senbazaj akuzoj. Pala, brilanta per la okuletoj, la prezidanto de la borsa komitato kaptiĝis je dorso de sia seĝo, kaj per sonora voĉo diris:

– Mi ĉiam estis oktobristo, kaj restos tia.

Oni komencis klarigi kiu kiun partion simpatias.

– Demokratio sinjoroj, estas antaŭ ĉio, – diris Ĉaruŝnikov, – nia urbeŝtraro devas esti demokratia. Sed sen kadetaĉoj. Ili ja sufiĉe aĉadis en jaro mil naŭcent dek sep!

– Mi esperas, – venene ekinteresiĝis la guberniestro, – ke inter ni forestas tiel nomataj social-demokratoj?

Pli maldekstre ol oktobristoj, kiujn en la kunsido reprezentis Kislarskij, estis neniu. Ĉaruŝnikov deklaris sin “centro”. Sur ekstreme dekstra flanko troviĝis la ĉefestingisto. Li estis ĝis tiom dekstra, ke eĉ ne sciis al kiu partio li apartenas.

Oni ekparolis pri milito.

– Se ne hodiaŭ, do morgaŭ, – diris Djadjev.

– Estos milito, estos.

– Mi rekomendas proviziĝi per io ajn, antaŭ ol estos malfrue.

– Ĉu vi opinias? – maltrankviliĝis Kislarskij.

– Sed kion vi pensas? Ĉu vi opinias ke dum milito oni povos akiri ion? Tuj faruno de bazaro – for! Arĝentaj moneretoj malaperos kiel en teron, paperetoj aperos diversaj, poŝtaj markoj, kaj ĉiuj similaj aĵoj kiuj estos egaligitaj al bankbiletoj,.

– Milito – tio estas afero decidita.

– Vi agu kiel vi volas, – diris Djadjev, – sed mi ĉiun liberan monon ĵetas por aĉeto de plej gravaj bezonaĵoj.

– Kaj kio pri viaj teksaĵ-aferoj?

– Teksaĵo – siavice, sed faruno kaj sukero – per sia. Samon mi rekomendas ankaŭ al vi. Insiste rekomendas.

Polesov ekridetis.

– Sed kiel bolŝevistoj militos? Per kio ili militos? Ĉu per malnovaj fusiloj? Sed kio pri aviado? Unu grava komunisto diris al mi ke ĉe ili, sed kion vi opinias, kiom da aviadiloj ili havas?

– Ĉirkaŭ ducent!

– Ĉu ducent? Ne ducent, sed tridek du! Sed Francio havas okdek-milon da militaj aviadiloj.

– Je-es... Venigis komunistoj ĝis la ekstremo.

Disiris ili jam post la meznokto.

La guberniestro iris akompani la urbestron. Ili ambaŭ iris troige rekte.

– Guberniestro! – diris Ĉaruŝnikov. – Kia ja guberniestro vi estas, se vi ne estas generalo?

– Mi estos civila generalo, ĉu vi envias? Kiam mi volos, enŝovos mi vin en malliberejon. Sidados vi ĉe mi.

– Oni ne povas aresti min. Mi estas balotita, konfidita.

– Kontraŭ unu balotita oni du nebalotitajn donas.

– Mi petas ne priŝerci min! – ekkriis subite Ĉaruŝnikov plengorĝe.

– Ja kial vi, stultulo, kriaĉas? – demandis la guberniestro. – Ĉu vi volas en policejo noktumi?

– Al mi estas malpermesate noktumi en policejo, – respondis la urbestro: mi estas sovetia oficisto...

Brilegis stelo. La nokto estis sorĉa. Sur Dua Sovetia daŭriĝis disputo de la guberniestro kun la urbestro.

Ĉapitro 20

De Sevilo ĝis Granado

Pardonu, sed kie estas patro Fjodor? Kie estas tiu ĉi tondita pastro de preĝejo je nomo de Frol kaj Lavr? Li, ŝajne, intencis iri al Vinogradnaja-strato, domo numero 34 al civitano Bruns? Kie ja estas tiu ĉi trezor-serĉanto, aspektanta anĝele, sed ega malamiko de Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov, kiu deĵoras nun en malluma koridoro ĉe la gardoŝranko?

Malaperis patro Fjodor. Ekturnadis lin lia sorto. Oni vidis lin, onidire, en stacio Popasnaja, Donecka fervojo. Kuris li sur la kajo kun tekaldrono por preni bolantan akvon.

Ekdeziregis patro Fjodor. Riĉaĵojn ekvolis li akiri. Ekportis lin tra la Rusio por mebla kompleto de general-vidvino Popova, en kiu, oni devas konfesi, estas tute nenio.

Veturas patro Fjodor tra Rusio. Nur leterojn al sia edzino li skribas.

LETERO DE PATRO FJODOR,
verkita per li en Ĥarkov, en stacidomo, al la edzino
en distriktan urbon No.

<http://bender.samaratoday.ru/showNews.php?idnews=192>

(Tio estas bronza monumento al patro Fjodor en stacidomo de urbo Ĥarkov. En unu mano la patro tenas tiun ĉi leteron, kaj en la dua – tekaldronon, kiu estis nepra parto de vojaĝ-ekipo).

Karulino vi mia, Katerina Aleksandrovna!

Sufiĉe kulpas mi antaŭ vi. Lasis mi vin, bedaŭrindan, solan en tiu ĉi tempo.

Mi devas ĉion rakonti al vi. Vi komprenos min kaj, espereble, konsentos.

Certe mi ekiris en neniujn novigistojn, kaj Dio gardu min de tio.

Kaj nun legu atente. Post nelonge ni vivos alie. Ĉu vi memoras, diris mi al vi pri kandela fabriketo. Estos ĝi ĉe ni, kaj, povas esti, ne nur tio. Do ne devos vi mem kuiri tag-manĝojn kaj eĉ pag-manĝulojn priservi. Na Samara ni veturos, kaj servistaron dungos.

Estas ĉi tie unu afero, sed tenu vi ĝin en granda sekreto. Al neniu rakontu, eĉ ne al Marja Ivanovna. Mi serĉas trezoron. Ĉu vi memoras mortintan Klavdija Ivanovna Petuĥova, bopatrino de Vorobjaninov? Antaŭ sia morto ŝi malkaŝis al mi ke en ŝia iama domo, en Stargorod, en unu el la gastsalonoj seĝoj (ili estas dek-du-opaj) kaŝiĝas ŝiaj brilantoj.

Vi, Katja, ne opiniu ke mi estas iu ŝtelisto. Tiujn ĉi brilantojn ŝi testamentis al mi, kaj petegis gardi ilin de Ipolit Matveeviĉ, ŝia delonga turmentanto.

Jen kial mi vin, bedaŭrindan, lasis tiel neatendite.

Do ne kulpigu vi min.

Venis mi na Stargorod kaj, imagu, tiu ĉi maljuna virinŝatanto ankaŭ troviĝis tie. Eksciis li iel. Verŝajne turmentis li la maljunulinon antaŭ ŝia morto. Terura homo! Veturas kun li iu krimulo, – dungis li banditon al si. Sur min ili ĵetiĝis, volis elvivigi min. Sed mi ne estas tia, ne donis mi min al ili.

Komence mi trafis malĝustan vojon. Nur unu seĝon trovis mi en domo de Vorobjaninov (tie nun estas bonfara organizaĵo); portas mi mian meblaĵon al mi, en ĉambrojn de “Sorbona”, kaj subite el post angulo sur min kun blekado homo iras, kiel leono ĵetiĝis li, kaj kaptiĝis je la seĝo. Preskaŭ ĝis interbatiĝo venis la afero. Malhonorigi volis li min. Poste mi pririgardis, sed tio estas Vorobjaninov. Raziĝis li, kaj la kapon nudigis, fiaferulo, malhonorigas li maljunaĝe.

Disrompis ni la seĝon: nenio estis tie. Nur poste mi komprenis ke sur malĝustan vojon mi trafis. Sed tiam mi tre ĉagrenis.

Ekestis ofende al mi, kaj mi al tiu ĉi malĉastulo tutan veron en vizaĝon lian prezentis.

«Kia malgloro», – diris mi, – «kia malhonoro maljunage», – diris mi, – «sovaĝeco okazas nun en Rusio: gvidanto de nobelaro sur di-servanton kiel leono ĵetiĝas, kaj pro senpartieco lin riproĉas! Vi», – diras mi, – «estas malnobla homo, turmentanto de Klavdija Ivanovna, kaj ĉasisto pri malpropra havaĵo, kiu estas nun ŝtata, sed ne via».

Ekhontis kaj foriris li de mi, en bordelon verŝajne.

Sed mi ekiris en mian ĉambron en “Sorbona”, kaj komencis primediti daŭrigan planon. Kaj komprenis mi tion kion neniam venus en kapon de tiu ĉi stultulo razita: mi decidis trovi homon kiu distribuis la rekviziciitajn meblojn. Jes, Katja, ne vane mi en jura fako lernadis: ekutilis tio al mi. Trovis mi tiun ĉi homon. Sekvonttage jam trovis mi lin. Varfolomeiĉ: tre honesta maljunuleto. Vivas li kun sia maljunulino, per malfacila laboro panon sian akiras li. Ĉiujn dokumentojn li donis al mi. Tamen estis necese kompensi lin pri tiu ĉi servo. Do restis mi sen mono (sed pri tio poste). Okazis ke ĉiuj dek du seĝoj el domo de Vorobjaninov trafis al inĝeniero Bruns, Vinogradnaja strato, domo numero 34. Rimarku vi ke ĉiuj seĝoj trafis al sama persono, pri kio mi tute ne atendis (timis mi ke la seĝoj trafos en diversajn lokojn). Mi tre ĝojis pri tio. Kaj tiam en “Sorbono” mi denove renkontiĝis kun aĉulo Vorobjaninov. Mi severe riproĉis lin, kaj ankaŭ lian amikon, banditon, mi ne kompatis. Tre timis mi ke ekscios ili pri mia sekreto, kaj kaŝiĝis mi en la gastejo ĝis kiam ili forveturis.

Okazis ke en jaro 1923 Bruns elveturis el Stargorod en urbon Ĥarkov, kien oni sendis lin servi. De tiea kortisto informiĝis mi ke li forveturigis kun si tutan sian meblaron, kaj ke tre gardas li ĝin. Homo li, onidire, estas serioza.

Sidas mi nun en Ĥarkov, en la stacidomo, kaj skribas al vi jen pro kio. Unue mi tre amas kaj memoras vin, due, Bruns jam ne estas ĉi tie. Sed vi ne ĉagrenu, Bruns servas nun en Rostov, en “Novoros-cemento”, kiel mi eksciis. Mono ĉe mi

restis ege limigita. Forveturas mi post unu horo per trajno var-pasaĝera. Kaj vi, kara mia, bonvolu viziti la bofilon, prenu de li kvindek rublojn (li ŝuldas al mi kaj promesis fordoni), kaj sendu na Rostov: ĉefa poŝtejo, ĝis postulo, al Fjodor Ioanoviĉ Vostrikov. La poŝt-mandaton, por monŝparo, sendu ordinar. Tio koston tridek kopekojn.

Kio okazas ĉe ni en la urbo? Kio nova?

Ĉu vizitis vin Kondratjevna? Al patro Kiril diru ke post nelonge mi revenos: kvazaŭ en Voroneĵ, al mortanta onklino forveturis mi. Ŝparu la rimedojn. Ĉu daŭrigas tagmanĝi Evs-tigneev? Transdonu al li saluton de mi. Diru ke al la onklino mi forveturis.

Kia estas la vetero? Ĉi tie, en Ĥarkov, estas jam tute somere. La urbo estas brua: centro de Ukraina respubliko. Post nia provinco ŝajnas ke eksterlandon mi trafis.

Faru:1) mian someran sutanon fordonu por purigado (pli bone 3 rublojn por la purigado fordoni, ol por nova elspezi), 2) gardu la sanon, 3) kiam vi al Gulja skribos, menciuj hazarde ke mi al la onklino forveturis, en Voroneĵ.

Saluton al ĉiuj de mi. Diru ke post nelonge mi revenos.

Tenere kisas, brakumas kaj benas vin.

Via edzo Fedja.

P.S. Sed kie vagas nun Vorobjaninov?

Amo sekigas homon. Bovo muĝas pro pasio. Koko ne povas trovi lokon por si. Gvidanto de nobelaro perdas la apetiton.

Lasinte na Ostap kaj studenton Ivanopulo en taverno, Ipolit Matveeviĉ penetris la rozkoloran dometon, kaj prenis pozicion ĉe la gardoŝranko.

Li aŭdis bruon de trajnoj, forirantaj en Kastilion, kaj plaŭdon de forbordiĝantaj vaporŝipoj.

Venis nokto Alpuhara
kun aromo kaj muslin'.

La koro balanciĝis kiel pendolo. En la oreloj tiktakis.

Al la voko de l' gitaro
venu, mia karulin'.

Maltrankvilo hastis tra la koridoro. Nenio povis degeli
malvarmon de la gardoŝranko.

De Sevilto ĝis Granado
dum silent' kaj stelbrilad'...

En la skribaĵoj ĝemis gramofonoj. Aŭdiĝis abela
zumo de primusoj.

Akre tintas ŝtalaj spadoj,
lirlas son' de l' serenad'...

Unuvorte, Ipolit Matveeviĉ senlime ekamis na Liza Ka-
laĉova.

Multaj homoj iris en la koridoro preter Ipolit Matveeviĉ,
sed ili odoris per tabako, per vodko, per apoteko aŭ per
brasika supo. En obskuro de la koridoro oni povis distingi
homojn nur per iliaodoro aŭ per pezeco de la paŝoj. Liza
ne preteriris. Pri tio Ipolit Matveeviĉ estis certa. Ŝi ne fu-
mis, ne drinkis vodkon, kaj ne portis botojn kun surplan-
dumaj feraĵoj. Ŝi ne povis odori per jodo aŭ nelavita kapo.
De ŝi povis disvastiĝi nur teneregaodoro de riza kaĉeto,
aŭ de bonguste preparita fojno, per kiu sinjorino Nordman-
Severova tiel longe nutris faman pentriston Ilja Repin.

Sed jen ekaŭdiĝis facilaj necertaj paŝoj. Iu iris sur la
koridoro, stumblante ĝiajn elastajn murojn, kaj dolĉe mur-
murante.

– Ĉu tio estas vi, Elizaveta Petrovna? – demandis Ipo-
lit Matveeviĉ per zefira voĉeto.

Responde oni elbasis:

– Bonvolu diri kie ĉi tie loĝas Pfeferkornoj? En tiu ĉi mallumo distingeblas tute nenio.

Ipolit Matveeviĉ time eksilentis. Serĉanto de Pfeferkornoj embarase atendis la respondon kaj, ne ricevinte ĝin, ekrampis pluen.

Liza venis nur je la naŭa. Ili eliris sur la straton, sub karamele-verdan vesperan ĉielon.

– Kie do ni promenados? – demandis Liza.

Ipolit Matveeviĉ ekrigardis ŝian blankan lumantan vizaĝon, kaj anstataŭ rekte diri: «Ho vi, Inezilo, sub via fenestro...», li komencis longe kaj enue paroli pri tio ke jam delonge li ne estis en Moskvo, kaj ke Parizo estas multe pli bona ol nia Blankŝtona, kiu, malgraŭ ĉiuj paroladoj, restas ĝi nur sensisteme planita granda vilaĝo.

– Ne tiun Moskvon mi memoras, Elizaveta Petrovna, ne, ne tiun. Nun en ĉio sentiĝas avareco. Sed ni, en nia tempo, ni ne ŝparis monon. «Ni vivas nian vivon ne pli ol unufoje», estas la kanteto.

Ili trairis tutan Preĉistenskij-bulvardon, kaj venis al ĉeborda strato, al preĝejo de Kristo-savanto.

Post Moskvareck-ponto tiriĝis nigra-brunaj vulpaj vosto: Moskvaj elektrostacioj fumadis kiel ŝiparo. Tramoj ruliĝis sur la pontoj. Sur la rivero iris boatoj. Malĝoje rakontadis tirharmoniko.

Liza, kaptinte manon de Ipolit Matveeviĉ, rakontis al li pri ĉiuj siaj ĉagrenoj. Pri la kverelo kun la edzo, pri la malfacila vivo inter subaŭskultantaj najbaroj, isaj kemiistoj, kaj pri unuformeco de la vegetara nutrado.

Ipolit Matveeviĉ aŭskultis kaj meditis. Ene de li vekiĝis demonoj. Li antaŭvidis jam rimarkindan vespermanĝon. Li

venis al konkludo ke tiun ĉi junulinon oni devas mirigi per io.

– Iru ni en teatron, – proponis Ipolit Matveeviĉ.

– Pli bone en kinejon, – diris Liza, – kinejo estas malpli kosta.

– Ho! Tia nokto, kaj, subite, iu mono.

Tute senbridintaj demonoj sidigis la pareton, sen marĉandi, en fiakron, kaj ekveturis ilin al kinejon “Ars”. Ipolit Matveeviĉ estis brilega. Li prenis plej multekostajn biletojn. Tamen ĝis fino de la seanco ili ne eltenis. Liza kutimis sidi sur ĉipaj lokoj, proksime. Ŝi malbone vidis el multekosta tridek-kvara vico.

En poŝo de Ipolit Matveeviĉ kuŝis duono de sumo, ricevita per la koncesiuloj de la stargorodaj komplotanoj. Por Vorobjaninov, malkutimiĝinta de lukso, tio estis multe da mono. Nun, emociigita per ebleco de facila amo, li intencis blindigi na Liza per vastaj elspezoj. Por tio li opiniis sin preparita perfekte. Li kun fiero rememoris kiel facile li konkeris iam koron de belulino Elena Bour. Kutimo facile kaj pompe elspezi la monon estis parto de li. En Stargorod li estis fama pro sia edukiteco kaj scipovo konversacii kun iu ajn sinjorino. Al li ŝajnis ridinde eluzi tutan sian antaŭ-revolucian brilon por konkero de eta sovetia knabino kiu, fakte, vidis kaj konis ankoraŭ nenion.

Post nelongaj persvadoj Ipolit Matveeviĉ veturigis na Liza en modelan manĝejon “Prago”: plej bonan lokon en Moskvo, kiel diris Bender.

”Prago” trafis na Liza per abundo da speguloj, de lumo, kaj enpotaj kreskaĵoj. Tio estis pardonebla por Liza: ŝi ankoraŭ neniam vizitis grandajn modelajn restoraciojn. Sed la spegulita halo tute neatendite konsternis ankaŭ na Ipolit Matveeviĉ. Li jam ŝanĝiĝis, forgesis enrestoracian

ordon. Nun estis al li vere ĝene pro la baronaj botoj kun kvadrataj pintoj, pro la antaŭmilita pantalono, kaj pro la luna veŝto, supersŭtita per arĝentaj steloj.

Ili ambaŭ konfuziĝis kaj rigidiĝis sub rigardoj de la sufiĉe diverseca publiko.

– Iru ni tien, en la angulon, – proponis Vorobjaninov, kvankam ĉe la podio mem, kie la orkestro eligis deĵorajn melodiojn el “Bajadero”, estis liberaj tabletoj.

Sentante ke ĉiuj rigardas ŝin, Liza rapide konsentis. Ŝin konfuzo postiris Vorobjaninov, monduma leono kaj konkeranto de virinoj. Eluzita pantalono de la monduma leono sakete pendis de lia magra postaĵo. La konkeranto de virinoj iom kurbiĝis kaj, por superi la ĝenon, komencis purigi vitrojn de la nazumo.

Al la tablo venis neniu. Tion Ipolit Matveeviĉ ne atendis. Do, anstataŭ ĝentile konversacii kun sia damo, li silentis, turmentiĝis, nekuraĝe frapetis per la cindrujo la tablon, kaj senĉese detusis. Liza scivole rigardis diversflanken, la silento iĝis nenatura. Sed Ipolit Matveeviĉ scipovis diri eĉ ne unu vorton. Li forgesis kion li kutime diris en tiuj ĉi kazoj.

– Estu bonvola! – vokis li preterflugantajn laborantojn de popola nutrado.

– Unu momenton! – kriis la kelneroj ne haltante.

Fine la menuo estis alportita. Ipolit Matveeviĉ kun sento de liberiĝo enprofundiĝis ĝin.

– Tamen, – elmurmuris li, – bovidaj kotletoj du dudek kvin, fileo – du dudek kvin, vodko – kvin rublojn.

– Per kvin rubloj – granda karafo, – informis la kelnero, senpacience ĉirkaŭrigardante.

«Kio okazas pri mi»? – teruriĝis Ipolit Matveeviĉ. – «Mi iĝas ridinda».

– Jen, bonvolu, – diris li al Liza kun malfruiĝinta ĝentileco, – ĉu vi bonvolos elekti? Kion vi manĝos?

Liza sentis ĝenon. Ŝi vidis kiel fiere rigardas la kelnero ŝian kunulon, kaj komprenis ke li faras ion ne tion.

– Mi tute ne volas manĝi, – diris ŝi per tremanta voĉo. – Aŭ jen kio... Diru, kamarado, ĉu estas ĉi tie io vegetara?

La kelnero ekpaŝadis kiel virĉevalo.

– Vegetaraĵojn ni ne tenas. Eblas omleto kun ŝinko.

– Do jen kio, – diris Ipolit Matveeviĉ, decidinte, – donu al ni kolbasetojn. Vi ja manĝos kolbasetojn, Elizaveta Petrovna, ĉu?

– Mi manĝos.

– Do. Kolbasetojn. Jen tiujn ĉi, rublo dudek kvin. Kaj botelon da vodko.

– En karafeto prezentiĝos ĝi.

– Do grandan karafon.

La laboranto de popola nutrado ekrigardis sendefendan Liza per la travideblaj okuloj.

– Per kio vi postmanĝetos la vodkon? Ĉu per freŝa kaviaro? Fumajita salmo? Viandokuketoj?

En Ipolit Matveeviĉ daŭre furiozadis oficisto de la registrejo.

– Ne bezonatas, – kun malagrabla krudeco diris li. – Kiom kostas ĉe vi peklitaj kukumoj? Bone, donu al mi du.

La kelnero forkuris, kaj ĉe la tableto denove ekregis silento. Unua ekparolis Liza:

– Mi neniam estis ĉi tie. Ĉi tie estas tre agrable.

– Je-es, – eltiris Ipolit Matveeviĉ, kalkulante prezon de la mendaĵoj.

«Ne gravas», – pensis li, – «eldrinkos mi la vodkon, kaj iom liberiĝos, gajiĝos. Ĉar vere, iel malagrablas tio.»

Tamen kiam li pe-drinkis iom da vodko, kaj post-manĝis ĝin per la kukumo, li ne liberiĝis, sed eĉ pli malgajiĝis. Liza ne drinkis. La rigideco ne malaperis. Aldone al tio al la tablo venis homo kaj, karese rigardante na Liza, proponis aĉeti florojn.

Ipolit Matveeviĉ aspektigis ke li ne rimarkas la lipharan floriston, sed tiu ne foriris. Diri dum lia ĉeesto afablaĵojn estis tute neeble.

Por iom da tempo helpis la koncerta programo. Sur la podion eniris diketa viro en redingoto kaj lakitaj ŝuoj.

– Jen ni denove rendevuas ĉi tie kun vi, – diris li familiare al la publiko. – Sekvonta numero de nia programo estos tutmonda plenumantino de rusaj popolaj kantoj, bone konata en moskva regiono Marjina Rosĉa. Varvara Ivanovna Godlevskaja. Varvara Ivanovna! Bonvolu!

Ipolit Matveeviĉ drinkis la vodkon kaj silentis. Ĉar Liza ne drinkis, kaj tuttempe penis foriri hejmen, li devis hasti, por eldrinki la tutan karafon.

Kiam la kantistino, bone konatan en Marjina Rosĉa, anstataŭis sur la podio kanzonisto en velura tolstoĵako, kaj ekkantis:

Iras, vagas vi, kompata,
kvazaŭ via apendico
iam ajn ekestos sata.
Iras, ta-ra ta-ra-ra.

Ipolit Matveeviĉ estis jam sufiĉe ebria kaj, kune kun ĉiuj vizitantoj de la modela manĝejo, kiujn nur antaŭ duonhoro li opiniis kruduloj kaj avaraĉaj sovetiaj banditoj, li ekkalkantis:

Iras, ta-ra ta-ra-ra...

Li ofte saltleviĝis kaj, ne petante pardonon, foriris en necesojn. Najbaraj tabletoj jam nomis lin onklo, kaj invitis al si por kruĉo da biero. sed li ne iris. Subite li ekestis fiera kaj suspektema. Liza decide ekstaris de ĉe la tablo:

– Mi iru. Kaj vi restu. Ne akompanu min.

– Ne, kial do? Estiel nobelo mi ne povas permesi tion!

Mesje! Kontresumon!

Vu-ulgaruloj!...

La kontresumon Ipolit Matveeviĉ rigardis longe, balanciĝante sur la seĝo.

– Naŭ rublojn dudek kopekojn? – murmuris li. – Eble mi donu al vi ankaŭ ŝlosilon de la loĝejo, kie la mono kuŝas?

Finiĝis per tio ke na Ipolit Matveeviĉ oni elkondukis soben, singarde tenante lin je la brakoj. Liza ne povis forkuri, ĉar ĵetono de la vestgardejo troviĝis ĉe la monduma leono.

En unua jam strateto Ipolit Matveeviĉ apogis sin je Liza per la ŝultro, kaj komencis kaptadi ŝin per la manoj. Liza silente deŝiriĝis.

– Aŭskultu! – diris ŝi. – Aŭskultu! Aŭskultu!

– Veturu ni en hotelon! – konvinkis ŝin Vorobjaninov.

Liza perforte liberiĝis, kaj per la pugneto frapis nazon de la venkinto de inoj. Tuj forfalis la nazumo kun ora arketo kaj, trafinte sub la baronan kvadratan ŝu-pinton, kun kraketo dispeciĝis.

Tra nokta etero
blovetas zefiro...

Liza, glutante la larmojn, kuris sur Arĝenta strateto al sia hejmo.

Ĉe brua kirlado
de Gvadalkiviro.

Blindiĝinta Ipolit Matveeviĉ etpaŝe kuris en kontraŭan direkton, kriante:

– Kaptu la ŝteliston!

Poste li longe ploris kaj, ankoraŭ plorante, aĉetis ĉe maljunulino ĉiujn ŝiajn ringokukojn kune kun la korbo. Li venis en Smolenskij bazaron, malplenan kaj malluman, kaj longe iradis sur ĝi tien kaj reen, disĵetante la ringokukojn kiel semanto ĵetadas la semojn. Dum tio li nemuzike kriis:

lras, vagas vi,
kompata,
ta-ra-ra-ra.

Poste Ipolit Matveeviĉ amikiĝis kun fiakristo, malfermis al li sian animon, kaj stumble rakontis pri la brilantoj.

– Gaja sinjoro! – kriis la fiakristo.

Ipolit Matveeviĉ vere gajiĝis. Ŝajne lia gajado aspektis ne tro ordinara, ĉar matene li vekiĝis je la dek-unua matene en policejo. El ducent rubloj, per kiuj li tiel malhonore komencis nokton de la delicoj kaj ĝuoj, ĉe li restis nur dek du.

Al li ŝajnis ke li mortas. Doloris la spino kaj la hepato, kaj sur la kapon, tiel li sentis sin, oni surmetis plumban kaserolon. Sed plej terura estis tio ke li tute ne memoris kie kaj kiel li povis elspezi tiom da mono. Dum vojo al la hejmo ekestis bezonate eniri optikejon, kaj munti en kadretojn de la nazumo novajn vitrojn.

Ostap longe kaj mire pririgardis mizeran figuron de Ipolit Matveeviĉ, sed diris nenion. Li estis malvarma kaj preta al la batalo.

Ĉapitro 21

Ekzekuto

La aŭkcia vendado komenciĝis je la kvina vespere. Konatiĝo kun la vendaĵoj komenciĝis je la kvara. La amikoj venis je la tria, kaj tutan horon pririgardis maŝinkonstruan ekspozicion, kiu troviĝis apude.

– Similas al tio, – diris Ostap, – ke jam morgaŭ ni, se aperos la deziro, povos aĉeti tiun ĉi lokomotiveton. Bedaŭrindas ke la prezo ne estas indikita. Estas ja agrable havi propran vaporlokomotivon.

Ipolit Matveeviĉ suferis. Nur la seĝoj povis konsoli lin.

Li deiris de ili nur en la minuton kiam sur la katedron surgrimpis aŭkciisto en kvadrat-desegnita pantalono “cent-jariĝo”, kaj en barbo, falanta sur la tolstoĵ-jakon el densa rusa lano.

La koncesiuloj prenis lokojn en kvara vico dekstre. Ipolit Matveeviĉ komencis emociiĝi. Al li ŝajnis ke la seĝojn oni ekvendos tuj. Sed ili vendiĝis sub kvardek-tria numero, kaj komence oni vendadis ordinarajn aŭkciajn aĉaĵojn: ne-kompletajn blazonigitajn servicojn, saŭcujon, arĝentan glasingon, pejzaĝon de pentristo Petunin, vitroglobetan mansaketon, tute novan brulilon por primuso, busteton de Napoleono, tolajn mamzonojn, gobelinon “Ĉasisto, pafanta sovaĝajn anasojn”, kaj ceterajn stultaĵojn.

Restis nur toleri kaj atendi. Atendi estis tre malfacile: ĉiuj seĝoj troviĝas ĉi tie; la celo estas proksima, oni povas atingi ĝin per la mano.

«Ĝis kiom granda tumulto ekestus ĉi tie», – pensis Ostap, ĉirkaŭrigardante la aŭkcian publikon, – «se ili ekscius kiu kukumeto vendiĝos hodiaŭ en formo de tiuj ĉi seĝoj».

– Figuro prezentanta justecon! – deklaris la aŭkciisto.
– Bronzo. En plena ordo. Kvin rublojn. Kiu donos pli? Ses kaj duono, dekstre, en fino – sep. Ok rublojn, en unua vico, rekte. Dua fojo ok rublojn rekte. Tria fojo, en unua vico, rekte.

Al la civitano en unua vico tuj alhastis fraŭlino kun kvitanco por ricevi la monon.

Frapadis marteleteto de la aŭkciisto. Vendiĝis cindrujoj el palaco, kristala vitraĵo, porcelana pudrujo.

La tempo tiriĝis turmente.

– Bronza busteto de caro Aleksandro la tria. Povas servi estiel paper-premilo. Al io alia, ŝajne, ĝi ne taŭgas. Iras laŭ proponita prezo busteto de Aleksandro la tria.

En la publiko oni ekridis.

– Aĉetu, gvidanto, – sarkasmis Ostap, – vi, ŝajne, ŝatas.

Ipolit Matveeviĉ ne forigis la okulojn de la seĝoj, kaj silentis.

– Ĉu forestas la dezirantoj? Estas forigita de la vendado la bronza busteto de Aleksandro la tria. Figuro prezentanta justecon. Ŝajne ĝi estas para al tiu nur nun aĉetita. Vasilij, montru al la publiko na “Justeco”. Kvin rublojn. Kiu donos pli?

En la unua vico rekte ekaŭdiĝis nazosiblo. Ŝajne la civitano volis havi na “Justeco” komplete.

– Kvin rublojn - bronza “Justeco”!

– Ses! – klare diris la civitano.

– Ses rublojn rekte. Sep. Naŭ rublojn, fine dekstre.

– Naŭ kaj duono, – nelaŭte diris ŝatanto de “Justeco”, levante la manon.

– Kun duono, rekte. Dua fojo, kun duono, rekte. Tria fojo, kun duono.

La marteletto malleviĝis. La civitanon en la unua vico sursaltis la fraŭlino.

Li pagis, kaj tiriĝis en alian ĉambron ricevi sian bronzon.

– Dek seĝoj el palaco! – diris subite la aŭkciisto.

– Kial el palaco? – mallaŭte elahis Ipolit Matveeviĉ.

Ostap koleriĝis:

– Iru al diablo! Aŭskultu vi kaj ne elpaŝu!

– Dek seĝoj el palaco. Nuksaj. Epoko de Aleksandro la dua. En plena ordo. Far mebla metiejo de Hambs. Vasilij, metu unu seĝon sub la reflektoron.

Vasilij tiel krude ektiris la seĝon, ke Ipolit Matveevi eksaltis.

– Ja sidu vi, idioto malbenita, altrudulo! – siblis Ostap.

– Sidu, mi diras al vi!

Ĉe Ipolit Matveeviĉ moviĝis suba makzelo. Ostap streĉiĝis. Liaj okuloj klariĝis.

– Dek seĝoj nuksaj. Okdek rublojn.

La halo vigliĝis. Vendiĝis aĵoj utilaj por mastrumo. Unu post alia elsaltis manoj. Ostap estis trankvila.

– Kial vi ne marĉandas? – ĵetiĝis sur lin Vorobjaninov.

– Iru for, – respondis Ostap, kunpremante la dentojn.

– Cent dudek rublojn, malantaŭe.

Cent tridek kvin, samloke. Cent kvardek.

Ostap trankvile turniĝis per la dorso al la katedro, kaj kun rideto komencis pririgardi siajn konkurencanojn.

Estis kulmino de la aŭkcio. Liberaj lokoj jam forestis.

Virino, sidanta ĝuste post Ostap, konversaciinte kun la edzo ekdeziris la seĝojn («Belegaj preskaŭ-brakseĝoj! Mirinda laboro! Saŝa! El palaco!») kaj levis la manon.

– Cent kvardek kvin, en kvina vico dekstre. Unu.

La halo estingiĝis. Tro multekoste.

– Cent kvardek kvin. Du.

Ostap indiferece pririgardis la modlitan kornicon. Ipolit Matveeviĉ sidis, malleviste la kapon, kaj tremetis.

– Cent kvardek kvin. Tri.

Sed, antaŭ ol la nigra lakita marteleteto frapiĝis je la kruclignan katedron, Ostap turniĝis, elĵetis la manon supren kaj nelaŭte diris:

– Ducent.

Ĉiuj kapoj turniĝis en flankon de la koncesiuloj. Kaskedoj, ĉapoj kaj ĉapeloj ekmoviĝis. La aŭkciisto levis la enuantan vizaĝon, kaj ekrigardis na Ostap.

– Ducent, unu, – diris li, – ducent en kvara vico, du. Ĉu estas dezirantoj marĉandi? Ducent rublojn, kompleto nuksa palaca dek-peca.

Ducent rublojn - tri, en kvara vico dekstre.

La mano kun la martelo ekpendis super la katedro.

– Panjo! – diris Ipolit Matveeviĉ laŭte.

Ostap, rozkolora kaj trankvila, ridetis. La marteleteto falis, eligante ĉielan sonon.

– Vendite, – diris la aŭkciisto. – Fraŭlino! En kvara vico dekstre.

– Nu, prezidanto, ĉu efekte? – demandis Ostap. Kion, volus mi scii, farus vi sen la teknika gvidanto?

Ipolit Matveeviĉ feliĉe elgruntis. Al ili, trotante, proksimiĝis la fraŭlino.

– Ĉu tio vi aĉetis la seĝojn?

– Ni! – kriis longe detenanta sin Ipolit Matveeviĉ. – Ni, ni. Kiam eblas preni ilin?

– Kiam vi volas. Eĉ tuĵ!

La melodio «Iras, vagas vi, kompata» freneze eksaltadis en kapo de Ipolit Matveeviĉ. «La seĝoj estas niaj,

niaj, niaj!» Pri tio kriis tuta lia organismo.«Niaj!» – kriis la hepato. «Niaj!» – konfirmis la apendico.

Li tiel ekĝojis, ke ĉe li en tute neatenditaj lokoj aperis pulsoj. Ĉio tio vibris, balanciĝis, kaj krakis sub premo de la senprecedenca feliĉo.

Ekvideblis trajno, proksimiĝanta al San-Gotardo. Sur malferma placeto de ĝia lasta vagono staris Ipolit Matveeviĉ Vorobjaninov en blanka pantalono, kaj fumis cigaron. Edelvejsoj malrapide falis sur lian kapon, denove plibeligitan per brila alumina grizaĵo. Li ruliĝis Edenon.

– Sed kial ducent tridek, sed ne ducent? – ekaŭdis Ipolit Matveeviĉ.

Tion diris Ostap, tenante en la mano la kvitancon.

– Enkalkuliĝas dek kvin procentoj de komisia pago, – respondis la fraŭlino.

– Nu, kion fari! Prenu!

Ostap eltiris la monujon, elkalkulis ducent rublojn, kaj turniĝis al ĉefa direktoro de la entrepreno:

– Elpoŝigu tridek rublojn, kara mia, kaj rapidu: ĉu vi ne vidas ke la sinjorino atendas. Nu?

Ipolit Matveeviĉ faris eĉ ne etan penon elpreni la monon.

– Nu? Kial vi rigardas min kiel soldato pedikon? Ĉu vi stultiĝis pro la feliĉo?

– Mi ne havas monon, – elmurmuris Ipolit Matveeviĉ.

– Kiu ne havas monon? – demandis Ostap tre mallaŭte.

– Mi.

– Kaj la ducent rubloj?!

– Mi... m-m-m... p-perdis.

Ostap alrigardis na Vorobjaninov, rapide taksis ĉifecon de lia vizaĝo, verdecon de la vangoj kaj disblovitajn sakojn sub la okuloj.

– Donu monon! – elflustris li kun malamo – olda kanajlo!

– Nu, ĉu vi pagos? – demandis la fraŭlino.

– Unu momenton! – diris Ostap, ĉarme ridetante, – nura prokrasteto.

Estis ankoraŭ eta espero. Eblis admoni pri ioma atendo de la mono.

Ĉi tie rekonsciiĝinta Ipolit Matveeviĉ enrompiĝis la konversacion.

– Permesu! – kriaĉis li. – Kial komisia pago? Ni konas nenion pri tiu ĉi pago! Oni devas averti! Mi rifuzas pagi tiujn ĉi tridek rublojn.

– Bone, – milde diris la fraŭlino, – mi tuj aranĝos ĉion.

Preninte la kvitancon ŝi forimpetis al la aŭkciisto, kaj diris al li kelkajn vortojn. La aŭkciisto tuj leviĝis. Lia barbo brilis sub lumo de fortaj elektraj lampoj.

– Laŭ reguloj de aŭkcia vendado, – sonore deklaris li, – persono rifuzanta pagi plenan sumon por la aĉetaĵo endas lasi la halon. Vendo de la seĝoj nuliĝas.

La mirigitaj amikoj sidis senmove.

– Mi petas vin! – diris la aŭkciisto.

La efekto estis granda. En la publiko oni malice ridis. Malgraŭ tio Ostap ne leviĝis. Tiajn batojn li jam delonge ne ricevis.

– Mi pe-e-tas vin!

La aŭkciisto kantis per voĉo kiu ne permesis oponon.

La rido en la halo plifortiĝis.

Kaj ili foriris. Ne estis multaj kiuj foriris el la aŭkcia halo kun tiel amara sento. Unua iris Vorobjaninov. En sia

kurtiĝinta jaketo kaj stultaj baronaj botoj li iris kiel gruo, klininte la rektajn ostecajn ŝultrojn, kaj sentante post si varman amikan rigardon de la granda kombinanto.

La koncesiuloj haltis en ĉambro najbara al la aŭkcia halo. Nun ili povis spekti la halon nur tra la vitra pordo. Vojo tien estis jam barita. Ostap amike silentis.

– Indignaj reguloj, – time elmurmuris Ipolit Matveeviĉ, – vera maldecaĵo! Oni devas en policon plendi pri ili.

Ostap silentis.

– Ne, tio vere estas diablo scias kio! – daŭrigis ardiĝi Vorobjaninov. – Lastajn rimedojn ili ŝiras de laboristaro. Je Dio!.. Pro iuj eluzitaj dek seĝoj – ducent tridek rublojn. Oni povas freneziĝi...

– Jes, – ligne diris Ostap.

– Ĉu vere? – redemandis Vorobjaninov. – Oni povas freneziĝi!

– Oni povas.

Ostap proksimiĝis al Vorobjaninov kontakte kaj, ĉirkaŭrigardante, aplikis al la gvidanto kurtan, fortan, kaj nerimarkeblan por eksteruloj baton je la flankon.

– Jen polico al vi! Jen multekosteco de seĝoj por proletaro de ĉiuj landoj! Jen al vi noktaj promenoj kun knabinoj! Jen al vi, kaduka malĉastulaĉo!

Dum tiu ĉi punado Ipolit Matveevis eligis eĉ ne unu sonon.

Al eksterulo povus ŝajni ke estimanta filo konversacias kun sia patro, nur tro vigle skuas la patro sian kapon.

– Kaj nun iru for!

Ostap turniĝis per la dorso al direktoro de la entrepreno, kaj komencis rigardi en aŭkcian halon. Post minuto li retrorigardis.

Ipolit Matveeviĉ daŭre staris malantaŭe, preminte la manojn al la gamboj.

– Kio, ĉu vi ankoraŭ estas ĉi tie, ŝatato de komunumo? Iru for! Nu?

– Kamara-ado Bender, – petegis Vorobjaninov. – Kamarado Bender!

– Iru, iru! Kaj al Ivanopulo ne venu! Forpelos mi!

– Kamara-ado Bender!

Ostap ne returnis plu. En la halo okazis io tiel forte interesigita na Bender, ke li malfermetis la pordon kaj ekis aŭskulti.

– Ĉio pereis! – elmurmuris li.

– Kio pereis? – kompleze demandis Vorobjaninov.

– La seĝojn oni disvendas aparte, jen kio. Eble vi deziras aĉeti? Bonvolu. Mi vin ne tenas. Sed estas dubinde ke oni enlasos vin. Krom tio da mono ĉe vi, ŝajne, estas ne tro multe.

Dume en la aŭkcia halo okazis jen kio: la aŭkciisto, sentanta ke ne eblas elbati el la publiko ducent rublojn tuj (tro granda sumo por la malriĉularo, restinta en la halo), decidis ricevi tiujn ducent rublojn popece. La seĝoj denove ekestis vendataj, sed jam aparte.

– Kvar seĝoj el palaco. Nuksaj. Molaj. El metiejo de Hambs. Tridek rublojn. Kiu donos pli?

Al Ostap rapide revenis tuta lia decidemo kaj senpasienco.

– Hej, vi, ŝatato de damoj, staru ĉi tie kaj eliru nenien. Post kvin minutoj mi revenos. Kaj vi rigardu ĉi tie kiu kaj kio. Por ke neniuj seĝoj foriru.

En kapo de Bender tuj maturiĝis plano sole ebla en tiuj ĉi malfacilaj kondiĉoj, en kiuj ili okazis.

Li enkuris Petrovka-straton, direktiĝis al proksima asfalta kaldronego, kaj entreprenis aferuman konversacion kun tieaj senhejmuloj.

Post kvin minutoj, laŭ sia promeso, li revenis al Ipolit Matveeviĉ. La senprizorguloj staris pretaj ĉe eniro en la aŭkciejon.

– Oni vendas, vendas, – flustris Ipolit Matveeviĉ, – oni vendis jam kvaropon kaj duopon.

– Tion vi aranĝis, – diris Ostap, – ĝoju. Ĉio jam estis en niaj manoj. Ĉu vi povas kompreni tion?

El la halo aŭdiĝis knara voĉo, kiun naturo donacas nur al aŭkciistoj, krupieroj kaj vitristoj:

– Kun duonrublo, maldekstren. Tri. Ankoraŭ unu seĝo el palaco. Nuksa. Tute sendifekta. Kun duonrublo, rekten. Unu – kun duonrublo, rekten.

Tri seĝoj estis venditaj pounuope. La aŭkciisto deklaris vendadon de lasta seĝo. Kolero sufokis na Ostap. Li denove ĵetiĝis sur Vorobjaninov. Liaj ofendaj rimarkoj estis plenaj de amaro. Kiu scias ĝis kio venus Ostap en siaj satiraj ekzercoj, se ne interrompus lin rapide alveninta viro en bruna kostumo. Li svingis siajn diketajn brakojn, alsaltis kaj desaltis, kvazaŭ ludis tenison.

– Diru ja, – haste demandis li na Ostap, – ĉu vere ĉi tie estas aŭkciejo? Ĉu? Aŭkciejo? Kaj ĉu vere oni vendas ĉi tie aĵojn? Perfekte!

La nekonato desaltis, kaj lia vizaĝo lumiĝis per multaj ridetoj.

– Ĉi tie, ĉu ĉi tie oni vere vendas aĵojn? Kaj ĉu vere oni povas aĉeti malmultekoste? Tre, tre! Ho!...

La nekonato, svingante la diketajn femurojn, enkuris la halon preter la mirigitaj koncesiuloj, kaj tiel rapide aĉetis

la lastan seĝon, ke Vorobjaninov nur elgrakis. Kun kvitanco en la manoj la nekonato alkuris tablon de aĉetaĵoj.

– Diru, ĉu la seĝon eblas jam preni? Bonege!.. Ho!.. Ho!..

Senĉese ŝafblekante kaj ĉiam moviĝante, la nekonato ŝargis la seĝon en fiakron, kaj forruliĝis. Laŭ liaj spuroj kuris senhejmulo.

Iom post iom disiris kaj disveturis ĉiuj novaj posedantoj de la seĝoj. Post ili impetis neplenaĝaj agentoj de Ostap. Ankaŭ li foriris. Ipolit Matveeviĉ time postsekvis lin malantaŭe. Hodiaŭa tago ŝajnis al li sonĝo. Ĉio okazis rapide, kaj tute alie ol estis atendite.

Fortepianoj, mandolinoj kaj tirharmonikoj en Sivcev Vraĵek festis la printempon. Fenestroj estis larĝe malfermitaj. Florejoj en argilaj potetoj plenigis bretojn de fenestroj. Dika homo en ŝelkoj, kun malferma haroza brusto, staris ĉe la fenestro, kaj pasie kantis. Laŭ muro malrapide ŝteliris kato. En proviantaj kioskoj flagris kerosenaj lampoj.

Ĉe la roz-kolora dometo promenis Kola. Vidinte na Ostap li ĝentile kapklinis al li, kaj venis al Vorobjaninov. Ipolit Matveeviĉ tutkore salutis lin. Tamen Kola ne perdis la tempon.

– Bonan vesperon, – decide diris li kaj, ne povante deteni sin, batis na Ipolit Matveeviĉ je la orelo.

Samtempe Kola prononcis frazon sufiĉe banalan, laŭ opinio de Ostap kiu observis tiun ĉi scenon:

– Tio trafos ĉiujn, – diris Kola per infana voĉo, kiuj atencos...

Sed Kola ne precizigis. Li altiĝis sur la piedfingrojn kaj, ferminte la okulojn, frapis na Vorobjaninov je la vangon.

Ipolit Matveeviĉ levis la kubuton, sed kuraĝis eligi eĉ ne soneton.

– Ĝuste, – alparoladis Ostap, – kaj nun je la kolo. Dufoje. Tiel. Kion fari, iam eĉ ovoĵoj devas instrui tromemfidan kokinon... Ankoraŭ foje... Tiel. Ne ĝenu vi vin. La kapon ne batu plu. Tio estas plej malforta lia parto.

Se komplotanoj de Stargorod ekvidus la giganton de pensado kaj patron de rusa demokratio en tiu ĉi kriza por li momento, tiam, eblas opinii, la sekreta alianco de “Glavo kaj plugilo” ĉesus sian ekzistadon.

– Nu, ŝajne sufiĉas, – diris Kola, ŝovante la manon en la poŝon.

– Ankoraŭ unu foĵeton, – petegis Ostap.

– Al diablo lin! Alifoje scios li!

Kola foriris. Ostap leviĝis al Ivanopulo, kaj ekrigardis soben. Ipolit Matveeviĉ staris iom flanke de la domo, apogante sin al krudfera ambasadeja barilo.

– Civitano Miĥelson! – kriis Ostap. – Konrad Karloviĉ! Eniru la loĝejon! Mi permesas!

En la ĉambron Ipolit Matveeviĉ eniris iomete pliviviĝinta.

– Neaŭdita aroganteco! – diris li kolere. – Mi pene detenis min.

– Aj-aj-aj, – kompatis Ostap, – kian junularon ni havas nun! Teruran junularon! Persekutas ĝi malproprajn edziĵojn! Elspezas malpropran monon... Plena dekadenco. Tamen diru, ĉu tio vere doloras kiam oni batas kapon?

– Mi vokos lin al duelo!

– Mirinde! Mi povas rekomendi al vi mian bonan konaton. Li konas duelan kodekson parkere, kaj posedas du balailojn, tute taŭgajn por mort-batalo. Por sekundantoj oni povas preni na Ivanopulo kaj lian dekstran najbaron. Tio

estas iama honora civitano de urbo Kologrivo kiu ĝis nun fieras pri tiu ĉi titolo. Sed eblas ankaŭ aranĝi duelon per viandmueliloj – tio estos pli elegante. Ĉiu vundiĝo sendube estos mortiga. Trafita kontraŭulo mekanike transformiĝas en kotleton. Ĉu vi konsentas, gvidanto?

Ĉi-momente de la strato aŭdiĝis fajfo, kaj Ostap iris ricevi de la senhejmuloj la agentajn informojn.

La senprizorguloj perfekte plenumis la konfiditajn al ili taskojn. Kvar seĝoj trafis teatron “Kolumbo”. La senhejmulo detale rakontis kiel oni transportis tiujn ĉi seĝojn per ĉarumo, kiel oni elŝarĝis ilin kaj entiris en la konstruaĵon tra pordo por la aktoroj. Ostap bone konis lokiĝon de tiu ĉi teatro.

Du seĝojn, kiel diris alia juna spur-esploristo, forveturigis per fiakro «belega virinaĉo». La knabo, ŝajne, ne estis tro talenta. La interstrateton, en kiun oni alveturigis la seĝojn, – Varsonofjevskij, – li konis, memoris li eĉ ke numero de la loĝejo estas dek sep, sed numeron de la domo li neniel sukcesis rememori.

– Tro rapide mi kuris, – diris la senhejmulo, – elsaltis ĝi el la kapo.

– Do ne ricevos vi la monon, – deklaris la dunganto.

– O-onklo!.. Mi montros al vi.

– Bone! Restu. Iru ni kune.

Ŝaf-blekanta civitano, kiel evidentiĝis, loĝis sur Sadova-Spaska. Ĝustan lian adreson Ostap registris el la notlibron.

Oka seĝo trafis Domon de popoloj. Knabo, persekutanta tiun ĉi seĝon, okazis penetremulo. Superigante la barojn, en formo de la administraro kaj la multnombraj kuroj, li penetris la domon, kaj trovis ke la seĝo estas aĉetita per mastrumisto de redakcio de “Stablo”.

Du knaboj ankoraŭ forestis. Ili alkuris preskaŭ samtempe, spiregantaj kaj lacaj.

– Militist-baraka interstrateto, ĉe Puraj Lagoj.

– Numero?

– Naŭ. Ankaŭ loĝejo naŭ. Tie apude tataroj loĝas. En korto. Mi portis la seĝon por li. Piede ni iris.

La lasta sendito venigis malgajan informon. Komence ĉio iris bone, sed poste ĉio ekestis malbona. La aĉetanto eniris kun la seĝo var-korton de Oktobra stacidomo, sed trairi post li okazis tute neeble: la pordon gardis pafistoj de fervoja komisarejo.

– Verŝajne forveturis ĝi, – finis la senhejmulo sian raporton.

Tio tre maltrankviligis na Ostap. Reĝe premiinte la senhejmulojn: po rublo al sendito, sed ne la informanton de Varsonofjevskij strateto, kiu forgesis numeron de la domo (al li estis ordonite veni sekvonttage frumatene), – la teknika direktoro revenis hejmen kaj, ne respondante al pridemandoj de la malhonoriĝinta prezidanto de la administraro, komencis kombini.

– Ankoraŭ nenio estas perdita. Adresojn mi havas, kaj por akiri la seĝojn ekzistas multaj malnovaj pruvitaj rimedoj: 1) ordinara konatiĝo, 2) amorado, 3) konatiĝo kun rabo, 4) interŝanĝo, kaj 5) mono. Lasta estas plej fidinda. Sed mono malmultas.

Ostap ironie ekrigardis na Ipolit Matveeviĉ. Al la granda kombinanto revenis siaj kutimaj freŝeco de pensado kaj anima ekvilibro. Sendube la mono estas akirebla. Inter la rimedoj triviĝis: pentraĵo “Komunistoj verkas leteron al Ĉemberlen”, tea kribileto, kaj plena ebleco daŭrigi kariieron de multedzinulo.

Maltrankviligis nur la deka seĝo. Jes, spuro ekzistas, sed kia spuro! – neklara kaj nebula.

– Kio ja, – diris Ostap laŭte. – Kun tiuj ĉi ŝancoj oni povas kaptadi. Mi ludas naŭ kontraŭ unu. La kunsido daŭrigas! Ĉu vi aŭdas? Vi! Juriano!

Ĉapitro 22

Kanibalino Eloĉka

Vorttrezoro de Ŝekspiro, laŭ kalkulo de la esploristoj, konsistis el dek du mil vortoj. Vortaro de negro el kanibala tribo “Mumbo-Jumbo” konsistas el 300 vortoj.

Eloĉka Sĉukina facile kaj libere kontentiĝis pri trideko da ili.

Jen vortoj, frazoj kaj interjekcioj kiujn ŝi skrupule elektis el majesta multvorta kaj fortega rusa lingvo:

1. Vi vulgaras.

2. Ĥo-ĥo! (Esprimas, depende de la cirkonstancoj: ironion, miron, jubilon, malamon, ĝojon, malestimon kaj kontentiĝon.)

3. Famege.

4. Obskura. (Rilate al ĉio. Ekzemple: «obskura Petro venis», «obskura vetero», «obskura okazaĵo», «obskura kato», ktp.)

5. Mornaĵo.

6. Teruro. (Terura. Ekzemple, dum renkonto kun bona konatino: «terura renkonto».)

7. junuljo. (Rilate al ĉiuj konataj viroj, sendepende de ilia aĝo kaj socia stato.)

8. Ne instruu min vivi.

9. Kiel infanon. («Mi batas lin kiel infanon», – dum kart-ludo. «Mi forbatis lin kiel infanon», – ŝajne pri konversacio kun respondeca loĝej-luanto.

10. Per-r-fekte!

11. Dika kaj bela. (Estas uzata por karakterizi aĵojn kaj estaĵojn.)

12. Veturu ni per fiakro. (Estas dirata al la edzo.)

13. Veturu ni en taksio. (Al konatuloj de vira sekso.)

14. Tuta via dorso estas blanka. (Ŝerco.)

15. Imagu ja.

16. -j. (Karesa finaĵo de nomoj. Ekzemple: Miŝo – Miŝjo; Zina – Zinja.)

17. Oho! (Ironio, miro, ravo, malamo, ĝojo, malestimo kaj kontentiĝo.)

Vortoj, restintaj en ekstreme nesignifa kvanto, servis estiel ligilo inter Eloĉka kaj laborantoj de universalaj vendejoj.

Pririgardante fotografaĵojn de Eloĉka Sĉukina, surmurigitajn ĉe lito de ŝia edzo, inĝeniero Ernest Pavloviĉ Sĉukin (unu – plenvizaĝa, dua – profila), estas facile rimarki la frunton de agrabla alteco kaj konvekseco, grandajn brilajn okulojn, nazeton, plej simpatian en Moskva gubernio, kaj la mentonon kun eta, desegnita per tuĉo maku-
leto.

Staturo de Eloĉka flatis virojn. Ŝi estis malalta, do eĉ plej sensignifaj viroj aspektis apud ŝi kiel grandaj kaj potencaj viregoj.

Kio koncernas apartajn distingaĵojn, ili forestis. Eloĉka ne bezonis ilin. Ŝi estis bela.

Ducent rublojn, kiujn ĉiumonate perlaboris ŝia edzo en fabriko “Elektrolustro”, estis ofendo por Eloĉka. Ili neniel

povis helpi en tiu titana lukto kiun Eloĉka gvidis jam kvar jaroj: de tiu tempo kiam ŝi ekokupis komunuman staton de dommastrino, edzino de Sĉukin. La lukto estis gvidata kun plena streĉo da fortoj. Ĝi konsumis ĉiujn rimedojn. Ernest Pavlovoĉ prenis hejmen vesperan laboron, detenis sin de dungo de servantino, funkciigis primuson, elportis rubaĵon, kaj eĉ rostitis kotletojn.

Sed ĉio estis vana. La danĝera malamiko ĉiujare pli kaj pli ruinigis la mastrumadon. Antaŭ kvar jaroj Eloĉka rimarkis ke trans la oceano ŝi havas rivalinon. La malfeliĉo vizitis ŝin dum tiu ĝoja vespero kiam ŝi almezuris tre simpatian krepan bluzeton. En tiu ĉi vestaĵo ŝi aspektis preskaŭ diino.

– Ĥo-ĥo! – kriis ŝi, esprimante per tiu ĉi kanibala krio konsternajn komplikajn sentojn, kiuj ekposedis ŝin.

Tiujn ĉi sentojn, en simpligita formo, oni povus esprimi per jena frazo: «Viroj, vidonte min tia, ekscitiĝos. Ili ektremos. Ili iros post mi al rando de la mondo, murmurante pri la amo. Sed mi estos malvarma. Ĉu ili valoras min? Mi estas plej bela. Tia eleganta bluzeton havas neniu sur ter-globo».

Sed estis nur trideko da vortoj, tial Eloĉka elektis plej espriman el ili: «ĥo-ĥo».

Dum tiu ĉi majesta horo venis al ŝi Fima Sobak. Ŝi alportis kun si frostan spiron de la januaro, kaj francan revuon de manieroj. Sur la unua paĝo Eloĉka haltis. Brilanta fotografaĵo prezentis filinon de usona miliardulo Vanderbild en ŝia vespera robo. Tie estis peltoj kaj plumoj, silko kaj perloj, eksterordinara facileco de la tajlo, kaj freneziga hararanĝo. Tio decidigis ĉion.

– Oho! – diris Eloĉka al si mem.

Tio signifis: «Aŭ mi, aŭ ŝi».

Sekvonta mateno trovis na Eločka en frizejo. Tie ŝi perdis belegan nigran harplektaĵon, kaj alifarbis la harojn en rufan koloron. Poste ŝi sukcesis leviĝi sur ankoraŭ unu ŝtupon de la ŝtuparo kiu proksimigis na Eločka al tiu radianta paradizo, kie promenadas filinoj de miliarduloj, taŭgaj eĉ ne por lavi piedojn de dommastrino Sĉukina. Estis aĉetita, kredite, hunda felo, kiu prezentis ondatron. Ĝi estis uzita por borderi la vesperan tualeton.

Sinjoro Sĉukin, kiu jam delonge dorlotis revon aĉeti novan desegnan tablon, iom malgajiĝis.

La robo, borderita per la hundaĵo, kaŭzis unuan trafan baton al aroganta Vanderbildino. Poste la fieru usonanino ricevis, unu post alia, tri batojn. Eločka akiris, ĉe persona felisto de Fima Sobak, peltan pelerinon el ĉinĉilo (rusa leporo, mortigita en Tula gubernio), ŝi ekposedis kolomban ĉapelon el argentina felto, kaj alikudris novan jakon de la edzo en modan inan jaketon. La miliardulino iom ŝanceliĝis, sed ŝin, verŝajne, savis amplena patro Vanderbild.

Sekvonta numero de la mod-revuoj enhavis portretojn de la malbenita rivalino en kvar aspektoj: 1) en nigrobrunaj vulpopeltoj, 2) kun brilanta stelo sur la frunto, 3) en aviadista kostumo (altaj botetoj, ekstreme maldika verda jaketo, kaj gantoj, supraj partoj de kiuj estas inkrustitaj per mezgrandaj smeraldoj), kaj 4) en bala tualeteto (kaskado da juvelaĵoj kaj iom da silko).

Eločka mobilizis la rimedojn. Patro-Sĉukin prenis prunton en kaso de interhelpo. Oni donis al li ne pli ol tridekon da rubloj. Tiu ĉi nova potenca streĉo detranĉis radikojn mem de la mastrumado. Aperis bezono lukti en ĉiuj sferoj de la vivo. Antaŭnelonge estis ricevitaj fotografaĵoj de la sinjorino en ŝia nova kastelo en Florido. Do ankaŭ Eločka endis ekposedi novan meblaron. Ŝi aĉetis en aŭk-

ciejo du molajn seĝojn. (Sukcesa aĉeto! Tute ne eblis preterlasi ĝin!). Eloĉka, ne demandinte la edzon, prenis monon el la pormanĝaj sumoj. Ĝis la dek kvina restis dek tagoj kaj kvar rubloj.

Eloĉka ŝike traveturigis la seĝojn sur Varsonofjevskij strateto. La edzo ne estis hejme. Tamen, post nelonge, li aperis, pene portante la kofron-paperujon.

– La obskura edzo venis, – distingeble diris Eloĉka.

Ĉiujn vortojn ŝi prononcis distingeble, kaj ili elsaltis vingle, kiel pizoj.

– Saluton, Eloĉka... sed kio estas tio?

– Ĥo-ĥo!

– Sed vere?

– Per-r-fekte!

– Jes, la seĝoj estas bonaj.

– Fa-me-gaj!

– Ĉu iu donacis?

– Oho!

– Kio?! Ĉu vi aĉetis? Sed per kiu mono? Ĉu per la mastruma? Sed mi jam milfoje diris al vi...

– Ernestjo! Vi vulgaras!

– Sed kial vi faris tion?! Ni ja havos nenion por manĝi!

– Imagu!

– Sed tio estas indignaĵo! Vi vivas ekster la rimedoj!

– Vi ŝercas!

– Jes, jes, vi vivas ekster niaj rimedoj...

– Ne instruu min vivi!

– Jes, ni devas priparoli tion serioze. Mi enspezas ducent rublojn...

– Mornaĵo!

– Koruptaĵojn mi ne ricevas, monon ne ŝtelas, kaj falsadi ĝin mi ne scipovas...

– Terure!

Ernest Pavloviĉ eksilentis.

– Jen kio, – diris li fine, – tio estas tute ne daŭrigebla.

– Ho-ho, – diris Eloĉka, sidante la novan seĝon.

– Ni devas divorci.

– Imagu ja!

– Ni ne kongruas pri la karakteroj. Mi...

– Vi estas dika kaj bela junuljo.

– Sed kiom da fojoj mi petis vin: ne nomu min junuljo!

– Vi ŝercas!

– Sed de kie ĉe vi tiu ĉi idiota slango!

– Ne instruu min vivi!

– Ho, diablo! – kriis la inĝeniero.

– Vi vulgaras, Ernestjo.

– Mi proponas: divorcu ni pace.

– Oho!

– Vi nenion pruvos al mi! Tiu ĉi disputo...

– Mi batos vin kiel infanon.

– Ne, tio estas tute netolereble. Viaj pruvoj ne sukcesos retenigi min de la paŝo kiun mi endas fari. Mi tuj iru por voki ĉariston.

– Vi ŝercas!

– La meblojn ni dividu egalparte.

– Terure!

– Vi ricevos cent rublojn monate. Eĉ cent dudek. La ĉambro restos ĉe vi. Vivu kiel vi volas, sed mi ne scipovas tiel...

– Famege, – diris Eloĉka malestime.

– Kaj mi translokiĝos al Ivan Alekseeviĉ.

– Oho!

– Li forveturis en la somerdomon, kaj lasis al mi, por la somero, tutan sian loĝejon. La ŝlosilo estas ĉe mi... Nur meblo forestas.

– Per-r-fekte!

Post kvin minutoj Ernest Pavloviĉ revenis kun la kortisto.

– Nu, la vestoŝrankon mi ne prenos, al vi ĝi estas pli bezonata, sed tiun ĉi skribotablon, permesu al mi... Kaj, kortisto, prenu la seĝon. Jes, mi prenos unu el tiuj ĉi du seĝoj. Ŝajnas ke mi rajtas pri tio, ĉu?!

Ernest Pavloviĉ volvis siajn aĵojn en grandan tukon, la botojn li volvis per ĵurnalpaĝoj, kaj turniĝis al la pordo.

– Tuta via dorso estas blanka, – diris Eloĉka per gramofona voĉo.

– Ĝis revido, Eloĉka.

Li atendis ke almenaŭ ĉi-foje la edzino detenos sin de la kutimaj metalaj vortetoj. Ankaŭ Eloĉka sentis tutan gravecon de tiu ĉi minuto. Ŝi streĉiĝis, kaj komencis serĉi vortojn taŭgajn por la disiĝo. Ŝi trovis ilin rapide:

– Ĉu vi veturos per taksio? Per-r-fekte!

La inĝeniero lavange deruliĝis per la ŝtuparo.

La vesperon Eloĉka pasigis kun Fima Sobak. Ili pripaŝis ekstreme gravan okazaĵon, kiu minacis renversi tutmondan ekonomikon.

– Ŝajnas ke oni vestos longan kaj vastan, – diris Fima, kokine mergante la kapon en la ŝultrojn.

– Mornaĵo.

Kaj Eloĉka estime rigardis na Fima Sobak. Fraŭlino Sobak estis konata estiel kultura junulino: ŝia vortaro enhavis ĉirkaŭ cent okdek vortojn. Krom tio ŝi konis vorton kiun Eloĉka kapablis eĉ ne alsonĝi. Tio estis riĉa vorto:

homoseksualismo. Fima Sobak sendube estis kultura junulino.

La vigla konversacio daŭriĝis post la noktomezo.

Je la deka matene la granda kombinanto eniris Varsonofjevskij strateton. Antaŭ li kuris la senhejma knabo. Li montris la domon.

– Ĉu vi ne mensogas?

– Pri kio vi, onklo... Jen ĉi tien, en la enirejon.

Bender donis al la knabo honeste perlaboritan rublon.

– Oni devas aldoni, – diris la knabo fiakriste.

– De morta azeno orelojn. Ricevu ĉe Puŝkin. Ĝis revido, difektulo.

Ostap frapetis la pordon, tute ne antaŭpensante pri preteksto de la vizito. Por konversacioj kun virinetoj li preferis inspiron.

– Oho? – oni demandis el post la pordo.

– Pri afero, – respondis Ostap.

La pordo malfermiĝis. Ostap eniris la ĉambron, mebligi kiun povis nur estaĵo kun imagopovo de pego. Sur la muroj pendis kinoaktoraj poŝtkartetoj, pupetoj, kaj tambovaj murtapiŝetoj. Sur tiu ĉi bunta fono, kiu dancis en la okuloj, estis malfacile rimarki etan estrinon de la ĉambro. Sur ŝi estis negliĝa manteleto, refarita el jako de Ernest Pavloviĉ, kaj borderita per enigma pelto.

Ostap tuj komprenis kiel kondukti sin en la monduma socio. Li fermis la okulojn kaj faris retropaŝon.

– Belega pelto! – kriis li.

– Vi ŝercas! – diris Eloĉka tenere. – Tio estas meksikia dipodo.

– Ne povas esti. Oni trompis vin. Oni donis al vi pelton multe pli valoran. Tio estas ŝanhajaj panteroj. Jes, ĝuste!

Panteroj! Mi rekonas ilin pro la tonvario. Rigardu kiel la peltoludas sub la suno!.. Smeraldo! Smeraldo!

Eločka mem farbis la meksikian dipodon per verda akvofarbo, tial laŭdo de la matena vizitanto estis precipe agrabla al ŝi.

Ne donante al la mastrino rekonsciiĝi, la granda kombinanto elŝutis ĉion kion li iam aŭdis pri peltoltoj. Poste ili ekparolis pri silko, kaj Ostap promesis donaci al la ĉarma mastrino kelkcenton da silkaj kokonoj kiujn, kvazaŭ, venigis al li prezidanto de Centra Partia Komitato de Uzbekio.

– Vi estas bonega junuljo, – rimarkis Eločka rezulte de unuaj minutoj de la konatiĝo.

– Vin, certe, mirigis tiu ĉi frumatena vizito de nekonata viro, ĉu?

– Ho-ho!

– Sed mi venis al vi pro unu delikata afero.

– Vi ŝercas!

– Hieraŭ vi estis en aŭkcio, kaj impresis min eksterordinare.

– Vi vulgaras!

– Pardonu! Vulgari al tiel ĉarma virino estas malhome.

– Teruro!

La konversacio daŭriĝis en la saman direkton kiu, kelkokaze, donas tamen mirindajn fruktojn. Sed komplementoj de Ostap iĝis pli kaj pli akvohavaj kaj mallongaj. Li rimarkis ke la dua seĝo forestas en la ĉambro. Ekestis neceso serĉi la spurojn. Intermitante siajn pridemandojn per multkolora orienta flatado, Ostap informiĝis pri la hieraŭaj eventoj kiuj okazis en vivo de Eločka.

«Nova problemo», – pensis li, – «la seĝoj disrampas kiel blatoj».

– Ĉarma junulino, – subite proponis Ostap, – vendu al mi tiun ĉi seĝon. Ĝi tre plaĉas al mi. Nur vi kun via virina intuicio povis elekti tiun ĉi artaĵon. Vendu, knabino, kaj mi donos al vi sep rublojn.

– Vi vulgaras, junuljo, – ruzete diris Eloĉka.

– Ĥo-ĥo, – insistis Ostap.

«Oni devas agi alie», – decidis li, – «proponu mi interŝanĝon».

– Ĉu vi scias, en Eŭropo kaj en plej bonaj domoj de Filadelfio oni renovigis nun antikvan modon: disverŝi teon tra kribrileto. Tio impresas neordinare efekte kaj estas tre elegante.

Eloĉka streĉiĝis.

– Ĝuste nun venis al mi mia konato, diplomato el Vieno, kaj alportis ĝin donace. Amuza aĵo.

– Verŝajne ĝi famas, – ekinteresiĝis Eloĉka.

– Oho! Ĥo-ĥo! Mi proponas interŝanĝon. Vi al mi – la seĝon, kaj mi al vi – la kribrileton. Ĉu vi konsentas?

Kaj Ostap elpoŝigis la etan orumitan kribrileton. Suno ruliĝis en la kribrileto kiel ovo. Sur la plafono eksaltadis rebriloj. Subite lumiĝis malluma angulo de la ĉambro. La aĵo impresis na Eloĉka same nerezisteble kiel malnova uzita konservaĵa ladskatolo impresas kanibalon de Mumbo-Jumbo. En tiuj okazoj kanibalo krias plenvoĉe, sed Eloĉka ekĝemis mallaŭte:

– Ĥo-ĥo!

<http://a10005.rimg.info/icon/1726356000dd9a2146d33a3f45421ff7ce1422bad7.jpg>

(Tio estas bronza monumento al Eločka en urbo Ĥarkov. Rimarku la te-kribrileton, kiu pendas de ŝia mano)

<http://www.liveinternet.ru/community/2315596/post65774394/>

(Monumentoj al niaj literaturaj herooj en sama urbo: Supre Ostap, poste Vorobjaninov, denove Eločka kaj patro Fjodor).

Ne donante al ŝi rekonsciiĝi, Ostap metis la kribrileton sur la tablon, prenis la seĝon kaj, informiĝinte de la ĉarma virino pri adreso de la edzo, ĝentile adiaŭis ŝin.

Ĉapitro 23

Avesalom Vladimiroviĉ Iznurenkov

Por la koncesiuloj komenciĝis rikolta tempo. Ostap asertis ke la seĝojn oni devas forĝi dum ili estas varmegaj. Ipolit Matveeviĉ estis amnestiita, kvankam tempo de tempo Ostap esplordemandis lin:

– Por kio, je diablo, mi prenis vin? Por kio, fakte, vi utilas? Ĉu ne estos pli bone ke revenu vi en vian hejmon, en la registrad-oficejon. Tie vin atendas mortintoj, nov-naskitoj. Ne turmentu la bebojn. Veturu!

Sed ene de la animo li ligiĝis al la sovaĝinta gvidanto. «Sen li estas ne tiel ridinde vivi», – pensis Ostap. Kaj li gaje rigardetis na Vorobjaninov, sur kapo de kiu jam elkreskis arĝenta gazoneto.

En plano de la laboroj al iniciato de Ipolit Matveeviĉ estis dediĉita sufiĉe granda rolo. Tuj kiam trankvila Iva-

nopulo foriris, Bender enkapigis al la partnero plej mallongan vojon por trovi la trezorojn:

– Agu kuraĝe. Pridemandu nenion. Pli da cinikado. Al homoj tio plaĉas. Nenion entreprenu tra triaj personoj. Stultuloj jam forestas. Neniu eltirados por vi brilantojn el malpropra poŝo. Sed ankaŭ sen krimado. Ni devas estimi kriminalan kodon.

Malgraŭ tio la serĉado daŭriĝis sen iu aparta brilo. Malhelpis la krimala kodo kaj grandega kvanto da burĝaj antaŭjuĝoj, konservintaj ĉe loĝantoj de la ĉefurbo. Ili, ekzemple, tute ne toleris noktajn vizitojn tra siaj fenestroj. Do endis labori nur legitime.

Post kiam Ostap vizitis na Eloĉka Sĉukina en ĉambro de studento Ivanopulo aperis meblo. Tio estis seĝo, interŝanĝita per la tea kribrileto: tria, laŭ nombro, trofeo de la ekspedicio. Jam delonge pasis la tempo kiam ĉaso post la brilantoj elvokis en la partneroj potencajn emociojn, kiam ili ŝiris la seĝojn per la ungoj kaj ronĝis la risortojn.

– Eĉ se en la seĝoj estas nenio, – diris Ostap, – opiniu ke ni perlaboris dek mil minimume. Ĉiu dissekcita seĝo aldonas al ni ŝancojn. Ĉu tiel gravas ke en seĝo de la sinjorineto okazis nenio? Oni ne devas rompi ĝin pro tio. Mebligu ni na Ivanopulo. Ankaŭ al ni tio agrablas.

Samtage la koncesiuloj elflugis el la rozkolora dometo, kaj ekiris diversflanken. Al Ipolit Matveeviĉ estis konfidita ŝafblekanta nekonato de Sadova-Spaska, kaj donitaj dudek kvin rubloj por elspezoj, kun ordono en bierejojn ne eniri, kaj sen la seĝo ne reveni. Por si la granda kombianto prenis edzon de Eloĉka.

Ipolit Matveeviĉ traveturis la urbon per buso numero ses. Skuiĝante sur la leda benketo, kaj flugante al la lakita plafono mem, li pensis kiel ekscii familnomon de la

blekanta civitano, per kiu preteksto eniri al li, kion diri per unua frazo, kaj kiel komenci la aferon mem.

Elirinte ĉe Ruĝa Pordego li trovis, laŭ adreso enregistrita per Ostap, la serĉatan domon, kaj komencis iradi apud ĝi. Eniri li ne kuraĝis. Tio estis malnova malpura moskva gastejo, aliformita en loĝejan kooperativon, kaj loĝigita, se juĝi laŭ la neglektita fasado, per impertinentaj nepagantoj.

Ipolit Matveeviĉ longe staris kontraŭ la enirejo, venadis al ĝi, parkerigis manskribitan afiŝeton kun minacoj, adresitaj al nepagemulaj loĝantoj kaj, nenion elpensinte, leviĝis sur duan etaĝon. Tie li trovis koridoron en kiun eniris apartaj ĉambroj. Malrapide, kvazaŭ li iras al klasa tabulo por pruvi ne lernitan per li teoremon, Ipolit Matveeviĉ proksimiĝis al ĉambro numero 41. Sur la pordo pendis inverse, sur unu fiksilo, la vizitkarto:

**AVESALOM VLADIMIROVIĈ
IZNURENKOV**

Troviĝante en plena stuporo, forgesinte frapeti la pordon, Ipolit Matveeviĉ malfermis ĝin, faris tri somnambulajn paŝojn, kaj ekestis meze de la ĉambro.

– Pardonu, – diris li per sufokita voĉo, ĉu mi povas vidi kamaradon Iznurenkov?

Avesalom Vladimiroviĉ ne respondis. Vorobjaninov levis la kapon, kaj nur tiam rimarkis ke en la ĉambro estas neniu.

Laŭ ĝia aspekto tute ne eblis diveni inklinojn de la mastro. Estis klare nur ke li estas fraŭlo, kaj ke servantiĝo li ne tenas. Sur fenestra breto kuŝis paperaĉo kun kolbasaj ŝeloj. Kanapo ĉe la muro estis supeŝutita per ĵurnaloj. Sur eta breto staris kelkaj polvaj libroj. De la muroj rigardis koloraj fotografaĵoj de katoj, katetoj kaj katinoj. Ene de la ĉambro, apud malpuraj, falintaj flanken botetoj, staris

la nuksa seĝo. Sur ĉiuj mebloj, inkluzive la seĝon el stargoroda izoldomo, balanciĝis frambokoloraj vaksaj sigeloj. Sed Ipolit Matveeviĉ ne rimarkis tion. Li tuj forgesis kriminalan kodon, instrukciojn de Ostap, kaj alsaltis la seĝon.

Dume ĵurnaloj sur la kanapo ekmoviĝis. Ipolit Matveeviĉ ektimis. La ĵurnaloj ekrapis kaj falis sur la plankon. El sub ili eliris trankvila kateto. Li indiferekte ekrigardis na Ipolit Matveeviĉ, kaj komencis lavi sin, kaptante per la piedeto la orelon, vangeton kaj la lipharojn.

– Uf! – diris Ipolit Matveeviĉ.

Kaj li ektiris la seĝon al la pordo. La pordo malfermiĝis mem. Sur la sojlo aperis mastro de la ĉambro, la blekanta nekonato. Li vestis palton, el sub kiu videblis violkolora kalsono. En la manoj li tenis la pantalonon.

Pri Avesalom Vladimiroviĉ Iznurenkov oni povus diri ke en la tuta respubliko forestas alia tia homo. La respubliko aprezis liajn meritojn. Li alportis al ĝi grandan utilon. Sed malgraŭ tio li restis nekonata, kvankam en sia arto li estis sama majstro kiel Ŝalapin – en kantado, Gorkij – en literaturo, Kapablanka – en ŝakludo, Melnikov – en glitkurado, kaj plej grandnaza, plej bruna asiriano, okupanta plej bonan lokon sur kruciĝo de stratoj Tverskaja kaj Kamergerskogo – en polurado de botoj per flava cremaĵo.

Ŝalapin kantis. Gorkij verkis grandan romanon, Kapablanka pretiĝis al matĉo kontraŭ Aloĥin. Melnikov ŝiris rekordojn. Asiriano venigis botetojn de civitanoj al suna brilo. Avesalom Iznurenkov spritis.

Li neniam spritis sencele, nur por impresi per trafa esprimo. Li faris tion profesie, plenumante mendojn de humuraĵaj gazetoj. Sur siaj ŝultroj li elportis plej gravajn

kampanjojn, provizis temojn por desegnaĵoj kaj felietonoj al plimulto de moskvaj satiraj gazetoj.

Famaj personoj spritas dufoje dum sia vivo. Tiuj ĉi spritaĵoj pligrandigas ties famon, kaj eniras historion. Iznurenkov eligis ne malpli ol sesdekon da unuaklasaj spritaĵoj monate, kiujn kun rideto ripetadis ĉiuj. Sed, malgraŭ tio, li restis nekonata.

Kiam per spritaĵo de Iznurenkov oni titoligis desegnaĵon, la famon akiris la desegnisto. Sub la desegnaĵo oni metis nomon de la desegnisto. Nomo de Iznurenkov forestis.

– Tio estas terure! – kriis li. – Ne eblas subskribi. Sub kio mi subskribos? Ĉu sub du linioj?

Kaj li daŭrigis arde batali kontraŭ malamikoj de la socio: malbonaj kooperativistoj, malversaciuloj, Ĉemberlen, burokratoj. Per siaj spritaĵoj li pikis flataĉulojn, dom-administrantojn, privatulojn, huliganojn, civitanojn kiuj ne konsentas malpliigi prezojn, kaj mastrumistojn, kiuj deflankiĝas de reĝimo de ŝparemo.

La spritaĵojn, post eldono de la revuoj, oni prononcis de sur cirka areno, reprintis en vesperaj ĵurnaloj, sen indiki la fonton, kaj prezentis al publiko de scenejo per “aŭtoroj-kanzonistoj”.

Iznurenkov sukcesis spritadi en tiuj sferoj en kiuj, ŝajne, oni povas diri jam nenion ridindan. El tiu sensuka dezerto, estiel troaltigita neta kosto, Iznurenkov lertis el-premi ĉirkaŭ centon da majstroverkoj de humuro. Hejne perdus esperon, se oni proponus al li diri ion ridindan tamen utilan por la komunumo pri malĝusta tabelo de prezoj por transportado de varoj per nealta rapideco. Mark Tven (Twain) forkurus de tiu ĉi temo. Sed Iznurenkov restis sur sia posteno.

Li kuradis tra redakciaj ĉambroj, ŝaf-blekante kaj stumblante kontraŭ rubaĵuoj por cigared-stumpoj. Post dek minutoj la temo okazis prilaborita, la desegnaĵo pripensita kaj provizita per titolo.

Ekvidante en sia ĉambro homon forportantan la sigelitan seĝon, Avesalom Vladimiroviĉ svingis la pantalonon, ĵus gladitan ĉe tajloro, eksaltis surloke kaj eklekis:

– Vi frenezigiĝis! Mi protestas! Vi ne rajtas! Finfine ekzistas ja leĝo! Kvankam «Stultular’ ne havas leĝojn» vi, eĉ hazarde, devas scii ke la mebloj povas stari ankoraŭ du semajnoj!.. Mi plendos al prokuroro!.. Kaj eblas eĉ ke mi pripagos!

Ipolit Matveeviĉ staris sur la loko, kaj Iznurenkov deĵetis la palton kaj, ne deirante de la pordo, surtiris la pantalonon sur siajn diketajn krurojn. Iznurenkov estis diketa, sed vizaĝo lia estis magra.

Vorobjaninov ne dubis ke oni tuj kaptos kaj tiros lin en policejon. Tial li estis ekstreme mirigita kiam mastro de la ĉambro, venkinte sian tualeton, subite trankviliĝis.

– Ja komprenu vi, – diris la mastro per paciga tono, – ke mi ne povas konsenti pri tio.

Ipolit Matveeviĉ, sur loko de Iznurenkov, ankaŭ povus ne konsenti se oni dum taga lumo ŝtelus de li seĝojn. Sed li ne sciis kion diri, dol silentis.

– Tio ne estas mia kulpo. Kulpas Muzlup mem. Jes, mi konfesas. Mi ne pagis pro luprenita piano ok monatojn, sed mi ne vendis ĝin, kvankam mi havis plenan eblecon fari tion. Mi agis honeste, sed ili – fripone. Ili forprenis la pianon kaj, aldone, plendis al juĝejo kaj sigeligis la meblojn. Ĉe mi oni rajtas sigeli nenion. Tiuj ĉi mebloj estas rimedo de mia produktado!

Ipolit Matveeviĉ komencis ion kompreni.

– Lasu la seĝon! – ekjelpis subite Avesalom Vladimiroviĉ. – Ĉu vi aŭdas? Vi, burokrato!

Ipolit Matveeviĉ obeeme lasis la seĝon kaj elmurmuris:

– Pardonu, tio estas eraro, laboro nia estas tia.

Tiam Iznurenkov ege gajiĝis. Li ekkuradis tra sia ĉambro kaj ekkantis: «Kaj matene jam, kiel kutime, ŝi ridetis ĉe sia fenestro». Li ne sciis kion fari pri siaj manoj. Ili flugis ĉe li. Li komencis alligi la kravaton kaj, ne alliginte, lasis ĝin. Poste li kaptis ĵurnalon kaj, leginte el ĝi nenion, ĵetis ĝin sur la plankon.

– Do vi ne prenos hodiaŭ la meblojn?.. Bone!.. Ho! Ho!

Ipolit Matveeviĉ, uzante la favorajn cirkonstancojn, ekmoviĝis al la pordo.

– Atendu – kriis subite Iznurenkov. – Ĉu vi iam vidis tian katon? Diru, ĉu ĝi vere estas ekstreme lanuga?

La kateto okazis en tremantaj manoj de Ipolit Matveeviĉ.

– Alta klaso!.. murmuris Avesalom Vladimiroviĉ, ne sciante kion fari kun superfluo de sia energio. – Ho!.. Ho!..

Li ĵetiĝis al la fenestro, disigis la manojn, kaj komencis rapide kaj multfoje klini sin antaŭ du junulinoj, rigardantaj lin el fenestro de transstrata domo. Li paŝadis surloke, kaj eligis tenerajn ho-vortojn:

– Junulinoj el limkvartaloj! Plej bona frukto!.. Alta klaso!.. Ho!.. «Kaj matene jam, kiel kutime, ŝi ridetis ĉe sia fenestro...»

– Do mi iros, civitano, – stulte diris direktoro de la koncesio.

– Atendu, atendu! – maltrankviliĝis subite Iznurenkov.
– Unu minuteto!.., Ho!.. Kaj la kateto, ĉu vere ĝi estas lanuga ekstreme?.. Atendu!.. Mi tuj!..

Li konsternite ekserĉis en ĉiuj poŝoj, forkuris, revenis, aĥ-is, elrigardis el la fenestro, kaj denove forkuris kaj revenis.

– Pardonu, karulo, – diris li al Vorobjaninov, kiu dum tiuj ĉi manipuladoj staris, metinte la manojn soldate.

Kun tiuj ĉi vortoj li donis al la gvidanto duonrublon.

– Ne, ne, bonvolu ne rifuzi. Ĉiu laboro devas esti pri-pagata.

– Mi ege dankas vin, – diris Ipolit Matveeviĉ, mirante pri sia elturniĝemo.

– Dankon, karulo, dankon, simpatiulo!..

Irante sur la koridoro, Ipolit Matveeviĉ aŭdis el ĉambro de Iznurenkov ŝafblekadon, jelpon, kantadon, kaj pasiajn kriojn.

Sur la strato Vorobjaninov rememoris pri Ostap, kaj ektemis pro la timo.

Ernest Pavloviĉ Sĉukin vagadis en la malplena ĉambro, ĝentile lasita al li por la somero per la kamarado, kaj pripensis la problemon: ĉu bani aŭ ne bani sin.

La triĉambra loĝejo troviĝis sub tegmento mem de la naŭetaĝa domo.

En ĝi, krom skribotablo kaj seĝo de Vorobjaninov, estis nur tualetspegulo. La suno respeguliĝis en ĝi kaj dolorigis la okulojn. La inĝeniero ekkuŝis sur la skribotablon, kaj tuj eksaltis. Ĉio estis ardigita.

«Iru mi lavi min», – decidis li.

Li senvestiĝis, malvarmiĝis, rigardis sin en la spegulo, kaj iris en la banĉambron. Tie lin kaptis malvarmeto. Li engrimis la bankuvon, verŝis sur sin akvon el blua emajlita kruĉo, kaj malavare sapumis sin. Tuta li kovriĝis per flokoj da ŝaŭmo, kaj ekestis simila al novjara avo-frosto.

– Bone! – diris Ernest Pavloviĉ.

Ĉio iris bone. Ekestis malvarmete. La edzino forestis. Antaŭe estis plena libero. La inĝeniero kaŭriĝis, kaj malfermis la kranon por delavi la sapon. La krano glutsufokiĝis, kaj komencis malrapide paroli ion nedistingeblan. Akvo ne iris. Ernest Pavloviĉ enigis la glitan etfingron en truon de la krano. Elverŝis maldika strifluo, sed sekvis nenio. Ernest Pavloviĉ grimaciĝis, eliris el la banĉambro kaj, laŭvice levante la piedojn, venis al kuireja krano. Sed ankaŭ el ĝi li sukcesis elmelki nenion.

Ernest Pavloviĉ ekplaŭdis en la ĉambrojn, kaj haltis antaŭ la spegulo. La ŝaŭmo piketis la okulojn, la dorso jukis, la sapaj flokoj falis sur la pargeton. Aŭskultante ĉu ne fluas akvo en la banĉambro, Ernest Pavloviĉ decidis voki la kortiston.

«Apenaŭ li alportu la akvon», – decidis la inĝeniero, frotante la okulojn kaj malrapide ekbolante, – «ĉar diablo scias kio okazas ĉi tie».

Li elrigardis el la fenestro. Ŝur fundo mem de la korta ŝakto ludis infanoj.

– Kortisto! – kriis Ernest Pavloviĉ. – Kortisto!

Respondis neniu.

Tiam Ernest Pavloviĉ rememoris ke la kortisto loĝas en ĉefenirejo sub la stuparo. Li surpaŝis la malvarmajn kahelojn kaj, altenante la pordon per la mano, kliniĝis soben. Sur la ŝtupara placeto estis nur unu loĝejo, do Ernest Pav-

loviĉ ne timis ke oni povas ekvidi lin en la stranga kostumo el sapaj flokoj.

– Kortisto! – kriis li soben.

La vorto ektondris, kaj kun bruo ekruliĝis sur la ŝtupoj.

– Gu-gu! – respondis la ŝtuparo.

– Kortisto! Kortisto!

– Gum-gum! Gum-gum!

Tiam la nudpieda inĝeniero senpacience ekpaŝadis sur la loko, ekgitis kaj, por konservi la ekvilibron, lasis el la mano la pordon. La pordo klakis per la kupra langeto de la seruro, kaj ŝlosiĝis. La muro ektremis. Ernest Pavloviĉ, ne kompreninte ankoraŭ neripareblon de la okazintaĵo, tiris la pordan manilon. La pordo ne cedis.

La inĝeniero, konsterniĝe, ankoraŭ kelkfoje ektiris ĝin kaj, kun la batanta koro, ekaŭskultis. Regis krepuska preĝeja silento. Tra diverskoloraj vitroj de la altega fenestro pene enpenetris lumo. «Situacio», – pensis Ernest Pavloviĉ.

– Jen kanajlo! – diris li al la pordo.

Sube, kiel petardoj, komencis aĥi kaj eksplodi homaj voĉoj. Poste, kiel laŭtparolilo, ekbojis hejma hundeto.

Ŝur la ŝtuparo oni puŝis supren infanan ĉareton.

Ernest Pavloviĉ time iradis sur la ŝtupara placeto.

– Oni povas freneziĝi!

Al li ŝajnis ke ĉio ĉi estas tro sovaĝa por vere okazi. Li denove venis al la pordo kaj aŭskultis. Li ekaŭdis iujn novajn sonojn. Komence al li ŝajnis ke iu iradas en la loĝejo.

«Eble iu venis tra la malĉefa eniro?» – pensis li, kvankam sciis ke la malĉefa eniro estas fermita, kaj en la loĝejon povas eniri neniu.

La monotona bruo daŭriĝis. La enĝeniero retenis la spiradon. Tiam li distingis ke tiun ĉi bruon okazigas plaŭ-

danta akvo. Ĝi, ŝajne, verŝis el ĉiuj kranoj de la loĝejo. Ernest Pavloviĉ preskaŭ esploris.

La situacio estis terura. En Moskvo, en centro de la urbo, sur placeto de naŭa etaĝo staras plenkreska liphara homo kun supera klereco, absolute nuda, kaj kovrita per ankoraŭ moviĝanta sapa ŝaŭmo. Iri li povis nenien. Li preferus trafi prizonon ol aperi ĉi-aspekte. Restis nur unu ebleco: pereii. La ŝaŭmo kreviĝis kaj bruligis la dorson. Sur la manoj kaj la vizaĝo ĝi jam solidiĝis, komencis simili skabion, kaj kuntirigis la haŭton.

Tiel pasis duonhoru. La inĝeniero frotiĝis je la kalkigitaj muroj, ĝemis, kaj kelkfoje sensukcese provis elrompi la pordon. Li ekestis malpura kaj timiga.

Sĉukin decidis, kiom ajn tio kostos al li, malleviĝi al la kortisto.

«Forestas alia eliro, forestas. Restis nur kaŝiĝi ĉe la kortisto!».

Sufokiĝante kaj fermante sin per la mano, kiel tion faras viroj enirante akvon, Ernest Pavloviĉ komencis malrapide ŝteliĝi laŭ la balustrado. Li atingis placeton inter oka kaj naŭa etaĝoj. Lian figuron lumigis diverskoloraj romboj kaj kvadratoj de la fenestro. Li estis simila al arlekono, subaŭskultanta konversacion de Kolombino kun Pajaco. Li direktiĝis jam la alian placeton, sed subite porda seruro de suba loĝejo elpafis, kaj el la loĝejo eliris fraŭlino kun baleta valizeto. La fraŭlino sukcesis fari eĉ ne unu paŝon kiam Ernest Pavloviĉ ekestis jam sur sia placeto. Li preskaŭ surdiĝis pro teruraj frapoj de sia koro.

Nur post duonhoru la inĝeniero rekonsciiĝis, kaj ekpovis efektiviĝi novan eliratakon. Ĉi-foje li firme decidis impete ĵetiĝi soben kaj, malgraŭ ĉio, alkuri la prirevatan ejon de la kortisto.

Li faris ĝuste tion. Senbrue saltante trans kvar ŝtupoj kaj alhurletante li, estrarano de sekcio de inĝenieroj kaj teknikistoj, eksaltis soben. Sur placeto de sesa etaĝo li pormomente haltis. Tio pereigis lin. De sube iu leviĝis.

– Fia knabaĉo! – ekaŭdiĝis ina voĉo, multfoje plifortigita per la ŝtupareja laŭtparolilo. – Kiom da fojoj mi diris al li!

Ernest Pavloviĉ, obeante jam ne la intelekton sed la instinkton, enflugis sur la naŭan etaĝon kiel kato, persekutata per hundoj.

Okazinte sur sia placeto, malpurigita per la malsekaj spuroj, li senvoĉe ekploris, ŝirante sin je la haroj kaj, konvulsie balanciĝante. La bolantaj larmoj entranciĝis la sapan kruston, kaj trabruligis en ĝi du ondajn sulkojn.

– Dio! – diris la inĝeniero. – Dio mia! Dio mia!

La vivo forestis. Tamen li distinge aŭdis bruon de ŝargauĉo, trakuranta la straton. Do ie oni vivis!

Li ankoraŭfoje igis sin malleviĝi, sed ne scipovis: la nervoj jam malfortiĝis. Li trafis en kripton.

– Oni malpurigis per la spuroj kiel porkoj! – ekaŭdis li maljunulinan voĉon de la suba placeto.

La inĝeniero alkuris la muron, kaj kelkfoje kornobatis ĝin per la kapo. Plej saĝe estus, certe, krei ĝis iu venu, kaj poste kapitulacii al la veninto. Sed Ernest Pavloviĉ jam tute perdis kapablon rezoni kaj, peze spirante, turniĝadis sur la placeto.

Eliro forestis.

Ĉapitro 24

Klubo de la aŭtoŝatantoj

En redakcio de granda ĉiutaga ĵurnalo “Stablo”, kiu troviĝis en dua etaĝo en Domo de popoloj, oni haste bakis materialon por transdoni ĝin en la kompostejon.

El enpelejo (loko kie oni tenas materialon jam kompostitan, sed ne enirintan antaŭan numeron) oni prenis noticojn kaj artikolojn, kalkulis kvanton da okupataj per ili linioj. Komenciĝis ĉiutaga marĉando pri la loko.

Entute la ĵurnalo, sur siaj kvar paĝoj, povis enlasi 4400 liniojn. Tio inkluzivis ĉion: telegramojn, artikolojn, okazaĵojn, leterojn de korespondantoj, anoncojn, unu versaĵan felietonon kaj du prozajn, karikaturojn, fotografaĵojn, specifajn rubrikojn: teatro, sporto, ŝakludo, ĉefan kaj subĉefan artikolojn, informojn de sovetiaj, partiaj kaj sindikataj organizaĵoj, romanon kun daŭrigoj, raportojn el ĉefurba arta vivo, malgravaĵojn sub titolo «Grajnetoj», sciencopopularajn artikolojn, kaj diversajn hazardajn materialojn. Tuta diversfaka materialo povus plenigi ĉirkaŭ dek mil liniojn. Tial, kutime, distribuo de la paĝolokoj estis akompanata per dramaj scenoj.

Unua kiu alkuris sekretario de la redakcio estis estro de la ŝakluda fako, majstro Juĝejkin. Ĝentile, sed amarplene li demandis:

– Kio? Ĉu hodiaŭ forestos ŝakludo?

– Ne estas loko, – respondis la sekretario. – Subĉefa artikolo estas granda. Tricent linioj.

– Sed hodiaŭ estas sabato. Leganto atendas la dimanĉan materialon. Ĉe mi estas respondoj al la problemoj, kaj ĉarma etudo de Neunivajko, ĉe mi fine...

– Bone. Kiom vi volas?

– Ne malpli ol cent kvindek.

– Bone. Se estas respondoj al la problemoj, ni donu sesdekon da linioj.

La majstro penus elpetegi ankoraŭ tridek liniojn, almenaŭ por la etudo de Neunivajko (perfekta hindia partio Tartakover – Bogolubov kuŝis ĉe li jam pli ol monato), sed oni deŝovis lin.

Venis raportisto Persickij.

– Ĉu impresoj de la partia plenkunveno estas publikindaj? – demandis li tre mallaŭte.

– Certe! – kriis la sekretario. Ni ja parolis pri tio antaŭhieraŭ.

– La materialo jam pretas, – diris Persickij eĉ pli mallaŭte, – kaj ankaŭ du komentarioj, sed ili ne donas al mi lokon.

– Kial ne donas? Kun kiu vi parolis? Ĉu ili freneziĝis?

La sekretario ekkuris kvereli. Lin, intrigante dum la irado, postiris Persickij, kaj pli poste ilin ekpostkuris laboranto el anonca fako.

– Ĉe ni estas sekarov-solvaĵo! – kriis li per malgaja voĉo.

Post li tiriĝis la mastrumisto, trenante post si molan seĝon, aĉetitan por la redaktoro en aŭkcio.

– Solvaĵon – marde. Hodiaŭ ni publikigas niajn aldonaĵojn!

– Multe vi havos de viaj senpagaj anoncoj, sed mono kontraŭ la solvaĵo estas jam ricevita.

– Bone, dum la nokta redaktado ni klarigos tion. Transdonu la anoncon al Paŝa. Ĝuste nun ŝi veturas por la nokta laboro.

La sekretario eksidis legi la ĉefartikolon. Sed oni tuj deŝiris lin de tiu ĉi entuziasmiga okupo. Venis desegnisto.

– Ha, – diris la sekretario, – tre bone. Estas temo por la karikaturaj rilatoj al lastaj telegramoj el Germanio.

– Mi opinias tiel, – diris la desegnisto: Ŝtala Kasko kaj ĝenerala situacio en Germanio...

– Bone. Do kombinu vi ion, kaj poste montru al mi.

La desegnisto foriris en sian fakejon. Li prenis kvadraton da desegna papero, kaj skizis per la krajono magnan hundon. Sur la hundan kapon li surmetis germanan kaskon kun pikilo. Kaj poste li komencis fari surskribojn. Sur korpo de la besto li preslitere skribis vorton “Germanio”, sur ĝia zigzaga vosto – “Dancig-a koridoro”, sur la suba makzelo – “Revoj pri la revanĉo”, sur la kolringo – “Plano de Dawes (Dawes)”, kaj sur la eligita lango – “Ŝtrezeman (Stresemann)”. Antaŭ la hundo la desegnisto metis na Puankare (Poincaré), kiu tenis en la mano pecon da viando. La desegnisto intencis fari surskribon ankaŭ sur la viando, sed la peco estis malgranda, kaj loko por la surskribo forestis. Homo malpli inteligenta ol ĵurnala karikaturisto, embarasiĝus, sed la desegnisto, sen iu ajn meditado, aldesignis al la viando pendantan etiketon, kaj sur ĝi, per etetaj literoj, skribis: “Francaj proponoj pri garantio de la sekureco”. Por oni ne konfuzu na Puankare kun iu alia politikisto, la desegnisto skribis sur lia ventro “Puankare”. La skizo ekestis preta.

Sur tabloj de la arta fako kuŝis alilandaj gazetoj, grandaj tondiloj, vazetoj kun tuĉo kaj kun blanka farbo. Sur la planko kuŝaĉis tranĉaĵoj de fotografaĵoj: ies ŝultro, ies piedoj, kaj pecetoj de pejzaĝo.

Kvin desegnistoj skrapadis fotografaĵojn per razilaj tranĉiletoj “Ĵilet” por heligi ilin; ili aldonis al la fotografaĵoj kontrastecon, alfarbante ilin per tuĉo kaj blanka farbo, kaj sur la reversoj metis subskribojn kaj dimensionojn: 3 kaj 3/4

de kvadrato, 2 kolumnoj, kaj tiel plu: informojn bezonatajn por zinkogravurado.

En ĉambro de la redaktoro sidis alilanda delegitaro. Redakcia tradukisto rigardis vizaĝon de la parolanta alilandano kaj diris:

– Kamarado Arno deziras scii...

Oni parolis pri strukturo de sovetia ĵurnalo. Dum la tradukisto klarigis al la redaktoro kion deziras scii kamarado Arno, Arno mem en velura bicikla pantalono, kaj ĉiuj aliaj alilandanoj, scivole rigardis la ruĝan inkskribilon kun plumo numero 86, kiu estis almetita al angulo de la ĉambro. La plumo preskaŭ tuŝis la plafonon, kaj la skribingo, en vasta sia parto, estis dika kiel korpo de mezgranda homo. Per tiu ĉi skribilo oni povus skribi: la plumo estis tute vera, kvankam dimensiis pli ol granda ezoko.

– Ho-ho! – ridis la alilandanoj. – Kolosal !

Tiu ĉi skribilo estis donacita al la redakcio per kongreso de laboristoj-korespondantoj.

La redaktoro, sidante sur seĝo de Vorobjaninov, ride-tis kaj, rapide kapsignante jen al la skribilo, jen al la gastoj, gaje klarigis.

En la sekretario ĉi alportis la kriadon. Persickij alportis artikolon de popolkomisaro Semaŝko, kaj la sekretario haste elstrekis el modelo de la tria paĝo la ŝakludan parton. Majstro Juĝejkin jam ne luktis pro la ĉarma etudo de Neunivajko. Li penis konservi almenaŭ solvon de la problemoj. Post lukto pli streĉa ol ties batalo kontraŭ Lasker ĉe san-sebastiana turniro, la majstro almetis al si loketon je kosto de “Juĝo kaj vivo”.

Na Semaŝko oni sendis en la kompostejon. La sekretario denove enprofundiĝis la ĉefartikolon. Li decidis tralegi ĝin malgraŭ ĉio, el pure sporta vidpunkto.

Kiam li venis ĝis loko: «...Tamen enhavo de lasta pakto estas tia, ke se Ligo de nacioj registros ĝin, tiam oni devos agnoski ke...», lin alvenis haroza viro “Juĝejo kaj vivo”. La sekretario daŭrigis legi, speciale ne rigardante direkton de “Juĝejo kaj vivo”, kaj farante en la ĉefartikolo bezonatajn signojn.

“Juĝejo kaj vivo” venis de alia flanko kaj ofendiĝe diris:

– Mi ne komprenas.

– Nu-nu, – elmurmuris la sekretario, penante prokrasti, – pri kio temas?

– Temas pri tio ke merkrede ne estis “Juĝejo kaj vivo”, ĵaŭde ne estis, vendrede estis publikita nur alimenta afero, kaj sabate oni forigas la proceson, kiun jam delonge priskribas ĉiuj ĵurnaloj kaj nur ni...

– Kiuj ĵurnaloj? – kriis la sekretario. – Mi ne legis.

– Morgaŭ tio aperos ĉie, kaj ni denove malfruos.

– Sed kiam al vi estis komisiita afero de Ĉubarov, kion vi verkis? Eĉ linion ne eblis ricevi de vi. Mi scias. Pri ĉubarov-anoj vi publikigis en la vesperaĵo.

– De kie vi scias tion?

– Mi scias. Oni diris al mi.

– Tial mi scias kiu diris al vi. Tion diris al vi Persickij, sama Persickij, kiu antaŭ okuloj de tuta Moskvo eluzas la redakcion por doni materialojn en Leningradon.

– Paŝa! – diris la sekretario mallaŭte, voku na Persickij.

“Juĝejo kaj vivo” indiferece sidis sur la fenestrobreto. Post li videblis ĝardeno, en kiu baraktadis birdoj kaj infanoj. Pri la kverelo oni okupiĝis longe. La sekretario ĉesis ĝin per lerta maniero: li forĵetis la ŝakludon, kaj anstataŭ ĝi enigis na “Juĝejo kaj vivo”. Al Persickij estis farita averto.

Venis plej varma redakcia tempo: la kvina vespere.

Super varmiĝintaj tajpiloj ŝvebetis fumeto. Oni diktis per voĉoj aĉaj pro hasto. La ĉeftajpistino alkriis fiulojn kiuj nerimarke alŝovis siajn materialojn ekstervice.

Sur la koridoro paŝadis redakcia poeto. Li amindumis tajpistinon, modestaj koksoj de kiu malligis liajn poetajn sentojn. Li forkondukis ŝin al fino de la koridoro, kaj diris vortojn de amo, al kiuj la junulino respondis:

– Hodiaŭ ĉe mi estas supernorma laboro, do mi estas tre okupata.

Tio signifis ke ŝi amas aliulon.

La poeto malhelpis al ĉiuj, kaj al ĉiuj rilatis kun frape unuformeca peto:

– Donu al mi dek kopekojn por tramo!

Por tiu ĉi sumo li envenis fakon de laboristaj korespondantoj. Vagante inter la tabloj, ĉe kiuj laboris “legistoj”, kaj tuŝinte per la mano stokojn da korespondaĵoj, la poeto renovigis siajn provojn. Legistoj, plej krudaj homoj en la redakcio (tiaj ili ekestis pro bezono pe-legi ĉiutage po cent leteroj, desegnitaj per manoj kiuj konas skribilon malpli bone ol hakilon, farban penikegon aŭ ĉarumon) silentis.

La poeto vizitis la ekspedojn, kaj fine ennomadis la kontoron. Sed tie li ne nur ne ricevis dek kopekojn, sed eĉ estis atakita per junkomunisto Avdotjev: al la poeto estis proponite aniĝi rondeton de aŭto-ŝatantoj.

Enamiĝema animo de la poeto ekestis kovrita per benzina vaporo. Li faris du paŝojn flanken kaj, preninte trian rapidumon, malaperis el la vido.

Avdotjev tute ne estis malkuraĝigita. Li kredis pri venko de la aŭta ideo. En sekretariejo li komencis la bata-

lon per subfosa metodo. Ĝuste tio malhelpis al la sekretario pe-legi la ĉefartikolon.

– Aŭskultu, Aleksandr Iosifoviĉ. Atentu vi, la afero estas serioza, –diris Avdotjev, alsidante la sekretarian tablon.

– Ĉe ni ordiĝis aŭto-klubo. Ĉu la redakcio povas prunti al ni kvincent rublojn por ok monatoj?

– Vi povas ne dubi pri tio.

– Ĉu vi opinias ke tio ne eblas?

– Mi ne opinias sed scias. Kiom da anoj enkalkulas via rondeto?

– Jam tre multe.

La rondeto, dume, konsistis nur el la organizanto mem, sed Avdotjev ne disfamigis tion.

– Per kvincent rubloj ni aĉetos en aŭto-fatrasedo aŭton. Jegorov jam eltrovis. Riparo, li diras, kostos ne pli ol kvincent. Sume mil. Do mi opinias kolekti dudek homojn, kvindek da rubloj de ĉiu. Estos bonege. Ni lernos gvidi aŭton. Jegorov estos estro. Kaj post tri monatoj, ĝis la aŭgusto, ni ĉiuj scipovas gvidi, estas aŭto, kaj ĉiu, laŭvice, veturu kien ĝi volas.

– Kaj kvincent rublojn por aĉeto?

– Ilin donos kaso de interhelpo sub procentoj. Ni elpagos. Kio do, ĉu enlistigi vin?

Sed la sekretario estis jam kalveta, multe laboris, troviĝis sub potenco de la familio kaj loĝejo, ŝatis kuŝadi post tagmanĝo sur kanapo kaj, antaŭdorme, legi na “Pravda”. Li meditis kaj rifuzis.

– Vi, – diris Avdotjev, – maljunulo!

Avdotjev venis al ĉiu tablo, kaj ripetis siajn flamigajn paroladojn. En maljunuloj, en kiujn li enkalkulis ĉiujn kunlaborantojn pli aĝajn ol dudek jaroj, liaj vortoj elvokis duban efekton.

Ili acide deparoladis, akcentante ke ili jam estas amikoj de infanoj, kaj regule pagas dudek kopekojn jare por nobla afero de helpo al kompatindaj etuloj. Ili, fakte, konsentus aniĝi al la nova klubo, se...

– Kio “se”? – kriis Avdotjev. – Se la aŭto estus hodiaŭ? Ĉu? Kaj se al vi oni metus sur la tablon bluan sescilindran “pakard” per dek kvin kopekoj jare, kaj benzinon kaj ŝmiraĵojn je fiska kosto, ĉu?!

– Iru, iru! – diris la maljunuletoj. – Nun estas tempo de lasta sendado, vi malhelpas labori!

La aŭta ideo estingiĝadis kaj komencis fulgadi. Fine aperis pioniro de la nova entrepreno. Persickij kun bruego desaltis de telefono, aŭskultis na Avdotjev kaj diris:

– Vi komencis ne tiel, donu la liston. Komencu ni denove.

Kaj Persickij kune kun Avdotjev komencis novan ĉirkaŭiron.

– Vi, kaduka matraco, – diris Persickij al bluokula junulo, – por tio eĉ monon oni ne devas doni. Ĉu vi havas obligaciojn de dudek-sepa jaro? Je kiom? Je kvindek? Des pli bone. Donu vi tiujn ĉi obligaciojn en nian klubon. La obligacioj konsistigos la kapitalon. Ĝis fino de la aŭgusto ni povos realigi ĉiujn obligaciojn kaj aĉeti aŭton.

– Kaj kio se mia obligacio gajnos? – defendis sin la junulo.

– Kiom vi esperas gajni?

– Kvindek mil.

– Per tiuj ĉi kvindek mil estos aĉetitaj aŭtoj. Kaj samo se gajnos mi aŭ Avdotjev. Unuvorte se iu ajn obligacio gajnos, la mono iros por aŭtoj. Ĉu vi komprenis nun? Vi, strangulo! Per privata aŭto vi veturos sur Milit-Kartvela ŝoseo! Montoj! Stultulo!.. Kaj post vi sur propraj aŭtoj ru-

liĝas "Juĝejo kaj vivo", okazaĵ-fako, kaj tiu virineto, kiu okupiĝas pri filmoj... Nu? Nu? Amindumos vi!..

En profundo de sia animo neniu havanto de obligacioj kredas pri ebleco gajni. Tamen oni tre ĵaluze rilatas al obligacioj de siaj najbaroj kaj konatoj. Pli ol fajron oni timas ke gajnos ili, kaj li, ĉiama malsukcesulo, restos kun nenio. Tial espero pri tio ke gajnos kolego senevite puŝis havantojn de obligacioj en sino de la nova klubo. Maltrankviligis nur timo ke gajnos neniu obligacio. Sed ial tio ŝajnis malverŝajna kaj, krom tio, la aŭto-klubo perdis nenion: unu aŭto de la aŭto-fatrasedo estis garantiita per kunigita kapitalo de la obligacioj.

Dudek homoj estis enkalkulitaj dum kvin minutoj. Kiam la afero estis jam kronita, venis la sekretario, aŭdinta pri la allogaj perspektivoj de la aŭto-klubo.

– Kio, knaboj, – diris li, – ĉu ne enlistiĝu ankaŭ mi?

– Enlistiĝu, maljunulo, kial ne, – respondis Avdotjev, – sed ne al ni. Ĉe ni, bedaŭrinde, estas jam plena kompleto, tial akcepto de novaj anoj estas prokrastita ĝis mil-naŭcent-dudek-naŭa jaro. Do enlistiĝu vi en amikojn de infanoj. Malmultekoste kaj trankvile. Dudek kopekojn jare, kaj forestas bezono veturi ien.

La sekretario meditis, rememoris ke li vere estas ne tro juna, suspiris, kaj iris pe-legi la entuziasmigan ĉefartikolon.

– Diru, kamarado, – haltis lin en la koridoro belulo kun ĉerkesa vizaĝo, – kie troviĝas redakcio de ĵurnalo "Stablo"?

Tio estis la granda kombinanto.

Ĉapitro 25

Konversacio kun nuda inĝeniero

Aperon de Ostap Bender en la redakcio antaŭis vico da ne malgravaj okazaĵoj.

Ne trovinte na Ernest Pavloviĉ tage (la loĝejo estis ŝlosita, kaj la mastro, verŝajne, troviĝis en la laborejo), la granda kombinanto decidis veni al li iom pli poste. Dume li promenis en la urbo. Turmentata per agad-soifo li transiris stratojn, haltis sur placoj, okulumis al policisto, helpis al inoj eniri busojn, kaj havis tian aspekton, kvazaŭ tuta Moskvo kun ĝiaj monumentoj, tramoj, stratvendistoj, preĝejoj, stacidomoj kaj reklampaneloj venis festeni en lian akceptejon. Li iradis inter la gastoj, ĝentile konversaciis kun ili, kaj por ĉiu trovis agrablan vorton. Akcepto de tioma kvanto da vizitantoj iom lacigis la grandan kombinanton. Krom tio estis jam la sesa, do venis tempo iri al inĝeniero Sĉukin.

Sed sorto decidis tiel ke antaŭ renkonto kun Ernest Pavloviĉ Ostap devis halti por ĉirkaŭ du horoj por subskribi negrandan protokolon.

Sur Teatra placo la granda kombinanto trafis sub ĉevalinon. Tute neatendite lin stumblis timida blankkolora besto, kaj puŝis lin per sia osteca brusto. Bender falis, kovrigante per ŝvito. Estis tre varme. La blanka ĉevalino laŭte petis pardonon. Ostap vigle leviĝis. Lia titana korpo ricevis neniujn difektojn. Ĝuste tio donis al li pli da kaŭzoj kaj eblecoj por skandalo.

La gasteman kaj ĝentilan mastron de Moskvo oni ne povis rekoni. Li minacpaŝe venis al la konfuzita maljunuleto-koĉero, kaj frapis lian vatan dorson. La maljunuleto tolere eltenis la punon. Alkuris policisto.

– Mi postulas protokolon! – patose kriis Ostap.

En lia voĉo aŭdiĝis metalaj tonoj de homo ofendita en plej sanktaj siaj sentoj. Do, starante ĉe muro de Negranda teatro, sur sama loko kie poste staros monumento al granda rusa dramverkisto Ostrovskij, Ostap subskribis la protokolon, kaj donis negrandan intervjuon al alkurinta Persickij. Persickij ne ignoris malaltprofesian laboron. Li detale enskribis en la notlibron nomon kaj familnomon de la suferito, kaj ekhastis pluen.

Ostap fiere iris sian vojon. Daŭre pensante pri atako de la blanka ĉevalino, kaj sentante malfruan bedaŭron ke li ne sukcesis frapi ankaŭ kolon de la koĉero, Ostap, paŝante ĉiun duan ŝtupon, leviĝis cis oka etaĝo de domo de Sĉukin. Ĉi tie sur lian kapon falis peza guto. Li ekrigardis supren. Rekte en liajn okulojn ekverŝis, de la supra placeto, akvofaleto de malpura akvo.

«Pro tiaj ŝercoj oni devas bati la vizaĝaĉon», – decidis Ostap.

Li ĵetiĝis supren. Ĉe pordo de Sĉukin-loĝejo, dorse al li, sidis nuda homo, kovrita per blankaj likenaĵoj. Li sidis senpere sur la kahelaj kvadratetoj, tenante la kapon kaj balanciĝante.

Ĉirkaŭ la nudulo estis akvo, kiu verŝis el sub la loĝeja pordo.

– O-o-o, – ĝemis la nudulo, -o-o-o...

– Diru, ĉu tio estas vi kiu verŝas ĉi tie akvon? – incite demandis Ostap. – Ĉu tio estas loko por banado? Vi freneziĝis!

La nudulo rigardis na Ostap kaj plorĝemetis.

– Aŭskultu, civitano, iru vi en banejon anstataŭ plori! Rigardu kiun vi similas! Kvazaŭ iu pikadoro!

– Ŝlosilo, – elmuĝis la inĝeniero.

– Kio pri ŝlosilo? – demandis Ostap.

– De la lo-ĝej-o.

– Kie la mono kuŝas?

La nuda homo singultis kun mirinda rapideco.

Nenio povis konsterni na Ostap. Li komencis kompreni. Kaj kiam li fine komprenis, tiam li preskaŭ falis trans la balustradon pro la ridego, lukti kontraŭ kiu estus tute senutile.

– Do vi ne povas eniri la loĝejon? Sed tio estas tiel simple!

Penante ne malpuriĝi je la nudulo, Ostap venis al la pordo, enigis en ŝlosil-aperturon de la usona seruro sian longan flavan dikfingran ungon, kaj singarde komencis turni ĝin de dekstre maldekstren kaj de supre malsupren.

La pordo senbrue malfermiĝis, kaj la nudulo kun ĝoja hurlo enkuris la inunditan loĝejon.

Bruis kranoj. Akvo en manĝoĉambro estigis akvokirilon. En la dormoĉambro ĝi staris kiel trankvila baraĵ-lageto, sur kiu malrapide, cigne, flosis pantofloj. En la angulo, kiel dormema aro da fiŝetoj, kuniĝis cigaredstumpoj.

Seĝo de Vorobjaninov staris en la manĝoĉambro, kie la akvofluo estis plej forta. Ĉe ĉiuj kvar ĝiaj piedetoj formiĝis blankaj ondetoj. La seĝo tremetis kaj, ŝajne, intencis tuj fornaĝi de sia persekutanto. Ostap eksidis sur ĝin, kaj subtiris la piedojn. Rekonsciiĝinta Ernest Pavloviĉ, kun krioj «pardonu! pardonu!..», fermis la kranojn, lavis sin, kaj aperis antaŭ Bender nuda ĝis zono, kaj en kuspita ĝis la genuoj pantalono.

– Vi vere savis min! – ekscite kriis li. – Pardonu, mi ne povas doni alvi la manon, mi estas tute malseka. Ĉu vi scias, mi preskaŭ freneziĝis.

– Ŝajnas ke vi proksimiĝis ĝuste al tio.

– Mi okazis en terura stato.

Kaj Ernest Pavloviĉ, ankoraŭfoje travivante la teruran okazaĵon, jen malĝojante, jen nervoze ridante, rakontis al la granda kombinanto detalojn de la trafinta lin malfeliĉo.

– Se ne vi, mi pereus, – finis la inĝeniero.

– Jes, – diris Ostap, – ankaŭ al mi okazis tio. Eĉ iom pli malbone.

La inĝenieron ĝis tiom interesis nun ĉio kio koncernas similajn historiojn, ke li eĉ lasis la sitelon, per kiu li kolektis la akvon, kaj komencis streĉe aŭskulti.

– Ĝuste kiel ĉe vi, – komencis Bender, – sed tio estis vintre, kaj ne en Moskvo, sed en Mirgorod (Ukrainio), dum unu el gajetaj intervaloj inter bandoj de Maĥno kaj Tjutjunik en jaro mil naŭcent dek naŭ. Loĝis mi en unu ukraina familio. Tipaj privatuloj: unuetaĝa dometo, kaj multe da diversaj havaĵoj. Oni devas mencii ke kio koncernas kloakon kaj ceterajn oportunaĵojn, do en Mirgorod ekzistas nur elĉerp-kavoj. Jen, elsaltis mi foje nokte en nura subvesto sur la neĝon, malvarmumon mi ne timis: minuta afero. Elsaltis mi, kaj mekanike batfermis post mi la pordon. La frosto estis ĉirkaŭ dudekgradoj de celsio. Mi frapas la pordon – oni ne malfermas. Stari sur loko ne eblas: pefrostiĝos! Mi frapas kaj kuras, frapas kaj kuras. Oni ne malfermas! Kaj, kio gravas, en la domo neniuj diablo dormas. La nokto estis terura. Hundoj hurlas. Oni pafas ie. Kaj mi kuras sur neĝaj dunoj en someraj kalsonetoj. Tutan horon mi frapis la pordon. Preskaŭ mortaĉis mi. Kaj kial, laŭ vi, ili ne malfermis? Ili kaŝis sian havaĵon, enkudris en kusenojn bankbiletojn de Kerenskij. Ili opiniis ke venis priserĉistoj. Mi apenaŭ mortigis ilin poste.

Al la inĝeniero tio ĉi estis tre proksima.

– Jes, – diris Ostap, – do ĉu tio vi estas inĝeniero Sĉukin?

– Mi. Sed bonvolu, rakontu pri tio al neniuj. Estas ja vere ĝene.

– Ho, certe! *Antr-nu, tet-a-tet*. Inter kvar okuloj, kiel diras francoj. Sed mi venis al vi pro afero, kamarado Sĉukin.

– Mi ege ĝojos servi al vi.

– *Gran merci*. La afero estas sensignifa. Via edzino petis min viziti vin kaj preni de vi tiun ĉi seĝon. Ŝi diris ke bezonas ĝin por ke estu paro. Kaj al vi ŝi intencas sendi la brakseĝon.

– Bonvolu ja – kiiis Ernest Pavloviĉ. – Mi estas tre ĝoja. Sed por kio vi penadu? Mi povas mem alporti ĝin. Jam hodiaŭ.

– Ne, kial! Por mi tio estas afero tute sensignifa. Mi loĝas proksime, do tio facilas por mi.

La inĝeniero ekvantis, kaj akompanis la grandan kombinanton ĝis la sojlo mem, transpaŝi kiun li timis, kvankam la ŝlosilo, antaŭvide, estis jam metita en poŝon de lia malseka pantalono.

Al iama studento Ivanopulo estis donacita ankoraŭ unu seĝo. Ĝia tegaĵo, fakte, estis iom difektita, tamen tio estis bonega seĝo. Krom tio ĝi ege similis la unuan. Malsukceso pri tiu ĉi seĝo, laŭnombro kvara, ne maltrankviligis na Ostap. Li konis ĉiujn artifikaĵojn de sorto.

En akordan sistemon de liaj meditoj entranĉiĝis nur, grand-obskure, la seĝo forflosinta profundon de vara korto de Oktobra stacidomo. Pensoj pri tiu ĉi seĝo estis malagrablaj, kaj alblovis pezajn dubojn.

La granda kombinanto troviĝis en pozicio de ruletludanto, kiu vetas nur je nombroj, dezirante gajni tridek-

ses-oble pli ol ĝi metis. La situacio estis eĉ pli malbona: la koncesiuloj ludis en tiun ruleton, kie zero falas sur dekunu numeroj el dek du. Kaj la dekdua numero mem elfalis el la vidspaco, troviĝas diablo scias kie kaj, eble, gardas en si la mirindan gajnon.

Ĉeno de tiuj ĉi malgajaj meditoj estis rompita per veno de la ĉefa direktoro. Lia aspekto tuj elvokis en Ostap malbonajn sentojn.

– Ho! – diris la teknika gvidanto. – Mi vidas ke vi faras sukcesojn. Sed ne ŝercu. Kial vi lasis la seĝon post la pordo? Ĉu por amuziĝi pri mi?

– Kamarado Bender, – elmurmuris la gvidanto.

– Ho, por kio vi ekscitas miajn nervojn! Enportu ĝin ĉi tien, rapide! Vi vidas ja ke la nova seĝo, sur kiu mi sidas, multfoje pligrandigis valoron de via akiraĵo.

Ostap klinis la kapon flanken, kaj fermetis la okulojn.

– Ne turmentu la infanon, – elbasis li fine, – kie estas la seĝo? Kial vi ne alportis ĝin?

La stumbla raporto de Ipolit Matveeviĉ estis rompita per krioj de la lokoj, per ironiaj aplaŭdoj, kaj per malsimplaj demandoj. Vorobjaninov finis sian raporton ĉe unuanima rido de la aŭskultantaro.

– Kaj kio pri miaj instrukcioj? – demandis Ostap minace. Kiomfoje mi diris al vi ke ŝtelo estas peko! Jam tiam, en Stargorod, kiam vi volis priŝteli mian edzinon, na *madam* Gricacujeva, jam tiam mi komprenis ke vi havas etkriman karakteron. Tiuj ĉi viaj kapabloj povas venigi vin, maksimume, al ses monatoj sen strikta izolo. Por giganto de penso kaj patro de rusa demokratio la skalo ŝajnas esti ne tiom granda, kaj jen la rezultoj. La seĝo, kiu estis jam en viaj manoj, elglitis. Eĉ pli ol tio, vi difektis la simplan lokon! Provu vi entrepreni duan viziton tien. Tiu Avesalom

kapon deŝiros de vi: via feliĉo ke al vi helpis la idiota oka-
zaĵo. Se ne, sidus vi post krado, kaj vane atendus de mi
transdonaĵojn. Sciu, mi ne portados transdonaĵojn al vi. Mi
ne estas Hekuba. Finfine vi estas por mi nek patrino, nek
fratino, kaj nek amorantino.

Ipolit Matveeviĉ, komprenanta tutan sian sensignife-
con, staris klininte la kapon.

– Jen kio, karulo, mi vidas plenan sencelon de nia
komuna laboro. Al mi ŝajnas absurdaĵo labori por kvardek
procentoj kun tiel malmultkultura partnero estiel vi. Vole-
nevole, sed mi endas meti novajn kondiĉojn.

Ipolit Matveeviĉ ekspiradis. Ĝis tiam li penis ne spiri.

– Jes, mia malnova amiko, vi malsanas pri organiza
senforteco kaj pala nepoveco. Konforme al tio via parto es-
tas malpliigota. Honeste, ĉu vi volas dudek procentojn?

Ipolit Matveeviĉ decide skuis la kapon.

– Sed kial vi ne volas? Ĉu tio estas malmulte al vi?

– M-malmulte.

– Sed tio estas tridek mil rubloj! Kiom do vi volas?

– Mi konsentas pri kvardek.

– Sed tio estas dumtaga rabo! – diris Ostap, imitante
voĉmoduladon de la gvidanto dum la historia marĉando en
la kortistejo. – Ĉu al vi ne sufiĉas tridek mil? Ĉu vi bezonas
ankaŭ ŝlosilon de la loĝejo?

– Tio estas vi kiu bezonas ŝlosilon de la loĝejo, – el-
murmuris Ipolit Matveeviĉ.

– Prenu dudek, dum ne estas malfrue, ĉar mi povas
ŝanĝi la opinion. Uzu mian bonan humoron.

Vorobjaninov jam delonge perdis tiun memfidan as-
pekton, kun kiu li komencis iam serĉon de la brilantoj.

La glacio, kiu ekmoviĝis ankoraŭ en la kortistejo, gla-
cio tondrinta, ŝpaltinta kaj frapiĝinta je granito de la river-

borderaĵo, jam delonge pecetiĝis kaj digelis. La glacio for-
estis jam. Estis vaste disverŝinta akvo, kiu senzorge portis
sur si na Ipolit Matveeviĉ, ĵetante lin de flanko al flanko,
jen batante lin je trabo, jen kunpuŝante lin kun la seĝoj, jen
forportante lin de ili. Ipolit Matveeviĉ sentis neesprimeblan
timon. Ĉio timigis lin. Sur la rivero flosis fatraso, naftaj
restaĵoj, trabatitaj kokejoj, mortaĉa fiŝo, ies terura ĉapo. Ĉu
eble tio estas ĉapo de patro Fjodor, anassimila kaskedeto,
kiun vento deŝiris de li en urbo Rostov? Kiu scias! Fino de
la vojo ne estis videbla. Li, iama gvidanto de la nobelaro,
ne estis puŝata al bordo, tamen li havis nek forton nek
deziron naĝi kontraŭ la fluo.

Lin portis en apertan maron de aventuroj.

Ĉapitro 26

Du vizitoj

Simile al bebo, liberiĝinta el siaj vindotukoj, kiu ĉe-
sante eĉ ne por sekundo kunpremadas kaj liberigas la
vaksajn pugnetojn, movas la piedetojn, elblovas el la buŝo
vezikojn, turnas la kapon, dimensio de kiu ne superas
grandan pomon, vestitan en kufeton, Avesalom Iznurenkov
troviĝis en stato de eterna maltrankvilo. Li movadis la dik-
etajn kruretojn, turnadis la razitan mentoneton, produktis
ho-sonojn, kaj faris per la harozaj manoj tiujn gestojn
kvazaŭ tio estis gimnastiko per kaŭĉukaj elastaĵoj.

Lia vivo estis tre klopoda, li aperis ĉie kaj proponis
ion; impetante sur strato kiel timigita kokino li rapide pa-
rolis voĉe, kvazaŭ prikalkulis asekuron de ŝtona ladteg-
menta konstruaĵo. Esenco de lia vivo kaj agado estis tio ke
li tute ne scipovis okupiĝi pri iu afero, aĵo aŭ penso pli ol
dum unu minuto.

Se lia spritaĵo ne plaĉis, kaj ne elvokis sammomentan ridon, Iznurenkov ne konvinkis la redaktoron, kiel aliaj, ke la spritaĵo estas bona kaj postulas nur, por plena taksado, iom da medito; li tuj proponis alian spritaĵon.

– Kio estas malbona, estas malbona, – diris li, – certe.

En vendejoj Avesalom Vladimiroviĉ efektivigis tiun perturbon, tiel rapide aperis kaj malaperis el vido de konsternitaj vendistoj, tiel energie aĉetis skatolon da ĉokolado, ke kasistino atendis ricevi de li minimume tridek rublojn. Sed Iznurenkov, dancante ĉe la kaso, kaj kaptante la kravaton, kvazaŭ oni sufokas lin, ĵetis sur la vitran breteton ĉifitan trirublaĵon kaj forkuris, danke ŝafblekante.

Se tiu ĉi homo scipovus haltigi sin eĉ por du horoj, tio kaŭzus plej neatenditajn rezultojn.

Povas esti ke Iznurenkov alsidus ĉe tablo kaj verkus bonegan novelon, sed, povas esti, – peton en kason de interhelpo por ricevi senrevenan prunton, aŭ novan punkton en leĝon pri uzo de loĝeja spaco, aŭ libron «Scipovo bone vestiĝi kaj kondukti sin en komunumo».

Sed li ne povis fari tion. La freneze laborantaj piedoj forportis lin, la krajono kiel sago forflugis el liaj moviĝantaj manoj, la pensoj saltadis.

Iznurenkov kuradis en la ĉambro, kaj la sigeloj sur la meblaro tremis kiel orelingoj de dancanta ciganino. Sur la seĝo sidis ridema junulino el limkvartalo.

– Aĥ, aĥ, – kriis Avesalom Vladimiroviĉ, – diece! «Reĝino per la voĉo kaj rigardo festenon sian pompan plivigligas...». Aĥ, aĥ! Alta klaso!.. Vi estas reĝino Margo.

Neion tion komprenanta reĝino el limkvartalo estime ridis.

– Manĝu vi la ĉokoladon, nu, mi petas vin!.. Aĥ, aĥ!.. Ĉarme!

Li ĉiuminute kisis manojn de la reĝino, raviĝis pri ŝia modesta tualetto, ŝovis al ŝi la katon kaj flate demandis:

– Ĉu vere ĝi similas papagon? Leono! Leono! Vera leono! Diru, ĉu ĝi vere estas eksterordinare lanuga? Kaj la vosto! Vosto! Diru, ĉu tio vere estas granda vosto? Aĥ!

Poste la kato flugis en angulon, kaj Avesalom Vladimiroviĉ, preminte la manojn al sia pufa lakta brusto, komencis klinadi sin antaŭ iu trans la fenestron. Subite en lia senprognoza kapo klakis iu valvo, kaj li komencis provoke ŝerci pri fizikaj kaj animaj kvalitoj de sia gastino:

– Diru, ĉu tiu ĉi broĉo vere estas vitra? Aĥ! Aĥ! Kia brilo... Vi blindigis min, je mia vorto!.. Diru, ĉu Parizo vere estas granda urbo? Ĉu vere tie troviĝas turo de Ejfel?.. Aĥ! Aĥ!.. Kiaj manoj!.. Kia nazo!.. Aĥ!

Li ne brakumis la junulinon. Al li estis sufiĉe diri al ŝi komplimentojn. Kaj li diris ilin senĉese. Torento da ili estis interrompita per neatendita apero de Ostap.

La granda kombinanto turnis en la manoj pecon da papero kaj severe esplordemandis:

– Ĉu Iznurenkov loĝas ĉi tie? Ĉu tio estas vi?

Avesalom Vladimiroviĉ maltrankvile pririgardis ŝtonan vizaĝon de la vizitanto. En liaj okuloj li penis tralegi kiuj ĝuste pretendoj estos nun prezentataj: ĉu tio estas mon-puno pro vitro, rompita dum entrampa konversacio, ĉu postulo veni en juĝejon pro ne pripago de la loĝejo, aŭ temas pri abonpago pri gazeto por blinduloj.

– Kio ja okazas, kamarado, – krude diris Bender, – forpelo de fiska kuriero tute ne estas permesata.

– De kiu kuriero? – teruriĝis Iznurenkov.

– Vi mem scias de kiu. Nun ni komencas elveturigi la meblojn. Mi petas vin, civitanino, liberigu la seĝon, – severe diris Ostap.

La civitanino, al kiu oni ĵus legis versaĵojn de plej lirika kaj poetoj, leviĝis de la loko.

– Ne! Sidu! – kriis Iznurenkov, fermante la seĝon per sia korpo. – Ili ne rajtas.

– Pri la rajtoj vi, civitano, pli bone silentus! Oni devas esti konscienca. Liberigu la meblon! Oni devas observi leĝojn!

Kun tiuj vortoj Ostap kaptis la seĝon kaj skuis ĝin en la aero.

– Mi elveturigas la meblojn! – decide deklaris Bender.

– Ne, ne elveturigas!

– Kial ne elveturigas, – mokridetis Ostap, elirante kun la seĝo en la koridoron, – kiam mi ĝuste elveturigas.

Avesalom kisis manojn de la reĝino kaj, klininte la kapon, ekkuris post la severa juĝisto. Tiu jam malleviĝis sur la ŝtuparo.

– Kaj mi diras al vi ke vi ne rajtas. Laŭ leĝo la mebloj povas stari du semajnoj, sed ili staris nur tri tagoj! Povas okazi eĉ ke mi pagos!

Iznurenkov rondkuris ĉe Ostap kiel abelo. Ĉi-maniere ili ambaŭ ekestis sur la strato. Avesalom Vladimiroviĉ kuris post la seĝo ĝis la angulo mem. Tie li ekvidis paserojn, kiuj saltis ĉirkaŭ ĉevalfekaĵoj. Li ekrigardis ilin per la priklariĝintaj okuloj, ekmurmuris, eksvingis la manojn kaj, ridegante, diris:

– Alta klaso! Aĥ! Aĥ.. Kia turniĝo de la temo!

Allogita per prilaboro de la temo, Iznurenkov gaje turniĝis kaj, alsaltante, ekkuris hejmen. Pri la seĝo li rememoris nur hejme, trovinte la junulinon el limkvartalo starantan meze de la ĉambro.

Ostap forveturigis la seĝon per fiakro.

– Lernu, – diris li al Ipolit Matveeviĉ, – la seĝo estas prenita per nudaj manoj. Senpage. Ĉu vi komprenas?

Post dissekco de la seĝo Ipolit Matveeviĉ eksopiris.

– La ŝancoj pligrandiĝas, – diris Ostap, – sed da mono, eĉ ne kopeko. Diru, ĉu eble via mortinta bopatrino ŝatis ŝerci?

– Pri kio vi?

– Eble ekzistas neniuj brilantoj?

Ipolit Matveeviĉ tiel eksvingis la manojn, ke lia jaketeto leviĝis sur li.

– Se tiel, ĉio bonegas. Ni esperu ke havaĵo de Ivanopulo pligrandiĝos nur je unu seĝo.

– Pri vi, kamarado Bender, oni hodiaŭ en ĵurnaloj skribis, – flate diris Ipolit Matveeviĉ.

Ostap sulkigis la brovojn.

Li ne ŝatis kiam ĵurnalaro komencas hurladon ĉirkaŭ lia nomo.

– Pri kio vi parolaĉas? En kiu ĵurnalo?

Ipolit Matveeviĉ solene malfermis na “Stablo”.

– Jen ĉi tie. En fako “Kio okazis dum la tago”.

Ostap iom trankviliĝis, ĉar li timis nur senmaskigajn rubrikojn: “Niaj pingloj” kaj “Fiulojn – sub juĝon”.

Kaj vere, en rubriko “Kio okazis dum la tago” estis presite:

TRAFIS SUB ĈEVALON

Hieraŭ sur Sverdlov-placo sub ĉevalon de koĉero numero 8974 trafis civitano O. Bender. La trafito spertis nur ioman timon.

– Tio estas koĉero kiu spertis ioman timon, – grumble rimarkis O. Bender. – Idiotoj! Verkas ili, verkas, kaj mem ne scias pri kio. Ha! Tio estas “Stablo”. Tre, tre agrable.

Ĉu vi scias, Vorobjaninov, ke tiun ĉi artikoleton oni verkis, eble, sidante sur via seĝo? Amuza historieto!

La granda kombinanto enpensiĝis.

Kaŭzo por viziti la redakcion estis trovita.

Informiĝinte de la sekretario pri tio ke ĉiuj ĉambroj dekstre kaj maldekstre je tuta longo de la koridoro estas okupataj per la redakcio, Ostap prenis aspekton de simplulo, kaj komencis ĉirkaŭiri la redakciajn ĉambrojn: li devis scii en kiu ĉambro troviĝas la seĝo.

Li engrimpis la lokan komitaton, kie jam okazis kunsido de junaj aŭtoŝatantoj kaj, ĉar li tuj rimarkis ke la seĝo tie forestas, ennamadis najbaran ejon. En la kontoro li aspektigis ke atendas rezolucion; en fako de laboristoj-korespondantoj li informiĝis kie ĉi tie, laŭ anonco, estas vendata makulature; en la sekretario li pridemandis kondiĉojn de la abono, kaj en ĉambro de felietonistoj demandis kie oni akceptas anoncetojn pri perdo de dokumentoj.

Tiumaniere li atingis ĉambron de la redaktoro kiu, sidante sur seĝo de la koncesiuloj, trumpetis en la telefonon.

Ostap bezonis tempon por atente lerni la lokon.

– Ĉi tie, kamarado redaktoro, estas publikita pri mi aĉa kalumnio, – diris Bender.

– Kiu kalumnio? – demandis la redaktoro.

Ostap longe malfermadis la ekzempleron de “Stablo”. Retrorigardante la pordon li ekvidis sur ĝi klaklangan seruron. Se detranĉi peceton de la porda vitro, estos simple enigi la manon kaj malfermi la seruron deinterne.

La redaktoro pe-legis la artikoleton, montritan de Ostap.

– Kiun kalumnion vi, kamarado, vidas ĉi tie?

– Kiel ja! Jen tio: “La suferito spertis nur ioman timon”.

– Mi ne komprenas.

Ostap karese rigardis la redaktoron kaj la seĝon.

– Ĉu vere mi timos iun ajn koĉeron! Malhonorigis vi min antaŭ tuta mondo. Oni devas publikigi refuton.

– Jen kio, civitano, – diris la redaktoro, – neniu vin malhonorigis, kaj pro tiuj sensignifaj aferoj ni ne publikigas refutojn.

– Malgraŭ ĉio mi ne lasos tiun ĉi aferon, – diris Ostap, lasante la kabineton.

Li jam vidis ĉion kion bezonis.

Ĉapitro 27

Mirinda prizona korbo

Stargoroda fako de efemera “Glavo kaj plugilo”, kune kun buboj el “Rapidpakado”, faris grandegan vicon ĉe vendejo “Panproduktoj”.

Preterirantoj haltis.

– Por kio la vico? – demandis la civitanoj.

En enuega vico, staranta ĉe vendejo, ĉiam troviĝas homo paroldeziro de kiu estas des pli granda ju pli malproksime li staras de la vendeja pordo. Kaj plej malproksime staris Polesov.

– Ĝisvivis ni, – diris la ĉefestingisto, – post nelonge ĉiuj ni manĝos restaĵojn de olea elpremado. Eĉ en jaro mil-naŭcent-dek-naŭa estis pli bone. Faruno en la urbo sufiĉas nur por kvar tagoj.

Civitanoj nekredeme tordis la lipharojn, disputis kun Polesov, kaj citis na “Stargoroda vero”.

Pruvinte al Polesov ke faruno en la urbo abundas, kaj ke tute ne decas provoki panikon, la civitanoj kuris hejmen, prenis tutan sian monon, kaj aliĝis al la faruna vico.

Buboj el “Rapidpakado”, elaĉetinte tutan farunon en “Panproduktoj”, transiris nutraĵvendejon kaj aranĝis teosukeran vicon.

Post tri tagoj Stargorod okazis kaptita per nutraĵa kaj vara krizo. Reprezentantoj de kooperacio kaj de ŝtatkomerco proponis, ĝis veno de troviĝantaj jam survoje nutraĵoj, limigi vendon de la varoj al unu persono ĝis kvarcent gramoj da sukero kaj tri kilogramoj da faruno.

Sekvonttage estis inventita antidoto.

Unua en vico por sukero staris Alĥen. Post li – lia edzino Saŝĥen, Paŝa Emileviĉ, kvar Jakovleviĉ-oj, kaj ĉiuj dek kvin prizorgitaj maljunulinoj en kalikotaj tualetoj. Pumpinte el la vendejo ĉirkaŭ ok kilogramojn da sukero, Alĥen forkondukis sian vicon en alian kooperativon, insultante dumvoje na Paŝa Emileviĉ, kiu sukcesis formanĝi sian parton da pulvora sukero. Paŝa ŝutis la sukerpulvoron montete sur la manplaton, kaj sendis ĝin en sian vastan buŝegon. Alĥen klopodis tutan tagon. Por eviti la perdojn li elprenis na Paŝa Emileviĉ el vico, kaj uzis lin por transportado de la aĉetaĵoj en la bazon. Tie Alĥen sinĝene revendis la akiritajn sukeron, farunon, teon kaj katunon.

Polesov staris en la vicoj precipe pro principo. Monon li ne havis, do scipovis aĉeti nenion. Li nomadis el vico en vicon, aŭskultis paroladojn, faris sarkasmajn rimarkojn, multsignife levis la brovojn, kaj profetis. Rezulto de lia agado estis tio ke la urbo pleniĝis per onidiroj pri apero de iu konspira organizaĵo, de iu Klavo kaj Flugilo.

Guberniestro Djadjev dum unu tago enspezis dek milojn. Kiom enspezis prezidanto de la borsa komitato Kislarskij sciis eĉ ne lia edzino.

Penso pro tio ke li apartenas al sekreta organizaĵo ne donis trankvilon al Kislarskij. La onidiroj, disvastiĝintaj en

la urbo, pe-timigis lin. Pasinte sendorman nokton, prezidanto de la bursa komitato decidis ke nur sincera konfeso povas mallongigi al li la prizonperiodon.

– Aŭskultu, Henrieta, – diris li al la edzino, – venis jam tempo transporti la ŝtofojn al la bofrato.

– Kio, ĉu oni venos? – demandis Henrieta Kislarskij.

– Oni povas veni. Se en la lando forestas libero de komerco, do oni devas iam ajn enprizonigi min, ĉu?

– Kio do, ĉu mi preparu la tolaĵojn? Malfeliĉa ĝi estas, mia vivo! Ĉiam mi devas portadi la transdonaĵojn. Kial vi ne ekestu soveta oficisto? Jen la bofrato, li estas ano de sindikato kaj, – nenio terura! Sed tiu ĉi nepre devas esti soveta komercisto!

Henrieta ne sciis ke sorto altigis ŝian edzon en rangon de prezidanto de la bursa komitato. Tial ŝi estis trankvila.

– Povas okazi ke mi ne venos noktumi, – diris Kislarskij, – tial vi morgaŭ venu kun la transdonaĵo. Sed bonvolu ne alporti kazeajn knedlikojn. Tio ne estas plezuro manĝi malvarmajn knedlikojn.

– Ĉu vi, eble, prenu kun vi la primuson?

– Ĉu vi opinias ke oni permesos en prizona kamero teni primuson? Donu al mi la korbon.

Ĉe Kislarskij estis speciala prizona korbo. Farita laŭ specifa mendo ĝi estis tute universala. En malfermita stato ĝi prezentis liton, en duonfermita – tableton; krom tio ĝi anstataŭigis ŝrankon: en ĝi estis bretetoj, hokoj kaj kestoj. La edzino metis en la universalan korbon malvarman vespermanĝon kaj freŝajn tolaĵojn.

– Vi povas ne akompani min, – diris la sperta edzo. – Se venos Rubene por peti monon, diru ke mono forestas. Ĝis revido! Rubene povas atendi.

Kaj Kislarskij nehaste eliris en la straton, tenante je la anso la prizonan korbon.

– Kien vi, civitano Kislarskij? – vokis lin Polesov.

Li staris ĉe telegrafa fosto, kaj per alkriroj kuraĝigis komunik-laboriston kiu, kroĉiĝante per la metalaj ungoj je la fosto, proksimiĝis al la izoliloj.

– Mi iras konfesi, – respondis Kislarskij.

– Pri kio?

– Pri glavo kaj plugilo.

Viktor Miĥajloviĉ perdis la parolkapablon. Kaj Kislarskij, eligante antaŭen sian ovsimilan ventreton, zonigitan per vasta someruma zono kun poŝeto por horloĝo, nehaste ekiris en la gubernian prokurorejon.

Viktor Miĥajloviĉ ektrapis per la flugiloj, kaj ekflugis al Djadjev.

– Kislarskij estas provokanto! – kriis la ĉefestingisto. – Li ĵus ekiris denunci. Li estas ankoraŭ videbla.

– Kio? Ĉu li iras kun la korbo? – teruriĝis la stargoroda guberniestro.

– Kun la korbo.

Djadjev kisis la edzinon, kriis ke, se venos Rubene, ŝi ne donu al li monon, kaj haste elkuris sur la straton. Viktor Miĥajloviĉ turniĝis, ekĝemis, kvazaŭ kokino, metinta la ovon, kaj ekkuris al Vladja kaj Nikeŝa.

Dume civitano Kislarskij, nerapide promenante, proksimiĝis al la gubernia prokurorejo. Sur la vojo li renkontis na Rubene, kaj longe konversaciis kun li.

– Sed kio pri la mono? – demandis Rubene.

– Por la mono venu al la edzino.

– Sed kial vi kun la korbo? – suspekta demandis Rubene.

– Mi iras en la banejon.

– Do, bonan banadon al vi.

Poste Kislarskij eniris ŝtatan sukeraĵejon SSPO, iaman “Bonbon de Varsovi”, elmanĝetis tie glason da kafo kaj tavolkuketon.

Venis jam tempo iri penti. Prezidanto de la borsa komitato eniris vestiblon de la gubernia prokurorejo. Tie estis malplene. Kislarskij venis al pordo, sur kiu estis skribite “Gubernia prokuroro”, kaj ĝentile frapetis.

– Eniru! – respondis la voĉo bone konata al Kislarskij.

Kislarskij eniris, kaj haltis mirigita. Lia ovsimila ventreto tuj kolapsis kaj faldiĝis kiel daktilo. Tio kion li ekvidis estis por li plena surprizo.

La skribotablon, ĉe kiu sidis la prokuroro, ĉirkaŭigis anoj de la potenca organizaĵo “Glavo kaj plugilo”. Se juĝi laŭ iliaj gestoj kaj ploraj voĉoj, ili konfesadis pri ĉio.

– Jen li estas, – kriis Djadjev, – plej ĉefa oktobristo!

– Unue, – diris Kislarskij, metante sur la plankon la prizonan korbon, kaj proksimiĝante al la tablo, – unue mi ne estas oktobristo, due, mi ĉiam subtenis sovetian reĝimon, kaj trie, ĉefa estas ne mi, sed kamarado Ĉaruŝnikov, adreso de kiu...

– Ruĝarmea! – kriis Djadjev.

– Numero tri! – ĥore informis Vladja kaj Nikeŝa.

– En la korton kaj maldekstren, – aldonis Viktor Miĥajloviĉ, – mi povas montri.

Post dudek minutoj oni alveturigis na Ĉaruŝnikov, kiu antaŭ ĉio deklaris ke li neniam en sia vivo vidis iun ajn el la ĉeestantoj. Tuj poste, seninterrompe, Ĉaruŝnikov denunciis na Elena Stanislavovna.

Nur en la kamero, ŝanĝinte la subvestojn, kaj etendiĝinte sur la prizona korbo, prezidanto de la borsa komitato eksentis sin libera kaj trankvila.

SinJORino Gricacujeva-Bender sukcesis, dum la krizo, provizi sian butiketon per manĝaj kaj aliaj varoj minimume por kvar monatoj. Trankviliĝinte, ŝi denove eksopiris pri la juna edzo, kiu turmentiĝas en kunsidoj de Sovetia komisarejo. Vizito al la divenistino ne venigis la trankvilon.

Elena Stanislavovna, maltrankviligita per malapero de la tuta stargoroda areopago, metadis la kartojn kun indigna malzorgeco. La kartoj antaŭdiris jen finon de la mondo, jen aldonon al la salajro, jen rendevuon kun la edzo en fiska domo dum ĉeesto de malfavora pika reĝo.

Ankaŭ la divenado mem finiĝis iel strange. Venis agentoj: pikaj reĝoj, kaj forkondukis la profetinion en fiskan domon, al la prokuroro.

Restinte nur kun la papago, la konfuziĝinta vidvino intencis jam foriri, kiam la papago frapis per la beko la kaĝon kaj, unuafoje en sia vivo, ekparolis home.

– Ĝisvivis ni! – diris li sarkasme, kovris la kapon per la flugilo, kaj elŝiris el la akselo plumeton.

Terurigita sinJORino Gricacujeva-Bender ĵetiĝis al la pordo.

Ŝin postsekvis varma senorda parolado. La antikva birdo estis tiel konsternita per vizito de la agentoj kaj forkonduko de la mastrino en fiskan domon, ke komencis elkrii ĉiujn konatajn al ĝi vortojn. Plej gravan lokon en ĝia repertuaro okupis Viktor Miĥajloviĉ Polesov.

– Pro foresto de ĉeesto, – incite diris la birdo.

Kaj, turniĝinte sur la stangeto per la kapo malsupren, ĝi okulumis al la vidvino, frostiĝinta ĉe la pordo, kvazaŭ dirante: «Nu, kiel tio plaĉas al vi, vidvineto?»

– Panjo mia! – elĝemis Gricacujeva.

– En kiu regimento vi servis? – demandis la papago per voĉo de Bender. – Kra-r-r-raĥ... Eŭropo helpos al ni.

Post forkuro de la vidvino la papago aranĝis sur si la falsĉemizon, kaj diris la vortojn kiujn homoj senrezulte penis elŝiri el ĝi dum tridek jaroj:

– Papageto-stultuleto!

La vidvino kuris sur la strato kaj hurlis. Sed hejme ŝin atendis turniĝema maljunuleto.

Tio estis Varfolomeiĉ.

– Laŭ la anonco, – diris Varfolomeiĉ, – du horoj mi atendas, fraŭlino.

Peza hufo de antaŭsento frapis koron de Gricacujeva.

– Ve! – elkantis la vidvino. – Turmentiĝas animeto mia!

– Ŝajnas ke de vi foriris civitano Bender? Ĉu vi publikigis la anoncon?

La vidvino falis sur sakojn da faruno.

– Jen kiom malfortas ĉe vi la organismoj, – dolĉe diris Varfolomeiĉ. – Komence mi volus klariĝi pri la rekompenco...

– Oh!.. Ĉion prenu! Nenion mi bezonas nun! – plendis la sentema vidvino.

– Do jen kio. Al mi estas konata loko kie troviĝas nun via fileto O. Bender. Kio estos la rekompenco?

– Ĉion prenu! – ripetis la vidvino.

– Dudek rublojn, – seke diris Varfolomeiĉ.

La vidvino leviĝis de la sakoj. Ŝi estis malpurigita per la faruno. Ŝiaj farunŝutitaj okulharoj rapide palpebrumis.

– Kiom? – redemandis ŝi.

– Dek kvin rublojn, – malpliigis Varfolomeiĉ la prezon.

Li sentis ke de la malfeliĉa virino estos malfacile elŝiri eĉ tri rublojn.

Premante la sakojn per la piedoj la vidvino atakis la maljunuleton, vokante estiel atestanto ĉielan forton kaj, kun ĝia helpo, albatis akcepteblan prezon.

– Kio ja, je Dio, estu kvin rubloj. Sed mi petas antaŭpagon. Tio estas mia regulo.

Varfolomeiĉ elprenis el la notlibreto du ĵurnalajn eltranĉaĵojn kaj, ne ellasante ilin el la manoj, komencis legi:

– Jen, bonvolu rigardi laŭorde. Vi skribis jenon: «Mi petegas... Foriris el la hejmo kamarado Bender... verda kostumo, flavaj botetoj, blua veŝto...» Ĉu vere? Tio estas “Stargoroda vero”. Kaj jen kion oni publikigas pri via fileto en centraj ĵurnaloj. Jen... «Trafis sub ĉevalon...» Sed vi ne ĉagrenu, *madameto*, aŭskultu vi pluen... «Trafis sub ĉevalon...» Sed vivas li, vivas! Ĉu vere mi prenus monon se li estus morta? Do jen kiel: «Trafis sub ĉevalon. Hieraŭ sur Sverdlov-placo sub ĉevalon de koĉero numero 8974 trafis civitano O. Bender. La trafito spertis nur ioman timon...». Do jen, tiujn ĉi dokumentetojn mi prezentas al vi, kaj vi al mi – la antaŭpagon... Ĉar estas ĉe mi tiu ĉi regulo.

La vidvino plorante fordonis la monon. Edzo, ŝia kara edzo en flavaj botetoj kuŝis sur malproksima moskva tero, kaj elspiranta flamon fiakrista ĉevalo batis per la hufo lian bluan lanan bruston.

Kompatema animo de Varfolomeiĉ kontentiĝis per la deca rekompenco.

Li foriris, klariginte al la vidvino ke aldonajn spurojn de sia edzo ŝi sendube trovos en redakcio de ĵurnalo “Stablo”, kie oni certe scias pri ĉio en la mondo.

LETERO DE PATRO FJODOR,
skribita en Rostov, en taverno “Lakta vojo” al sia
edzino en distriktan urbon No.

Kara mia Katja! Nova ĉagreno trafis min, sed pri tio poste. La monon mi ricevis tre ĝustatempe, pri kio mi kore vin dankas. Post veno na Rostov mi tuj kuris laŭ la adreso. “Novoroscement” estas sufiĉe granda entrepreno, kaj neniu konis tie inĝenieron Bruns. Mi estis jam tute malespera, sed oni helpis al mi per konsilo. Iru, oni diris al mi, en personaran fakon. Iris mi. «Jes,» – oni diris al mi, – «servis ĉe ni tiu ĉi homo, plenumis li gravan taskon, sed», – oni diras, – «pasintjare li foriris de ni. Oni logis lin en urbon Bakuo, por servi en Aznafto, kie li okupiĝos pri akcident-preventado».

Jes, kolombino vi mia, ne tiel mallongas mia vojaĝo kiel ni opiniis. Vi skribas ke la mono finiĝas jam. Kion fari, Katerina Aleksandrovna. Restis jam nelonge atendi la finon. Kolektu la tolerfortojn kaj preĝu al Dio. Vendu mian studentan uniformon. Eĉ ne tiujn elspezojn devos ni toleri. Estu preta al ĉio.

En Rostov ĉio estas terure multekosta. Por ĉambro en hotelo mi pagis 2 rublojn 25 kopekojn. Ĝis Bakuo la mono sufiĉos. De tie, okaze de sukceso, mi sendos telegramon.

Vetero ĉi tie estas varmega. La palton mi portas sur la mano. Lasi ĝin en la ĉambro mi timas: eblas ke oni forŝtelos. Popolo ĉi tie estas nefidinda.

Ne plaĉas al mi urbo Rostov. Per kvanto da loĝantoj kaj per sia geografia situo ĝi signife malavantaĝas al Ĥarkov. Sed kion fari, patrino, se Dio donos, ni kune vizitos Moskvon. Vidos vi tiam tute okcidenteŭropan urbon. Kaj poste loĝos ni en Samaro, apud nia fabriketo.

Ĉu revenis Vorobjaninov? Kie li nun vagadas? Ĉu Evs-tigneev daŭrigas tagmanĝi ĉe ni? Kiel aspektas mia sutano

post la purigado? Ĉe ĉiuj konatuloj subtenu certecon kvazaŭ mi troviĝas ĉe lito de la onklino. Al Gulja skribu samon.

Jes! Preskaŭ forgesis mi rakonti al vi pri teruraĵo kiu okazis al mi hodiaŭ.

Admirante trankvilan riveron Don staris mi ĉe ponto, kaj revis pri nia estonta bonstato. Sed jen ekblovis vento, kaj forportis en la riveron kaskedeton de via frato bakisto. Mala-peris ĝi. Okazis necese toleri novan elspezon: aĉeti anglan kaskedon per 2 rubloj 50 kopekoj. Al frato via, bakisto, rakontu nenion pri la okazaĵo. Konvinku lin ke mi estas en Voroneĵ. Bedaŭrinde problemas la tolaĵoj. Vespere mi lavas ilin kaj, se ne sekiĝis, vestas mi ilin matene malsekajn. Dum nuna varmego tio eĉ agrablas. Kisas kaj brakumas mi vin.

Eterne via, edzo Fedja.

Ĉapitro 28

Kokineto kaj pacifika koketo

Raportisto Persickij aktive pretiĝis al ducent-jariĝo de granda matematikisto Isak Neŭton (Isaac Newton).

Dum kulmino de la laboro eniris Stjopa el “Scienco kaj vivo”. Post li tiriĝis graseta civitanino.

– Aŭskultu, Persickij, – diris Stjopa, – jen civitanino venis. Proksimiĝu, civitanino, tiu ĉi kamarado klarigos al vi.

Stjopa, ridetante, forkuris.

– Nu? – demandis Persickij. – Kion vi diros?

SinJORino Gricacujeva (tio estis ŝi) levis sur la raportiston siajn langvorajn okulojn, kaj silente etendis al li papereton.

– Tiel, – diris Persickij, – ... trafis sub ĉevalon... la trafito spertis nur ioman timon... Do kio estas via problemo?

– Adreson, – pete diris la vidvino, – ĉu eblas ricevi la adreson?

– Kies adreson?

– De O. Bender.

– De kie mi povas scii?

– Sed jen la kamarado diris ke vi scias.

– Nenion mi scias. Turnu vi vin en adresan priservon.

– Sed eble vi rememoros, kamarado? Li vestis flavajn botetojn.

– Mi mem vestas flavajn botetojn. En Moskvo ankoraŭ ducent mil homoj vestas flavajn botetojn. Eble vi deziras koni ankaŭ iliajn adresojn? Tial bonvolu. Mi ĉesos labori kaj okupiĝos pri tiu ĉi afero. Post duonjaro vi scios ĉion. Mi estas okupata, civitanino.

Sed la vidvino, kiu eksentis grandan estimon al Persickij, iris post li sur la koridoro kaj, frapante per la amelita suba jupo, ripetis siajn petojn.

«Kanajlo li estas tiu Stjopa», – pensis Persickij. – «Sed atendu li, mi sendos sur lin inventiston de eterna movigilo, vidu ni kiel saltados li tiam».

– Sed kion mi povas fari? – incite diris Persickij, haltante antaŭ la vidvino. – De kie mi povas scii adreson de civitano O. Bender? Ĉu mi estas tiu ĉevalo kiu surveturis lin? Aŭ la koĉero, kies dorson li frapis en mia ĉeesto?..

La vidvino respondis nur per neklara murmuro, en kiu oni povis kompreni nur «kamarado» kaj «mi tre».

Labortago en Domo de popoloj jam finiĝis. Kancelarioj kaj koridoroj malpleniĝis. Nur ie iu tajpmaŝino ĝisfrapadis la paĝon.

– *Pardon*, madam, vi vidas ja ke mi estas okupata!

Kun tiuj ĉi vortoj Persickij malaperis en necesejo. Promeninte tie dek minutoj li gaje eliris. Gricacujeva paci-

ence skuis la juojn sur angulo de la du koridoroj. Ekvidante na Persickij ŝi denove ekparolis.

La raportisto diablĝis.

– Jen kio, onklino, – diris li, – bone, estu tiel, mi diros al vi kie estas via O. Bender. Iru rekte sur la koridoro, poste turnu dekstren, kaj denove iru rekten. Tie estos pordo. Demandu tie na Ĉerepenikov. Li devas scii.

Kaj, kontenta pri sia elpenaĵo, Persickij malaperis tiel rapide, ke la ameligita vidvino ne sukcesis ricevi de li aldonajn informojn.

Aranĝinte la juojn, madam Gricacujeva ekiris sur la koridoro.

Koridoroj en Domo de popoloj estas tiel longaj kaj malvastaj, ke ĉiuj irantaj sur ili nevole plirapidigas la iron. Laŭ konduto de iranto oni povis diveni kiom ĝi trairis. Se ĝi iras iom pli rapide, tio signifas ke ĝia irado nur komenciĝis. Trairante du aŭ tri koridorojn oni venas al rapideco de meza troto. Kaj iam oni povas vidi homon kurantan ege rapide: li troviĝas en stadio de kvina koridoro. Civitano kiu faris vojon je ok koridoroj povas libere konkuri pri la rapideco kun birdo, kurĉevalo, kaj kun Nurmi, mondĉampiono pri kurado.

Turniĝinte dekstren, madam Gricacujeva ekkuris. Krakis la pargeto.

Renkonte al ŝi rapide iris nigrabarulo en blua veŝto kaj frambokoloraj ŝuoj. Laŭ vizaĝo de Ostap videblis ke la vizito en Domon de popoloj, en tiom malfrua horo, estas elvokita per ekstreme gravaj aferoj de la koncesio. Ŝajnas ke renkonto kun la amatino ne eniris planojn de la teknika gvidanto.

Ekvidinte la vidvineton Bender turniĝis kaj, ne retrorigardante, ekiris laŭ la muro malantaŭen.

– Kamarado Bender, – rave kriis la vidvino, – ja kien vi?

La granda kombinanto plirapidigis la paŝojn. Samon faris ankaŭ la vidvino.

– Atendu, aŭskultu kion mi diros, – petis ŝi.

Sed ŝiaj vortoj ne trafis aŭdosenton de Ostap. En liaj oreloj kantis kaj fajfis vento. Li kuregis jam kvaran koridoron, kaj transsaltis sekciojn de feraj internaj ŝtuparoj. Al sia amatino li lasis nur eĥon, kiu longe ripetis al ŝi la ŝtuparan bruon.

– Nu, dankon, – grumblis Ostap, sidante en kvina etaĝo, – nu, trovis ŝi tempon por la rendevuo. Kiu alsendis ĉi tien tiun ĉi varmegan dameton? Venis jam tempo likvidi moskvan filion de la koncesio, ĉar se ne, al mi, gardu Dio, alveturos la husaro-solulo kun motoro.

Dume madam Gricacujeva, dividita de Ostap per tri etaĝoj, milo da pordoj, kaj deko da koridoroj, viŝis per basko de la suba jupo la varmiĝintan vizaĝon, kaj komencis la serĉojn. Komence ŝi volis kiom eble rapide trovi la edzon kaj interkompreniĝi. En la koridoroj eklumis nehelaj lampoj. Ĉiuj lampoj, ĉiuj koridoroj kaj ĉiuj pordoj estis samaj. La vidvino eksentis timon. Ŝi volis jam foriri.

Subiĝante al la koridora progresio ŝi impetis kun ĉiam pli grandiĝanta rapideco. Post duonhoro ŝi jam ne povis halti. Pordoj de prezidantejoj, sekretariejoj, lokaj komitatoj, organizaj fakoj kaj redakcioj, kun bruego flugis ambaŭflanke de ŝia grandampleksa korpo. Per siaj feraj jupoj ŝi renversis rubujojn por cigaredstumpoj. La rubuoj ruliĝis post ŝiaj spuroj kun kaserola bruo. En anguloj de la koridoroj estiĝis ciklonoj kaj vorticoj. Frapadis malfermiĝintaj ventolfenestretoj. La kompatindan pasantinon pikis montrantaj fingroj, farbitaj per ŝablono sur la muroj.

Fine Gricacujeva trafis placeton de interna ŝtuparo. Tie estis mallume, sed la vidvino superis la timon, dekuris soben kaj ŝiris la vitrigitan pordon. La pordo estis ŝlosita. La vidvino ĵetiĝis reen. Sed ankaŭ la pordo, kiun ŝi ĵus trairis, okazis jam ŝlosita per ies zorgema mano.

En Moskvo oni ŝatas ŝlosi pordojn.

Miloj da ĉefenirejoj estas najligitaj de interne per tabuloj, kaj cent-miloj da civitanoj penetras siajn loĝejojn per eniroj malĉefaj. Jam delonge pasis revolucia 1918-a jaro, delonge jam perdis sian klarecon termino “surloĝeja rab-atako”, malaperis tutdomaj gardaroj, organizitaj per la loĝantoj en celo de sekureco, solviĝas problemoj de urb-rafika regulado, konstruatas enormaj elektrostacioj, efektivigis gravegaj sciencaj malkovroj, sed forestas homo kiu dediĉus sian vivon por solvi problemon de fermitaj pordoj.

Kiu li estas, la homo kiu solvos enigmon de kinejoj, teatroj kaj cirkoj?

Tri mil homoj devas dum dek minutoj eniri cirkon tra unusola pordo, malfermita nur per unu el du siaj klapoj. Aliaj dek pordoj, speciale adaptitaj por tralaso de grandaj homamasoj, estas fermataj. Kiu scias kial ili estas fermataj? Eblas ke antaŭ dudek jaroj el la cirka ĉevalejo oni ŝtelis instruitan azeneton, kaj de tiam la estraro time masonigas oportunajn en- kaj el-irojn. Aŭ, eble, iam estis trablovita fama reĝo de aero, kaj la fermataj pordoj estas nur reeĥo de skandalo, okazita per la reĝo.

En teatroj kaj kinejoj oni ellasas publikon nur per ne-grandaj kvantoj, kvazaŭ por eviti ŝtopiĝojn. Sed eviti la ŝtopiĝojn estas tre simple: oni devas nur malfermi la pordojn, kiuj abundas. Sed anstataŭ tio la administraro agas

uzante forton. La servantaro, interkroĉiginte la manojn, aranĝas vivan barilon, kaj tiamaniere tenas la publikon en sieĝo ne malpli ol duonhoron. Kaj la pordoj, revataj pordoj, ŝlositaj eĉ ĉe Pavel la unua, restas ŝlosataj ĝis nun.

Dek-kvin-milo da futbol-ŝatantoj, ekscititaj per brava ludo de Moskva reprezenta teamo, estas devigataj penetri al la tramoj tra fendo ĝis tiom malvasta, ke unu leĝere armita batalanto povus teni ĉi tie kvardek mil barbarojn, posedantajn du sieĝajn turojn.

Stadiono ne havas plafonon, sed ĝi havas kelkajn pordegojn. Neŝlosita estas nur unu el ili. Eliri oni povas nur trarompinte la pordegojn. Post ĉiu granda konkuro oni rompas ilin. Sed, zorge plenumante la sanktan tradicion, oni ĉiufoje akurate restaŭras ilin kaj zorgeme ŝlosas.

Se tute ne eblas instali pordon (tio okazas kiam for- estas tio sur kion oni pendigu ĝin), oni uzas kaŝajn pordojn de ĉiuj specoj:

1. Barilojn.
2. Pikdraton.
3. Renversitajn benkojn.
4. Gardajn surskribojn.
5. Ŝnurojn.

Bariloj estas vaste uzataj en organizaĵoj.

Per ili oni baras vojon al bezonata oficisto. Vizitanto kiel tigro iradas laŭ la barilo, per signoj penante rimarkigi sin. Tio sukcesas ne ĉiam. Sed eblas ke la vizitanto alportis utilan inventon! Aŭ ĝi simple volas pagi la enspezimposton! Sed la barilo malhelpis: la invento restis nekonata, kaj la imposto – ne pagita.

Pikajn dratojn oni uzas sur stratoj.

Oni metas ilin printempe, sur brua magistralo, kvazaŭ por riparo de la trotuaro. Kaj tuj la brua strato dezertiĝas.

La piedirantoj penetras bezonatajn al ili lokojn per aliaj stratoj. Ili devas ĉiutage fari superfluan kilometron, sed facilflugila espero ne lasas ilin. Pasas la somero. Velkas foliaro, sed la pikdratoj daŭriĝas stari. La riparo ne estas plenumita. Kaj la strato dezertas.

Per renversitaj parkaj benkoj oni baras enirojn en moskvajn skvarojn kiuj, pro nepardonebla malzorgo de la konstruantoj, ne estas provizitaj per fortikaj pordegoj.

Pri gardaj surskriboj oni povus verki plenan libron, sed tio ne eniras nun planojn de la aŭtoroj.

Ekzistas du specoj de tiuj ĉi surskriboj: rektaj kaj nerektaj.

Al la rektaj oni povas atribui:

ENIRO MALPERMESATAS

AL EKSTERAJ PERSONOJ ENIRO MALPERMESATAS

ENIRO FORESTAS

Tiujn surskribojn oni pendigas iam sur pordoj de institucioj precipe ofte vizitataj per publiko.

Nerektaj surskriboj estas plej insidaj. Ili ne malpermesas eniron, sed malofta kuraĝulo riskos malgraŭ tio ekuzi sian rajton. Jen ili estas, tiuj ĉi malhonoraj surskriboj:

SEN INVITO NE ENIRU

ONI NE AKCEPTAS

PER VIA VIZITO VI MALHELPAS AL OKUPATA PERSONO

Kie ne eblas meti barilojn aŭ pikdratojn, renversi benkojn aŭ pendigi surskribon, tie oni instalas ŝnurojn. Oni dispendigas ilin laŭ inspiro, en plej neatenditaj lokoj. Se ili pendas sur alto de homa brusto, la afero finiĝas per timeto kaj iom nerva rido. Sed sama ŝnuro, instalita sur alto de maleoloj, povas kripligi homon.

Al diablo pordojn! Al diablo vicojn ĉe teatraj enirejoj!
Permesu eniri sen invito! Ni petegas forigi la pikdratojn,
metitajn per maldiligenta domestro ĉe sia kripligita trotuaro!
For la renversitajn benkojn! Restarigu ilin sur la lokojn!
En skvaro agrablas sidi ĝuste nokte. La aero estas pura,
kaj en la kapon penetras saĝaj pensoj!

Madam Gricacujeva, sidante sur ŝtuparo ĉe la ŝlosita
vitra pordo en mezo mem de Domo de popoloj, pensis pri
sia vidvina sorto, iam dormetis, kaj atendis la matenon.

Sur la vidvinon, tra vitra pordo de lumigita koridoro,
fluis flava lumo de elektraĵ lampoj. Cindra mateno enpenetris
tra fenestroj de la ŝtuparejo.

Estis trankvila horo kiam la mateno estas ankoraŭ
juna kaj pura. Ĉi-hore Gricacujeva ekaŭdis paŝojn en la
koridoro. La vidvino vigle leviĝis, kaj premiĝis al la vitro.
En fino de la koridoro ekbriletis la blua veŝto. La frambokoloraj
ŝuoj estis polvigitaj per stukaĵo. La frivola filo de
turka civitano proksimiĝis al la vitra pordo, deskuante
polveron de la jako.

– Zizelo! – vokis la vidvino. – Zize-e-elo!

Ŝi spiris sur la vitron kun neesprimebla tenero. La vitro
nebuliĝis kaj fermiĝis per ĉielarkaj makuloj. En la nebulo
kaj ĉielarkoj brilis bluj kaj ĉielarkaj fantomoj.

Ostap ne aŭdis kukuojn de la vidvino. Li gratetis la
dorson, kaj zorge turnadis la kapon. Nur unu sekundo, kaj
li malaperus post la angulo.

Kun ĝemo «Kamarado Bender!» la malfeliĉa edzino
ektamburis la vitron. La granda kombinanto retrorigardis.

– Ha, – diris li, vidante ke de la vidvino li estas dividita
per la fermita pordo, – ĉu ankaŭ vi estas ĉi tie?

– Ĉi tie, ĉi tie, – ĝoje ripetadis la vidvino.

– Do brakumu min, ĝojo mia, ja ni tiel longe ne renkontiĝis, – invitis la teknika direktoro.

La vidvino ekvantis. Ŝi saltetis post la pordo kiel birdeto en la kaĝo.

La jupoj, trankviliĝintaj dum la nokto, denove ektondris. Ostap disigis la manojn por la brakumo.

– Kial vi ne iras al mi, mia kokinetto? Via pacifika koketo tiel laciĝis en kunsidoj de Sovetia Popola Komisarejo.

La vidvino estis senigita je fantazieco.

– Zizelo, – diris ŝi kvinan fojon. – Malfermu al mi la pordon, kamarado Bender.

– Pli mallaŭte, fraŭlino! Virinon plibeligas modesteco. Por kio tiuj ĉi saltadoj?

La vidvino suferis.

– Sed kial vi turmentas vin? – demandis Ostap. Kio malhelpas al vi vivi?

– Mem forveturis, kaj mem demandas!

Kaj la vidvino ekploris.

– Viŝu viajn okuletojn, civitanino. Ĉiu via larmeto estas molekulo en kosmo.

– Sed mi atendis, atendis, la vendadon fermis. Al vi mi veturis, kamarado Bender...

– Kaj kiel vi fartas nun sur la ŝtuparo, ĉu ne trablovas vin?

La vidvino, kiel granda monaĥeja samovaro, poiome komencis boli.

– Perfidulo! – diris ŝi, treminte.

Ĉe Ostap estis ankoraŭ iom da libera tempo. Li ekk-lakis per la fingroj kaj, ritme balanciĝante, mallaŭte pekantis:

Alloga fort' de in'
similas al benzin'.
Pro eta spark' de l' am'
eksplodas brusta flam'.

– Krevu vi, malĉastulo! – ekdeziris la vidvino post plenumo de la danco. – La braceleton vi ŝtelis, donacon de la edzo. Kaj la seĝon, por kio vi forprenis ĝin?

– Ŝajnas ke vi ekparolis persone? – malvarme rimarkis Ostap.

– Forŝtelis, forŝtelis! – ripetis la vidvino.

– Jen kio, junulino: enigu en vian kapeton ke Ostap Bender ŝtelis nenion kaj neniam.

– Kaj kiu prenis la kribrileton?

– Ha, kribrileton! Ĉu el via nelikvida fonduso? Kaj tion vi opinias ŝtelo? Ĉi-okaze niaj vidpunktoj pri vivo estas diametre kontraŭaj.

– Forportis, – kukuis la vidvino.

– Se juna sana homo prunteprenas ĉe provinca avino kuirejan aĵon, nebezonatan al ŝi pro la fizika malforteco, do li estas ŝtelisto? Ĉu oni tiel komprenu vin?

– Ŝtelisto, ŝtelisto!

– Ĉi-okaze ni devas disiĝi. Mi konsentas pri la divorco.

La vidvino ĵetis sin sur la pordon. La vitroj ekstremis. Ostap komprenis ke indas foriri.

– Ni ne havas tempon por brakumadoj, – diris li, – adiaŭ, amatino mia! Ni disiras kiel ŝipoj en maro.

– Polico!! – kriegis la vidvino.

Sed Ostap estis jam en fino de la koridoro. Li ekstaris sur fenestra breto, peze alsaltis la malsekan post la nokta pluvo teron, kaj malaperis en la brilanta skvaro.

Al krioj de la vidvino altreniĝis vekiĝinta gardisto. Li ellasis la malliberulinon, minacante ŝin pri monpuno.

Ĉapitro 29

Aŭtoro de “Gavrilado”

Kiam madam Gricacujeva lasis la negasteman tendaron de la kancelarioj, al Domo de popoloj jam fluis laborantoj de plej modestaj rangoj: kurieroj, enir- kaj elir-paperaĵfraŭlinoj, deĵoraj telefonistinoj, junaj helpantoj de librotenisistoj, kaj lernoknaboj.

Inter ili moviĝis Nikifor Lapis, tre juna homo kun ŝafa hararango kaj nemodesta rigardo.

Profanoj, obstinuloj kaj unuafojaj vizitantoj eniris Domon de popoloj tra la ĉefa enirejo. Nikifor Lapis penetris la konstruaĵon tra la dispensario. En Domo de popoloj li sentis sin kiel en propra hejmo, kaj sciis plej mallongajn vojojn al oazoj kie lirlas klaraj fontoj de honorarioj sub vastfolia ombro de departementaj revuoj.

Antaŭ ĉio Nikifor Lapis vizitis la kantonon. La nikelizita kasregistriilo plenumis dancmelodion matĉiŝ, kaj elĵetis tri kvitancojn. Nikifor pe-manĝis jogurton, malferminte la paperkovrilon de la glaso, kaj kremman kuketon, similan al florbedeto. Ĉion ĉi li posttrinkis per teo. Poste Lapis komencis nehaste ĉirkaŭiri siajn posedejojn.

Unuan viziton li faris en redakcion de ĉiumonata ĉasista revuo **“Gerasim kaj Mumu”**³¹. Kamarado Napernikov ankoraŭ ne venis, do Nikifor Lapis ekmoviĝis na “Higroskopio informilo”, ĉiumonatan parolilon, per kiu farmaciistoj komunikadas kun ekstera mondo.

31. **“Gerasim”** (kamparano) kaj **“Mumu”** (hundeto) estas protagonistoj de unu novelo far Turgenev (li estis ĉas-ŝatanto).

– Bonan matenon, – diris Nikifor. – Mi verkis rimarkindajn versaĵojn.

– Pri kio? – demandis estro de la literatura paĝeto. – Kio estas la temo? Vi ja scias, Trubeckoj, ke nia revuo...

La estro, por pli subtile difini esencon de “Higroskopia informilo”, ekmovis la fingrojn.

Trubeckoj-Lapis ekrigardis sian pantalonon el blanka velŝtofo, klinis la korpon malantaŭen kaj kante diris:

– “Balado pri gangreno”.

– Interese, rimarkis la higroskopia persono. – Jam de longe venis tempo popularigi ideojn de profilaktiko.

Lapis senprokraste ekdeklamis:

Gavrilo pri gangren’ suferis,

Gavrilon trafis la gangren’...

Kaj poste, per sama bravula kvarjambo, estis rakontite pri Gavilo, kiu pro sia malklereco ne vizitis ĝustatempe apotekon, kaj pereis pro tio ke ne ŝmiris la vundeton per jodo.

– Vi progresas, Trubeckoj, – aprobis la redaktoro, – sed dezirindus io eĉ pli... Ĉu vi komprenas?

Li ekmovadis la fingrojn, sed la timigan baladon prenis, promesante pagi marde.

En revuo “Ĉiutagaĵoj de telegrafisto” oni renkontis na Lapis gastame.

– Bone ke vi venis, Trubeckoj. Ĝuste nun ni bezonas versaĵojn. Sed: ĉiutagaĵo, ĉiutagaĵo, ĉiutagaĵo. Neniun lirikon. Ĉu vi komprenas, Trubeckoj? Ion el vivo de poŝtlaboristoj kaj, samtempe, ĉu vi komprenas?..

– Ĝuste hieraŭ mi pensis pri ĉiutaga vivo de poŝtlaboristoj. Kaj tio transformiĝis en poemon. Ĝi nomiĝas: “La lasta letero”. Jen...

Gavrilo servis en poŝtejo,
Leterojn disportadis li...

Historio pri Gavrilo estis enigita en sepdek du liniojn. Fine de la versaĵo leterportisto Gavrilo, trafita per kuglo de faŝisto, tamen venigas la leteron al la adresato.

– Sed kie okazis la afero? – oni demandis na Lapis.

La demando estis trafa. En Sovetio forestas faŝistoj, kaj eksterlande forestas Gavrilo, ano de poŝtist-sindikato.

– Kio ja? – diris Lapis. – Tio certe okazis ĉe ni, kaj la faŝisto estas alivestita.

– Ĉu vi scias, Trubeckoj, pli bone verku al ni pri radiostacio.

– Kaj kial vi ne volas la leterportiston?

– Kuŝu ĝi. Ni prenas ĝin kondiĉe.

Malgajiĝinta Lapis-Trubeckoj denove ekiris en “Gerasim kaj Mumu”. Napernikov jam sidis ĉe sia tablo. Sur la muro pendis pligrandigita portreto de Turgenev kun nazumo, en marĉaj botoj, kaj kun dutuba fusilo en la manoj. Apud Napernikov staris konkuranto de Lapis: versaĵfaranto el limkvartaloj.

Komenciĝis malnova kanto pri Gavrilo, sed jam kun ĉasista inklino.

La verko nomiĝis “Preĝo de ŝtelĉasisto”.

Gavrilo ĉasis en arbaro,
Leporon pafmortigis li.

– Tre bone! – diris bonkora Napernikov. Vi, Trubeckoj, per tiu ĉi versaĵo superis eĉ na Entiĥ mem. Sed oni devas ion korekti. Unue elradikigu na “preĝo”.

– Kaj la leporon, – diris la konkuranto.

– Kial ja leporon? – miris Napernikov.

– Ĉar ne estas la sezono.

– Ĉu vi aŭdas, Trubeckoj, ŝanĝu ankaŭ la leporon.

La poemo en la ŝanĝita formo ricevis nomon “Puno al kaŝĉasisto”, kaj la leporo estis anstataŭigitaj per galinagoj. Poste okazis ke ankaŭ galinagojn oni ne ĉasas somere. En rezulta formo la versaĵo aspektis tiel:

Gavrilo kaŝe ĉasis birdon.

Gavrilo pafe trafis ĝin... k.t.p.

Post la matenmanĝo en la kantino Lapis denove komencis labori. Lia blanka pantalono intermitis en malumo de la koridoroj. Li eniris redakciojn kaj vendis multvi-zaĝan Gavrilo. En “Kooperativa fluto” oni prenis Gavrilon sub nomo “Eola fluto”.

Gavrilo en vendej’ laboris.

Vendadis tie flutojn li...

Simpluloj el dika revuo “Forstisto” aĉetis de Lapis ne-grandan poemon “Ĉe arbar-rando”. Ĝi komenciĝis tiel:

Gavrilo en arbaro iris,

Bambuon tie hakis li.

Lasta ĉi-tage Gavrilo okupiĝis pri panbakado. Lokon por ĝi li trovis en redakcio de “Bulk-laboristo”. La poemo havis longan kaj malgajan nomon: “Pri pano, kvalito de la produktaĵo, kaj pri la amatino”. La poemo estis dediĉita al enigma Ĥina Ĉlek. Komenco estis same eposa:

Gavrilo servis en bakejo,

Bakadis tie bulkojn li...

La dediĉon, post delikata lukto, oni forigis.

Plej malgaja estis tio ke Lapis nenie ricevis monon. Iuj promesis doni merkrede, aliaj – ĵaŭde aŭ vendrede, post du semajnoj. Por prunti monon ekestis necese iri en tendaron de malamikoj: tien kie na Lapis oni publikigis neniam.

Lapis malleviĝis de la kvina etaĝo la duan, kaj eniris sekretariejon de "Stablo". Tuj, malfeliĉe por li, li kunpuŝiĝis kun laboregulo Persickij.

– Ha! – kriis Persickij. – **Lapsus**³²!

– Aŭskultu, – diris Nikifor Lapis, mallaŭtigante la voĉon, – donu al mi tri rublojn. "Gerasim kaj Mumu" ŝuldas al mi tre multe da mono.

– Duonrublon mi donos al vi. Atendu. Mi tuj revenos.

Kaj Persickij revenis, alkondukinte dekon da kunlaborantoj de "Stablo".

Komenciĝis komuna konversacio.

– Nu, kiel vi komercadas? – demandis Persickij.

– Mi verkis rimarkindajn versaĵojn!

– Ĉu pri Gavrilto? Ĉu ion kamparanan? «Gavrilto plugis frumatene, plugilon ege ŝatis li». Ĉu?

– Kio estas Gavrilto! Tio ja estas nura fuŝaĵo, – defendis sin Lapis. – Mi verkis pri Kaŭkazo.

– Ĉu vi estis en Kaŭkazo?

– Post du semajnoj mi veturos tien.

– Ĉu vi ne timas, Lapsus? Ja tie estas ŝakaloj!

– Tio tute ne timigas min! En Kaŭkazo ili ne estas venenaj!

Post tiu respondo ĉiuj streĉiĝis.

– Diru, Lapsus, – demandis Persickij, – kiaj, laŭ vi, ili estas?

– Ja scias mi, lasu!

– Do diru, se vi scias!

– Nu, tiaj... similaj al serpento.

– Jes, jes, kiel ĉiam vi pravas. Selon de sovaĝa kaprino, laŭ vi, oni metas sur tablon kune kun piedingo.

32. **lapsus**: latine (kaj ruse) "misdiro, ridinda eraro".

– Neniam mi diris tion! – kriis Trubeckoj.

– Vi ne diris. Vi skribis. Napernikov diris al mi ke vi penis vendi al li tiun ĉi versaĵaĉon por “Gerasim kaj Mumu”, kvazaŭ el vivo de ĉasistoj. Diru honeste, Lapsus, kial vi verkas pri tio kion vi vidis neniam en via vivo, kaj pri kio vi havas tute neniun komprenon? Kial ĉe vi, en versaĵo “Kantón”, pelerino estas bala robo? Kial?!

– Vi estas filistro, – diris Lapis fanfarone.

– Kial ĵokeo ĉe vi, en versaĵo “Vetgalopado” fiksas sur la ĉevalon koljungon, kaj post tio sursidas la antaŭan benkon? Ĉu vi vidis koljungon kaj antaŭan benkon en vetgalopadoj? Ĉu vi vizitis vetgalopadojn?

– Oni tute ne bezonas viziti ĉion! – kriis Lapis. Puŝkin verkis versaĵojn pri Turkio, sed neniam vizitis ĝin.

– Ho jes, Erzerum troviĝas en Tula gubernio.

Lapis ne komprenis la ironion. Li varme daŭrigis:

– Puskin verkis laŭ materialoj. Li legis historion de Pugaĉov-ribelo, kaj poste verkis pri ĝi. Kaj pri vetgalopadoj Entiĥ rakontis al mi ĉion.

Post tiu ĉi majstra defendo Persickij ektiris kontraŭantan Lapis en najbaran ĉambron. La spektantoj sekvis ilin. Tie sur muro pendis granda ĵurnal-eltranĉaĵo, borderita funebre.

– Ĉu vi verkis tiun ĉi rakonton por “Ŝipestra ponteto”?

– Jes, mi.

– Tio, ŝajne, estas via unua proza verko? Mi gratulas vin! «Ondoj transruliĝis la moleon, kaj falis soben kiel impeta kriko...». Nu, vi faris tre gravan servon al “Ŝipestra ponteto”. La “ponteto” longe memoros vin, Lapis!

– Pri kio vi?

– Temas pri tio ke... Ĉu vi scias kio estas kriko?

– Certe mi scias, lasu min...

- Kiel vi imagas krikon? Priskribu ĝin per viaj vortoj.
- Ĝi estas tia... Falas ĝi, unuvorte.
- Kriko falas. Ĉiuj rimarku tion! Kriko impete falas!

Atendu, Lapsus, nun mi alportos al vi duonrublon. Ne for-lasu lin!

Sed ankaŭ ĉi-foje la duonrublo ne estis donita. Persickij altiris el la inform-fako dudek-unuan volumon de Brokhaus-enciklopedio, de Domicij ĝis Evreinov. Inter Domicij, kio estas fortikaĵo en granda dukejo Meklenburg-Ŝverin kaj Domel, rivero en Belgio kaj Nederlando, estis trovita la serĉata vorto.

– Aŭskultu! «Kriko (germane Daumkraft) – unu el aparatoj por levo de signifaj pezaĵoj. Ordinara simpla kriko, uzata por levo de ĉaroj ktp, konsistas el movebla dentigita stango, ligita kun dentorado, turnigata per tenilo...». Kaj tiu ĉi aparato, laŭ vi, kapablas impete fali, ĉu? Kial vi fuŝas, anstataŭ lerni? Respondu!

– Mi bezonas monon.

– Sed vi neniam havas ĝin. Vi konstante vagas por trovi duonrublon.

– Mi aĉetis meblon, kaj tial eliris el la buĝeto.

– Ĉu multe da meblaro vi aĉetis? Ja oni pagas pro viaj fuŝverkoj tiom kiom ili kostas: groŝojn!

– Pri kio vi! En aŭkcio mi aĉetis tian seĝon...

– Ĉu en formo de serpento?

– Ne. El palaco. Sed min trafis malfeliĉo. Hieraŭ nokte mi revenis hejmen...

– Ĉu de Ĥina Ĉlek? – kriis la ĉeestantoj unuvoĉe.

– Ĥina... Kun Ĥina mi jam ne vivas. Mi revenis de disput-prezentado de Majakovskij. Venas mi. La fenestro estas malfermata. Mi tuj eksentis ke io okazis.

– Aj-aj-aj! – diris Persickij, fermante la vizaĝon per la manoj. – Mi sentas, kamaradoj, ke de Lapsus oni forŝtelis lian plej bonan ĉefverkon: «Gavrilo estis purigisto, per balail’ ŝvingadis li».

– Donu al mi pe-rakonti. Mirinda huliganado! En mian ĉambron engrimpis iuj aĉuloj, kaj distranĉis tutan tegaĵon de la seĝo. Ĉu iu pruntos al mi kvinrublaĵon por la riparo?

– Por la riparo verku novan Gavrilon. Mi povas eĉ diri la komencon. Atendu, atendu... Jen: «Malbonis seĝo ĉe Gavrilo, aĉetis novan seĝon li». Rapidu registri. Tion oni povas profite vendi al “Voĉo de komodo”.

Ĉapitro 30

En teatro “Kolumbo”

Ipolit Matveeviĉ poiome iĝis flataĉulo. Kiam li rigardis na Ostap, liaj okuloj akceptis bluan ĝendarman subtonon.

En ĉambro de Ivanopulo estis tiel varme, ke sekiĝintaj seĝoj de Vorobjaninov kraketis kiel brulaĵo en kameno. La granda kombinanto ripozis, metinte sub la kapon la bluan veŝton.

Ipolit Matveeviĉ rigardis en fenestron. Tie, sur kurbaĵoj, preter etaj moskvaj ĝardenoj, hastis blazonigita kupea kaleŝo. En ĝia nigra lako unu post alia respegulis kline salutantaj paŝantoj: imperiestra gvardiano kun kupra kapo, urbaj damoj, kaj pufaj blankaj nubetoj. Ruinigante la pavimon per siaj hufferoj, la ĉevaloj impetis la kaleŝon. Ipolit Matveeviĉ deturniĝis seniluziita.

La kaleŝo portis sur si blazonon de Moskva Komunuma Mastrum-entrepreno, estis destinita por transportado de rubaĵoj, kaj ĝiaj tabulaĵoj muroj respegulis nenion.

Sur la koĉera benko sidis brava maljunulo kun pufa griza barbo. Se Ipolit Matveeviĉ sciis ke la koĉero estas neniu alia ol grafo Aleksej Bulanov, la fama husaro-ermito, li verŝajne alvokus la maljunulon por konversacii kun li pri la ĉarma iama tempo.

Grafo Aleksej Bulanov estis tre zorgita. Vipante la ĉevalojn, li malgaje meditis pri la burokratismo kiu korodas la sanitar-servan subfakon, pro kio al la grafo oni jam duonjaro ne eldonis antaŭtukon, disponendan laŭ la sindikat-kontrakto.

– Aŭskultu, – diris subite la granda kombinanto, – kiel oni nomis vin infanaĝe?

– Por kio vi?

– Ja tiel! Mi ne scias kiel nomi vin. Nomi vin Vorobjaninov estas jam tede al mi, kaj – Ipolit Matveeviĉ, – tro acide. Do kiel oni nomis vin? Ĉu Ipa?

– Kisa, – respondis Ipolit Matveeviĉ, ridetante.

– Bonege. Do, Kisa, – bonvolu rigardi kio estas ĉe mi sur la dorso. Mi sentas doloron inter la skapoloj.

Ostap demetis trans la kapo la ĉemizon “vakero”. Antaŭ Kisa Vorobjaninov aperis vasta dorso de provinca Antinoo. La dorso estis ĉarma laŭ la formo, sed iom malpureta.

– Ho, – diris Ipolit Matveeviĉ, – ĉi tie estas iu ruĝaĵo.

Inter skapoloj de la granda kombinanto violkoloris kaj naŭte ĉielarkis bluaĵoj de stranga formo.

– Je mia vorto, cifero ok! – kriis Vorobjaninov. – Unuafoje vidas mi tian bluaĵon.

– Ĉu estas ankaŭ iu alia cifero? – trankvile demandis Ostap.

– Io simila al litero Po.

– Aliajn demandojn mi ne havas. Ĉio klaras. Malbenita skribilo! Ĉu vi vidas, Kisa, kiel mi suferas, al kiuj danĝeroj mi submetiĝas pro viaj seĝoj. Tiujn ĉi aritmetikajn signojn kaŭzis al mi la granda memfalanta plumingo kun plumo numero okdek ses. Mi devas menciigi ke la malbenita skribilo falis sur mian dorson en tiun momenton kiam mi enigis la manojn en internon de la redaktora seĝo. Sed vi, nenion vi fakte scipovas. Kiu difektigis seĝon de Iznurenkov tiel ke mi poste devis laboregi pro vi? Pri la aŭkcio mi eĉ ne parolas. Trovis vi tempon por virhundaĉado! En via aĝo estas jam malutile virhundaĉi! Gardu vian sanon!.. Sed mi estas tute alia kazo! Seĝon de la vidvino prilaboris mi. Du seĝojn de Sĉukin-familio – ankaŭ mi. Ankaŭ seĝon de Iznurenkov prilaboris mi! En la redakcion kaj al Lapis iris mi! Nur unusolan seĝon vi venigis ĝis venka fino, sed ankaŭ ĝin – kun helpo de nia sankta malamiko – ĉefepiskopo.

Neaŭdeble paŝante en la ĉambro per la nudaj piedoj, la teknika direktoro instruis obeeman Kisa.

La seĝo, malaperinta en vara korto de Oktobra stacidomo kiel antaŭe restis nigra makulo sur brila plano de la koncesiaj laboroj. Kvar seĝoj en teatro Kolumbo estis certa trafajo. Sed la teatro forveturis en vojaĝon sur rivero Volgo per lota vaporŝipo “Skrjabin”, kaj hodiaŭ ĝi prezentis premieron de “Geedziĝo” estiel lastan spektaklon de la sezono. Oni devis decidi: ĉu resti en Moskvo por serĉi la seĝon malaperintan en vastaĵoj de Kalanĉevskaja-placo, aŭ veturi kune kun la trupo en la turneon. Ostap inklinis al la lasta.

– Sed eble ni disiĝu? – demandis Ostap. – Mi veturu kun la teatro, kaj vi restu kaj serĉu la seĝon en la vara korto.

Sed Kisa tiel timide palpebrumis per la grizaj okulharoj, ke Ostap ne daŭrigis.

– El du leporoj, – diris li, – oni elektas kiun estas pli grasa. Veturu ni kune. Sed elspezoj estos grandaj. Bezonatos mono. Ĉe mi restis sesdek rubloj. Kaj ĉe vi? Ho, mi forgesis! En via aĝo junulina amo kostas tiel multe! Mi decidas: hodiaŭ ni iras en la teatron spekti premieron de "Geedziĝo". Ne forgesu vesti la frakon. Se la seĝoj estas ankoraŭ tie, se oni ne vendis ilin por pripagi ŝuldojn al sociala asekuro, do ni forveturas morgaŭ. Memoru, Vorobjaninov, venas lasta akto de komedio "Trezojoj de mia bopatrino". Proksimiĝas finita-la-komedio, Vorobjaninov! Ne spiru, mia malnova amiko! Ĉiujn rigardojn sur la scenejon! Ho mia juneco! Hoodoro de kulisoj! Kiom da rememoroj! Kiom da intrigoj! Kiom da talento mi prezentis siatempe en rolo de Hamleto! Unuvorte, la kunsido daŭriĝas!

Pro ŝparemo ili iris en la teatron piede. Estis ankoraŭ tute lume, sed la stratlanternoj brilis jam per la limonkolora lumo. Antaŭ ĉies okuloj pereis la printempo. Polvo pelis ĝin de la placoj, la varmega venteto forpuŝis ĝin en stratetojn. Maljunulinoj alkaresis tie la belulinon, kaj trinkis kun ŝi teon en kortetoj, ĉe rondaj tabloj. Sed vivo de la printempo finiĝis: oni jam ne permesis al ŝi veni al homoj. Sed ŝi tiel volis al monumento de Puŝkin, kie jam promenas junaj homoj en buntetaj kaskedoj, pantalonoj-klarnetoj, kravatoj "hunda ĝojo" kaj botetoj "ĝimi".

Junulinoj, superŝutitaj per violkolora pudro, cirkulis inter templo de Moskva Konsuma Unuiĝo, kaj kooperativo "Komunumano" (inter iama Filipov kaj iama Jelisejev). La junulinoj aŭdeble blasfemadis. Tiuhore pasantoj malrapidigis la paŝojn, sed ne nur pro tio ke Tverskaja iĝis malvasta. Moskvaj ĉevaloj estis ne pli bonaj ol la stargorodaj:

ili same speciale frapadis per la hufoj ŝtonojn de la pavimo. Biciklistoj senbrue flugis de stadiono “Junaj pioniroj”, de unua granda interurba matĉo. Glaciaĵisto ruligis sian verdan kofron, plenan per maja tondrado, time strabante la policiston; sed la policisto, katenita al la lumanta semaforo, per kiu li reguligis la stratan trafikon, ne estis danĝera.

La duopo da amikoj moviĝis ene de tiu ĉi svarmo. Allogaĵoj aperis ĉiupaŝe. En et-etaj manĝegulejoj oni, antaŭ rigardoj de la tuta strato, rostis ŝaŝlikojn karsk-stilajn, kaŭkazajn kaj lumbaĵajn. Varmega kaj pika fumo leviĝis al la heleta ĉielo. El bierejoj, restoracietoj kaj kinejo “La granda mutulo”, aŭdiĝis korda muziko. Ĉe trama haltejo pasiĝis laŭtparolilo.

Oni devis rapidi. La amikoj eniris eĥan vestiblon de teatro Kolumbo.

Vorobjaninov ĵetiĝis al la kaso kaj pe-legis la prezaŭron.

– Tamen tre multekoste, – diris li, – dek-sesa vico kostas tri rubloj.

– Ĝis kiom mi ne ŝatas, – rimarkis Ostap, – tiujn primitivulojn, tiujn provincajn simplulojn! Kien vi ŝoviĝas? Ĉu vi ne vidas ke tio estas kaso?

– Sed kien? Sen bileto oni ne enlasos!

– Kisa, vi estas banalulo. En ĉiu aranĝita teatro estas du giĉetoj. Al giĉeto de kaso venas nur geamantoj kaj riĉaj heredantoj. Ĉiuj aliaj civitanoj (kaj ili, oni devas menci, plimultas) turnas sin en giĉeton de administranto.

Kaj vere, antaŭ giĉeto de la kaso staris ĉirkaŭ kvin modeste vestitaj homoj. Eblas ke tio estis riĉaj heredantoj aŭ geamantoj. Tamen ĉe giĉeto de la administranto regis vigliĝo. Tie staris kolora vico. Junaj homoj en modaj jakoj

kaj pantalonoj de tia tajlado kiu povas nur alsonĝi al provinculo, konvinke skuis leteretojn de konataj al ili reĝisoroj, aktoroj, redakcioj, teatra vestaĵisto, estro de loka policejo, kaj de ceteraj bone ligitaj kun la teatro personoj, estiel: anoj de asocio de teatro- kaj kino-recenzistoj, de komunumo “Larmoj de malfeliĉaj patrinoj”, de lerneja konsilio de “Mastrumejo de cirka eksperimento”, kaj de iu “Fortinbraso ĉe Umslopogaso³³”. Ĉirkaŭ ok personoj staris kun leteretoj de Esper Ekleroviĉ.

Ostap entranĉiĝis la vicon, dispuŝis la fortinbrasanojn kaj, kriante: «Mi nur demandi, ĉu vi ne vidas ke mi eĉ la galoŝojn ne demetis», tratabiĝis al la giĉeto kaj enrigardis enen.

La administranto laboregis kiel ŝargisto. Hela brilanta ŝvito aspergis lian grasan vizaĝon. Telefono maltrankviligis lin ĉiuminute, ĝi sonoris kun persisto de trama vagono kiu pene traigas Smolenskij-bazon.

- Rapide, – kriis li al Ostap, – vian letereton!
- Du lokojn, – mallaŭte diris Ostap, – en partero.
- Al kiu?
- Al mi!
- Sed kio vi estas por ke mi donu al vi la lokojn?
- Malgraŭ ĉio mi opinias ke vi konas min.
- Mi ne rekonas.

Sed rigardo de la nekonato estis ĝis tiom pura kaj klara, ke mano de la administranto mem dediĉis al Ostap du lokojn en dek-unua vico.

– Iradas ĉi tie iuj ajn, – diris la administranto, levante la ŝultrojn, – kiu konas ilin! Eblas ke li el Komisarejo pri klerigado, ĉu? Ŝajnas ke mi vidis lin tie. Kie mi vidis lin?

33. Fortinbraso...: nedeĉifreblaj kunmetaĵoj estis vaste uzataj tiam.

Kaj, mekanike eldonante enirbiletojn al feliĉaj teatro-kaj kino-recenzistoj, koncentriĝinta Jakov Menelajeviĉ daŭrigis rememori kie li vidis tiujn ĉi purajn okulojn.

Kiam ĉiuj enirpermesoj estis jam eldonitaj, kaj en la promena halo oni malpliigis la lumon, Jakov Menelajeviĉ rememoris: tiujn ĉi purajn okulojn, tiun ĉi konvinkan rigardon li vidis en Taganka prizono, en jaro 1922, kiam ankaŭ li sidis tie pro iu malgrava afero.

El dek-unua vico, kie sidis la koncesiuloj, ekaŭdiĝis rido. Al Ostap ekplaĉis la preludo, kiun la orkestranoj plenumis per boteloj, vazoj de **Esmarĥ**³⁴, saksofonoj, kaj grandaj regimentaj tamburoj. Ekfajfis fluto kaj, alblovante malvarmeton, la sceneja kurteno malfermiĝis.

Al miro de Vorobjaninov, kutimiĝinta al klasika interpretado de "Geedziĝo", Podkolesin sur la scenejo forestis. Serĉante per la okuloj, Ipolit Matveeviĉ ekvidis pendantajn de la plafono kruclignajn rektangulaĵojn, farbitajn en bazajn kolorojn de suna spektro. Estis nek pordoj, nek bluaj muslinaj fenestroj. Sub la diverskoloraj rektangulaĵoj dancis virinetoj en grandaj ĉapeloj, eltranĉitaj el nigra kartono. Botelaj ĝemoj elvokis sur la scenejon na Podkolesin, kiu rajde, sur Stepan, entranĉiĝis la homamason. Podkolesin vestis uniformon de kortegano. Dispelante la virinetojn per vortoj kiuj forestis en la spektaklo, Podkolesin kriaĉis:

– Stepa-an!

Samtempe li saltis flanken kaj rigidiĝis en malfacila pozo. Vazoj de Esmarĥ ekbruegis.

– Stepa-a-n!! – ripetis Podkolesin, farante novan salteton.

34. **Esmarĥ**: (Esmarch) 1823-1908, germana kuracisto-inventisto.

Sed ĉar Stepan, staranta apude kaj vestita en panteran felon ne respondis, Podkolesin tragike demandis lin:

– Kial vi silentas, kiel Ligo de nacioj?

– Povas esti ke mi na Ĉemberlen ektimis, – respondis Stepan, gratetante sian felon.

Sentiĝis ke Stepan depuŝos na Podkolesin, kaj iĝos ĉefa personaĵo de la nuntempigita spektaklo.

– Nu kio, ĉu kudras la tajloro la surtuton?

Salto. Bato sur vazojn de Esmarĥ. Stepan pene faris manstaron, kaj el tiu ĉi pozicio respondis:

– Kudras!

La orkestro plenumis mikspoton el “Madam Baterflaj”. Dum tuta tiu ĉi tempo Stepan staris sur la manoj. Lia vi-zaĝo ruĝiĝis.

– Kio, – demandis Podkolesin, – ĉu ne demandis la tajloro por kio la mastro bezonas tiel bonan drapon?

Stepan, kiu tiutempe sidis jam ene de la orkestro kaj brakumis la dirigenton, respondis:

– Ne, ne demandis. Ĉu li estas deputito de angla parlamento?

– Kaj ĉu demandis la tajloro ke, eble, la mastro intencas edziĝi?

– La tajloro demandis ĉu ne volas la mastro pagi alimentojn.

Post tio la lumo malaperis, kaj la publiko ekis piedfrapadi. Ĝi piedfrapadis ĝis kiam de la scenejo ekaŭdiĝis voĉo de Podkolesin:

– Civitanoj! Ne maltrankviliĝu! La lumon oni malŝaltis speciale. Tion postulas la dekoraciado.

La publiko cedis. La lumo forestis ĝis fino mem de la akto. En plena mallumo tondris tamburoj. Preteriris, kun lanternoj, taĉmento da militistoj en uniformo de hotelaj

pordistoj. Poste, verŝajne sur kamelo, alveturis Koĉkarjov. Oni povis kompreni tion el sekva dialogo:

– Ho, kiel vi timigis min! Kvankam per kamelo vi alrajdis!

– Ĉu vi rimarkis tion malgraŭ la mallumo?! Jes, mi volis prezenti al vi dolĉan ka-mielon!

Dum la interakto la koncesiuloj pe-legis la afiŝon:

GEEDZIĜO

Teksto: N. V. Gogol.

Versaĵoj: M. Ŝerŝelafamov.

Literatura muntado: I. Antioĥijskij.

Muzika akompanado: Ĥ. Ivanov.

Aŭtoro de la spektaklo: Nik. Sestrin.

Dekoro: Simbieviĉ-Sindieviĉ.

Lumo: Platon Plasĉuk.

Sona dekor: Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind.

Ŝminko: el metiejo de Krult.

Perukoj: Foma Koĉura.

Meblaro: el lignaĵejo de Fortinbraso ĉe Umslopogaso je nomo de Baltazaro.

Instrukciistino pri akrobataĵoj: Ĵorĵeta Tiraspolskiĥ.

Hidraŭlika premilo sub manipulado de muntisto Meĉnikov.

La afiŝo estas presita en fabrika lernejo Krult.

– Ĉu tio plaĉas al vi? – timide demandis Ipolit Matveevič.

– Kaj al vi?

– Tre interese, nur Stepan estas iel stranga.

– Kaj al mi tio ne plaĉas, – diris Ostap, – precipe ĉar mebloj ĉe ili estas el iu lignaĵejo de Vogopas. Ĉu ne transformis ili novmaniere niajn seĝojn?

Tiu ĉi timo okazis vana. Jam komence de la dua akto mem ĉiuj kvar seĝoj estis alportitaj sur la scenejon per negroj en cilindraĵoj.

Sceno de svatado elvokis plej grandan intereson ĉe la spektantoj. En la momenton kiam Agafja Tiĥonovna, irante sur ŝnuro streĉita tra la tuta halo komencis malleviĝi, terura orkestro de H. Ivanov eligis tian bruon, ke nur pro ĝi Agafja Tiĥonovna devus fali en la publikon. Tamen Agafja bonege tenis sin sur la scenejo. Ŝi estis vestita en trikotan kostumon de korpa koloro, kaj en viran melon-ĉapelon. Ekvilibriĝinte per verda ombrelo kun surskribo: «Mi volas na Podkolesin», ŝi paŝadis sur la streĉita ŝnuro kaj, de sube, ŝiaj malpuraj plandoj estis videblaj al ĉiuj. De la ŝnuro ŝi sursaltis ĝuste sur seĝon. Samtempe ĉiuj negroj, Podkolesin, Koĉkarjov en baleta jupo, kaj la svatistino, en kostumo de tramkondukisto, faris retrosalton. Poste ĉiuj ripozis dum kvin minutoj, por kaŝi kion oni denove malŝaltis la lumon.

La fianĉoj estis tre ridindaj, precipe Ovaĵo. Anstataŭ li estis elportita sur pato granda ovaĵo. Maristo vestis maston kun velo.

Vane komercisto Starikov kriis ke lin sufokas komerc-permesilo kaj egaliga imposto. Li ne ekplaĉis al Agafja Tiĥonovna. Ŝi edziniĝis kun Stepan. Ili ambaŭ komencis manĝegi la ovaĵon, kiun servis al ili Podkolesin, transformiĝinta je lakeo. Koĉkarjov kun Fjokla plenumis kanteton pri Ĉemberlen kaj pri alimentoj, kiujn la brita ministro forprenas de Germanio. Per vazoj de Esmarĥ oni plenumis la finaĵon. Post tio la sceneja kurteno frape fermiĝis, alblovante malvarmeton.

– Mi estas kontenta pri la spektaklo, – diris Ostap: la seĝoj ne estas difektitaj. Sed ne valoras prokrasti. Se Agafja Tiĥonovna alsaltos ilin ĉiutage, ili vivos ne longe.

Junaj homoj en modaj jakoj, interpuŝante kaj ridante penetradis subtilaĵojn de la aĵa kaj muzika dekorado.

– Nu, Kisa, – diris Ostap – iru vi baj-baj. Morgaŭ matene necesas stari en vico por biletoj. En la sepa vespere la teatro elveturas per la plirapidigita na Niĵnij. Do prenu vi du malmolajn sidlokojn ĝis Niĵnij, Kurska fervojo.

Ne gravas, sidu ni. Nur unu nokto.

Sekvonutage tuta teatro Kolumbo sidis en bufedejo de Kurska stacidomo. Simbieviĉ-Sindieviĉ, pe-zorginte ke la dekoraĵoj venu per sama trajno, manĝetis ĉe la tablo. Malsekigante la lipharojn en la biero, li maltrankvile demandis la muntiston:

– Kion vi opinias, ĉu ne difektiĝos la hidraŭlika premilo dum la vojo?

– Problemas ĝi, tiu ĉi premilo – respondis Meĉnikov, – nur kvin minutoj ĝi funkcias ĉe ni, sed transportadi ĝin ni devos la tutan someron.

– Kaj ĉu pri “lumĵetilo de tempoj”, el spektaklo “Pulvoro de ideologio”, estis al vi pli simple?

– Certe pli simple. La lumĵetilo estis pli granda, sed ne tiom rompebla.

Ĉe najbara tableto sidis Agafja Tiĥonovna, junulineto kun piedoj muskolaj kaj brilaj kiel kegloj. Ĉirkaŭ ŝi klopodis la tuta son-dekoro: Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind.

– Hieraŭ vi sonis al mi maltakte, – plendis Agafja Tiĥonovna, – tiel mi eĉ falaĉi povas.

La sona de koro ekbruegis:

– Ja kion fari! Du vazoj rompiĝis!

– Ĉu oni eblas akiri nun eksterlandan vazon de Esmarĥ? – kriis Galkin.

– Eniru vi en ŝtatan medicinan vendejon. Ne nur vazon de Esmarĥ, eĉ termometron vi ne aĉetos tie! – subtenis Palkin.

– Ĉu vi ankaŭ per termometroj muzikas? – terurigis la junulino.

– Ne, ni ne muzikas per termometroj, – rimarkis Zalkind, – sed pro tiuj ĉi malbenitaj vazoj vere oni povas malsaniĝi – bezonatas mezuri la temperaturon.

Aŭtoro kaj, samtempe, ĉefa reĝisoro de la spektaklo Nik. Sestrin promenis kun sia edzino sur la kajo. Podkolesin kun Koĉkarjov eldrinkis po tri glasetoj, kaj konkure flirtis na Ĵorĵeta Tiraspolskiĥ.

La koncesiuloj, venintaj du horoj antaŭ foriro de la trajno, faris jam kvinan rondon ĉirkaŭ la stacidoma skvaro.

Ĉe Ipolit Matveeviĉ turniĝis la kapo. Persekuto de la seĝoj eniris decidan stadion. Longaj ombroj kuŝis sur la varmiĝinta pavimo. Polvo gluiĝis al iliaj malsekaj ŝvitaj vizaĝoj. Alruliĝis fiakroj. Odoris benzino. El taksioj eliris pasaĝeroj. Renkonten al ili elkuris bravuloj, forportis la valizojn, kaj iliaj ovalaj ĵetonoj brilis sub la suno. Muzo de malproksimaj vagadoj kaptis homojn je la gorĝo.

– Nu, ankaŭ ni iru, – diris Ostap.

Ipolit Matveeviĉ obeeme konsentis. Ĉi tie li vizaĝo al vizaĝo kunpuŝiĝis kun ĉerka majstro Bezenĉuk.

– Bezenĉuk! – diris li, ekstreme mirigita. Kiel vi trafis ĉi tien?

Bezenĉuk demetis la ĉapon kaj ĝoje rigidiĝis.

– Sinjoro Vorobjaninov! – kriis li. – Honoron al la kara gasto!

– Nu, kiel vi fartas?

– Malbonas la aferoj, – respondis la ĉerka majstro.

– Kial do?

– Klienton mi serĉas. Ne iras kliento.

– Ĉu “Nimfa” rekaptas?

– Ne, ne scipovas ĝi. Ne okazis tio. Post via bopatri-neto nur “Pjer kaj Konstantin” renversiĝis.

– Kion vi diras? Ĉu vere li mortis?

– Renversiĝis li, Ipolit Matveeviĉ. Sur sia posteno renversiĝis. Razis li apotekiston nian, na Leopold, kaj renversiĝis. Homoj diris ke disŝiro de internaĵo okazis, sed mi opinias ke la mortinto enspiradis kuracilojn de tiu ĉi apotekisto, kaj ne eltenis tion.

– Aj-aj-aj, – elmurmuris Ipolit Matveeviĉ, – aj-aj-aj! Do tio estas vi kiu enterigis lin?

– Jes, mi enterigis. Kiu alia? Ĉu “Nimfa”, je kukolo ĝin, ĉu ĝi donas la varon?

– Do superis vi?

– Superis. Sed oni batis min poste. Preskaŭ koron el mi forbatis. Polico deprenis min. Du tagoj mi kuŝis, per alkoholo kuraciĝis.

– Ĉu vi enfrotis ĝin?

– Ne, ni ne bezonas enfroti.

– Kaj kio alportis vin ĉi tien?

– Varon mi altransportis.

– Kiun varon?

– Mian varon. Konduktoro, konatulo mia, senpage, en la poŝta vagono altransportis. Pro la konateco.

Nur nun Ipolit Matveeviĉ rimarkis ke iom flanke de Bezenĉuk sur la tero staras staplo da ĉerkoj. Kelkaj estis

kun kvastoj, aliaj – sen. Unun el ili Ipolit Matveeviĉ rekonis tuj. Tio estis granda kverka kaj polva ĉerko el eksponfenestro de Bezenĉuk.

– Ok ekzempleroj, – diris Bezenĉuk memkontente, – altkvalitaj. Kiel kukumetoj.

– Sed kiu bezonas ĉi tie vian varon? Ĉi tie propraj metiistoj sufiĉas.

– Kaj krupo?

– Kiu krupo?

– Epidemio. Prusis diris al mi ke en Moskvo krupo teruradas, ke forestas en kio homojn enterigi. Oni jam tutan materialon eluzis. Do mi decidis plibonigi la aferojn.

Ostap, scivole aŭskultinta tutan tiun ĉi konversacion, enmiksiĝis:

– Aŭskultu, paĉjo, ne en Moskvo, en Parizo teruradas la gripo.

– Ĉu en Parizo?

– Jes. Veturu en Parizon. Tie vi profitados! Kvankam estos iom da problemoj pri la vizo, sed vi, paĉjo ne malĝoju. Se Brian vin ekamos, vivos vi nemalbone: ricevos postenon de ĉefa ĉerkisto de pariza urbestro. Sed ĉi tie ankaŭ lokaj ĉerkistoj estas tute sufiĉaj.

Bezenĉuk sovaĝe ĉirkaŭrigardis. Vere, sur la placo, malgraŭ certigo de Prusis, mortintoj ne kuŝaĉis. Homoj energie tenis sin sur la piedoj, kaj kelkaj el ili eĉ ridis.

La trajno jam delonge forportis la koncesiulojn, teatron Kolumbo, kaj ceteran publikon, sed konsternita Bezenĉuk daŭre staris apud siaj ĉerkoj. Liaj okuloj, en veninta malumo, brilis per flava neestingebla lumo.

Parto tria

Trezoroj de madam Petuĥova

Ĉapitro 31

Sorĉa nokto sur rivero Volgo

Maldekstre de bargaj albordiĝejoj de volga ŝtata river-ŝiparo, sub surskribo: «Ligu al ringo, gardu la kradon, ne tuŝu la muron», staris la granda kombinanto kun sia amiko kaj proksima helpanto Kisa Vorobjaninov.

Super la albordiĝejoj frapadis flagoj. Fumo, krispa kiel florbrasiko, elamasigis el vaporŝipaj tuboj. Oni ŝargis ŝipon “Anton Rubinŝtejn”, kiu staris ĉe bargia albordiĝejo numero du. La ŝargistoj enpikis la ferajn ungojn en varpagojn da kotono, sur la kajo soldate liniigis krudferaj potoj, kuŝis malseke salitaj feloj, volvaĵoj da dratoj, kestoj kun plataĵoj da vitro, buloj da ŝnureto por kunligi garbojn, muelŝtonoj, dukoloraj ostecaj agrikulturaj maŝinoj, lignaj forkegoj, korboj kun juna merizo, ĉirkaŭkudritaj per sakŝtofo, kaj bareloj kun haringo. “Skrjabin” forestis. Tio tre maltrankviligis na Ipolit Matveeviĉ.

– Kial vi nervumas? – demandis Ostap. – Imagu ke “Skrjabin” estas jam ĉi tie. Nu, kiel vi penetros ĝin? Eĉ se ni havus monon por aĉeti bileton, ankaŭ tiam okazus nenio. Tiu ĉi ŝipo ne prenas pasaĝerojn.

Ostap ankoraŭ en la trajno sukcesis konversacii kun hidraŭlik-premila estro, muntisto Meĉnikov, kaj eksciis de li ĉion. Vaporŝipo “Skrjabin”, kiun luis Financ-komisarejo, devis iri de Niĵnij ĝis **Caricin**³⁵, haltante ĉe ĉiuj albordiĝejoj,

35. **Caricin**: poste Stalingrado, pli poste Volgogrado.

kaj aranĝante lotadon de gajna pruntado. Por tio el Moskvo alveturis tuta organizaĵo: lota komisiono, kancelario, blovorkestro, kinofilmisto, korespondantoj de centraj ĵurnaloj, kaj teatro Kolumbo. La teatro devis prezentadi dum la vojo spektaklojn, en kiuj oni popularigas ideon de ŝtataj pruntoj. La teatron, ĝis Stalingrado, vivtenos la lota komisiono, kaj poste ĝi intencas, memriske, efektivigi grandan vojaĝon tra Kaŭkazo kaj Krimeo kun “Geedziĝo”.

”Skrjabin” malfruiĝis. Oni promesis ke ĝi venos el la flanko akvejo, kie oni faras lastajn preparojn, nur antaŭ la vespero. Tial ĉiuj moskvanoj, atendante la enŝipiĝon, aranĝis bivakon sur la albordiĝejo.

Teneraj estaĵoj kun valizetoj kaj pluvmanteloj sidis sur volvaĵoj de dratoj, gardante siajn tajpmaŝinojn, kaj timide rigardante la ŝarĝistojn. La muelŝtonon okupis civitano kun violkolora bereto. Sur liaj genuoj kuŝis staketo da emajlitaj platetoj. Sur plej supra el ili scivolulo povus tralegi:

FAKO DE INTERAJ PAGOJ

Skribotabloj kun kestoj, kaj aliaj tabloj, pli modestaj, staris unu sur alia. Ĉe sigelita fera ŝranko promenadis gardisto. Persickij, reprezentanto de “Stablo”, per okobliga binoklo pririgardis teritorion de fama foirejo.

Turniĝante kontraŭ la fluo proksimiĝis vaporŝipo “Skrjabin”. Sur siaj ŝiprandoj ĝi portis kruclignajn tabulojn kun ĉielarkaj bildoj de gigantaj pruntatestaĵoj. La ŝipo ekmuĝis, imitante krion de mamuto aŭ, eble, de iu alia besto, kiu en antaŭhistoria tempo anstataŭigis ŝipan sirenon.

La financ-teatra bivako vigliĝis. Sur la kruta urba riverbordo kuris lotad-oficistoj. Ene de polva nubo al la ŝipo ruliĝis diketa Platon Plasĉuk. Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind elkuris el taverno “Flosa”. Ĉe la fera gardoŝranko jam laboris ŝarĝistoj. Instrukciistino pri akroba-

tiko Ĵorĵeta Tiraspolskiĥ per gimnastikaj paŝoj surkuris la ŝipan descendilon. Simbieviĉ-Sindieviĉ, zorgante pri la dekoraĵoj, etendis la manojn jen al la **kremlaj**³⁶ altaĵoj, jen al la ŝipestro, staranta sur la ponteto. Kinofilmisto portis sian aparaton alte super kapoj de la homamaso kaj, ankoraŭ irante, postulis por si kvarlokan kajuton por aranĝi en ĝi labon.

Ipolit Matveeviĉ, ene de la komuna konfuzo, penetris al la seĝoj kaj, estante ekscitita, jam preskaŭ ektrenis unu el la seĝoj flanken.

– Lasu la seĝon! – kriegis Bender. – Kio vi, ĉu freneziĝis? Tiel ni prenos nur unu seĝon, sed aliajn ni perdos por ĉiam. Pli bone pensu kiel veni sur la ŝipon.

Tra la barĝa albordiĝejo iris muzikistoj, zonigitaj per latunaj blovinstrumentoj.

Ili kun abomeno rigardis la saksofonojn, fleksotonojn, bierajn botelojn kaj vazojn de Esmarĥ, per kiuj estis armita la sona dekoraro.

La lotaj radoj estis alveturigitaĵoj per ford-kamioneto. Tio estis komplika aparato, konsistanta el ses turniĝeblaj cilindroj, brilantaj per kupro kaj vitro. Muntado de ĝi sur suban ferdekon prenis multe da tempo.

Piedfrapado kaj interkvereloj daŭriĝis ĝis malfrua vespero.

En lota halo oni aranĝis podion, alnajlis al la muroj afiŝojn kaj sloganojn, dismetis lignajn benkojn por vizitantoj, kaj kunigis elektraĵojn dratojn kun la lotaj radoj. Skribotablojn oni lokigis sur pobo, kaj el kajuto de la tajpistinoj, alterne kun rido, aŭdiĝis klakoj de tajpiloj. La pala homo en

36. **Kremlo**: fortreso en rusaj urboj (PIV).

violkolora bereto iradis tra la tuta ŝipo kaj pendigis sur la konformajn pordojn siajn emajligitajn platetojn:

FAKO DE INTERAJ PAGOJ

PERSONARA FAKO

KOMUNA KANCELARIO

TAJP-MAŜINA FAKO

Apud la platetoj homo en la bereto fiksaĉis platetojn malpli grandajn:

SEN AFERO NE ENIRU

ONI NE AKCEPTAS

AL EKSTERAJ PERSONOJ ENIRO ESTAS MALPERMESATA

ĈIUJN DEMANDOJN – EN LA REGISTREJO

En salono de unua klaso estis aranĝita ekspozicio de monaj kaj kreditaj biletoj. Tio elvokis eksplodon da indigno ĉe Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind.

– Sed kie ni tagmanĝos? – maltrankvilis ili. Kio se estos pluvo?

– Oho! – diris Nik. Sestrin al sia helpanto, tion mi jam ne povas elteni!.. – Kion vi opinias, Serjoĝa, ĉu ni sukcesos elturniĝi sen tiu ĉi sona deko?

– Pri kio vi, Nikolaj Konstantinoviĉ! La aktoroj alkuti-miĝis al la ritmo.

Tiam komenciĝis nova skandalo. La kvinopo elflaris ke ĉiujn kvar seĝojn aŭtoro de la spektaklo fortrenis en sian kajuton.

– Tiel do, – diris la kvinopo ironie, – ni provludu si-dante sur la litoj, kaj sur la kvar seĝoj sidos Nikolaj Konstantinoviĉ kun sia edzino Gusta, kiu havas neniun rilaton

al nia kolektivo. Eble ankaŭ ni volas havi dum la vojaĝo niajn edzinojn!

La granda kombinanto malice rigardis de la bordo la lotan vaporŝipon.

Nova eksplodo da kriadoj atingis orelojn de la koncesiuloj.

– Kial vi antaŭe ne diris al mi pri tio?! – kriis ano de la komisiono.

– Sed de kie mi povis scii ke li ekmalsanos.

– Tio estas diablo scias kio! Do veturu en dungejon kaj postulu ke oni urĝe sendu al ni pentriston.

– Sed kien mi veturu? Nun estas la sesa. La dungejo jam delonge estas fermita. Krom tio post duonhoro la ŝipo deiras.

– Do vi mem pentros. Se vi prenis sur vin respondecon pri dekorado de la ŝipo, do elturniĝu kiel vi volas.

Ostap jam kuris sur la ŝipa descendejo, dispuŝante per la kubutoj la ŝarĝistojn, fraŭlinojn, kaj simple scivoluojn. Ĉe eniro oni haltis lin:

– Enirpermeson!

– Kamarado! – kriaĉis Bender. – Vi! Vi! Diketa! Kiu pentriston bezonas!

Post kvin minutoj la granda kombinanto sidis en blanka kajuto de la diketa maŝinisto de la flosanta lotejo, kaj priparolis la laborkondiĉojn.

– Do tiel, kamarado, – diris la diketulo, – de vi estas postulata jen kio: plenumo de artaj afiŝoj, surskriboj, kaj pe-plenumo de reklamtabulo. Nia pentristo komencis fari ĝin, sed ekmalsanis. Ni lasis lin ĉi tie en la malsanulejo. Kaj, certe, ĝenerala priservo de arta fako. Ĉu vi povas preni sur vin tiujn ĉi taskojn? Mi avertas: estas multe da laboro.

– Jes, mi povas preni tion sur min. Al mi okazis jam fari tiun ĉi laboron.

– Kaj ĉu vi povas ekveturi kun ni tuj?

– Tio ne estos simple, sed mi penos.

Granda kaj peza monto defalis de ŝultroj de la mas-trumisto. La dikulo, sentante infanan facilecon, per radian-taj okuloj rigardis la novan pentriston.

– Kiaj estos la kondiĉoj? – demandis Ostap imperti-nente. – Sciu, mi ne estas enteriga kontoro.

– Kondiĉoj pokvantaj. Laŭ labortabelo.

Ostap malkontente sulkigis la vizaĝon, kio kostis al li multe da peno.

– Sed, krom tio, senpaga nutrado, – rapide aldonis la diketulo, – kaj aparta kajuto.

– Nu, bone, – diris Ostap suspirante, – mi konsentas. Sed kune kun mi estas ankaŭ knabo, asistanto.

– Pri la knabo mi ne scias. Por knabo forestas kredito. Se proprakoste, do bonvolu. Loĝu li en via kajuto.

– Do, estu laŭ vi. Li estas vigla. Kutimiĝis li al spar-tanaj kondiĉoj.

Ostap ricevis enirpermesilon por si kaj por la vigla knabo, metis en la poŝon ŝlosilon de la kajuto, kaj eniris la varmegan ferdekon. Tuŝante la ŝlosilon li sentis nemal-grandan kontentiĝon. Tio estis unua fojo en lia tempesta vivo. Ekestis kaj ŝlosilo kaj loĝejo. Forestis nur mono. Sed ĝi troviĝis ĉi tie, proksime, en la seĝoj. La granda kombi-nanto, enpoŝiginte la manojn, promenadis laŭ la ŝiprando, ne rimarkante na Vorobjaninov, lasitan sur la bordo.

Komence Ipolit Matveeviĉ signalis silente, sed poste kuraĝis eĉ pepadi. Sed Bender estis surda. Turniĝinte per la dorso al prezidanto de la koncesio, li atente pririgardis mallevadon de la hidraŭlika premilo en la holdon.

Oni faris lastajn preparojn por la debordiĝo. Agafja Tiĥonovna, kiu estis ankaŭ Mura, frapante per la piedetoj kuradis el sia kajuto al la pobo, rigardis la akvon, laŭte dividis siajn admirojn kun virtuoza-balalajkisto, kaj per ĉio tio enigis konfuzon en aron da respektaj agantoj de la lota entrepreno.

La ŝipo eligis duan fajfon. Pro la teruraj sonoj deŝoviĝis la nuboj. La suno ekruĝiĝis kaj falis trans la horizon-ton. En supra urbo eklumis lampoj kaj lanternoj. De bazarro, el de Poĉajev ravino, aŭdiĝis raŭkoj de gramofonoj, konkurantaj por lastaj aĉetantoj. Ipolit Matveeviĉ, surdigita kaj sola, kriis ion, sed li ne estis aŭdebla. Klakoj de la vinĉo pereigis ĉiujn aliajn sonojn.

Ostap Bender ŝatis efektojn. Nur antaŭ la tria fajfo, kiam Ipolit Matveeviĉ jam ne dubis ke li estas lasita al sia sorto, Ostap rimarkis lin:

– Kial vi staras kvazaŭ pe-svatita? Mi opiniis ke vi jam delonge estas sur la ŝipo. Oni demetas jam la descendilon! Kuru rapide! Enlasu tiun ĉi civitanon! Jen la enirpermesilo.

Ipolit Matveeviĉ, preskaŭ ploranta, enkuris la vaporŝipon.

– Ĉu tio estas via knabo? – suspekto demandis la mastrumisto.

– Jes, knabo, – diris Ostap, – ĉu li malbonas? Kiu diras ke tio estas knabino, unua ĵetu sur min ŝtonon!

La dikulo malserene deiris.

– Nu, Kisa, – rimarkis Ostap, – matene ni devos komenci la laboron.

Mi esperas ke vi scipovas dilui farbojn. Kaj jen kio: mi estas diplomita pentristo, kaj vi – mia helpanto. Se vi opinias ke estas ne tiel, rapide kuru reen, sur la bordon.

Nigra-verda ŝaŭmo elŝiriĝis el sub la pobo. La ŝipo ekstremis, ekplaŭdis la latunaj cimbaloj, flutoj, kornetoj, trombonoj; la basoj ektrumpetis mirindan marŝon, kaj la urbo, turniĝante kaj balancante, eknomadis sur maldekstran bordon. Daŭrante tremi, la ŝipo ekstaris laŭ la fluo, kaj rapide ekkuris en la mallumon. Malantaŭe balanciĝis steloj, lampoj, kaj diverskoloraj havenaj signaloj. Post minuto la ŝipo deiris ĝis tiom malproksimen, ke la urbaj lumoj ŝajnis esti raketa pulvoro haltiĝinta sur la loko.

Ankoraŭ aŭdiĝis murmuro de laborantaj tajpmaŝinoj, sed la naturo kaj Volgo prenis jam sion. Langvoro kaptis ĉiujn veturantajn sur vaporŝipo "Skrjabin". Anoj de la lota komisiono lactenere trinketis teon. En unua kunsido de la loka sindikat-komitato ankaŭ regis tenero. Tiel brue spiris la varma vespero, tiel mole plaŭdis la akveto ĉe la ŝipprando, tiel rapide preterflugis mallumaj konturoj de la bordoj, ke prezidanto de la loka komitato, homo tute pozitiva, malferminte la buŝon por paroli pri kondiĉoj de laboro en nekutimaj laborkondiĉoj, neatende por ĉiuj kaj por si mem ekkantis:

Vaporŝip' sur Volgo kuras,
ho patrin-rivero Volgo...

Kaj aliaj severaj partoprenantoj de la kunsido elmurmuris la refrenon:

Siri-ingo flo-oras...

Rezolucio laŭ elpaŝo de prezidanto de la loka komitato okazis do neverkita. Aŭdiĝis sonoj de piano. Estro de la muzika akompanado Ĥ. Ivanov eligis el la instrumento plej lirikajn notojn. Virtuozo-balalajkisto tiriĝis post Mura kaj, ne trovinte proprajn vortojn por esprimi sian amon, murmuris vortojn de romanco:

– Ho, ne foriru, dolĉa vi kerubo, karesoj viaj ne lacigis min. En intermonto dormas blankaj nuboj, kaj steloj brilas sur ĉiela sin’.

Simbieviĉ-Sindieviĉ, kaptiĝinte je la balustrado, observis la ĉielan abismon. Dekoro de “Geedziĝo”, kompare kun ĝi, ŝajnis al li indigniga porkaĵo. Li aĉe rigardis siajn manojn, kiuj prenis furiozan partoprenon en aĵa dekoro de la klasika komedio.

En momenton de plej alta langvoro Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind, poziciintaj sur la pobo, frapis sian apotekan kaj bieran ilaron. Ili provludis. La miraĝo dispeliĝis tuj. Agafja Tiĥonovna oscedis kaj, ne atentante la virtuozon-flirtulon, ekiris dormi. En animoj de la lok-komitatanoj denove eksonis la ĝenerala kontrakto, kaj ili ekokupiĝis pri la rezolucio.

Simbieviĉ-Sindieviĉ, post detala pripenso, venis al konkludo ke dekoro de “Geedziĝo” estas ne tiel malbona. Incita voĉo el la mallumo vokis na Ĵorĵeta Tiraspolskiĥ al konsilado ĉe la reĝisoro. En vilaĝoj bojis hundoj. Ekestis malvarmete.

Ostap, kuŝanta sur leda sofo en la kajuto de unua klaso, kaj pripense rigardanta la sav-ringon, tegitan per verda tolo, esplordemandis na Ipolit Matveeviĉ:

– Ĉu vi scipovas desegni? Tre bedaŭrinde. Ankaŭ mi ne scipovas.

Li ekpensis kaj daŭrigis:

– Kaj literojn, ĉu vi scipovas ilin? Ankaŭ ne? Ege malbone! Ja ni estas pentristoj! Du tagoj, eble, oni eltenos nin, sed poste forĵetos. Dum tiuj ĉi du tagoj ni devas fari ĉion kio estas bezonata al ni. La situacio iom komplikiĝis. Mi eksciis ke la seĝoj troviĝas en kajuto de la reĝisoro. Sed ankaŭ tio, fakte, ne estas terura. Gravas ke ni troviĝas sur

la ŝipo. Ĉiuj seĝoj, ĝis oni forpelos nin, devas esti kontrolitaj. Hodiaŭ estas jam malfrue. La reĝisoro dormas en sia kajuto.

Ĉapitro 32

La malpura paro

Homoj ankoraŭ dormis, sed la rivero vivis kiel tage. Iris flosoj: grandegaj kampoj da traboj kun dometoj sur ili. Eta malica tirŝipeto, sur padel-rada ŝirmilo de kiu estis arke desegnita ĝia nomo: “Konkeranto de ŝtormoj”, tiris post si tri naftajn barĝojn, kunligitajn linie. Preterkuris de sobe rapida poŝtŝipo “Ruĝa Latvio”. “Skrjabin” devancis grundfosan karavanon kaj, mezurante la profundon per striigita stango, komencis desegni arkon, turniĝante kontraŭ la fluo.

Sur la ŝipo oni komencis vekiĝi. Sur albordiĝejon “Barmino” ekflugis pezaĵeto kun ŝnureto. Per tiu ĉi ŝnureto la lokuloj tiris al si dikan finaĵon de la albordiga ŝnurego. La helicoj ekturnadis reen. Duono de la rivero verŝiĝis per moviĝanta ŝaŭmo. “Skrjabin” ekstremis pro la abruptaj fraĵoj de la helico, kaj tutflanke premiĝis al la barĝa albordiĝejo. Estis ankoraŭ frue. Tial oni decidis komenci la lotadon je la deka.

Oficeja laboro en “Skrjabin” komenciĝis kvazaŭ sur firma tero, ĝuste je la naŭa. Neniu ŝanĝis siajn kutimojn. Kiu malfruiĝis al la laboro sur firma tero, malfruiĝis ankaŭ ĉi tie, kvankam ĝi dormis en la entrepreno mem. Vojaĝanta laborforto de Financ-komisarejo sufiĉe rapide kutimiĝis al la nova vivmaniero. Kurieroj balais la kajutojn same indiferente kiel ili balais kancelariojn en Moskvo. La purigistinoj disportis teon, kuris kun paperoj el registrejo en perso-

narejon, neniom mirigante pri tio ke la personarejo troviĝas sur la pobo, kaj la registrejo sur la pruo. El kajuto de interaj pagoj aŭdiĝis kastanjeta sono de abakoj kaj grincado de mekanika kalkulilo. Antaŭ ŝipestra kabino oni riproĉis iun.

La granda kombinanto, brulvundante la nudajn plandojn je la supra ferdeko, iradis ĉirkaŭ longa mallarĝa strio da ruĝa ŝtofo, pentrante sur ĝi sloganon, tekston de kiu li ĉiuminute kontrolis laŭ la papereto:

«Ĉiuj – al la lotado! Ĉiu laborulo endas havi en sia poŝo pruntateston de la ŝtatprunto».

La granda kombinanto tre penadis, sed, malgraŭ ĉio, sentiĝis foresto da talento. La skriblinio ekrampis soben, kaj la peco de la ŝtofo, ŝajne, ekestis difektita senespere. Tiam Ostap, kun helpo de knabo Kisa, renversis la ŝtofstrion, kaj komencis la farbadon denove. Nun li estis pli singarda. Antaŭ pentraĉi la literojn li, per kretigita ŝnureto, faris du paralelajn liniojn kaj, mallaŭte insultante senkulpan Vorobjaninov, komencis figuradon de la vortoj.

Ipolit Matveeviĉ konsciencie plenumis taskojn de knabo. Li kuris soben por preni varmegan akvon, fandis la gluaĵon, ternante ŝutis en la siteleton la farbojn, kaj komplezaĉe enrigardis okulojn de la postulema pentristo. La koncesiuloj alportis la pretan kaj sekigitan slogan-strion suben, kaj fiksas ĝin sur la ŝiprandon.

La dikuleto, kiu dungis na Ostap, dekuris sur la bordon, kaj de tie rigardis verkon de la nova pentristo. Literoj de la slogano estis diversdimensiaj, kaj iom kliniĝantaj flanken. Tamen eliro forestis, do endis kontentiĝi ankaŭ pri tio.

Sur la bordon deiris la blovorkestro, kaj komencis elblovi varmigajn marŝojn. Al sonoj de la muziko de tuta

Barmino alkuris infanoj kaj, post ili, el pomaj ĝardenoj ek-moviĝis kamparanoj kaj kamparaninoj. La orkestro tondradis ĝis kiam sur la bordon deiris anoj de la lota komisiono. Komenciĝis mitingo. De peroneto de taverno de Korobkov ekfluis unuaj sonoj de parolado pri internacia situacio.

Kolumbanoj spektis la kunvenon de sur la ŝipo. De tie videblis blankaj kaptukoj de kamparaninoj, singarde starantaj iom flanke de la peroneto, senmova amaso da kamparanoj, aŭskultantaj la parolanton, kaj la parolanto mem, tempo de tempo svinganta la manojn. Poste ekludis la muziko. La orkestro turniĝis kaj, ne ĉesante ludi, ek-moviĝis al la descendaĵo. Post ĝi ekmoviĝis la homamaso.

La lota aparato metode elĵetis kombinaĵojn da ciferoj. La radoj turniĝis, oni voĉlegis la nombrojn, barminanoj rigardis kaj aŭskultis.

Por momento alkuris Ostap. Konvinkiĝinte pri tio ke ĉiuj ŝipanoj sidas en la lota halo, li denove forkuris sur la ferdekon.

– Vorobjaninov, – flustris li, – por vi estas urĝa arta afero. Prenu lokon ĉe eliro el koridoro de la unua klaso, kaj staru tie. Se iu venos, kantu pli laŭte.

La maljunulo konsterniĝis.

– Sed kion mi kantu?

– Certe ne “Gardu ho Dio la caron”! Kantu ion pasian: na “Pometo” aŭ na “Koro de belulin”. Sed mi avertas: se vi ne ĝustatempe ekkantos vian arion!.. Tio ne estas Eksperimenta teatro! Mi kapon de vi deŝiros.

La granda kombinanto, frapetante per la nudaj kalkanoj, enkuris la koridoron, paneligitan per ĉerizaj plakaĵoj. La granda spegulo fine de la koridoro respegulis, dum unu sekundo, lian figuron. Li legis la surpordan plateton:

NIK. SESTRIN
REGÎSORO DE TEATRO "KOLUMBO"

La spegulo malpleniĝis. Poste en ĝi denove aperis la granda kombinanto. En la mano li tenis seĝon kun kurbaj piedetoj. Li trakuregis la koridoron, eniris la ferdekon kaj, interrigardante kun Ipolit Matveeviĉ, ekportis la seĝon supren, al kabino de la stiristo. En la vitra kabino estis neniu. Ostap forportis la seĝon en la pobon, kaj instrue diris:

– La seĝo staru ĉi tie ĝis la nokto. Mi pripensis ĉion. Ĉi tien venadas preskaŭ neniu, krom ni. Ni ŝirmu la seĝon per afiŝoj kaj, kiam mallumiĝos, trankvile konatiĝu kun ĝia enhavo.

Post minuto la seĝo, supersutita per krucplakaĵaj folioj kaj ruĝa ŝtofo, estis jam nevidebla.

Na Ipolit Matveeviĉ denove kaptis la ora febro.

– Sed kial ne alporti ĝin en nian kajuton? – demandis li senpacience. – Ni dissekcus ĝin tuj. Kaj, se troviĝos la brilantoj, tiam ni tuj sur la bordon...

– Kaj se ne? Kio tiam? Kien ni ŝovu ĝin? Ĉu eble ni portu ĝin reen al civitano Sestrin, kaj ĝentile diru: «Pardonu, ni forŝtelis de vi la seĝeton sed, bedaŭrinde, trovis en ĝi nenion, do reprenu vi ĝin en iom difektita stato!» Ĉu vi agus tiel?

La granda kombinanto, kiel ĉiam, estis prava. Ipolit Matveeviĉ rekonsciiĝis de la embaraso nur en momenton kiam de la ferdeko ekaŭdiĝis sonoj de uverturo, plenumata per vazoj de Esmarĥ kaj bieraj baterioj.

Lotaj operacioj por tiu ĉi tago estis jam ĉesitaj. La spektantoj poziciis sin sur la borda deklivo kaj, neatendite, brue esprimis sian aprobon al la apotek-negra ensemblo. Galkin, Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind fiere interrigardis, kvazaŭ dirante: «Jen, ĉu vi vidas! Sed vi asertis ke vastaj

homamasoj ne komprenos. Sed arto, ĝi ĉiam kompreneblas!»

Poste, sur improvizita scenejo, kolumbanoj ludis simplan vodevileton kun kantoj kaj dancoj, enhavo de kiu prezentis kiel Vavila gajnis kvindek mil rublojn, kaj kio okazis pro tio. La aktoroj, deĵetintaj de si ligojn de la niksestrin-a “konstrukciismo”, ludis gaje, dancis energie, kaj kantis per simpatiaj voĉoj. La bordo estis tute kontentigita.

Dua programero estis virtuoza-balalajkisto. La bordo kovriĝis per ridetoj.

«Bienul-bienulino», – ellaboris la virtuoza, – «vi mastrino-sinjorino».

La balalajko moviĝis. Ĝi flugis post dorson de la aktoro, kaj el post la dorso aŭdiĝis: «Se la mastro kun ĉeneto, do li estas sen horloĝ’!». Ĝi flugis supren, kaj dum mallonga sia flugo eligis nemalmulte da ege malfacilaj variaĵoj.

Venis vico de Jorĵeta Tiraspolskiĥ. Ŝi elkondukis kun si gregeton da junulinoj en sarafanoj. La koncerto finiĝis per rusaj dancoj.

Dum “Skrjabin” pretiĝis daŭrigi la vojaĝon, dum la ŝipestro konversaciis per la tubeto kun la maŝina fako, kaj la vaporŝipaj fajrujoj brulegis, varmigante la akvon, la blovorkestro denove venis sur la bordon kaj, al ĉies plezuro, komencis ludi dancojn. Ordiĝis pitoreskaj grupoj, plenaj da movado. La subiranta suno sendis molan abrikotan lumon. Venis ideala horo por kinofilmado. Kaj vere, filmisto Polkan³⁷, oscedante, eliris el la kajuto. Vorobjaninov, kiu jam kutimiĝis al tasko de ĉies knabo, singarde portis post Polkan la filmaparaton. Polkan venis al la ŝiprando, kaj rigar-

37. Polkan: vaste uzata hundo-nomo.

daĉis la bordon. Tie, sur la herbo, oni dancis soldatan polkon. La junuloj frapis per la nudaj piedoj tiel forte, kvazaŭ ili volis fendi nian planedon. La junulinoj flosis. Sur la natur-teraso kaj la malleviĝantaj vojoj dispoziciis la spektantoj. Franca filmisto el grupo “Avangardo” trovis ĉi tie laboron por tri tagnoktoj. Sed Polkan, glitrigardinte la bordon per siaj rataj okuletoj, tuj deturniĝis, amble alkuris prezidanton de la komisiono, almetis lin al blanka muro, enigis en lian manon libron kaj, petinte ne moviĝi, longe kaj flue turnadis krakon de la aparato. Poste li forkondukis la sinĝenantan prezidanton al la pobo, kaj filmis lin sur fono de la sunsubiro.

Pe-inte la filmadon Polkan grave eniris sian kajuton, kaj ŝlosiĝis tie.

Denove ekmuĝis la vaporfajfilo, kaj denove la suno time forkuris. Venis dua nokto. La ŝipo estis preta al deiro.

Ostap time meditis pri morgaŭa mateno. Lia tasko estis eltranĉi en folio de kartono figuron de semisto, disjettanta prunt-atestilojn. La granda kombinanto tute ne estis taŭga por tiu ĉi arta heroaĵo. Jes, Ostap scipovis, primalpli, produktadi literojn, sed ĉe li restis jam neniuj resursoj por arta figurado de la semanto.

– Sciu, – avertis la dikulo, – de Vasjuki ni komencas vesperajn lotadojn, kio tute ne eblas sen tiu ĉi reklamtabulo.

– Bonvolu ne maltrankviliĝi, – deklaris Ostap, esperante ne tiom pri morgaŭa mateno kiom pri hodiaŭa vespero, – la reklamtabulo estos farita.

Venis stela venta nokto. Loĝantaro de la lota arkeo ekdormis. Dormis leonoj el la lota komisiono. Dormis kapridoj el la personara fako, virkaproj el la fako financa, ku-

nikloj el la fako de interaj pagoj, hienoj kaj ŝakaloj el la sona dekoraĵo, kaj kolombinoj el la tajpa buroo.

Ne dormis nur unu malpura paro. La granda kombianto eliris el sia kajuto je la unua nokte. Lin sekvis senbrua ombro de fidela Kisa. Ili leviĝis sur la ferdekon, kaj neaŭdeble proksimiĝis al la seĝo, kovrita per folioj da krucligno. Singarde demetinte la kovraĵon, Ostap metis la seĝon sur ĝiajn piedetojn, kunpremite la makzelojn li disŝiris la tegaĵon per la tenaĵlo, kaj enigis la manon en sub la sidaĵon.

Vento kuradis sur la supra ferdeko. En la ĉielo moviĝetis steloj. Sub la piedoj, en profunda subo, plaŭdis nigra akvo. La bordoj ne estis videblaj. Ipolit Matveeviĉ tremis.

– Estas! – diris Ostap per premiĝa voĉo.

LETERO DE PATRO FJODOR,

skribita per li en Bakuo, en meblitaj ĉambroj “Kosto” al sia edzino en distriktan urbon No.

Mia kara kaj valorega Katja!

Ĉiuhore proksimiĝas ni al nia feliĉo. Mi skribas al vi en meblitaj ĉambroj “Kosto”, vizitinte ĉiujn bezonatajn lokojn.

Urbo Bakuo estas tre granda. Ĉi tie, onidire, oni akiras kerosenon, sed veturi tien oni devas per elektra trajno, sed mi ne havas monon. Tiu ĉi pitoreska urbo troviĝas sur bordo de Kaspia maro.

Ĝi vere estas tre granda laŭ dimensioj. Varmego ĉi tie estas terura. Sur unu mano mi portas la palton, sur alia – la jakon, kaj eĉ post tio estas varmege. La manoj ŝvitas. Tempo de tempo mi plezuriĝas per teo. Kaj mono preskaŭ forestas. Sed tio ne problemas, kolombino mia, Katerina Aleksandrovna, mono, post nelonge, abundos ĉe ni. Vizitados ni ĉion, kaj poste ekloĝos bonorde en Samaro, apud nia fabrik-

eto, kaj likvoron drinketos ni. Tamen, pli proksimen al la afero.

Urbo Bakuo, laŭ sia geografia situo kaj kvanto da loĝantaro, signife superas urbon Rostov. Tamen ĝi cedas al urbo Ĥarkov pri urbotrafiko. Alinaciuloj multegas ĉi tie. Aparte multaj estas armenoj kaj persoj. De ĉi tie, panjo mia, tre proksimas Turkio. Vizitis mi ankaŭ bazon, kaj vidis multe da turkaj aĵoj kaj ŝaloj. Volis mi aĉeti donacon por vi, islaman kovrotukon, sed mono forestis. Kaj ekpensis mi ke kiam ni riĉiĝos (ĝis tio oni devas tagojn kalkuli), tiam ankaŭ islaman kovrotukon ni povos aĉeti.

Ho, patrineto, forgesis mi skribi al vi pri du teruraĵ aferoj okazintaj al mi en urbo Bakuo: 1) jako de frato via, bakisto, elfalis de mi en Kaspian maron kaj 2) En la bazaro kraĉis sur min unuĝiba kamelo. Tiuj du okazaĵoj ege mirigis min. Kial la regantaro permesas tiujn ĉi ekscesojn rilate al veturantaj pasaĝeroj, des pli ke la kamelon mi ne tuŝis, sed faris eĉ agrablaĵon al ĝi: tiklis mi ĝian nazotruon per vergeto! Kaj la jakon oni elkaptadis per la tuta komunumo, pene elkaptis ĝin, sed ĝi okazis tuta makulita per keroseno. Nun mi ne scias eĉ kion diri al via frato bakisto. Do vi, kolombino, dume ne disbabilu tion. Ĉu Evstignejev daŭre tagmanĝas ĉe ni?

Relegis mi la leteron, kaj ekvidis ke pri la afero sukcesis mi rakonti al vi nenion. Inĝeniero Bruns vere laboras en Aznafto. Sed en urbo Bakuo li forestas nun. Li forveturis por forpermesi en urbon Batumo. Lia familio loĝas tie konstante. Mi parolis ĉi tie kun homoj, kaj ili diras ke vere tuta meblaro de Bruns troviĝas en Batumo. Li loĝas tie en somerdomo, en Verda Kabo, – estas tie tiu someruma loko (multekosta, oni-dire). Vojo de ĉi tie ĝis Batumo –15 rubloj kun iom da kopekoj. Sendu vi dudekon ĉi tien, per telegrafo, kaj poste, el Batumo, mi pri ĉio telegrafos al vi. Disvastigu en la urbo onidirojn ke mi ĝis nun troviĝas ĉe la severe malsana onklino en Voroneĵ. Ĉiame via, via edzo Fedja.

Post-skribo: **Forportante**³⁸ tiun ĉi leteron al poŝkesto oni forŝtelis de mi, el ĉambroj “Kosto”, palton de via frato bakisto. Mi estas tiel ĉagrenita! Bone ke nun estas somero! Nenion vi diru al la frato.

Ĉapitro 33

Forpelo el la paradizo

Dum iuj herooj de la romano estis konvinkitaj ke tempo povas atendi, kaj aliaj opiniis ke ne, la tempo iris sian ordinaran vojon. Post polva moskva majo venis la polva junio. Aŭto “Ŝtat. num. 1”, en distrikta urbo No, difektiĝinta pro voja kavo, jam du semajnoj staris sur angulo de Staropana placo kaj strato je nomo de kamarado Gubernskij, tempo de tempo kovrante la ĉirkaŭaĵojn per terura fumo. El stargoroda malliberejo eliris, aparte, konfuziĝintaj partoprenantoj de komploto “Glavo kaj plugilo”: ĉe ili estis prenita skriba promeso pri neforveturo. Vidvino Gricacujeva (pasia virino, revo de poeto) revenis al sia spicvara afero, kaj estis monpunita per dek kvin rubloj pro tio ke ŝi ne elpendis sur videbla loko prezaron por sapo, pipro, tolaĵ-bluiĝaĵo, kaj aliaj etaj varoj, – forgesemo pardonebla al virino kun granda koro!

– Estas! – ripetis Ostap per ŝanĝiĝinta voĉo. – Tenu!

Ipolit Matveeviĉ akceptis en siajn tremantajn manojn platan lignan skatoleton. Ostap, en la mallumo, daŭre prisercis la seĝon. Ekbrilis borda lumtureto. Sur la akvon ekkuŝis ora stangeto, kaj ekfloris post la ŝipo.

38. **Forportante**: Pri la stilo respondecas patro Fjodor mem.

- Diable! – diris Ostap. – Nenio pli!
- N-n-e povas esti, – elmurmuris Ipolit Matveeviĉ.
- Nu, ankaŭ vi priserĉu.

Vorobjaninov, ne spirante, falis sur la genuojn, kaj ĝis la kubuto enigis la manon sub la sidaĵon. Inter la fingroj li eksentis bazon de la risorto. Krom tio tie troviĝis nenio firma. La seĝo disvastigis aĉan sekan odoron de mal-trankviligita polvo.

- Ĉu forestas? – demandis Ostap.
- Forestas.

Tiam Ostap levis la seĝon, kaj ĵetis ĝin malproksimen trans la ŝiprandon. Ekaŭdiĝis peza plaŭdo. Tremetante pro la nokta malsekeco, la dubantaj koncesiuloj revenis en sian kajuton.

- Do, – diris Ostap. – Ion ni, ĉiuokaze, trovis.

Ipolit Matveeviĉ elpoŝigis la kesteton, kaj nekomprene ekrigardis ĝin.

- Agu, agu! Ne rigardaĉu!

La kesteto ekestis malfermita. Sur ĝia fundo kuŝis kupra verdiĝinta plateto kun surskribo:

Per tiu ĉi duonbrakseĝo majstro Hambs komencas novan opon da mebloj. Jaro 1865, Sankt-Peterburgo.

Tiun ĉi surskribon Ostap pe-legis voĉe.

– Sed kie estas la brilantoj? – demandis Ipolit Matveeviĉ.

– Vi estas mirinde divenema, kara taburet-ĉasisto! La brilantoj, kiel vi vidas, forestas.

Estis bedaŭrinde rigardi na Vorobjaninov. Liaj iom elkreskintaj lipharoj moviĝis, vitroj de la nazumo estis nebulaj.

Ŝajnis ke pro la malespero li frapas per la oreloj siajn van-
gojn.

Malvarma racia voĉo de la granda kombinanto oka-
zigis sian kutiman magian agon. Vorobjaninov etendis la
manojn, premante ilin al la eluzita pantalono, kaj eksilentis.

– Silentu, malĝojo, silentu, Kisa! Iam ni priridos tiun ĉi
stultan okan seĝon, en kiu troviĝis la stulta plateto. Tenu
vin. Ĉi tie estas ankoraŭ tri seĝoj: naŭdek naŭ ŝancoj el
cent!

Dum la nokto sur vango de ekstreme ĉagrenita Ipolit
Matveeviĉ elsaltis vulkana pustulo. Ĉiuj suferoj, ĉiuj mal-
sukcesoj, ĉiuj turmentoj de kurado post la brilantoj, ĉio tio,
ŝajne, eniris la pustulon kaj respegulis nun per perlamoto,
sunsubira ĉerizo, kaj tolaĵ-bluigaĵo.

– Ĉu vi faris tion speciale? – demandis Ostap.

Ipolit Matveeviĉ suspiris konvulsie kaj, longa, iom
kliniĝinta, kiel fiŝkapta vergo, iris preni la farbojn. Komen-
ciĝis produktado de la reklamtabulo.

La koncesiuloj laboris sur la ferdeko.

Kaj komenciĝis tria tago de la river-vojaĝo.

Komenciĝis ĝi de mallonga kunpuŝiĝo de la blovorkes-
tro kontraŭ la son-dekoruloj pro provluda loko.

Post la matenmanĝo, samtempe de du flankoj, al la
pobo direktiĝis forteguloj kun la latunaj blovinstrumentoj,
kaj la magraj kavaliroj de Esmarĥ-vazoj. Unua sur la poban
benkon sukcesis eksidi Galkin. Poste alkuris klarneto el la
blovorkestro.

– La loko estas okupata, – sulkinte la brovojn diris
Galkin.

– Per kiu okupata? – demandis minace la klarneto.

– Per mi, per Galkin.

– Kaj ankoraŭ per kiu?

– Per Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind.

– Ĉu eble ankaŭ per Katafalkin? Tio estas nia loko!

De ambaŭ flankoj proksimiĝis freŝaj fortoj. Venis tubjo, trioble zonigita per la latuna drako. Tio estis plej potenca maŝino en la orkestro. Balanciĝis valvhava korno, simila al orelo. Trombonoj staris en plena batalpreteco. La suno milfoje respeguliĝis en la kirasoj. Mallume kaj ete aspektis la sona dekoro. Tie intermitis botela vitro, pale lumiĝis la klisteraj vazoj. Kaj saksafono, indigna parodio al vera blovinstrumento, estis bedaŭrinda, kaj similis pipon.

– La klistera bataliono, – diris incitulo-klarneto, – pretendas je la loko.

– Vi, – diris Zalkind, penante trovi ion plej ofendan, – vi estas muzikaj konservativuloj!

– Ne malhelpu al ni provludi!

– Tio estas vi kiuj malhelpas al ni!

– Ju malpli oni provludas per viaj noktaj vazoj, des pli bele okazas.

– Ĉu oni provludas per viaj samovaroj, ĉu ne, rezulto estas tute sama.

Veninte al neniuj interkonsento, la ambaŭ flankoj restis sur sama loko kaj ekludis ĉiu sian. Laŭ la rivero ektanĝis sonoj, kiujn povus eligi nur tramo, malrapide rampanta sur pecoj da surrela vitro. La blovistoj plenumis marŝon de Keksholma gvardia regimento, kaj la sona dekoro – negrandancon “Antilopo ĉe riverkomenco de Zambezo”. La skandalo estis ĉesigita per persona interveno de prezidanto de la lota komisiono.

Ĝis la dudek-tria la grandega laboro estis pe-ita. Irante retren Ostap kaj Vorobjaninov tiris la reklaman tabulon al la ŝipestra ponteto. Antaŭ ili, levante la manojn al la steloj, kuris la dikuleto-mastrumisto. Per komunaj penoj la

reklamtabulo estis pe-ligita al la balustrado. Ĝi altiĝis super la pasaĝera ferdeko kiel ekranon. Elektromuntisto dum duonhoron venigis al dorso de la reklamtabulo dratojn, kaj enigis tri lampojn. Restis nur turni la ŝaltilon.

Antaŭe, sur dekstra bordo, jam videblis lumetoj de urbo Vasjuki.

Por solena lumigado de la reklamtabulo la mastrumisto kunvokis tutan loĝantaron de la ŝipo. Ipolit Matveeviĉ kaj la granda kombinanto rigardis la kunvenintojn de supre, starante ĉe flankoj de sia ankoraŭ malluma verko.

Ĉiu okazaĵo sur la ŝipo tuŝis animon mem de la flo-santa entrepreno. Tajpistinoj, kurieroj, respondecaj personoj, kolumbanoj kaj ŝipano amasiĝis, suprenlevante la kapojn, sur la pasaĝera ferdeko.

– Faru! – ordonis la dikulo.

La reklamtabulo lumiĝis.

Ostap rigardis soben, la homamason. Rozkolora lumo ekkuŝis sur la vizaĝoj.

La spektantoj ekridis. Poste venis silento. Kaj severa voĉo de sube diris:

– Kie estas la mastrumisto?

La voĉo estis ĝis tiom respondeca, ke la mastrumisto, ne kalkulante la ŝtupojn, ĵetiĝis suben.

– Rigardu, – diris la voĉo, – admiru vian laboron!

– Tuj oni forpelos nin! – flustris Ostap al Ipolit Matveeviĉ.

Kaj vere, sur la supran ferdekon kiel akcipitro alflugis la dikuleto.

– Nu, kiel la tabuleto? – arogante demandis Ostap. – Ĉu influas?

– Kunprenu viajn aĵojn! – kriis la mastrumisto.

– Por kio tiu ĉi hasto?

– Kun-pre-nu la aĵojn! For! Oni juĝos vin! Nia estro ne ŝatas ŝercojn!

– Forpelu lin! – ekaŭdiĝis se sobe la respondeca voĉo.

– Sed serioze, ĉu la tabulo ne plaĉas al vi? Ĉu tio vere estas ne tro bona tabulo?

Daŭrigi la ludon estis sence. “Skrjabin” jam albor-diĝis al Vasjuki, kaj de la ŝipo oni povis vidi mirigitajn vi-zaĝojn de vasjukianoj, amasiĝintaj sur la albordiĝejo.

Oni kategorie rifuzis doni monon. Por la preparoj estis donitaj nur kvin minutoj.

– Aĉuloj, – diris Simbieviĉ-Sindieviĉ, dum la partneroj deiris sur la bordon. – Se oni komisiis tiun ĉi reklamtabu-lon al mi, mi farus ĝin tiel ke neniu **Mejerhold**³⁹ sukcesus superi min.

Sur la albordiĝejo la koncesiuloj haltis kaj ekrigardis supren. En la nigra ĉielo brilis la reklamtabulo.

– J-jes, – diris Ostap, – ĝi vere estas sufiĉe sovaĝa. Mizera plenumo.

Desegno farita per vosto de malobeema mulo ŝajnus muzea valoraĵo kompare kun la reklamtabulo far Ostap. Anstataŭ semanto, disĵetanta pruntatestilojn, petolaĉa mano de Ostap figuris iun detranĉaĵon kun konusa kapo, kaj kun maldikaj vipoj anstataŭ la manoj.

La vaporŝipo, post la koncesiuloj, flamegis per lumo kaj tondris per muziko, sed antaŭe, sur la alta bordo, estis obskuro de distrikta meznokto, hunda bojo, kaj malprok-sima tirharmoniko.

– Mi resumas la situacion, – diris Ostap vivĝoje. – Pa-sivo: plena foresto de mono, la tri seĝoj forveturas laŭ la

39. **Mejerhold** (1874-1940): fama reĝisoro, pereigita per Stalin.

riverfluo, noktumejo forestas, kaj eĉ ne unu ĵetono de infankomisiono. Aktivo: Gvidlibro pri Volgo, eldonita en mil naŭcent dudek sesa jaro (estis necese pruntepreni ĝin el kajuto de *mosje* Simbieviĉ). Fari la bilancon sendeficita estas ege malfacile. Noktumi ni devos en la albordiĝejo.

La koncesiuloj lokiĝis sur la albordiĝejaj benkoj. Ĉe lumo de aĉa kerosena lampo Ostap pe-legis el la gvidlibro:

«Sur dekstra alta bordo – urbo Vasjuki. De ĉi tie oni eksportas lignajn materialojn, gumon, baston, bastajn matojn, ĉi tien oni importas aĵojn de vasta uzado por la regiono, troviĝanta 50 kilometroj de fervojo. En la urbo 8000 loĝantoj, ŝtata kartona fabriko kun 320 laboristoj, etaj krudfer-giseja, bierprodukta kaj leda uzinoj. El lernejoj, entreprenoj, krom komunkleraj, estas forsta teknikumo.»

– La situacio estas multe pli serioza ol mi supozis, – diris Ostap. – Elbati monon el la vasjukianoj dume prezentigas al mi tasko neplenumbla. Kaj da mono ni bezonas ne malpli ol tridek rublojn. Unue ni devas nutri nin kaj, due, ni devas devanci la lotan lavkuvon kaj renkontiĝi kun kolumbanoj sur firma tero en Stalingrado.

Ipolit Matveeviĉ volviĝis kiel maljuna magra kato post kunpuŝiĝo kun la juna kontraŭulo – energia posedanto de tegmentoj, subtegmentoj, kaj subtegmentaj fenestroj.

Ostap promenadis preter la benkoj, meditante kaj kombinante. Ĝis la unua nokte ekestis jam preta brila plano. Bender ekkuŝis apud la partnero, kaj ekdormis.

Ĉapitro 34

Interplaneda ŝaka kongreso

De la mateno en Vasjuki iradis alta magra maljunulo kun ora nazumo kaj en botoj malaltaj, tre malpuraj, makulitaj per farboj. Li algluis sur la murojn manskribajn afiŝojn:

*La 22-an de junio 1927
en klubejo “Kartonisto” okazos lekcio
“PRODUKTIVA DEBUTA IDEO”*

*Kaj
SEANCO DE SAMTEMPA ŜAKLUDO SUR 160 TABULOJ
far grossmeister (ĉefa ŝak-majstro) O. Bender.*

*Ĉiuj venas kun siaj tabuloj.
Pago por la ludo: 50 kopekoj.
Pago por la eniro: 20 kopekoj.
Komenco ĝuste je la 6-a vespere.*

Administranto K. Miĥelson.

Ankaŭ la grandmajstro mem ne perdis la tempon. Luinte la klubon per tri rubloj li turnis sin al la ŝaka sekcio, kiu lokiĝis ial en koridoro de la ĉevalbreda kontoro.

En la ŝaka sekcio sidis unuokula homo kaj legis romanon de Ŝpilhagen (Spielhagen), eldonitan far Panteleev.

– Grandmajstro O. Bender! – deklaris Ostap, eksidante la tablon. – Mi organizas ĉe vi seancon de samtempa ŝakludo.

Sola okulo de la vasjukia ŝakisto malfermiĝis ĝis limoj permesataj per naturo. – Unu momenton, kamarado grandmajstro! – kriis la unuokululo. Bonvolu sidi. Mi tuj.

Kaj la unuokululo forkuris. Ostap pririgardis ejon de la ŝaka sekcio. Sur la muroj pendis fotografaĵoj de rajdoĉevaloj, kaj sur la tablo kuŝis polva kontora libro kun titolo: “Atingo de Vasjukia ŝaka sekcio en jaro 1925».

La unuokululo revenis kun dek-duo da diversaĝaj civitanoj. Ili ĉiuj laŭvice alvenadis konatiĝi, nomis sin, kaj estime premis manon de la grandmajstro.

– Preterveture en Kazanon, diris Ostap abrupte, – jes, jes, la seanco okazos hodiaŭ vespere, venu. Kaj nun, pardonu min, mi ne estas en bona sporta stato: laciĝis mi post la karlsbada turniro.

Vasjukiaj ŝakistoj aŭskultis na Ostap kun fila amo. Ostap entuziasmiĝis. Li sentis alfluon de novaj fortoj kaj ŝakaj ideoj.

– Vi eĉ ne kredos – diris li, – kiel disvolviĝis ŝaka pensado. Lasker, ĉu vi scias, venis ĝis vulgaraĵoj. Ekestis jam neeble ludi kun li. Li fumigas siajn kontraŭulojn per cigaroj. Kaj speciale li fumas la malmultekostajn, por ke la fumo estu pli abomena. Ŝaka mondo ekas maltrankviliĝi.

La grandmajstro transiris al lokaj temoj.

– Kial en provinco oni trovas neniun ludon de penso? Jen, ekzemple, via ŝaka sekcio. Ĝi nomiĝas ĝuste tiel: ŝaka sekcio. Enue, fraŭlinoj! Kial ne nomi ĝin bele, vere ŝake. Tio allogus en la sektion vastan publikon. Kio se vi nomu vian sektion, ekzemple, “Ŝaka klubo de kvar ĉevaloj”, aŭ “Ruĝa ludfinaĵo”, aŭ “Perdo de la kvalito ĉe gajno de la tempo”. Estus bone! Sonore!

La ideo havis sukceson.

– Vere, – diris la vasjukianoj, – kial ne renomi nian sektion en “Klubo de kvar ĉevaloj”?

Ĉar prezidantaro de la ŝaka sekcio troviĝis surloke, Ostap aranĝis sub sia honora prezidanteco minutan kunsil-

don, en kiu la sekcion oni unuvoĉe renomis je “Ŝaka klubo de kvar ĉevaloj”. La grandmajstro propramane, uzante lecionojn de “Skrjabin”, arte plenumis sur peco de kartono elpendaĵon kun kvar ĉevaloj kaj kun konvena surskribo.

Tiu ĉi grava iniciato promesis disfloron de ŝaka pensado en Vasjuki.

– Ŝako! – diris Ostap. – Ĉu vi scias kio estas ŝako? Ĝi movas antaŭen ne nur kulturon, sed ankaŭ ekonomikon! Ĉu vi scias ke via “Ŝaka klubo de kvar ĉevaloj” povas, ĉe ĝusta aranĝo de la afero, tute transformi urbon Vasjuki?

De hieraŭa tago Ostap manĝis ankoraŭ nenion. Pro tio lia elokventeco estis eksterordinara.

– Jes! – kriis li. – Ŝako pliriĝigas la landon! Se vi konsentos pri mia projekto, de la urbo al la albordiĝejo vi irados per marmoraj ŝtuparoj! Vasjuki estos centro de deko da gubernioj! Kion vi aŭdis antaŭe pri urbo Zemmering? Nenion! Sed nun tiu ĉi urbetaĉo estas riĉa kaj fama nur pro tio ke tie estis organizita internacia turniro. Tial mi diras: en Vasjuki oni devas organizi internacian ŝakan turniron.

– Ĉu?! – kriis ĉiuj.

– Tute reala afero, – respondis la grandmajstro, – miaj personaj ligoj, kaj via aktivado – tio estas ĉio bezonata kaj sufiĉa por organizado de internacia vasjukia turniro. Pensu pri tio kiel bele tio sonos: «Internacia vasjukia turniro de 1927-a jaro». Alveturo de Ĥoze (Jose) Raul Kapablanka (Capablanca), Emanuil Lasker, Aloĥin, Reti, Rubinŝtejn, Taraŝ (Tarrasch), Widmar, kaj de doktoro Grigorjev estas garantiita. Krom tio estas garantiita ankaŭ mia partopreno!

– Sed mono! – ĝemis la vasjukianoj. – Ili ĉiuj devas esti pagataj! Multaj miloj da mono! Kie preni ĝin?

– Ĉio estas pripensita, – diris O. Bender, – la monon donos kolektado.

– Sed kiu ĉe ni pagos tiujn frenezajn sumojn? Vasjukianoj...

– Kial vasjukianoj! Vasjukianoj ne pagos la monon. Ili ri-ce-vos ĝin! Tio estas ekstreme simple, ĉar al turniro kun partopreno de plej altaj majstroj kunveturos ŝatantoj de ŝako de tuta mondo. Centmiloj da homoj, riĉaj homoj, strebos veni en Vasjuki. Unue, la rivera transporto ne eltenos tiun kvanton da pasaĝeroj. Sekve Popola Komisarejo pri vojoj konstruos ĉefan fervojon Moskvo-Vasjuki. Tio – unue. Due – tio estas hoteloj kaj ĉielskrapuloj por dislokigi la gastojn. Trie – disvolviĝo de agrikulturo en radiuso de mil kilometroj: oni devas provizi la gastojn per legomoj, fruktoj, kaviaro kaj ĉokoladaj bombonoj. La palaco, en kiu okazos la turniro, – kvar. Kvin – konstruado de garaĝoj por aŭtoj de la gastoj. Por dissendi tra tuta mondo sensaciajn rezultojn de la turniro estos bezonata superpotenca radiostacio. Tio estas ses. Nun koncerne de ĉefa fervojo Moskvo-Vasjuki. Sendube ĝi ne scipovos transporti en Vasjuki ĉiujn dezirantojn. De tio sekvas flughaveno “Granda Vasjuki” – regulaj flugoj de poŝtaj aviadiloj kaj aerŝipoj en ĉiujn angulojn de mondo, inkluzive na Los-Anĝeles kaj Melburn.

Brilegaj perspektivoj disvolviĝis antaŭ vasjukiaj hobiuloj. Limoj de la ĉambro disvastiĝis. Putraj muroj de la ĉevalbredista nesto ruiniĝis, kaj anstataŭ ili la bluan ĉielon eniris vitra tridek-tri-etaĝa kastelo de ŝaka pensado. En ĉiu ĝia halo, en ĉiu ĉambro, kaj eĉ en kugle preterflugantaj liftoj sidis enpenŝiĝintaj homoj kaj ludis ŝakojn sur tabuloj inkrustitaj per malakito...

Marmoraj ŝtuparoj defalis ĝis blua Volgo mem. Sur la rivero staris oceanaj ŝipoj. En la urbon, per funikularoj, leviĝis vizaĝaĉaj alilandanoj, ŝakaj sinjorinoj, aŭstraliaj ŝatantoj de hindia defendo, hindianoj en blankaj turbanoj,

adeptoj de hispana partio, germanoj, francoj, novzelandanoj, loĝantoj de Amazon-rivera baseno, kaj ankaŭ moskvanoj, kievanoj, leningradanoj, siberianoj kaj odesanoj, enviantaj la vasjukianojn.

Vicoj da aŭtoj ĉene moviĝis inter la marmoraj hoteloj. Sed jen – ĉio haltis. El luksa hotelo “Trairanta peono” eliris mondĉampiono Ĥoze-Raul Kapablanka-kaj-Graupera. Lin ĉirkaŭis damoj. Policisto, vestita en specialan ŝakan uniformon (vasta kvadratigita pantalono kaj kurieroj sur la kolum-anguloj), ĝentile mansalutis. Al la ĉampiono memfide alvenis unuokula prezidanto de vasjukia “Klubo de kvar ĉevaloj”.

Konversacio de la du steluloj, kiun ili subtenis angle, estis ĉesita per alflugo de doktoro Grigorjev, kaj estonta mondĉampiono Aloĥin.

Salutaj krioj tremigis la urbon. Ĥoze-Raul Kapablanka-kaj-Graupera iom grimaciĝis. Laŭ mansigno de la unuokululo al la aviadilo estis venigita marmora ŝtuparo. Doktoro Grigorjev dekuris per ĝi, salute svingantela novan ĉapelon, kaj komentante eblan eraron de Kapablanka en okazonta matĉo kontraŭ Aloĥin.

Subite sur la horizonto ekestis vidata nigra punkto. Ĝi rapide proksimiĝis kaj kreskis, transformiĝinte en grandan smeraldkoloran paraŝuton. Sur la paraŝuta ringo pendis, kiel granda rafano, homo kun valizeto.

– Tio estas li! – kriis la unuokululo. Hura! Hura! Hura! Mi rekonas grandan filozofon-ŝakiston doktoron Lasker. Nur li, en tuta mondo, portas tiujn verdajn ŝtrumpetojn.

Ĥoze-Raul Kapablanka-kaj-Graupera denove grimaciĝetis.

Oni haste submetis al Lasker marmoran ŝtuparon, kaj la vigla eksĉampiono, forblovante de la maldekstra maniko

la pulveron, kiu alsidis dum lia flugo super Silezio, falis en brakumojn de la unuokululo. La unuokululo prenis na Lasker je la talio, venigis lin al la ĉampiono kaj diris:

– Paciĝu! Mi petas vin je nomo de vasjukia loĝantaro! Paciĝu vi!

Ĥoze-Raul brue suspiris kaj, skuante manon de la maljuna veterano diris:

– Mi ĉiam adoris vian ideon pri transigo de kuriero en hispana partio de b5 al c4.

– Hura! – eksklamaciis la unuokululo. – Simple kaj konvinke, en stilo de ĉampiono!

Kaj la tuta neimagebla homamaso subkaptis:

– Hura! Vivat! Banzaj! Simple kaj konvinke, en stilo de ĉampiono!!!

Ekspresaj trajnoj alruligis al dek du stacidomoj de Vasjuki novajn kaj novajn amasojn da ŝak-ŝatantoj.

La ĉielo jam flamegis pro lumantaj reklamoj, kiam tra la stratoj de la urbo oni trakondukis blankan ĉevalinon. Tio estis sola ĉevalino restinta post mekanizigo de vasjukia transporto. Per speciala dekreto ŝi estis alinomita je ĉevalo. Ŝatantoj de ŝakoj salutis ŝin, svingante palmajn branĉojn kaj ŝaktabulojn.

– Ne maltrankviliĝu, – diris Ostap, – mia projekto garantias al via urbo eksterordinaran disfloron da produktivaj fortoj. Pensu pri kio okazos post kiam la turniro finiĝos, kaj ĉiuj gastoj forveturos. Loĝantoj de Moskvo, premataj per la loĝeja krizo, ĵetiĝos en vian belegan urbon. La ĉefurbo aŭtomate transiras en Vasjuki. Ĉi tien alveturas la registaro. Vasjuki alinomiĝas je Nov-Moskvo, kaj Moskvo – en Malnov-Vasjuki. Leningradanoj kaj ĥarkovanoj grincas per la dentoj, sed povas fari nenion. Nov-Moskvo iĝas plej

eleganta centro de Eŭropo kaj, post nelonge, ankaŭ de tuta mondo.

– De tuta mondo!!! – elĝemis la stuporiĝintaj vasjukianoj.

– Jes! Kaj poste ankaŭ de tuta universo. La ŝaka penso, kiu aliformigis la distriktan urbon en ĉefurbon de nia planedo, mem aliformiĝos en aplikan sciencon, kaj inventos metodon de interplanedaj vojaĝoj. El Vasjuki flugos signaloj al Marso, Jupitero kaj Neptuno. Komunikado kun Venuso estos same simpla kiel translokiĝo el urbo en urbon. Kaj tiam, kiu scias, eblas ke post ĉirkaŭ ok jaroj en Vasjuki okazos unua, en historio de universo, ŝaka kongreso!

Ostap viŝis sian noblan frunton. Li estis malsata ĝis tiom ke volonte formanĝus rostitan ŝakan ĉevalon.

– Je-es, – elpremis el si la unuokululo, freneze ĉirkaŭrigardante la polvan ejon. – Sed kiel praktike efektiviĝi en-vivigon de la projekto, enigi, tiel dirite, bazon sub ĝin?

La ĉeestantoj streĉe rigardis la grandmajstron.

– Mi ripetas ke la afero, praktike, dependas nur de via agemo. Tutan organizadon mi prenas sur min. Bezonatas nenioj materialaj elspezoj, se ne enkalkuli koston de telegramoj.

La unuokululo puŝetis siajn kunulojn.

– Nu! – demandis li. – Kion vi diros?

– Ni aranĝu! Aranĝu! – bruis la vasjukianoj.

– Sed kiom da mono bezonas tio... telegramoj?

– Ridinda sumo, – diris Ostap, – cent rublojn.

– Ĉe ni en la kaso estas nur dudek unu rubloj dek ses kopekoj. Certe ni komprenas ke tio tute ne sufiĉas...

Sed la grandmajstro okazis konsentema organizanto.

– Bone, – diris li, – donu viajn dudek rublojn.

– Sed ĉu sufiĉas? – demandis la unuokululo.

– Por komencaj telegramoj sufiĉas. Poste venados oferoj, kaj ne estos kien ŝovi la monon.

Kaŝinte la monon en la verdan vojaĝan jakon la grandmajstro memorigis la kuniĝintojn pri sia lekcio kaj seanco de samtempa ludo sur cent sesdeko da tabuloj, ĝentile adiaŭis ilin ĝis la vespero, kaj eniris klubon “Kartonisto” por rendevui na Ipolit Matveeviĉ.

– Mi malsatas, – diris Vorobjaninov per krakanta voĉo.

Li sidis jam ĉe la kasa giĉeto, sed kolektis ankoraŭ eĉ ne unu kopekon, do povis aĉeti eĉ ne pecon da pano. Antaŭ li kuŝis verda drata korbeto, destinita por kolektota mono. En tiuj korbetoj oni, en mezprosperaj familioj, tenas tranĉilojn kaj forkojn.

– Aŭskultu, Vorobjaninov, – kriis Ostap, – ĉesu por unu horo la kasajn operaciojn. Iru ni tagmanĝi en popolnutejon. Dum la vojo mi priskribos la situacion. Parenteze, vi devas raziĝi kaj puriĝi. Vi aspektas kiel trampo. Ĉe grandmajstro ne povas esti tiel suspektaj konatuloj.

– Eĉ ne unu bileton mi vendis, – informis Ipolit Matveeviĉ.

– Ne gravas. Ĝis vespero oni alkurados. La urbo jam oferis al mi dudek rublojn por organizo de internacia ŝaka turniro.

– Do por kio ni okupiĝu pri la seanco de samtempa ludo? – flustris la administranto. – Ja povas okazi ke oni batos nin. Kaj per la dudek rubloj ni povas tuj preni lokon sur ŝipo: ĝuste nun “Karl Libkneĥt (Liebknecht)” venis de supre. Trankvile veturu ni ĝis Stalingrado, kaj atendu tie venon de la teatro. Se ni sukcesos tie dissekci la seĝojn, tiam ni – riĉuloj, kaj ĉio apartenas al ni.

– Ĉe malsata stomako oni ne devas diri tiujn stultojn. Tio negative influas la cerbon. Per dudek rubloj ni, eble, veturos ĝis Stalingrado... Sed per kiu mono ni nutru nin? Vitaminoj, kara kamarado gvidanto, al neniuj estas donataj senpage. Sed de vervaj vasjukianoj ni povas deŝiri, per la lekcio kaj la seanco, ĉirkaŭ tridekon da rubloj.

– Ili batos! – amare diris Vorobjaninov.

– Certe, ekzistas la risko. Oni povas kapti iom da frapoj. Tamen ĉe mi estas unu penseto kiu, ĉiuokaze, sendanĝerigos vin. Sed pri tio poste. Dume ni iru gustumi lokajn pladojn.

Cis la sesa vespere sata, razita, kaj odoranta per parfumo grandmajstro eniris kason de klubo “Kartonisto”.

Sata kaj razita Vorobjaninov vigle vendis biletojn.

– Nu, kio? – mallaŭte demandis la grandmajstro.

– Eniraj – tridek, kaj por ludi – dudek biletoj, – respondis la administranto.

– Dek ses rubloj. Malmulte, malmulte!

– Pri kio vi, Bender, rigardu kia vico staras! Oni sendube batos.

– Pri tio vi ne pensu. Vi ploros kiam oni batos vin, sed dume ne prokrastu! Lernu komercadi!

Post unu horo en la kaso estis tridek kvin rubloj. En la halo maltrankviladis la publiko.

– Fermu la ĝiceton! Donu la monon! – diris Ostap. – Kaj nun jen kio. Prenu vi kvin rublojn, iru al la albordiĝejo, luu tie boaton por ĉirkaŭ du horoj, kaj atendu min ĉe bordo, iom pli sobe ol la staplo. Ni faru vesperan promenadon. Pri mi vi ne maltrankviliĝu. Hodiaŭ mi estas en bona sporta stato.

La grandmajstro eniris la halon. Li sentis sin vigla kaj bone sciis ke la unua movo, e2-e4, minacas al li per neniuj

komplikaĵoj. Kvankam sekvantaj movoj perdiĝis en plena nebulo, tio neniom ĝenis la grandan kombinanton. Ĉe li estis preparita tute nekutima eliro por savi sin eĉ de plej senespera partio.

La grandmajstron oni renkontis per aplaŭdoj. La ne-granda kluba halo estis plibeligita per diverskoloraj flage-toj.

Antaŭ semajno ĉi tie okazis vespero de “Socio por savo sur akvoj”, pri kio atestis surmura slogano:

**AFERO DE HELPO AL DRONANTOJ
TROVIĜAS EN MANOJ DE LA DRONANTOJ MEM**

Ostap kliniĝis, etendis antaŭen la manojn, kvazaŭ rifuzante akcepti ne meritajn aplaŭdojn, kaj surpaŝis la po-dion.

– Kamaradoj! – diris li per belega voĉo. – Kamaradoj kaj ŝakaj fratoj, temo de mia hodiaŭa lekcio estas sama al tiu kiun mi prezentis antaŭ semajno en Niĵnij Novgorod kaj, mi devas konfesi, ne sen sukceso. Temo de mia lekcio estas fruktodona debuta ideo. Kio, kamaradoj, estas debuto kaj kio, kamaradoj, estas ideo? Debuto, kamaradoj, estas «*Kvasi una fantasia*». Kaj kio, kamaradoj, estas ideo? Ideo, kamaradoj, – tio estas homa penso prezentita per lo-gika ŝaka formo. Eĉ kun sensignifaj fortoj oni povas ekregi la tutan tabulon. Ĉio dependas de ĉiu aparta individuo mem. Jen tiu blonduleto, ekzemple, en tria vico. Ni supozu ke li ludas bone...

La blondulo en la tria vico ruĝiĝis.

– Kaj jen tiu nigraharulo kiu, ni supozu, ludas malpli bone.

Ĉiuj turniĝis kaj pririgardis ankaŭ la nigraharulon.

– Kion do ni vidas, kamaradoj? Ni vidas ke la blondulo ludas bone, kaj la nigraharulo ludas malbone. Kaj neniuj

lekcioj ŝanĝos tiun ĉi rilaton inter la fortoj, se ĉiu individuo aparte ne trejnos konstante pri dam... mi volis diri pri ŝakludo. Kaj nun, kamaradoj, mi rakontos al vi kelkajn instruajn historiojn el praktiko de niaj estimataj hipermoder-nuloj Kapablanka, Lasker kaj doktoro Grigorjev.

Ostap rakontis al la ĉeestantoj kelkajn antikvajn anekdotojn, kiujn li elĉerpis ankoraŭ infanaĝe el “Blua revuo”, kaj per tio finis la intermezon.

Ĉiuj estis iom mirigitaj per mallongeco de la lekcio. La unuokululo ne deigis sian solan okulon de piedvestoj de la grandmajstro.

Tamen komenciĝinta seanco de la samtempa ludo prokrastis kreskantan suspekton de la unuokula ŝakisto. Kune kun ĉiuj li aranĝis la tablojn forme de minuskla litero no. Trideko da ŝatantoj eksidis por ludi kontraŭ la grandmajstro. Multaj el ili estis tute konsternitaj, kaj ĉiuminute enrigardis ŝakajn lernolibrojn, freŝigante en la memoro malsimplajn variantojn, pere de kiuj ili esperis kapitulacii al la grandmajstro ne pli frue ol post dudek dua movo.

Ostap glitis per la rigardo linion da “nigraj”, kiuj ĉirkaŭigis lin de ĉiuj flankoj, la fermitan pordon, kaj sentime komencis labori. Li venis al la unuokululo, sidanta ĉe unua tabulo, kaj movis la reĝan peonon de kvadrato e2 sur kvadraton e4.

La unuokululo tuj kapis siajn orelojn per la manoj, kaj komencis streĉe mediti. Laŭ vicoj de la ŝatantoj trairis susuro:

– La grandmajstro faris e2-e4.

<http://gorod-elista.ru/elista/foto88.htm>

(Bronza du-metra monumento al Ostap en urbo Elista. La grandmajstro pririgardas la ŝak-ĉevalon.)

Ostap ne dorlotis siajn kontraŭulojn per diverseco de la ludkomencoj. Sur restintaj dudek naŭ tabuloj li faris la saman operacion: ŝovis la reĝan peonon de e2 sur e4. Unu post alia la ŝatantoj kaptis sin je la haroj kaj profundigis en febrajn meditojn. Neludantoj movis la rigardojn post la grandmajstro. Sola en la urbo fotograf-amatoro surgrimpis seĝon, kaj intensis jam bruligi la magnezion, sed Ostap kolere eksvingis la manojn kaj, ĉesinte sian fluon laŭ la tabuloj, laŭte kriis:

– Forigu la fotografiston! Li malhelpas al mia ŝaka pensado!

«Por kio mi lasu mian fotografaĵon en tiu ĉi mizera urbeto. Mi ne ŝatas havi aferojn kun polico», – decidis li.

Indigna siblo de la ŝatantoj igis la fotografiston rifuzi de sia provo. La indigno estis tiel granda, ke la fotografiston oni eĉ forpuŝis el la halo.

Post tria movo evidentiĝis ke la grandmajstro ludas dek ok hispanaj partioj. En aliaj dek du la nigraj uzis kvankam malnoviĝintan, sed sufiĉe sekuran defendon de Filidor. Se Ostap sciis ke li ludas tiel rafinitajn partiojn, kaj staras kontraŭ tiel pruvita defendo, li estus ege mirigita. Ĉar en vivo de la granda kombinanto tio estis nur dua ŝakludo.

Komence la ŝatantoj, kaj unua inter ili – la unuokululo, teruriĝis. Insidemo de la grandmajstro estis senduba.

Kun neimagebla simpleco, kaj certe malicante en la animo pri la malprogresintaj ŝatantoj de urbo Vasjuki, la grandmajstro tute libere oferis peonojn, pli kaj malpli gravajn pecojn. Al neglektita dum la lekcio nigraharulo li oferis eĉ damon. La nigraharulo teruriĝis, volis jam senprokraste

kapitulacii, kaj nur per terura streĉo de la fortoj igis sin daŭrigi la ludon.

Tondro de klara ĉielo venis post kvin minutoj.

– Mato! – elmurmuris ĝis morto terurigita nigraharulo. Mato al vi, kamarado grandmajstro.

Ostap analizis la situacion, malhonore nomis la demon “reĝino”, kaj bombaste gratulis la nigraharulon pri la gajno. Obtuzo bruas trakuris vicojn de la ŝatantoj.

«Venis jam tempo forkuri», – pensis Ostap, trankvile preterirante la tablojn, kaj senzorge movante la pecojn.

– Vi malĝuste movis la ĉevalon, kamarado grandmajstro, – ekflatis la unuokululo. – Ĉevalon oni ne movas tiel.

– Pardon, pardon, mi petas pardonon, – respondis la grandmajstro, – post la lekcio mi iom laciĝis.

Dum sekvantaj dek minutoj la grandmajstro malgajnis ankoraŭ dek partiojn.

Miraj krioj aŭdiĝis en ejo de klubo “Kartonisto”. Maturiĝis konflikto. Ostap malgajnis unu post alia dek kvin partioj, kaj post nelonge ankoraŭ tri. Restis nur unuokululo. Komence de la partio li, pro la timo, faris multajn erarojn, kaj nun malfacile gvidis la partion al venka fino. Ostap, nerimarke por la ĉirkaŭantoj, forŝtelis de la tabulo nigran turon, kaj kaŝis ĝin en la poŝo.

La homamaso dense ĉirkaŭigis la ludantojn.

– Sur tiu ĉi loko ĵus staris mia turo! kriis la unuokululo, ĉirkaŭrigardante, – sed nun ĝi jam forestas!

– Se ne estas, do ne estis! – sufiĉe krude respondis Ostap.

– Kial ne estis? Mi bone memoras!

– Certe ne estis!

– Sed kien ĝi malaperis? Ĉu vi gajnis ĝin?

– Gajnis.

– Kiam? Dum kiu movo?

– Kial vi tedas min pri via turo? Se vi malgajnis, do diru ĝuste tion.

– Permesu, kamaradoj, ĉe mi ĉiuj movoj estas registritaj!

– Kontoro registras, – diris Ostap.

– Tio estas indignaĵo! – kriaĉis la unuokululo. – Fordonu mian turon.

– Cedu vi, cedu, tio ne estas ludo pri katoj kaj musoj!

– Fordonu la turon!

Post tiuj ĉi vortoj la grandmajstro, kompreninte ke prokrasto estas pereiga, ĉerpis per la mano kelkajn pecojn, kaj ĵetis ilin en kapon de la unuokula kontraŭulo.

– Kamaradoj! – jelpis la unuokululo – ĉiuj rigardu! Oni batas la ŝatanton!

Ŝakistoj de urbo Vasjuki konsterniĝis.

Ne perdante la valoregan tempon Ostap ĵetis la ŝakan tabulon en la lampon kaj, batante en veninta mallumo ies makzelojn kaj fruntojn, elkuris sur la straton. Vasjukiaj ŝatantoj, falante unu sur alian, ĵetiĝis post li.

Estis luna vespero. Ostap impetis sur la arĝenta strato facile kiel anĝelo, depuŝante sin de la peka tero. Ĉar Vasjuki ne sukcesis ankoraŭ transformiĝi en centron de universo, li devis kuri ne inter palacoj, sed inter arbotrunkaj dometoj kun eksteraj ŝutroj.

Post li kuregis la ŝakŝatantoj.

– Tenu la grandmajstron! – muĝis la unuokululo.

– Fripono! – subtenis lin aliaj.

– Dandaĉoj! – refutis la grandmajstro, aldonante la rapidecon.

– Polico! – kriis la ofenditaj ŝakistoj.

Ostap saltadis sur ŝtuparo gvidanta al la albordiĝejo. Li devis trakuri kvarcent ŝtupojn. Sur sesa interplaceto lin jam atendis du ŝatantoj, trafintaj tien per sur-dekliva padeto. Ostap retrorigardis. De supre kiel hunda grego ruliĝis densa grupo da incititaj ŝatantoj de Filidor-defendo. Reiro forestis. Tial Ostap ekkuris antaŭen.

– Jen mi vin, kanajlojn! – eltondris li al la kuraĝuloj-avanuloj, ĵetante sin de la kvina placeto.

La timigitaj kuraĝuloj aĥis, saltis trans la balustradon, kaj ekruliĝis ien en mallumon de tuberoj kaj deklivoj. La vojo ekestis libera.

– Tenu la grandmajstron! – ruliĝis de supre.

La persekutantoj kuris, frapante la lignan ŝtuparon kiel falantaj keglaj globoj.

Alkurinte la bordon Ostap turniĝis dekstren, per la okuloj serĉante boaton kun la fidela administranto.

Ipolit Matveeviĉ idilie sidis en la boateto. Ostap falis sur la benkon, kaj komencis furioze remi de la bordo. Post minuto en la boaton ekflugis ŝtonoj. Unu el ili trafis na Ipolit Matveeviĉ. Ĉe li, iom pli alte ol la vulkana pustulo, elkreskis malhela kontuzaĵo. Ipolit Matveeviĉ kaŝis la kapon en la ŝultrojn, kaj ĝeme ekploretis.

– Jen dorlotulo! De mi oni apenaŭ kapon deŝiris, sed mi estas en ordo: vigla kaj gaja. Kaj se enkalkuli ankoraŭ kvindekon da rubloj de pura gajno, la honorario pro unu kontuzaĵo sur via kapo estas sufiĉe alta.

Dume la persekutantoj, kiuj nur nun komprenis ke plano transformi Vasjuki en Nov-Moskvon ruiniĝis, kaj ke la grandmajstro forveturigas el la urbo kvindekon da pene akiritaj vasjukiaj rubloj, ensaltis grandan boaton, kaj kun krioj ekremis al mezo de la rivero. En la boato amasiĝis ĉirkaŭ tridek homoj. Ĉiuj volis persone venĝi la grandmajs-

tron. La ekspedicion komandis la unuokululo. Lia sola okulo brilis en la nokto kiel lumturo.

– Kaptu la grandmajstron! – aŭdiĝis kriaĉoj en la troŝarĝita barko.

– Rapidu ni, Kisa! – diris Ostap. – Se ili atingos nin, mi ne povos garantii kompletecon de via nazumo.

La ambaŭ boatoj iris laŭ la fluo. Distanco inter ili konstante malpliĝis. Ostap uzis jam siajn lastajn fortojn.

– Ne foriros vi, bastardoj! – aŭdiĝis el la barko.

Ostap ne respondis: forestis la tempo. La remiloj elŝiriĝis el la akvo. Ŝprucegoj da akvo elflugis el sub la furiozantaj remiloj, kaj trafis la boaton.

– Rapidu, – flustris Ostap al si mem.

Ipolit Matveeviĉ turmentiĝis. La barko triumfis. Ĝia alta rando jam preteriris boateton de la koncesiuloj de maldekstra flanko, por premi la grandmajstron al la bordo. La koncesiulojn atendis malagrabla sorto. Ĝojo en la barko estis ĝis tiom granda, ke ĉiuj ŝakistoj transiris al la dekstra rando por, proksimiĝinte al la boateto, per la superaj fortoj ataki la aĉulon-grandmajstron.

– Gardu la nazumon, Kisa! – malespere kriis Ostap, ĵetante la remilojn. – Komenciĝas!

– Sinjoroj! – eksklamaciis subite Ipolit Matveeviĉ per koka voĉo. – Ĉu vere vi batos nin?

– Kaj dolore! – ektondris la vasjukiaj ŝatantoj, kiuj intencis jam ensalti la boateton.

Sed tiumomente okazis io ekstreme ofenda por honestaj ŝakistoj de tuta mondo. La barko neatendite kliniĝis kaj ĉerpis la akvon per la dekstra rando.

– Singarde! – elpepis la unuokula ŝipestro.

Sed estis jam malfrue. Tro multaj ŝatantoj akumuligis ĉe dekstra rando de la vasjukia kirassĥipo. La barko ŝanĝis

centron de la gravito kaj, en plena kongruo kun leĝoj de fiziko, renversiĝis. Komuna kriego rompis trankvilon de la rivero.

– Ŭau! – tire ĝemis la ŝakistoj.

Tuta trideko de la ŝatantoj okazis en la akvo. Ili rapide elprofundiĝis kaj, unu post alia, kroĉiĝis al la renversita barko. Lasta albarkiĝis la unuokululo.

– Dandaĉoj! – jubile kriis Ostap. – Kial vi ne batas vian grandmajstron? Se mi ne eraras vi intencis bati min, ĉu?

Ostap desegnis rondon ĉirkaŭ la paneantoj.

– Vi ja komprenas, vassjukiaj individuoj, ke mi povus dronigi vin unu post la alia, sed mi donacas al vi vivon. Vivu, civitanoj! Sed, je Kreanto, ne ludu ŝakon! Ja vi simple ne scipovas ludi! Ho vi dandaĉoj, dandaĉoj...

Veturu ni pluen, Ipolit Matveeviĉ. Adiaŭ, unuokulaj ŝatantoj! Mi timas ke Vassjuki ne estos centro de universo. Ŝakaj majstroj, miaopinie, ne veturos al stultuloj estiel vi, eĉ se mi petus ilin pri tio. Adiaŭ, ŝatantoj de fortaj ŝakaj sentoj! Vivu “Klubo de kvar ĉevaloj”!

Ĉapitro 35

Kaj aliaj

La mateno trovis la koncesiulojn ĉe vido de urbo Ĉeboksaro. Ostap dormetis apud la stirilo. Ipolit Matveeviĉ dorme movis la remilojn sur la akvo. Pro la malvarma nokto ilin traigis tremo. Oriente malfermiĝis rozaj burĝonoj. Nazumo de Ipolit Matveeviĉ heliĝis pli kaj pli. Ĝiaj ovalaj vitroj ekludis. En ili interŝanĝe respegulis la ambaŭ bordoj. En la dukonkava vitro kurbiĝis semaforo de maldekstra bordo. Bluaj kupoloj de Ĉeboksaro floris kvazaŭ ŝipoj.

Ĝardeno en oriento diskreskis. La burĝonoj transformiĝis en vulkanojn, kaj komencis eligi laŭfalon de plej bonaj sukeraĵaj farboj. Birdetoj sur maldekstra bordo okazigis grandan kaj laŭtan skandalon. Ora arketo de la nazumo ekflamis kaj blindigis la grandmajstron. Eliris la suno.

Ostap malfermis la okulojn kaj streĉiĝis, klinante la boaton kaj krakante per la ostoj.

– Bonan matenon, Kisa, – diris li, sufokiĝante per la oscedo. – Kun saluto mi alvenis, diri ke ekbrilis lumo, ke florejo ekfestenis ĉe... de ies gaja zumo...

– Albordiĝejo, – raportis Ipolit Matveeviĉ. Ostap malfermis la gvidlibron.

– Ŝajnas ke Ĉeboksaro. Jes, tiel...

Ni atentu tre bele lokiĝintan urbon Ĉeboksaro...

– Kisa, ĉu ĝi vere lokiĝas bele?..

Nun en Ĉeboksaro estas 7702 loĝantoj.

– Kisa! Ĉesu ni persekuti la brilantojn kaj pligrandigu loĝantaron de Ĉeboksaro ĝis sep mil sep cent kvar homoj. Ĉu? Tio estos tre efekte... Malfermu ni “*Pti-ŝvo*” kaj de tiu “*Pti-ŝvo*” ni havos konfidindan grand-pecon da pano... Nu, legu ni pluen.

Fondita en jaro 1555 tiu ĉi urbo konservis kelkajn sufiĉe interesajn preĝejojn. Krom administrejoj de Ĉuvaŝa respubliko ĉi tie troviĝas: laborista fakultato, partia lernejo, pedagogia teknikumo, du lernejoj de dua ŝtupo, muzeo, scienca societo, kaj biblioteko. Sur ĉeboksara albordiĝejo kaj en la bazaro oni povas vidi ĉuvaŝojn kaj mariojn, kiuj distingiĝas per sia aspekto...

Sed antaŭ ol la amikoj proksimiĝis al la albordiĝejo, kie oni povas vidi ĉuvaŝojn kaj mariojn, ilian atenton allogis aĵo, flose moviĝanta antaŭ la boato.

– Seĝo! – kriis Ostap. – Administranto! Nia seĝo flosas.

La kompanianoj venis al la seĝo. Ĝi balanciĝis, turniĝis, enakviĝis, denove elakviĝis, malproksimiĝante de boato de la koncesiuloj. La akvo libere enfluis ĝian dis-tranĉitan ventron.

Tio estis seĝo dissekcita sur “Skrjabin”, malrapide direktiĝanta nun en Kaspian maron.

– Saluton, kamarado! – kriis Ostap. – Delonge ni ne renkontiĝis. Ĉu vi scias, Vorobjaninov, tiu ĉi seĝo memoriĝas al mi nian vivon. Ankaŭ ni flosas laŭ fluo. Oni dronigas nin, sed ni elplonĝas, kvankam tio ŝajne ĝojigas neniun. Neniu ŝatas nin, se ne konsideri kriman policon, kiu ankaŭ nin ne ŝatas. Neniu interesiĝas pri ni. Se hieraŭ la ŝakaj ŝatantoj sukcesus dronigi nin, de ni restus nur protokolo pri pririgardo de la kadavroj: «La ambaŭ korpoj kuŝas per piedoj sud-orienten, kaj per la kapoj nordokcidenten. Sur la korpoj estas ŝiraj vundoj, okazigitaj, verŝajne, per iu malakra ilo». La ŝatantoj batis nin, ŝajne, per ŝakaj tabuloj. Jes, tiu ilo vere estas ne sufiĉe akra... «Unua kadavro apartenas al homo ĉirkaŭ kvindek kvin, vestita en disŝiritan brilet-ŝtofan jakon, malnovan pantalonon, kaj malnovajn botojn. En poŝo de la jako troviĝas identigilo je nomo de Konrad Karloviĉ Miĥelson...» Jen, Kisa, kion oni skribus pri vi.

– Kaj kion oni skribus pri vi? – kolere demandis Vorobjaninov.

– Ho! Pri mi oni skribus ion tute alian. Pri mi oni skribus tiel: «Dua kadavro apartenas al viro dudek-ŝep-jaraĝa.

Li amis kaj suferis. Li amis monon, kaj suferis pro ĝia manko.

Lia kapo kun alta frunto, kadrigita per blu-nigraj bukloj, estas direktita al suno. Liaj elegantaj piedoj, botet-numero kvardek du, estas direktitaj al nord-polusa lumado. La korpo estas vestita en senmakulajn blankajn vestojn, sur la brusto – ora harpo, inkrustita per perlamoto, kaj notoj de romanco “Adiaŭ vi, ho la vilaĝo nova”. La morta junulo okupiĝis pri surligna bruldesegnado, kio evidentiĝis el identigilo numero 86/1562, trovita en poŝo de lia frako, kaj eldonita 23/08/1924 per metia kolektivo “Parnaso kaj Pegazo”. Kaj oni enterigos min, Kisa, pompe, kun orkestro, kun paroladoj, kaj sur mia monumento estos elĉizite: «Ĉi tie kuŝas fama termoinĝeniero kaj konkeranto Ostap-Sulejman-Berta-Maria Bender-bej, patro de kiu estis civitano de Turkio, kaj mortis, lasinte al sia filo eĉ ne minimuman heredaĵon. Patrino de la mortinto estis grafino, kaj vivtenis sin per nelaboraj enspezoj.

Konversaciante ĉi-maniere la koncesiuloj venis al ĉeboksara bordo.

Vespere, pligrandiginte la kapitalon je kvin rubloj per vendo de vasjuka boato, la amikoj surŝipiĝis dizelan ŝipon “Urickij”, kiu iris en Stalingrad, supozante devanci dum la vojo la malrapidan lotan vaporŝipon, kaj renkonti trupon de kolumbanoj en Stalingrad.

”Skrjabin” venis en Stalingrad komence de julio. La amikoj renkontis ĝin, kaŝante sin post kestoj ĉe la albor-diĝejo. Sur la vaporŝipo, antaŭ la elŝarĝo, okazis lotado. Oni lotis valorajn gajnojn.

Atendo de la seĝoj prenis ĉirkaŭ kvar horoj. Unuaj de la ŝipo elamasigis kolumbanoj kaj lotaj servantoj. Inter ili distingiĝis jubilanta vizaĝo de Persickij.

Sidante embuske la koncesiuloj aŭdis liajn kriojn:

– Jes! Mi tuj veturas en Moskvon! La telegramon mi jam elsendis! Ĉu vi scias kiun? «Jubilas kune kun vi». Penu ili diveni!

Poste Persickij ensidis taksion, ĉirkaŭrigardinte ĝin de ĉiuj flankoj kaj palpinte la radiatoron, kaj forveturis, ial akompanata per krioj «hura!».

Post kiam de la ŝipo estis malŝarĝita la hidraŭlika premilo, oni komencis elporti la aĵan dekoron. La seĝojn oni elportis kiam venis jam mallumiĝo. Kolumbanoj ensidis kvin duĉevalajn ŝarĝĉarojn kaj, gaje kriante, ekruliĝis rekte al la stacidomo.

– Ŝajnas ke en Stalingrado ili ne ludos, – diris Ipolit Matveeviĉ.

Tio konsternis na Ostap.

– Do endas veturi, – decidis li, – sed per kiu mono ni veturu? Tamen iru ni al la stacidomo, tie ni vidu.

En la stacidomo evidentiĝis ke la teatro veturas na Pjatigorsk tra Tiĥoreckaja – Mineralaj Akvoj. Mono ĉe la koncesiuloj sufiĉis nur por unu bileto.

– Ĉu vi scipovas veturi senbilete? – demandis Ostap na Vorobjaninov.

– Mi provos, – timide diris Ipolit Matveeviĉ.

– Al kukolo vin! Pli bone vi ne provu! Ankoraŭfoje mi pardonas vin. Bone, senbilete veturu mi.

Por Ipolit Matveeviĉ estis aĉetita nerezerv-loka bileto en triaklasa vagono, per kiu la iama gvidanto venis en Nord-Kaŭkazan fervojstacion "Mineralaj Akvoj", dekoritan per oleandroj en verdaj bareletoj. Penante ne trafi sub rigardojn de eltrajniĝantaj kolumbanoj li komencis serĉi na Ostap.

Jam delonge la teatro forveturis na Pjatigorsk, lokiĝinte en novaj somerumajn vagonetojn, sed Ostap daŭre forestis. Li venis nur vespere, kaj trovis na Vorobjaninov en plena konsterniĝo.

– Kie vi estis? – ĝemis la gvidanto. – Mi tiel turmentiĝis!

– Ĉu tio estas vi kiu turmentiĝis, veturante kun bileto? Kaj mi, ĉu mi ne turmentiĝis? Do tio ne min oni forpelis de bufro de via trajno en Tiĥoreckaja? Do tio ne mi sidis tie dum tri horoj kiel stultulo, atendante ŝarĝvagonaron kun malplenaj **narzan**⁴⁰-boteloj? Vi estas porko, civitano gvidanto! Kie estas la teatro?

– En Pjatigorsk.

– Veturu ni! Mi ion akiris dum la vojo. Pura gajno esprimiĝas per tri rubloj. Tio certe ne estas multe, sed por narzan kaj la fervojaj biletoj sufiĉos.

Dum kvindek minutoj someruma trajno, grincante kiel ĉaro, altiris la vojaĝantojn na Pjatigorsk. Preter Zmejka kaj Beŝtaŭ la koncesiuloj venis al piedo de monteto Maŝuk.

Ĉapitro 36

Pejzaĝo de malaĥita flako

Estis dimanĉa vespero. Ĉio estis pura kaj lavita. Eĉ Maŝuk, superkreskita per arbustoj kaj bosketoj estis, ŝajne, zorge kombita, kaj elstriis odoron de monta parfumo.

Sur la eta ludila kajo intermitis blankaj pantalonoj de plej diversaj proprecoj: el kepro, dreliko, veltolo, kaj tenera flanelo. Ĉi tie oni vestis sandalojn kaj ĉemizetojn kun vaste

40. **narzan**: loka, onidire kuraca, mineralriĉa naturgasita akvo.

malfermitaj kolumnoj. La koncesiuloj, en pezaj malpuraj botegoj, pezaj polvaj pantalonoj, en varmaj veŝtoj kaj ardiĝintaj jakoj, sentis sin fremdaj. Inter tiu ĉi diverseco de gajetaj katunoj, en kiuj pavis ferieaj junulinoj, plej hela kaj plej eleganta estis kostumo de la staciestrino.

Al miro de ĉiuj alveturintoj la staciestro estis virino. Ŝiaj rufaj bukloj elŝiriĝis el sub la ruĝa kaskedo kun du arĝentaj galonoj sur la rubando. Ŝi portis blankan uniforman tunikon kaj blankan jupon.

Satadmirinte la estrinon, traleginte freŝe algluitan afiŝon de teatro "Kolumbo", kiu turneis en Pjatigorsk, kaj eltrinkinte du kvinkopekajn glasojn da narzan, la vojaĝantoj penetris la urbon per tramo de linio "Stacidomo – Florejo". Eniro na "Florejo" kostis dek kopekojn.

En "Florejo" estis multe da muziko, multe da gajaj homoj, kaj tre malmulte da floroj. Simfonia orkestro, en blanka konko, plenumis na "Danco de kuloj". En **Lermontov**⁴¹-galerio oni vendis na narzan. Oni vendis ĝin en kioskoj kaj kolportiste.

Neniun interesis paro da malpuraj serĉantoj de brilantoj.

– Ho, Kisa, – diris Ostap, – ni estas fremdaj en tiu ĉi festeno de vivo.

Unuan nokton en la feriejo la koncesiuloj pasigis ĉe narzan-fonto.

Nur ĉi tie, en Pjatigorsk, kiam teatro "Kolumbo" jam trian fojon prezentis antaŭ mirigitaj urbanoj sian "Geedziĝo", la partneroj komprenis tutan malfacilecon de persekuto post la trezoroj. Penetri la teatron, kion ili planis antaŭe, estis neeble. Post la kulisoj noktumis Galkin,

41. **Lermontov**: fama rusa poeto (1814-1841), duel-mortigita en Pjatigorsk.

Palkin, Malkin, Ĉalkin kaj Zalkind, salajra dieto de kiuj ne permesis al ili loĝi en hotelo.

Tiel pasis tagoj, kaj la amikoj perdis fortojn, noktumante ĉe loko kie duelis Lermontov, kaj enspezante per portado de bagaĝo de turistoj-mezuloj.

Dum la sesa tago Ostap sukcesis konatiĝi kun muntisto Meĉnikov, administranto pri la hidraŭlika premilo. Cis tiu tempo Meĉnikov, kiu pro foresto da mono ĉiutage trinkis na narzan el la fonto, anstataŭ alkoholaĵoj, trafis en teruran staton kaj, laŭ observo de Ostap, vendadis en bazaro iujn aĵojn el la teatra dekorado. Definitiva interkonsento estis atingita dum matena trinkado ĉe la fonto. Muntisto Meĉnikov nomis na Ostap "Dusja" kaj konsentis.

– Eblas, – diris li, – tio ĉiam eblas, Dusja. Plezure, Dusja.

Ostap tuj komprenis ke la muntisto estas grandega majstro.

La interkonsentantaj flankoj enrigardis okulojn unu de la alia, interbrakumis, interfrapis je la dorsoj kaj ĝentile ridis.

– Bone, – diris Ostap, – por la tuta afero – dekrublaĵon.

– Dusja! – miris la muntisto. – Vi malicigas min. Mi estas homo turmentita per narzan.

– Do kiom vi volas?

– Metu kvindekon. La propraĵo ja estas fiska. Mi estas homo turmentita.

– Bone. Prenu dudek! Ĉu vi konsentas? Nu, laŭ la okuloj mi vidas ke vi konsentas.

– Konsento estas produkto de plena nekontraŭo de la flankoj.

– Bone li, hundo, formulas, – flustris Ostap en orelon de Ipolit Matveeviĉ, – lernu.

– Do kiam vi alportos la seĝojn?

– Seĝoj kontraŭ mono.

– Tio eblas, – diris Ostap, ne pensante.

– Monon antaŭen, – deklaris la muntisto, – matene mono, vespere la seĝoj, aŭ vespere mono – sekvont-matene – la seĝoj.

– Ĉu, eble, hodiaŭ – seĝoj kaj morgaŭ – mono? – pridemandis Ostap.

– Mi, Dusja, estas homo turmentita. Tiajn kondiĉojn la animo ne akceptas.

– Sed mi, – diris Ostap, – nur morgaŭ ricevos monon telegrafe.

– Do tiam ni konversaciu, – konkludis la obstina muntisto, – kaj dume, Dusja, feliĉan restadon ĉe la fonto, sed mi iru: ĉe mi estas multeda laboro pri la premilo. Simbieviĉ kaptas la gorĝon. Sed ĉu oni povas vivi per nura narzan?

Kaj Meĉnikov, pitoreske lumigita per la suno, malproksimiĝis.

Ostap severe rigardis na Ipolit Matveeviĉ.

– Tempo, – diris li, – kiun ni havas, – tio estas mono, kiun ni ne havas. Kisa, ni endas fari karieron. Cent kvindek mil rubloj kaj nul kopekoj kuŝas antaŭ ni. Ni bezonas nur dudekon da rubloj por ke la trezoro ekestu nia. Ĉi tie ignorindas neniuj eblecoj. Temas pri elekto inter pereco kaj apogeo. Mi preferas apogeon.

Ostap pripense ĉirkaŭiris na Vorobjaninov.

– Demetu vian jakon, gvidanto, kaj rapide, – diris li neatendite.

Ostap prenis la jakon el manoj de mirigita Ipolit Matveeviĉ, ĵetis ĝin sur la teron, kaj komencis treti ĝin per siaj polvaj botetoj.

– Kion vi faras? – kriegis Vorobjaninov. – Tiun ĉi jakon mi portas jam dek kvin jaroj, kaj ĝi daŭre estas kvazaŭ nova!

– Ne maltrankviliĝu! Post nelonge ĝi ne estos kvazaŭ nova! Donu al mi la ĉapelon! Nun superŝutu la pantalonon per polvo kaj aspergu ĝin per narzan. Rapide!

Post kelkaj minutoj Ipolit Matveeviĉ ekestis malpura ĝis abomeno.

– Nun vi maturiĝis kaj havas jam plenan eblecon honeste perlabori monon.

– Sed kion mi devas fari? – larme demandis Vorobjaninov.

– Francan lingvon vi, espereble, konas, ĉu?

– Tre malbone. En kadroj de gimnazia kurso.

– Hm... Do endos agi en tiuj ĉi kadroj. Ĉu vi povas diri france sekvontan frazon: «Sinjoroj, mi ne manĝis ses tagoj»?

– *Mosje*, – komencis Ipolit Matveeviĉ, stumblante, – *mosje*, hm,hm... *ĵe ne*, ĉu? *Ĵe ne manĝ pa...* ses, kio estas ses... *en, de, trua, katr, senk... sis... sis... ĵur*. Do, *ĵe ne manĝ pa sis ĵur* .

– Ĝis kiom aĉas via prononco, Kisa! Tamen kion oni postuli de almozulo! Certe almozulo el eŭropa Rusio parolas france pli malbone ol Mileran (Millerand). Nu, Kisjo, kaj en kiuj kadroj vi konas la germanan?

– Por kio al mi tio ĉi? – eksklamaciis Ipolit Matveeviĉ.

– Por tio, – diris Ostap peze, – ke vi iros nun na “Florejo”, staros en ombro, kaj per franca, germana kaj rusa lingvoj petos almozon, kredigante ke vi estas iama

ano de Regna Dumao de frakcio de kadetoj. Tuta neta gajno iros al muntisto Meĉnikov. Ĉu vi komprenis?

Ipolit Matveeviĉ aliigis. Lia brusto fleksiĝis kiel Kastela ponto en Leningrado, la okuloj elĵetis fajron, kaj el la naz-truoj, kiel ŝajnis al Ostap, elamasigis densa fumo. La lipharoj komencis malrapide leviĝi.

– Ha! – diris la granda kombinanto neniom timigita, – rigardu lin. Nehomo, sed iu draketo!

– Neniam, – subite ekventroparolis Ipolit Matveeviĉ, – neniam Vorobjaninov etendis la manojn.

– Do vi etendos la piedojn, maljuna stultulo! – kriis Ostap. – Ĉu vi ne etendis manojn?

– Ne etendis.

– Kiel plaĉas al vi tiu ĉi ĝigolaĵo? Tri monatoj li vivas je mia kosto. Tri monatoj mi nutras lin, drinkigas kaj edukas, kaj tiu ĉi ĝigolo deklaras nun ke... Nu! Sufiĉas, kamarado! Aŭ vi tuj iras al “Florejo” kaj alportas ĝis la vespero dek rublojn, aŭ mi aŭtomate elstrekas vin el listo de la koncesiuloj.

Mi kalkulas ĝis kvin. Jes aŭ ne? Unu...

– Jes, – elmurmuris la gvidanto.

– Tiukaze ripetu la magiaĵon.

– *Mosje, ĵe ne manĵ pa sis ĵur. Geben zi mir bitte etvas kopek auf dem ŝtük brod.* Donu ion al iama deputito de Regna Dumao.

– Ankoraŭfoje. Pli kortuŝe!

Ipolit Matveeviĉ ripetis.

– Nu, bone. Talento almozpetadi baziĝas ĉe vi de la infaneco. Iru. Rendevuo ĉe la fonto dum la noktomezo. Tio, rimarku, ne por romantiko, sed ĉar vespere oni donas pli.

– Kaj vi, – demandis Ipolit Matveeviĉ, – kien iros vi?

– Pri mi ne zorgu. Mi, kiel ĉiam, agas en plej malfacila loko.

La amikoj disiris.

Per lasta dekkopeka monero Ostap aĉetis en paper-
vara vendejo kvitanclibreton, kaj preskaŭ horon sidis sur
ŝtona bloko, numerante la kvitancojn, kaj subskribante ĉiun
el ili.

– Antaŭ ĉio — sistemo, — murmuris li, — ĉiu komunuma
kopeko devas esti registrita.

La granda kombinanto soldatpaŝe marŝis sur monta
vojo, iranta ĉirkaŭ Maŝuk, preter sanatorioj kaj ripozejoj, al
loko de duelo de Lermontov kontraŭ Martinov.

Devancita per busoj kaj duĉevalaj veturiloj Ostap
venis al Profundejo.

Negranda galerio, elĉizita en la roko, gvidis al konus-
forma profundaĵo. La galerio finiĝis per balkoneto, starante
sur kiu oni povis vidi sur fundo de la Profundejo flaketon da
malakita fiodora likvaĵo. Tiu ĉi Profundejo estas opiniata
rimarkindaĵo de Pjatigorsk, tial dum tago ĝin vizitas ne-
malmulte da ekskursoj kaj turistoj-unuopuloj.

Ostap tuj trovis ke por homo senigita de antaŭjuĝoj la
Profundejo povas esti bona enspezloko.

«Mirinda afero», — meditis Ostap, — «kial la urbo ĝis
nun ne konjektis preni dekkopekajn monerojn por eniro en
Profundejon. Tio, ŝajne, estas sola loko kien pjatigorskanoj
permesas al turistoj eniri senpage. Mi neniigos tiun ĉi mal-
honoran makulon de sur reputacio de la urbo, mi korektos
tiun ĉi domaĝan mankon».

Kaj Ostap ekis agi tiel kiel diktis al li la racio, sana in-
stinkto, kaj la kreĝinta situacio.

Li haltis ĉe eniro en la Profundejon kaj, tenante en la
manoj la kvitancan libreton, tempo de tempo elkriadis:

– Akiru la biletojn, civitanoj! Dek kopekojn! Infanoj kaj soldatoj senpage! Studentoj — kvin kopekojn! Ne-anoj de sindikato — tridek kopekojn.

Ostap agis trafe. Pjätigorskanoj ne vizitis Profundejon, kaj deŝiri de sovetia turisto dek kopekojn por eniro “ien”, estis afero tute senproblema. Ĝis la kvina li kolektis jam ĉirkaŭ ses rublojn. Helpis neanoj de sindikato, kiuj en Pjätigorsk estis ege multaj. Ĉiuj kredeme fordonis siajn dekkopekaĵojn, kaj unu ruĝvanga turisto, ekvidinte na Ostap, triumfe diris al la edzino:

– Ĉu vi vidas, Tanja, kion mi diris al vi hieraŭ? Sed vi diris ke eniro en Profundejon estas senpaga. Tio ne povas okazi. Ĉu vere, kamarado?

– Tute vere, – konfirmis Ostap, – ne povas okazi ke oni ne pripagu la eniron. Anoj de sindikato — dek kopekojn, ne anoj de sindikato — tridek kopekojn.

Antaŭ la vespero al Profundejo alveturis, per duo da benĉaroj, ekskurso de policistoj el Ĥarkov. Ostap ektimis, kaj intencis jam ŝajnigi sin senkulpa turisto, sed la policistoj tiel timide amasiĝis ĉirkaŭ la granda kombinanto, ke remarŝo estis jam neebla. Tial Ostap kriis per sufiĉe firma voĉo:

– Anoj de sindikato — dek kopekojn sed, ĉar reprezentantoj de polico povas esti egaligitaj al studentoj kaj infanoj, ili pagu po kvin kopekoj.

La policistoj pagis, delikate informiĝinte kiucele oni kolektas la kvinkopekaĵojn.

– Por fundamenta riparo de la Profundejo, – arogante diris Ostap, – por ke ĝi ne tro profundiĝu.

Dum la granda kombinanto lerte vendadis pejzaĝon de la malakita flako, Ipolit Matveeviĉ, kliniĝinte kaj ŝlimiĝ-

ante en honton, staris sub akacio kaj, ne rigardante la promenantojn, maĉis la tri enmanigitajn al li frazojn:

– *Msje, ĵe ne manĵ pa... Geben zi mir bitte... Donu ion al deputito de Regna Dumao...*

Oni donis ne tiom malmulte, sed iel malgaje. Tamen, ludante per pura pariza prononco de vorto “*manĵ*”, kaj emociigante animojn per mizera stato de iama ano de Regna Dumao, li sukcesis kolekti kupraĵojn je ĉirkaŭ tri rubloj.

Sub piedoj de la promenantoj krakis la gruzo. La orkestro kun mallongaj paŭzoj ludis na Ŝtraus (Straus), Brams (Brahms) kaj Grig (Grieg). La hela amaso murmurante ruliĝis tien kaj reen preter la maljuna gvidanto. Ombro de Lermontov nevideble ŝvebis super la civitanoj, frandantaj *maconi* sur verando de la bufedejo. Regisodoro de parfumoj kaj de narzan-gasoj.

– Donu al iama ano de Regna Dumao, – murmuris la gvidanto.

– Diru, ĉu vi vere estis ano de Regna Dumao? – eksonis super orelo de Ipolit Matveeviĉ. – Ĉu vi vere vizitis la kunsidojn? Ho! Ho! Alta klaso!

Ipolit Matveeviĉ levis la vizaĝon, kaj ŝtoniĝis. Antaŭ li, kiel pasereto, saltadis diketa Avesalom Vladimiroviĉ Iznurenkov. Li ŝanĝis sian brunetan kostumon je blankan jakon kaj griza pantalono kun gajaj fajreroj. Li estis eksterordinare vigla, kaj iam saltis je alteco de ĉirkaŭ dudek centimetroj. Li ne rekonis na Ipolit Matveeviĉ, kaj daŭre superŝutis lin per demandoj:

– Diru, ĉu vi vere vidis na Rodzjanko? Ĉu Puriŝkeviĉ vere estis kalva? Ho! Ho! Kia temo! Alta klaso!

Daŭre turniĝante, Iznurenkov enmanigis al la embarasita gvidanto tri rublojn, kaj forkuris. Sed longe post tio in-

termitis en “Florejo” liaj diketaj femuroj, kaj kvazaŭ de la arboj ŝutiĝis:

– Ho! Ho! «De Kartveli’ malgajajn kantojn ne kantu vi, ho belulin’». Ho! Ho! «Alia bord’, montrar’ giganta, jam estas nura halucin’...» Ho! Ho! «Kaj matene, ĉe sia fenestro, ŝi denove ridetis kutime...» Alta klaso!

Ipolit Matveeviĉ daŭre staris, rigardante teren. Sed vane li staris tiel. Li pretervidis multon.

En mirinda obskuro de pjatigorska nokto sur aleoj de la parko promenis Eloĉka Sĉukina, tirante post si humilan, paciĝintan kun ŝi Ernest Pavloviĉ. La vojaĝo al Mineralaj Akvoj estis lasta akordo en la malfacila lukto kontraŭ filino de Vanderbild. Antaŭnelonge la fiera usonanino ekveturis distracele en propra jakto, al Sandviĉaj insuloj.

– Ĥo-ĥo! – aŭdiĝis en la nokta silento. – Fame, Ernestjo! Per-r-fekte!

En la bufedejo, lumigita per lampoj, sidis blua ŝtelisteto Alĥen kun sia edzino Saŝhen. Ŝiaj vangoj, kiel antaŭe, estis plibeligitaj per vangobarboj en stilo de caro Nikolao. Alĥen sinĝene manĝis karsk-stilan ŝaŝlikon, posttrinkante ĝin per kaĥetinskij-vino numero du; kaj Saŝhen, karesante la vangobarbojn, atendis la menditan sturgon.

Post likvido de dua domo de sociala provizo (estis vendita ĉio, inkluzive eĉ kalikota ĉapo de la kuiristo kaj slogano: “Zorgeme maĉante la manĝaĵojn vi helpas al socio”) Alĥen decidis ripozi kaj distriĝi. Sorto mem gardis tiun ĉi satan friponon. Ĉi tage li intencis veturi en Profundejon, sed ne sukcesis. Tio savis lin: Ostap elmelkus el la timida mastrumisto ne malpli ol tridek rublojn.

Ipolit Matveeviĉ altiriĝis al la fonto nur kiam la muzikistoj demuntadis siajn pupitrojn, la festanta publiko ekis

disiri, kaj nur paroĵ da amantoĵ intense spiris en magraj aleoj de “Floreĵo».

– Kiom vi kolektis? – demandis Ostap, kiam kliniĝinta figuro de la gvidanto aperis ĉe la fonto.

– Sep rublojn dudek naŭ kopekojn. Tri rublojn per bankbileto. Ceteraj — kupro kaj iom da arĝento.

– Por unua turneo — mirinde! Salajro de respondeca laboranto! Vi kortuŝas min, Kisa! Sed kiu stultulo donis al vi tri rublojn, volus mi scii? Ĉu eble vi donadis restaĵojn?

– Iznurenkov donis.

– Ne povas esti! Avesalom? Rigardu, globeto! Jen kien li alruliĝis! Ĉu vi konversaciis kun li? Ha, li ne rekonis vin!

– Li pridemandis min pri Regna Dumao! Ridis li!

– Ĉu vi vidas, gvidanto, ne tiom malbonas esti almozulo, precipe se oni havas moderan klercon kaj malfortan voĉon! Sed vi protestis, aspektigis sin lordo-gardanto de la stampilo! Nu, Kisa, ankaŭ mi pasigis la tempon ne vane. Dek kvin rublojn. Resume — sufiĉas.

Sekvontmatene la muntisto ricevis la monon kaj altiris du seĝojn. La trian seĝon, laŭ liaj vortoj, estis tute ne eble elpreni. La son-dekoruloj ludis sur ĝi kartoĵn.

La amikoj, por plia sekureco, surgrimpis preskaŭ pinton mem de Maŝuk.

Sobe, per fortikaj nemovantaj briloj, lumiĝis Pjatangorsk. Malriĉaj lumetoj, malpli alte ol Pjatangorsk, indikis kozakan vilaĝon Gorjaĉevodsk. Sur la horizonto, per du paralelaj streketoj, el post monto elŝoviĝis urbo Kislovodsk.

Ostap ekrigardis la stelplenan ĉielon, kaj elpoŝigis la konatan jam tenaĵon.

Ĉapitro 37

Verda Kabo

Inĝeniero Bruns sidis sur ŝtona verando de la somerdomo en Verda Kabo sub granda palmo, amelitaj folioj de kiu ĵetis pikajn kaj akrajn ombrojn sur razitan nukon de la inĝeniero, sur lian blankan ĉemizon, kaj sur hambsan seĝon el meblaro de general-vidvino Popova, sur kiu turmentiĝis la inĝeniero, atendente la tagmanĝon.

Bruns eligis siajn dikajn sukplenaĵajn lipojn tubete, kaj per voĉo de petolema bubeto diris tire:

– Muse-eto!

La domo silentis.

La tropika flaŭro karesiĝis al la inĝeniero. La kaktoj etendis al li siajn erinacajn gantojn. La dracenoj bruegis per la folioj. La bananoj kaj sagaj palmoj forpelis muŝojn de kalvaĵo de la inĝeniero. Rozoj, ĉirkaŭvolvanta la verandon, falis al liaj sandaloj.

Sed ĉio estis vana. Bruns volis tagmanĝi. Li ekscite rigardis la perlamotan golfon, la malproksiman kabeton de urbo Batumo, kaj kantsimile vokis:

– Muse-eto! Muse-eto!

En la humida sub-tropika aero la sonoj ĉesiĝis rapide. Respondo forestis. Bruns imagis grandan brunan anseron kun siblanta grasa haŭto kaj, ne kapabla deteni sin, ekkriaĉis:

– Museto!!! Ĉu pretas la ansereto?!

– Andrej Miĥajloviĉ! – kriis ina voĉo el la ĉambro. – Ne tedu min!

La inĝeniero, volvinta jam la kutimiĝintajn lipojn tubete, senprokraste respondis:

– Museto! Vi ne kompatas vian etan edzon!

– Iru for, manĝegulo! – oni respondis el la ĉambro.

Sed la inĝeniero ne subiĝis. Li jam intencis daŭrigi elvokojn de la ansereto, kiujn li senrezulte faris jam du horoj, sed neatendita susuro igis lin retrorigardi.

El la nigro-verda bambua densejo eliris homo en ŝirita blua ĉemizo, zonigita per tordita ŝnureto kun densaj kvas-toj, kaj en eluzita striita pantalono. Sur bonkora vizaĝo de la nekonato kreskis vila barbeteto. En la manoj li tenis jakon.

La homo proksimiĝis kaj demandis per agrabla voĉo:

– Kie ĉi tie troviĝas enĝeniero Bruns?

– Mi estas inĝeniero Bruns, – diris la anser-sorĉanto per neatendita baso. – Per kio mi povas helpi al vi?

La homo silente falis sur la genuojn. Tio estis patro Fjodor.

– Vi frezeziĝis! – eksklamaciis la inĝeniero saltleviĝante. – Bonvolu ekstari!

– Mi ne staros, – respondis patro Fjodor, turnante la kapon post la inĝeniero, kaj rigardante lin per la klaraj okuloj.

– Leviĝu!

– Mi ne leviĝos!

Kaj patro Fjodor singarde, por ne estu dolore, komencis bateti la kapon je la gruzo.

– Museto! Venu ĉi tien! – kriis la timigita inĝeniero. – Rigardu kio okazas. Leviĝu, mi petas vin. Mi petegas vin!

– Mi ne leviĝos, – ripetis patro Fjodor.

Sur la verandon elkuris Museto, detale distinganta intonaciojn de sia edzo.

Ekvidante la damon patro Fjodor, ne leviĝante de la genuoj, vikle ekrampis pli proksimen al ŝi, kliniĝis antaŭ ŝiaj piedoj, kaj ekparolis rapide:

– Pri vi, panjo, pri vi, kolombino, pri vi mi esperas.

Tiam inĝeniero Bruns ekruĝiĝis, kaptis la petanton sub la akselojn, kaj pene levis, por surpiedigi lin. Sed patro Fjodor ekruzis, kaj subfleksis la krurojn. Indignita Bruns ek-tiris la strangan gaston en la angulon kaj perforte sidigis lin sur la duonbrakseĝon (hamsan, tute ne el domo de Vorobjaninov, sed el gastoĉambro de general-vidvino Popova).

– Mi ne kuraĝas, – murmuris patro Fjodor, metante sur la genuojn jakon de la bakisto, kiu odoretis per keroseno, – ne kuraĝas mi sidi en ĉeesto de la altestimataj personoj.

Kaj patro Fjodor provis denove fali sur la genuojn.

La inĝeniero kun malgaja krio ektenis patron Fjodor je la ŝultroj.

– Museto, – diris li, malfacile spirante, – konversaciu vi kun tiu ĉi civitano. Ĉi tie estas iu miskompreno.

Musetoj tuj ekparolis afereme.

– En mia domo, – diris ŝi minace, – bonvolu stari sur nenioj genuoj!

– Kolombino! – kortuŝiĝis patro Fjodor. – Panjo!

– Mi tute ne estas panjo por vi. Kion vi deziras?

La pastro murmuradis ion nekompreman, sed, ŝajne kortuŝan. Nur post longaj pridemandoj evidentiĝis ke li, estiel specialan favoron, petas vendi al li kompletan el dek du seĝoj, sur unu el kiuj li ĉi-momente sidas.

La inĝeniero, pro la miro, lasis el la manoj ŝultrojn de patro Fjodor, kiu senprokraste falis sur la genuojn, kaj komencis testude persekuti la inĝenieron.

– Kial, – kriis la inĝeniero, – evitante longajn manojn de patro Fjodor, – kial mi vendu miajn seĝojn? Kiom ajn vi falu sur la genuojn, mi sukcesas kompreni nenion!

– Ja tio estas miaj seĝoj, – elĝemis patro Fjodor.

– Kial vi diras ke ili estas viaj? Kial ili estas viaj? Ĉu vi frenezigi? Museto, nun ĉio estas klara al mi! Tio sendube estas frenezulo.

– Miaj, – humile ripetis patro Fjodor.

– Kio, do mi ŝtelis ilin de vi, ĉu? – koleris la inĝeniero.

– Ŝtelis? Ĉu vi aŭdas, Museto! Tio estas iu ĉantaĝo!

– Tute ne, je Dio, – elflustris patro Fjodor.

– Se mi ŝtelis ilin de vi, do postulu ilin per juĝo, kaj ne okazigu en mia domo pandemonion! Ĉu vi aŭdas, Museto! Ĝis kio venas la impertinento. Oni ne donas eĉ tagmanĝi deĉe!

Ne, patro Fjodor ne volas postuli “siajn” seĝojn per juĝo. Tute ne. Li scias ke inĝeniero Bruns ne ŝtelis de li la seĝojn. Ho ne! Tio tute forestas en liaj pensoj. Sed tamen antaŭ la revolucio tiuj ĉi seĝoj apartenis al li, al patro Fjodor, kaj ili estas senlime karaj al lia edzino, kiu mortas nun en Voroneĵ. Plenumante ŝian deziron, sed tute ne pro persona aroganteco, li permesis al si ekscii lokiĝon de la seĝoj, kaj veni al civitano Bruns. Patro Fjodor ne petas almozon. Ho ne! Li estas sufiĉe bonstata (negranda kandela fabriketo en Samara), por plezurigi lastajn minutojn de la edzino per aĉeto de la malnovaj seĝoj. Li pretas ne avari, kaj pagi por la tuta kompleto ĉirkaŭ dudek rublojn.

– Kio! – kriis la inĝeniero, ruĝiĝante. – Dudek rublojn? Belegan gastsalonan kompleton per dudek rubloj? Museto! Ĉu vi aŭdas? Tio tamen estas frenezulo. Je Dio, frenezulo!

– Mi ne estas frenezulo. Sed sole plenumante deziron de la sendinta min edzino...

– Diablo, – diris la inĝeniero, – denove li komencis rampi! Museto! Li denove rampas!

– Do nomu la prezon, – ĝemis patro Fjodor, singarde frapante per la kapo trunkon de araŭkario.

– Ne difektigu la arbon vi, strangulo! Museto, ŝajnas ke li ne estas frenezulo. Verŝajne li vere estas ĉagrenita per malsano de la edzino. Ĉu ni vendu al li la seĝojn? Alie li rompos la frunton!

– Sed sur kio ni sidos? – demandis Museto.

– Ni aĉetos aliajn.

– Ĉu per dudek rubloj?

– Per dudek mi certe ne vendos. Ankaŭ per ducent mi ne vendos ilin... Sed per ducent kvindek mi vendos.

Responde sekvis terura kap-frapo je la dracenon.

– Nu, Museto, tio jam tute tedis al mi.

La inĝeniero decide venis al patro Fjodor kaj komencis dikti la ultimaton:

– Unue, deiru de la palmo ne malpli ol je tri paŝoj; due, tuj leviĝu. Trie, la meblojn mi vendos per ducent kvindek rubloj, kaj ne malpli.

– Tute ne profite, – elkantis patro Fjodor, – sed sole por plenumi volon de la malsana edzino.

– Nu, kara mia, ankaŭ mia edzino estas malsana. Ĉu vere, Museto, ne ĉio bonas pri viaj pulmoj? Sed mi ne postulas ke vi... nu... vendu al mi, ekzemple, vian jakon per tridek kopekoj.

– Prenu senpage! – eksklamaciis patro Fjodor.

La inĝeniero incite svingis la manon, kaj malvarme diris:

– Lasu vi viajn ŝercojn. Mi ĉesas la priparolojn. La seĝojn mi aprezis je ducent kvindek rubloj, kaj mi cedos eĉ ne kopekon.

– Kvindek, – proponis patro Fjodor.

– Museto! – diris la inĝeniero. – Voku na Bagration. Ĝi akompanu la civitanon!

– Tute ne profite...

– Bagration!

Patro Fjodor time forkuris, kaj la inĝeniero envenis la manĝoĉambron kaj eksidis ĉe la ansereto. La ŝatata birdo bonefike influis inĝenieron Bruns. Li komencis trankviliĝi.

Dum la inĝeniero, volviginte la osteton per maldika papero, portis la anseran piedeton al la rozkolora buŝo, en la fenestro aperis peteganta vizaĝo de patro Fjodor.

– Tute ne profite, – diris la mola voĉo. Kvindek kvin rublojn.

La inĝeniero, ne retrorigardante, ekroris. Patro Fjodor malaperis.

Tutan tagon post tio figuro de patro Fjodor intermitis en ĉiuj flankoj de la somerdomo. Jen elkuris ĝi el ombro de la kriptomerioj, jen aperis en la mandarina bosketo, jen transflugis la mastruman korton kaj, tremetante, impetis al Botanika ĝardeno.

La inĝeniero la tutan tagon vokis Museton, plendis pri la frenezulo kaj la kapdoloro. En veninta mallumo tempo de tempo aŭdiĝis voĉo de patro Fjodor.

– Cent tridek ok! – kriis li ie de ĉielo.

Kaj post minuto lia voĉo venis de flanko de la somerdomo de Dumbasov.

– Cent kvardek unu, – proponis patro Fjodor, – Tute ne profite, sinjoro Bruns, – sed sole por plenumi...

Fine la inĝeniero ne eltenis, venis sur mezon de la verando kaj, enrigardante la mallumon, komencis takte krei:

– Al diablo vin! Ducent rublojn! Nur liberigu min.

Ekaŭdiĝis susuro de la maltrankviligitaj bambuoj, mal-laŭta ĝemo kaj malproksimiĝantaj paŝoj. Poste ĉio silentiĝis.

En la golfo baraktadis steloj. Lampiroj atingis patron Fjodor, ĉirkaŭflugis lian kapon, verŝante lian vizaĝon per sia verdeta medicina lumo.

– Kiaj anseretoj aperis nun, elmurmuris la inĝeniero, enirante la ĉambrojn.

Tiutempe patro Fjodor en lasta buso flugis sur ĉemara bordo al Batumo. Sub lia flanko mem alkuradis, kun sono de foliumata libro, etaj ondoj, la vento batis lian vizaĝon, kaj al la aŭta hupo respondis miaŭado de ŝakaloj.

Samvespere patro Fjodor sendis en urbon No, al sia edzino Katerina Aleksandrovna, tiun ĉi telegramon:

la varon mi trovis elsendu ducent tridek
telegrafe vendu kion volas fedja

Du tagoj li jubile vagadis ĉe somerdomo de Bruns, de malproksime li klinsalutis Museton kaj eĉ, tempo de tempo, sonigis la tropikajn malproksimojn per krioj:

– Tute ne profite, sed sole por plenumi volon de la sendinta min edzino!

En tria tago la mono estis ricevita kun malespera telegramo:

vendis ĉion restis sen eĉ unu kopeko kisas
kaj atendas evstigneev daŭre tagmanĝas katja

Patro Fjodor rekalkulis la monon, fervore krucigis sin, luis ŝarĝĉaron, kaj ekveturis al Verda Kabo.

La vetero estis krepuska. De turkia limo la vento alpelis nubojn. Blua tavolo en la ĉielo ŝrumpiĝis. La ŝtormo atingis sesan gradon. Estis malpermesate bani sin kaj boatadi. Obtuzo bruas kaj tondrado regas super Batumo. La ŝtormo tremigis la bordon.

Atinginte la somerdomon de inĝeniero Bruns patro Fjodor diris al la lokulo-veturigisto atendi, kaj iris preni la meblojn.

– Alportis mi la monon, – diris patro Fjodor, – estus bone ke vi cedu iom.

– Museto, – elĝemis la inĝeniero, – mi ne povas plu!

– Sed ne, mi alportis la monon, – rapidis patro Fjodor, – ducent rublojn, kiel vi diris.

– Museto! Prenu de li la monon! Donu al li la seĝojn. Kaj faru li ĉion rapide. Ĉe mi estas migreno.

Celo de la tuta vivo ekestis akirita. Kandela fabriketo en Samara mem iris en la manojn. Brilantoj ŝutiĝis en la poŝojn kiel rostitaj sunfloraj semoj.

Dek du seĝoj unu post la alia estis ŝarĝitaj sur la ĉaron. Ili ege similis tiujn de Vorobjaninov, kun tiu nur diferenco, ke tegaĵo de ili estis ne katuna, flordesegnita, sed repsa, blua, kun rozkoloraj strietoj.

Patron Fjodor posedis senpacienco. Ĉe li sub la torditan ŝnureton estis enŝovita hakileto, nevidebla de ekstere. Patro Fjodor eksidis apudla la koĉero kaj, ĉiuminute ret-rorigardante la seĝojn, ekveturis al Batumo. La viglaj ĉevaloj veturigis patron Fjodor kaj lian trezoron soben, sur la ŝosean vojon, preter restoracieto “Final”, sur bambuaj tabloj kaj laŭboj de kiu promenis la vento, preter la tunelo, glutanta lastajn cisternajn vagonojn de nafta trajno, preter fotografisto, senigita en tiun ĉi krepuskan tagon de sia ordinara klientaro, preter elpendaĵo “Batuma botanika ĝardeno”, kaj ektiris ne tro rapide super linio de la surfo mem. En lokoj kie la vojo tanĝis la ŝtonozan bordon, patro Fjodor estis aspergita per la salaj ŝprucoj. La ondoj, deĵetitaj de la ŝtonoza bordo, transformiĝis en gejserojn, leviĝis al la ĉielo, kaj malrapide defalis.

Puŝoj kaj eksplodoj de la surfo ardigis la tumultan animon de patro Fjodor. La ĉevaloj, superante la venton, malrapide proksimiĝis al Maĥinĝauri. Ĉie, kien penetris la rigardo, fajfegis kaj konvekxiĝis malklara verda akvo. Ĝis Batumo mem, kvazaŭ basko de suba jupo, eliĝinta el sub robo de malordema sinjorineto, flirtis blanka ŝaŭmo de la surfo.

– Halt! – kriis subite patro Fjodor al la veturigisto. Haltu, islamano!

Kaj, tremante kaj stumblante, li komencis elŝarĝi la seĝojn sur la malplenan bordon. La indiferenta lokulo ricevis sian kvinrublaĵon, vipis la ĉevalojn, kaj forveturis. Kaj patro Fjodor, konvinkiginte ke ĉirkaŭe estas neniu, detiris la seĝojn de la abruptaĵo sur negrandan, ankoraŭ sekan pecon de la plaĝo, kaj elprenis la hakileton.

Minuton li troviĝis en dubo, ne sciis de kiu seĝo komenci. Poste, kvazaŭ somnambulo, li venis al tria seĝo, kaj bestece frapis ĝin je la dorseton. La seĝo falis, nedifektita.

– Ha! – kriis patro Fjodor. – Mi montros al vi!

Kaj li ĵetiĝis sur la seĝon kiel sur vivan estaĵon. La seĝo momente ekestis dishakita kiel brasiko. Patro Fjodor ne aŭdis frapojn de la hakileto kontraŭ la ligno, repso, kaj la risortoj. En la potenca muĝo de la ŝtormo ĉiuj eksteraj sonoj surdiĝis kvazaŭ en felto.

– Ha! Ha! Ha! – alparolis patro Fjodor, hakante plenforte.

La seĝoj pereis unu post la alia. Furiozo de patro Fjodor konstante kreskis. Pligrandiĝis ankaŭ la ŝtormo. Kelkaj ondoj atingis jam piedojn mem de patro Fjodor.

De Batumo ĝis Sinopo regis grandega bruoj. La maro furiozis kaj transigis sian furiozon sur ĉiujn ŝipetojn. Va-

porŝipo “Lenin”, fulgante per du siaj tuboj, kaj peze mallevigante la pobon, proksimiĝis al Novorosijsk. La ŝtormo turniĝis en Nigra maro, elĵetante miltunajn ondegajn sur bordojn de Trapezund, Jalto, Odeso kaj Konstanco. Post trankvilo de Bosporo kaj Dardanelo tondris Mediteranea maro. Atlantika oceano, trans Gibraltara markolo, frapiĝis je Eŭropo. La kolera akvo zonigis terglobon.

Kaj sur bordo de Batumo staris patro Fjodor kaj, ŝvitegante, dishakis la lastan seĝon. Post unu minuto ĉio estis pe-ita. Malespero kaptis patron Fjodor. Ĵetinte stuporiĝintan rigardon sur amasigitan per li monton da piedetoj, dorsetoj kaj risortoj, li retiriĝis. La akvo kaptis lin je la piedoj. Li ŝiriĝis antaŭen kaj, malsekiĝinte, ĵetiĝis sur la ŝoseon. Granda ondo frapiĝis je la loko, kie ĵus staris patro Fjodor kaj, ruliĝante malantaŭen, fortiris kun si tutan kripligitan kompleton de general-vidvino Popova. Patro Fjodor jam ne vidis tion. Li tiriĝis sur la ŝoseo, kliniĝinte, kaj premante al la brusto la malsekan pugn.

Li eniris Batumon, nenion vidante ĉirkaŭ si. Lia stato estis plej terura. Je kvin mil kilometroj de la domo, kun dudeko da rubloj en la poŝo, ĝisveturi sian intiman urbon estis tute ne eble.

Patro Fjodor preteriris la turkan bazon, ĉe kiu oni, per ideala flustro konsilis al li aĉeti pudron *Coty*, silkajn ŝtrumpojn kaj senimpostan tabakon el Suĥum, ektiriĝis al la stacidomo, kaj perdiĝis en amaso da portistoj.

Ĉapitro 38

Sub nuboj

Tri tagoj post la negoco de la koncesiuloj kun muntisto Meĉnikov teatro "Kolumbo" forveturis per fervojo tra Maĥaĉkala kaj Bakuo. Dum ĉiuj tiuj tri tagoj la koncesiuloj, ne kontentiĝintaj per enhavo de la du dissekcitaj sur Maŝuk seĝoj, atendis de Meĉnikov la trian seĝon, lastan el la teatraĵoj. Sed la muntisto, turmentita per narzan, eluzis ĉiun dudekon da rubloj por aĉeto da simpla vodko, kaj venis ĝis tiu stato ke estis tenata en ŝlosita rekvizitejo.

– Jen Mineralaj Akvoj al vi! – deklaris Ostap, sciinte pri forveturo de la teatro. – Bastardo li estas, tiu ĉi muntisto! Faru post tio aferojn kun teatraĵoj laborantoj!

Ostap ekestis pli vanta ol antaŭe. Ŝancoj trovi la trezoron pe-kreskis senmezure.

– Ni bezonas monon por veturi na Vladikaŭkaz, diris Ostap. – De tie ni veturos Tiflison per Milit-Kartvela vojo. Ĉarmaj pejzaĝoj! Mirinda monta aero! Kaj en finalo – cent kvindek mil rublojn nul nul kopekojn. Valoras daŭrigi la kunsidon.

Sed elveturi el Mineralaj Akvoj estis ne tiel simple. Evidentiĝis ke Vorobjaninov estas maltalenta fervoja senbiletulo kaj, ĉar liaj provoj eniri la trajnon okazis malsukcesaj, li devis elpaŝi apud "Florejo" en rolo de iama respondeculo de lerneja regiono. Tio havis sufiĉe negrandan sukceson. Du rublojn per dek du horoj de malfacila kaj malglora laboro. Tamen la sumo estis sufiĉa por veturi ĝis Vladikaŭkaz.

En Beslan oni forpelis de la trajno na Ostap, kiu veturis sen bileto, kaj la granda kombinanto arogante kuris

post la trajno ĉirkaŭ tri kilometroj, minacante al tute senkulpa Ipolit Matveeviĉ per la pugno.

Post tio Ostap sukcesis sursalti ŝtupeton de la trajno, kiu malrapide tiriĝis al Kaŭkaza kresto. De tiu ĉi pozicio Ostap scivole spektis disvolviĝintan antaŭ li panoramon de Kaŭkaza monta ĉeno.

Estis la kvara matene. Montaj pintoj lumiĝis per malhel-roza suna lumo. Montoj ne plaĉis al Ostap.

– Tro multe da ŝiko, – diris li. – Sovaĝa beleco. Imagopovo de idioto. Senutila aĵo.

Ĉe Vladikaŭkaza relvoja stacidomo la alveturintojn atendis granda malferma buso de Transkaŭkaz-aŭto, kaj karesemaj homoj diris:

– Kiu veturos sur Milit-Kartvela vojo, tiun ni veturigas en la urbon senpage.

– Kien vi, Kisa? – diris Ostap. – Iru ni en la buson. Ili veturigu nin senpage.

Alveturigitaj per la buso al kontoro de Transkaŭkaz-aŭto, Ostap tamen ne rapidis mendi lokon en buso. Vigle konversaciante kun Ipolit Matveeviĉ li spektis Tablan monton, zonigitan per nuboj kaj, trovinte ke la monto vere similas tablon, rapide malproksimiĝis.

En Vladikaŭkaz ili devis sidi kelkajn tagojn. Sed ĉiuj provoj akiri monon por veturo sur Milit-Kartvela vojo aŭ tute ne alportis fruktojn, aŭ donis rimedojn sufiĉajn nur por unutaga nutrado. Provo preni de civitanoj dekkopekajn monerojn ne sukcesis. Kaŭkaza ĉeno estis ĝis tiom alta, ke ne eblis preni monon por montri ĝin. Ĝi estis videbla preskaŭ de ĉie. Aliaj belaĵoj en Vladikaŭkaz forestis. Kio koncernas riveron Terek, ĝi fluis preter "Trek", kaj monon por eniri ĝin la urbo prenis sen helpo de Ostap. Almozpe-

tado, entreprenita per Ipolit Matveeviĉ, venigis dum du tagoj dektri kopekojn.

– Sufiĉas, – diris Ostap, – ekzistas nur unu eliro: iri Tiflison piede. Dum kvin tagoj ni trairos la ducent kilometrojn. Ne maltrankviliĝu, paĉjo: ĉarmaj montaj pejzaĝoj, freŝa aero!.. Estas bezonata mono por pano kaj kolbaso. Vi povas aldoni al via vortaro kelkajn italajn vortojn, se vi volas, sed ĝis la vespero endas kolekti ne malpli ol du rublojn! Hodiaŭ ni ne tagmanĝos, kara kamarado. Ve! Malbonas la ŝancoj...

Frumatene la koncesiuloj transiris per ponteto riveron Terek, preteriris militistajn barakojn, kaj enprofundiĝis verdan valon, en kiu iris Milit-Kartvela vojo.

– Al ni prosperis, Kisa, – diris Ostap, – nokte estis pluvo, kaj ni ne devos gluti polvon. Enspiru, gvidanto, puran aeron. Kantu. Rememoru prikaŭkazajn versaĵojn. Kondu tu sin kiel decas!...

Sed Ipolit Matveeviĉ ne kantis kaj ne rememoris versaĵojn. La vojo iris supren. Noktoj, pasigitaj sub malferma ĉielo, memorigis pri si per pikado en flanko, pezeco en la piedoj, kaj la kolbaso — per konstanta kaj turmenta pirozo. Li iris kliniĝinte flanken, iom posttirante la maldekstran piedon, kaj tenante en la mano dukilograman panon, envolvitan en Vladikaŭkazan ĵurnalon.

Denove iri! Ĉi-foje en Tiflison, per vojo kiu estas plej bela en la mondo. Al Ipolit Matveeviĉ ĉio estis indiferenta. Li ne rigardis flankojn, kiel Ostap. Li decide ne rimarkis na Terek, kiu komencis jam tondreti sur fundo de la valo. Nur brilantaj sub la suno glaciaj pintoj neklare memorigis al li ion: ĉu brilon de brilantoj, ĉu plej bonajn brokaĵajn ĉerkojn de majstro Bezenĉuk.

Post Balto la vojo eniris montfendejon, kaj ekiris sur malvasta kornico, elĉizita en malhelaj vertikalaj rokoj. Spiralo de la vojo volviĝis supren, kaj vespere la koncesiuloj okazis en stacio Lare, je mil metroj super marnivelo.

Ili noktumis senpage en malriĉa *duĥan*, kaj eĉ ricevis po glaso da lakto, plezurinte la mastron kaj liajn gastojn per kartaj artifikoj.

La mateno estis ĝis tiom ĉarma, ke eĉ Ipolit Matveeviĉ, aspergita per la monta aero, paŝadis pli vigle ol hieraŭ. Post stacio Lare tuj ekstaris grandioza muro de Flanka montoĉeno. Valo de Terek ĉi tie ege malvastiĝis. La pejzaĝo iĝis pli kaj pli malserena, kaj surskriboj sur la rokoj – pli multnombraj. En loko kie la rokoj tiel kunpremis fluon de Terek ke ponto tie estis nur dudek-metra, la koncesiuloj ekvidis tiom da surskriboj sur la rokaj muroj de la montfendejo, ke Ostap, forgesinte majestecon de tiu ĉi Darjala montofendejo, ekkriis, penante superi tondradon kaj ĝemojn de Terek:

– Grandaj homoj! Turnu vian atenton, gvidanto. Ĉu vi vidas? Iom pli alte ol la nubo kaj iom malpli alte ol la aglo! Surskribo: “Kola kaj Mika, julio 1914.” Neforgesebla spektaklo! Turnu vian atenton al arteco de la plenumo! Ĉiu litero grandas je unu metro, kaj estas desegnita per olea farbo! Kie vi estas nun, Kola kaj Mika?

– Kisa, – daŭrigis Ostap, – eterniĝu ankaŭ ni. Superu ni na Mika. Mi, bonokaze, havas kreton! Je dio, mi tuj grimpu kaj skribu: «Kisa kaj Osja estis ĉi tie».

Kaj Ostap, ne longe pensante, metis la provizan kolbason sur la parapeton, gardantan la ŝoseon de bolanta abismo de Terek, kaj komencis leviĝi sur la rokon.

Komence Ipolit Matveeviĉ sekvis per la rigardo grimpadon de la granda kombinanto, sed poste deflankiĝis kaj,

turniĝinte, komencis pririgardi fundamenton de kastelo de Tamara, konserviĝintan sur roko, kiu similis ĉevalan denton.

Tiutempe, je du kilometroj de la koncesiuloj, en Darĵalan montofendejon eniris, de flanko de Tifliso, patro Fjodor. Li paŝadis per ritma soldata irmaniero, rigardante antaŭ si per la firmaj diamantaj okuloj, kaj apogante sin sur altan bastonon kun kurba finaĵo.

Per lasta mono patro Fjodor veturis ĝis Tifliso, kaj nun paŝis al la hejmo piede, nutrante sin per libervolaj donacoj. Dum transiro de Kruca montpasejo (2345 metroj super marnivelo) lin mordis aglo. Patro Fjodor svinge minacis la arogantan birdon per la bastono, kaj ekiris pluen.

Li iris, implikiĝante en la nuboj, kaj murmuris:

– Tute ne profite, sed sole por plenumi volon de la sendinta min edzino!

Distanco inter la malamikoj malpliigis. Turniĝinte post pikan elstaraĵon, patro Fjodor trafis maljunulon kun ora nazumo.

La montofendejo rompiĝis en okuloj de patro Fjodor, Terek ĉesis sian miljaran krion.

Patro Fjodor rekonis na Vorobjaninov. Post la terura malsukceso en Batumo, post kiam disfalis ĉiuj liaj esperoj, nova ebleco ricevi la riĉaĵojn influis patron Fjodor per nekutima maniero.

Li kaptis na Ipolit Matveeviĉ je la magra gorĝo kaj, premante per la fingroj, elkriis per la raŭkiĝinta voĉo:

– Kien vi kaŝis trezorojn de la mortigita per vi bo-patrino?

Ipolit Matveeviĉ, atendanta nenion similan, silentis, eliginte la okulojn tiel, ke ili preskaŭ tuŝis vitrojn de la nazumo.

– Diru! – ordonis patro Fjodor. – Pentu, pekulo!
Vorobjaninov sentis ke li perdas la spirkapablon.

Sed tiam patro Fjodor, jam celebranta la venkon, ekvidis na Bender, saltantan sur la roko. La teknika direktoro malleviĝis, kriante plengorĝe:

Dispeciĝante je nigra granito
ŝaŭmegas kaj kirlas l' river' ekscitita...

Grandega timo trafis koron de patro Fjodor. Li aŭtomate daŭrigis teni la gvidanton je la gorĝo, sed genuoj liaj ekstremsis.

– Ha, jen kiu estas tio! – amike kriis Ostap. – La konkuranta organizaĵo!

Patro Fjodor ne prokrastis. Obeante la bonfaran instinkton li kaptis la koncesiulajn kolbason kaj panon, kaj ekkuris for.

– Batu lin, kamarado Bender! – kriis de la tero Ipolit Matveeviĉ, trovinta la spiron.

– Kaptu lin! Tenu!

Ostap fajfis kaj kriis:

– Tju-u-u! – kriis li, ĵetante sin kuratingi la malamikon.
– Batalo ĉe piramidoj, aŭ Bender dum ĉasado! Kien vi kuras, kliento? Mi povas proponi al vi bone sentripigitan seĝon!

Patro Fjodor ne eltenis turmentojn de la persekutado, kaj ekgrimpis sur tute vertikalan rokon. Supren lin puŝis koro, leviĝanta al la gorĝo mem, kaj speciala, konata nur al timuloj juko en la kalkanoj. La piedoj mem ŝiriĝadis de la granito kaj portis sian mastron supren.

– U-u-u! – kriis Ostap desobe. – Kaptu lin!

– Li forportis nian proviaĵon! – kriaĉis Ipolit Matveeviĉ, alkurante na Ostap.

– Haltu! – tondris Ostap. – Haltu, mi diras al vi!

Sed tio aldonis novajn fortojn al malfortiĝinta jam patro Fjodor. Li eksaltis, kaj per kelkaj paŝegoj okazis je ĉirkaŭ dudek metroj pli alte ol plej alta surskribo.

– Fordonu la kolbason! – kriis Ostap. – Fordonu la kolbason, stultulo! Mi ĉion pardonos!

Patro Fjodor aŭdis jam nenion. Li okazis sur plataĵo, surgrimpi kiun sukcesis ĝis nun eĉ ne unu homo. Patron Fjodor ekposedis angora teruro. Li komprenis ke li neniel sukcesos malleviĝi.

La roko falis sur la ŝoseon vertikale, kaj pri reveno oni eĉ pensi ne povis. Li ekrigardis soben. Tie tumultis Ostap, kaj sur fundo de la montfendejo briletadis ora nazumo de la gvidanto.

– Mi fordonos la kolbason! – kriis patro Fjodor. – Deprenu min!

Responde tondris Terek, kaj el kastelo de Tamara aŭdiĝis pasiaj krioj. Tie loĝis strigoj.

– Depre-enu min! – plende kriis patro Fjodor.

Li vidis ĉiujn manovrojn de la koncesiuloj. Ili kuradis sub la roko kaj, se juĝi laŭ la gestoj, kriis maldecaĵojn.

Post unu horo patro Fjodor, kuŝanta sur la ventro, kaj klinanta la kapon soben, ekvidis ke Bender kaj Vorobjaninov foriras en direkton de Kruca montpasejo.

Malleviĝis rapida nokto. En la obskuro kaj infera bruoj, sub nubo mem tremis kaj ploris patro Fjodor. Li jam ne bezonis terajn trezorojn. Li volis nur soben, sur la teron. Nokte li muĝis tiel ke iam superis na Terek; matene li pli fortigis sin per la kolbaso kun la pano, kaj diable priridegis aŭtojn, preterveturantajn sobe. Reston de la tago li pasigis kontemplante la montojn kaj la ĉielan lumigilon: sunon. Kaj sekvontnokte li ekvidis reĝinon Tamara. La reĝino alflugis lin el sia kastelo, kaj kokete diris:

– Najbaroj ni estu.

– Panjo! – kortuŝe diris patro Fjodor. – Tute ne profite...

– Konas mi, konas, – rimarkis la reĝino, – sed sole por plenumi volon de la sendinta vin edzino.

– Sed de kie vi scias? – miris patro Fjodor.

– Ja scias mi. Vizitu min, najbaro. Ludu ni je “Sesdek ses”! Ĉu?

Ŝi ekridis kaj forflugis, sendante petardojn en la noktan ĉielon.

Dum tria tago patro Fjodor komencis prediki al birdoj. Ial li inklinis ilin al luterismo.

– Birdoj, – diris li al ili per la sonora voĉo, – pentu vi publike viajn pekojn!

Dum kvara tago oni jam montris lin desobe al ekskursanoj.

– Dekstre — kastelo de Tamara, – diris spertaj gvidistoj, – kaj maldekstre viva homo staras, sed per kio li vivas, kaj kiel li trafis tien, tute nenio estas sciata.

– Ĝis kiom sovaĝas la popolo! – miris la ekskursanoj. – Idoj de montaro!

Iris nuboj. Super patro Fjodor ronde flugis agloj. Plej kuraĝa el ili forŝtelis restaĵon de la kolbaso, kaj per svingo de la flugilo deĵetis en la ŝaŭmantan Terek ĉirkaŭ duonkilogramon da pano.

Patro Fjodor minacis al la aglo per la fingro kaj, ride-tante radie, elflustris:

Birdon dian okupigas
nek zorgemo, nek labor',
kaj portempan sian neston
ĝi forlasas sen angor'.

La aglo strabe ekrigardis patron Fjodor, elkriis «ki-ke-ri-ki», kaj forflugis.

– Ho agleto, agleto, granda kanajlo vi estas!

Post dek tagoj el Vladikaŭkaz venis estingista brigado kun ĉio necesa, kaj deprenis patron Fjodor.

Kiam oni prenis lin, li klakis per la manplatoj, kaj per la voĉo, senigita de agrablo, kantis:

Kaj estos vi reĝin' de l' mo-o-ndo,
ete-erna mia amiki-in!

Kaj severa Kaŭkazo multfoje ripetis vortojn de M. Lermontov kaj muzikon de A. Rubinŝtejn.

– Tute ne profite, – diris patro Fjodor al la ĉefestingisto, – sed sole...

Kaj sur fajrobrigadista ŝtuparo oni forveturigis la ridegantan pastron en psikiatrian malsanulejon.

Ĉapitro 39

Tertremo

– Kion vi opinias, gvidanto, – demandis Ostap, kiam la koncesiuloj proksimiĝis al vilaĝo Sioni, – per kio oni povas perlabori en tiu ĉi sensuka loko, troviĝanta sur dukilometra alteco?

Ipolit Matveeviĉ silentis. Sola okupo per kiu li povus akiri la vivrimedojn estis almozpetado, sed ĉi tie, sur montaj spiraloj kaj kornicoj, estis neniu de kiu oni povus peti.

Tamen ankaŭ ĉi tie ekzistis almozpetado, sed almozpetado tute alia, speciale-alpa: ĉiun buson aŭ aŭton, pret-erirantan la vilaĝon, alkuris infanoj, kaj plenumis antaŭ la

movanta spektantaro kelkajn paŝojn de *naura lezginka*⁴²; post tio la infanoj kuris post la aŭto kriante:

– Monon! Donu monon!

La pasaĝeroj ĵetis kvinkopekajn monerojn, kaj soris al Kruca montpasejo.

– Sankta afero, – diris Ostap, – kapitalaj elspezoj tute ne estas bezonataj, sed la enspezoj, kvankam ne grandaj, tre valorus en nia stato.

Al dua horo de la dua ir-tago Ipolit Matveeviĉ, sub pririgardo de la granda kombinanto, plenumis antaŭflugantaj pasaĝeroj sian unuan dancon. Tiu ĉi danco similis mazurkon, sed la pasaĝeroj, trosatigitaj per sovaĝaj belecoj de Kaŭkazo, opiniis ĝin lezginka, kaj premiis lin per tri kvinkopekaj moneroj. Antaŭ sekvanta aŭto, kiu okazis malfermita buso, iranta de Tifliso na Vladikaŭkaz, dancadis kaj saltadis la teknika direktoro mem.

– Monon! Donu monon! – kriis li kolere.

La ridantaj pasaĝeroj malavare premiis liajn saltojn. Ostap kolektis en la voja polvo tridek kopekojn. Sed tiam sionaj infanoj superŝutis la konkurenculojn per ŝtona hajlo. La irantoj, savante sin de la pripafado, per rapidaj paŝoj direktiĝis en plej proksiman vilaĝon, kie ili elspezis la perlaboritan monon por fromaĝo kaj loka plata pano.

En tiuj okupoj la koncesiuloj pasigis siajn tagojn. Noktumis ili en montaraj kabanoj. En kvara tago ili malleviĝis per zigzagoj de la ŝoseo en Kajŝauran valon. Suno ĉi tie estis varmega, kaj ostoj de la partneroj, kiuj forte frostiĝis sur Kruca montpasejo, rapide revarmiĝis.

Darjalaj rokoj, obskuro kaj malvarmo de la pasejo ŝanĝiĝis je verdaĵo kaj hejmeco de la profundega valo. Ili

42. *lezginka*: multspeca danco de kaŭkazaj popoloj.

iris super rivero Aragva, malleviĝis en la valon, loĝatan per homoj, kaj abundantan per hejma brutaro kaj manĝaĵoj. Ĉi tie eblis elpeti ion, ion perlabori aŭ simple forŝteli. Tio estis Transkaŭkazo.

Ĝojiĝintaj koncesiuloj ekiris pli rapide.

En Pasanaur, en varmega riĉa loĝloko kun du gastejoj kaj kelkaj lokaj restoracioj, la amikoj elpetis platan panon, kaj ekkuŝis en arbustoj kontraŭ gastejo “Francio”, kiu posedis ĝardenon kaj duopon da alĉenigitaj ursetoj. Ili ĝuis la varmon, bongustan panon, kaj merititan ripozon.

Tamen, post nelonge, la ripozo estis rompita per jelpo de aŭtaj hupoj, susuro de novaj pneŭoj sur la gruza ŝoseo, kaj per ĝojaj krioj. La amikoj elrigardis. Al “Francio” alruliĝis unu post la alia tri novetaj samspecaj aŭtoj. La aŭtoj senbrue haltis. El la unua aŭto elsaltis Persickij. Post li eliris “Juĝejo kaj vivo”, aranĝante la polvigatajn harojn. Poste el ĉiuj aŭtoj elamasiiĝis anoj de aŭta klubo de ĵurnalo “Stablo”.

– Bivako! – kriis Persickij. – Mastro! Dek kvin ŝaŝlikojn!

En “Francio” ekiradis dormemaj figuroj, kaj ekaŭdiĝis krioj de virŝafo, kiun oni je la kruoj trenis en la kuirejon.

– Ĉu vi rekonas tiun junan homon? – demandis Ostap. – Tio estas raportisto de “Skrjabin”, unu el kritikantoj de nia reklama tabulo. Tamen kun kiu ŝiko ili alveturis. Kion tio signifas?

Ostap proksimiĝis al vorantoj de ŝaŝlikoj, kaj plej elegante salutis na Persickij.

– *Bonĵur!* – diris la raportisto. – Sed kie mi vidis vin, kara kamarado? Ha-a-a! Mi rememoras. Pentristo de “Skrjabin”! Ĉu jes?

Ostap premis la manon al la brusto kaj ĝentile kliniĝis.

– Pardonu, pardonu, – daŭrigis Persickij, posedanta kroĉan memorkapablon de raportisto. – Ĉu ne vin en Moskvo, sur Sverdlov-placo, trafis fiakrista ĉevalo?

– Jes, certe! Kaj, laŭ via trafa diraĵo, mi spertis nur ioman timon.

– Kaj pri kio vi okupiĝas ĉi tie, ĉu pri arto?

– Ne, mi kun ekskursaj celoj.

– Ĉu piede?

– Piede. Specialuloj asertas ke vojaĝi sur Milit-Kartvela vojo per aŭto estas nura stultaĵo.

– Ne ĉiam stultaĵo, kara mia, ne ĉiam! Jen ni, ekzemple, veturas ne tiom stulte. La aŭtetoj, kiel vi vidas, estas propraj, mi substrekas, — propraj, kolektivaj. Rekta vojaĝo Moskvo – Tifliso. Benzino kostas preskaŭ nenion. La moviĝo estas rapida kaj oportuna. Molaj risortoj. Eŭropo!

– De kie ĉe vi tio? – envie demandis Ostap. – Ĉu vi gajnis centmilon?

– Ne, ne cent, sed kvindekon ni gajnis.

– Ĉu en kartludo?

– Per obligacio, posedaĵo de la aŭta klubo.

– Jes, – diris Ostap, – kaj per tiu ĉi mono vi aĉetis la aŭtojn, ĉu?

– Kiel vi vidas!

– Bo-one. Eble vi bezonas aranĝanton? Mi konas certan junan homon. Nedrinkulo.

– Kiun aranĝanton?

– Nu tiun... Ĝenerala gvidado, aferaj konsiloj, kompleks-metoda instruado... Ĉu?

– Mi komprenas. Ne, ni ne bezonas.

– Ĉu vere?

– Jes, bedaŭrinde. Kaj ankaŭ pentriston ni ne bezonas.

– Tiam donu dek rublojn.

– Avdotjin, – diris Persickij. – Estu bonvola, eldonu al tiu ĉi civitano tri rublojn de mia konto. Kvitanco ne estas bezonata.

– Tio estas ekstreme malmulte, – rimarkis Ostap, – sed mi akceptas. Mi komprenas tutan malfacilecon de via stato. Se vi gajnus cent mil, tiam, verŝajne, vi pruntus al mi eĉ kvinrublaĵon. Sed vi gajnis nur kvindek mil rublojn nul nul kopekojn. Tamen dankon al vi!

Bender ĝentile demetis la ĉapelon. Persickij ĝentile demetis la ĉapelon. Bender ĝentilege kliniĝis. Persickij respondis per ege ĝentila kliniĝo. Bender adiaŭe svingis la manon. Persickij, sidante ĉe la stirilo, ankaŭ levis la manon. Sed Persickij forveturis en bonega aŭto al brilanta malproksimo, en komunumo de la gajaj amikoj, dum la granda kombinanto restis sur la polva vojo kun la stultulo partnero.

– Ĉu vi vidis tiun ĉi brilon? – demandis Ostap na Ipolit Matveeviĉ.

– Ĉu Transkaŭkazaŭto aŭ privata firmao “Motor”? – afereme demandis Vorobjaninov, kiu dum kelkaj tagoj de la irado bonege konatiĝis kun ĉiuj specoj de aŭtotransporto sur la vojo. – Mi volis jam veni al ili por danceti.

– Post nelonge vi plene stultiĝos, mia bedaŭrinda amiko. Ĉu tio estas Transkaŭkazaŭto? Tiuj ĉi homoj, ĉu vi aŭdas, Kisa, gaj-nis kvindek mil rublojn! Vi mem vidas, Kisjo, ĝis kiom ili estas gajaj, kaj kiom da mekanika fatraso ili aĉetis! Kiam ni ricevos nian monon ni elspezos ĝin pli racie. Ĉu?

Kaj la amikoj, revante pri tio kion ili aĉetos kiam ek-estos riĉuloj, eliris el Pasanaur. Ipolit Matveeviĉ vigle imagis aĉeton de novaj ŝtrumpoj kaj forveturon eksterlan-

den. Revoj de Ostap estis pli vastaj. Liaj projektoj estis grandiozaj: ĉu konstruo de baraĵo sur Blua Nilo, ĉu malfermo de kazino en Rigo, kun filioj en najbaraj regionoj.

Dum tria tago, antaŭ la tagmanĝo, preterirante enuajn kaj polvajn lokojn: Ananur, Duŝet kaj Cilkan, la paŝantoj venis al Mĉet – iama ĉefurbo de Kartvelio. Ĉi tie Kura turniĝis al Tifliso.

Vespere ili preteriris hidroelektran stacion Zemo-Avĉal. Vitro, akvo kaj elektro brilis per diversaj lumoj. Ĉio tio respegulis kaj tremis en rapide kuranta Kura.

Ĉi tie la koncesiuloj amikiĝis kun kamparano, kiu sur alta durada ĉaro venigis ilin en Tiflison ĝis la dudek-tria, en horon kiam vespera malvarmeto elvokas sur stratojn de la kartvelia ĉefurbo loĝantojn, turmentitajn per la sufoka tago.

– La urbeto ne estas malbona, – diris Ostap, enirante avenueon Ŝota Rustaveli, – ĉu vi scias, Kisa...

Subite Ostap, ne fininte la frazon, ĵetiĝis postkuri iun civitanon, kuratingis lin, kaj komencis vigle konversacii kun li.

Poste li rapide revenis, kaj puŝis per la fingro flankon de Ipolit Matveeviĉ.

– Ĉu vi scias kio estas tio? – flustris li rapide. – Tio estas “Odesa ring-pana meti-kolektivo ‘Moskvaj sekringe-toj’ ”, civitano Kislarskij. Ni iru al li. Kvankam tio estas paradokso, sed nun vi denove estas giganto de penso kaj patro de rusa demokratio. Ne forgesu disblovi la vangojn kaj movi la lipharojn. Ili, bonokaze, estas jam sufiĉe longaj! Kiu okazo! Fortuno! Se mi tuj ne dissekcios lin je kvincent rubloj, kraĉu en miajn okulojn! Iru ni! Iru!

Kaj vere, je ioma malproksimo de la koncesiuloj staris lakto-blua pro la timo Kislarskij en silka kostumo kaj pajla ĉapelo.

– Ŝajnas ke vi estas konataj, – diris Ostap flustre, – tio estas persono proksima al la imperiestro, giganto de penso kaj patro de rusa demokratio. Ne atentu lian kostumon. Tio – por konspiro. Senprokraste veturigu nin ien ajn. Ni devas konversacii.

Kislarskij, veninta en Kaŭkazon por ripozi de stargorodaj konsternaĵoj, estis tute premita. Murmurante ion sensignifan pri probleboj en ringopana kaj sekringeta afero, Kislarskij sidigis la terurigajn konatulojn en fiakron kun arĝentizitaj spokoj kaj ŝtupeto, kaj ekveturis ilin al monto de Davido. Sur pinton de tiu ĉi restoracia monto ili leviĝis per la funikularo. Tifliso en miloj da lumoj malrapide forrampis en la abismon. La konspirantoj leviĝis rekte al steloj.

Restoraciaj tabloj estis dismetitaj sur la herbo. Obtuze murmuris kaŭkaza orkestro, kaj eta knabino, sub feliĉaj rigardoj de la gepatroj, proprainiciate dancis inter la tabloj na lezginka.

– Ordonu alporti ion, – diris Bender.

Laŭ ordono de sperta Kislarskij estis venigitaj vino, manĝeblaj herboj kaj sala kartvela fromaĝo.

– Kaj ion por manĝi, – diris Ostap. – Se vi scius, kara sinjoro Kislarskij, kion mi kaj Ipolit Matveeviĉ devis elteni, vi mirus pri nia kuraĝeco.

«Denove!» – malespere pensis Kislarskij. – «Denove komenciĝas miaj turmentoj. Kial mi ne veturis en Krimeon? Ja estas certe ke mi volis veturi en Krimeon! Kaj ankaŭ Henrieta konsilis tion!»

Sed li rezignacie mendis du ŝaŝlikojn, kaj turnis al Ostap sian serveman vizaĝon.

– Do jen kio, – diris Ostap, ĉirkaŭrigardante, kaj mal-laŭtigante la voĉon, – en du vortoj. Oni observas nin jam du

monatoj kaj, verŝajne morgaŭ, en konspira loĝejo nin atendos embusko. Ni devos pafdefendi nin.

Ĉe Kislarskij arĝentiĝis la vangoj.

– Ni estas ĝojaj, – daŭrigis Ostap, – renkonti en tiu ĉi maltrankvila situacio fidelan luktanton por la patrolando.

– Hm... jes! – fiere eligis Ipolit Matveeviĉ, memorante kun kiu malsata vervo li dancis na lezginka proksime al Sioni.

– Jes, – flustris Ostap. – Ni esperas kun via helpo trafi la malamikon. Mi donos al vi pistolon.

– Ne, – firme diris Kislarskij.

En sekvonta minuto evidentiĝis ke la prezidanto de la borsa komitato ne havas eblecon partopreni en la morgaŭa batalo. Li tre bedaŭras, sed li ne povas. Li ne konas militan aferon. Ĝuste tial oni elektis lin prezidanto de la borsa komitato. Li estas en plena malespero, sed por savi vivon de la patro de rusa demokratio (li mem estas malnova oktobristo) li pretas proponi laŭeblecan financon helpon.

– Vi estas fidela amiko de la patrolando! – solene diris Ostap, postdrinkante la bonodoran ŝaŝlikon per dolĉeta *kipiani*. – Kvincent rubloj povas savi la giganton de penso.

– Diru, – demandis Kislarskij plende, – ĉu ducent rubloj povas savila giganton de penso?

Ostap ne eltenis kaj, sub la tablo, rave frapis na Ipolit Matveeviĉ per la piedo.

– Mi opinias, – diris Ipolit Matveeviĉ, – ke marĉando ne estas konvena ĉi tie!

Li tuj ricevis piedfrapon en la femuron, kio signifis:

«Brave, Kisa, brave, jen kio signifas la skolo!»

Kislarskij unuan fojon en la vivo ekaŭdis voĉon de la giganto de penso.

Tio ĝis tiom afekciis lin, ke li senprokraste transdonis al Ostap kvincent rublojn. Poste li pagis laŭ la kontresumo kaj, lasinte la amikojn ĉe la tablo, foriris kaŭze de la kapdoloro. Post duonhoro li sendis na Stargorod telegramon al la edzino:

viakonsile veturas krimeon iu-ajn okaze pretigu la korbon.

Longaj senigoj, kiujn toleris Ostap Bender, postulis tujan kompenson. Tial dum sama vespero la granda kombianto drinkadis sur la restoracia monto ĝis katalepsio, kaj preskaŭ elfalis el vagono de la funikularo dum vojo en hotelon. Sekvonttage li plenumis sian malnovan revon. Li aĉetis mirindan grizan kun pomoj kostumon. En tiu ĉi kostumo estis varmege, sed li, malgraŭ tio, iradis, ŝvitegante, en ĝi. Al Vorobjaninov, en vendejo de pretaj vestaĵoj de tiflisa kooperacio, estis aĉetitaj blanka tola kostumo kaj kaskedo kun ora signo de nekonata jakta klubo. En tiu ĉi vesto Ipolit Matveeviĉ similis komercan amator-admiralon. Lia trunko rektiĝis. La irmaniero ekestis firma.

– Ho! – diris Bender, – alta klaso! Al tiu brava belulo estiel vi, mi, se mi estus virino, farus ok-procentan rabaton de kutima prezo. Aĥ! Aĥ! En tiu aspekto ni povas mondumi! Ĉu vi scipovas mondumi, Kisa?

– Kamarado Bender, – ripetis Vorobjaninov, kio pri la seĝo? Oni devas informiĝi pri la teatro.

– Ĥo-ĥo! – refutis Ostap, dancante kun seĝo en granda maŭritana ĉambro de hotelo “Oriente”. – Ne instruu min vivi. Nun mi estas kolera. Mi havas monon. Sed mi estas grandanima. Mi donas al vi dudek rublojn kaj tri tagojn

por prirabi la urbon! Mi estas kiel **Suvorov**⁴³!.. Rabu la urbon, Kisa! Ĝoju!

Kaj Ostap, svingante la femurojn, ekkantis rapidritme:

Ho kiel vi, preĝej-sonor',
pensigas dum vespera hor'...

La amikoj drinkadis tutan semajnon. Admirala kostumo de Vorobjaninov kovriĝis per diverskoloraj vinaj makuloj, kaj sur kostumo de Ostap ili disfluis en grandan ĉielark-koloran pomon.

– Saluton! – diris dum oka mateno Ostap, al kiu, pro la postebrieco, venis ideo legi na “Matenruĝo de Oriento”. – Vi, drinkulaĉo, aŭskultu kion saĝaj homoj publikigas en ĵurnaloj! Aŭskultu!

TEATRA KRONIKO

Hieraŭ, la 3-an de septembro, fininte turneon en Tifliso, moskva teatro “Kolumbo” forveturis na Jalta. La teatro intencas troviĝi en Krimeo ĝis komenco de vintra sezono en Moskvo.

– Ha! Kion mi diris al vi! – diris Vorobjaninov.

– Kion vi diris al mi! – refutis Ostap.

Tamen li estis konfuzita.

Tiu ĉi preterlaso estis tre malagrabla al li. Anstataŭ pe-i postkuron de la trezoroj en Tifliso, ili endas nun translokiĝi en Krimean duoninsulon. Ostap ekagis tuj. Estis aĉetitaj biletoj ĝis Batumo, kaj menditaj dua-klasaj lokoj en ŝipo “Pestel”, kiu iros de Batumo en Odeson la 7-an de septembro en 23-a horo, laŭ moskva tempo.

Dum nokto de la deka al la dek-unua de septembro, kiam “Pestel”, ne enirante pro la ŝtormo na Anapa, turniĝis

43. **A. Suvorov** (1730-1800): fama rusia militestro.

en malferman maron kaj prenis itineron rekte al Jalto, Ipolit Matveeviĉ vidis sonĝon.

Li sonĝis ke li, en admirala kostumo, staras sur balkono de sia stargoroda domo, kaj scias ke la homamaso, staranta sube, ion atendas de li. Granda tur-gruo mallevigis al liaj piedoj nigre-makulan porkon.

Venis kortisto Tiĥon en plena jaka kostumo kaj, kaptinte la porkon je la malantaŭaj kruroj, diris:

– Ha, ĉu “Nimfa”, je kukolo ĝin, donas kvaston?

En manoj de Ipolit Matveeviĉ okazis ponardo. Li batis per ĝi flankon de la porko, kaj el la granda vasta vundo elŝutiĝis kaj eksaltis sur la cemento brilantoj. Ili saltis kaj frapobruis pli kaj pli laŭte. Kaj fine ilia frapado ekestis netolerebla kaj timiga.

Ipolit Matveeviĉ vekiĝis pro frapoj de ondoj je la ŝipan fenestron.

Jalton ili alvenis ĉe kalmo, dum laciga suna mateno. La gvidanto, resaniĝinta de la mara malsano, paradis sur la pruo ĉe la sonorilo, plibeligita per gisita malnovslava surskribo. Gaja Jalto liniigis laŭ la bordo siajn etajn butikojn kaj flosantajn restoraciojn. Sur la kajo staris fiakroj kun veluraj sidlokoj sub ornamajitaj kapuĉoj, aŭtoj kaj busoj de “Krimea-ekskurso” kaj de kompanio “Krimea ŝoforo”. Brikaj junulinoj rotaciis malfermitajn ombrelojn, kaj svingis per tukoj.

La amikoj unuaj deiris sur la ardan kajon. El amaso de la renkontuloj kaj scivoluloj elplonĝis, ekvidinte la koncesiuojn, civitano en silka kostumo, kaj rapide ekpaŝis al eliro el la havena teritorio. Sed estis jam malfrue. Ĉasista rigardo de la granda kombinanto rapide rekonis la silkkostuman civitanon.

– Atendu, Vorobjaninov! – kriis Ostap.

Li ĵetiĝis antaŭen tiel rapide, ke atingis la silkkostuman civitanon je dek paŝoj de la eliro. Ostap tuj revenis kun cent rubloj.

– Ne donas pli. Cetere mi ne insistis, ĉar li ne havos per kio reveni hejmen.

Kaj vere, Kislarskij samhore, per aŭto, fuĝis na Sevastopol, kaj de tie, per tria klaso, hejmen, na Stargorod.

Tutan tiun ĉi tagon la koncesiuloj pasigis en hotelo, sidante nudaj sur la planko, kaj ĉiuminute kurante en la banĉambron sub la duŝon. Sed la akvo fluis varma, kiel aĉa teo. Savo de la varmego forestis. Ŝajnis ke Jalto tuj degelos kaj defluos en la maron.

Al la oka vespere, malbenante ĉiujn seĝojn de la mondo, la partneroj surtiris la varmegajn botetojn kaj ekiris en teatron.

Oni prezentis na “Geedziĝo”. Stepan, turmentita per la varmego, preskaŭ falis starante sur la manoj. Agafja Tiĥonovna kuris sur la ŝnuro, tenante per malsekiĝintaj manoj la ombrelon kun surskribo: «Mi volas na Podkolesin». En tiu ĉi minuto ŝi, kiel dum tuta tiu ĉi tago, volis nur tion: malvarman akvon kun glacio. Ankaŭ la publiko volis trinki. Eble pro tio, kaj ankaŭ pro tio ke aspekto de Stepan, voranta varmegan ovaĵon, elvokis abomenon, la spektaklo ne plaĉis.

La koncesiuloj estis kontentigitaj, ĉar ilia seĝo, kune kun tri novaj duonbrakseĝoj rokoko, troviĝis surloke.

Kaŝinte sin en unu el la loĝioj, la amikoj pacience atendis finon de la ekstreme longdaŭra spektaklo. Fine la publiko disiris, kaj la aktoroj ekkuris refreŝiĝi. En la teatro restis neniuj krom anoj de la koncesia entrepreno. Ĉiuj vivuloj elkuris en la straton, sub longe atenditan torentan freŝan pluvon.

– Post mi, Kisa, – komandis Ostap. – Se io okazos, – ni estas provinculoj kiuj ne trovis eliron.

Ili penetris sur la scenejon kaj, strekante alumetojn, sed malgraŭ tio frapiĝinte je la hidraŭlika premilo, esploris la tutan scenejon.

La granda kombinanto per la ŝtuparo kuris supren, en la rekvizitejon.

– Iru ĉi tien! – kriis li.

Vorobjaninov, svingante la manojn, impetis supren.

– Ĉu vi vidas? – diris Ostap, bruligante la alumeton.

El la obskuro eliris angulo de la hambsa seĝo, kaj sektoro de la ombrelo kun surskribo “... volas...».

– Jen! Jen estas nia estonto, estanto kaj estinto. Lumigu, Kisa, la alumetojn. Mi dissekcos ĝin.

Kaj Ostap enpoŝigis la manon por elpreni la ilaron.

– Nu, – diris li, etendante la manon al la seĝo, – ankorau unu alumeton, gvidanto.

Ekflamis la alumeto kaj, stranga afero, la seĝo memstare eksaltis flanken kaj, subite, antaŭ rigardoj de la mirigitaj koncesiuloj, forfalis tra la plankon.

– Panjo! – kriis Ipolit Matveeviĉ, deflugante al la muro, kvankam li havis neniun deziron fari tion.

Kun sonoro elsaltis vitroj, kaj ombreleto kun surskribo “Mi volas na Podkolesin», kaptita per la ventego, elflugis tra la fenestro al la maro. Ostap kuŝis sur la planko, iomete premita per kruclignaj tabuloj.

Estis la dek-dua kaj dek kvar minutoj. Tio estis unua frapo de granda krimea tertremo de jaro 1927.

Naŭgrada frapo, kaŭzinta senmezurajn plagojn al la tuta duoninsulo, elŝiris la trezoron el manoj de la koncesiuloj.

– Kamarado Bender! Kio estas tio? – kriis terurigita Ipolit Matveeviĉ.

Ostap estis ege malkontenta: la tertremo ekstaris sur lia vojo. Tio okazis unuan fojon en lia riĉa praktiko.

– Kio estas tio? – kriaĉis Vorobjaninov.

De la strato aŭdiĝis krioj, sonoroj kaj piedfrapado.

– Tio signifas ke endas urĝe forkuri sur la straton, ĝis nin dispremos muro. Rapide! Donu la manon, profanulo.

Kaj ili ĵetiĝis al eliro. Ĉe la pordo, gvidanta de la scenejo en interstrateton, sur la dorso kuŝis, al ilia miro, la nedifektita hambsa seĝo. Eliginte hundan jelson Ipolit Matveeviĉ enkreĉiĝis ĝin.

– Donu la plattenajlon! – kriis li al Ostap.

– Stulta idioto! – ĝemis Ostap. – Nun falos la plafono, sed li frenezadas ĉi tie! Rapide eksteren!

– Plattenajlon! – muĝis freneziĝinta Ipolit Matveeviĉ.

– Al diablo vin! Pereu ĉi tie kune kun via seĝo! Sed al mi la vivo valoras estiel memoraĵo!

Kun tiuj ĉi vortoj Ostap ĵetiĝis al la pordo. Ipolit Matveeviĉ ekbojis kaj, kaptinte la seĝon, ekkuris post Ostap. Tuj kiam ili okazis sur mezo de la interstrateto, la tero naŭze ekbalanciĝis sub iliaj piedoj, de tegmento de la teatro eksutiĝis tegoloj, kaj sur la loko kiun ĵus forlasis la koncesiuloj jam kuŝis restaĵoj de la hidraŭlika premilo.

– Nu, kaj nun donu la seĝon, – malvarmsange diris Bender. – Vi, vidas mi, jam tedis teni ĝin.

– Mi ne donos! – jelpis Ipolit Matveeviĉ.

– Kio estas tio? Ĉu ribelo sur la ŝipo? Fordonu la seĝon. Ĉu vi aŭdas?

– Tio estas mia seĝo! – kriĉis Vorobjaninov, superante ĝemojn, plorojn kaj krakojn, aŭdatajn de ĉiuj flankoj.

– Tial ricevu la honorarion, olda galoŝo!

Kaj per sia kupra manplato Ostap batis na Vorobjaninov je la kolo.

Samminute sur la interstrateto preterimpetis fajrobrigadista ĉararo kun torĉoj, kaj ĉe ilia intermita lumo Ipolit Matveeviĉ ekvidis sur vizaĝo de Bender ĝis tiom teruran mienon, ke li momente humiliĝis, kaj fordonis la seĝon.

– Nun estas bone, – diris Ostap, retrovante la spiron, – la ribelo estas subpremita. Kaj nun prenu la seĝon kaj portu ĝin post mi. Vi respondecas pri konservo de la aĵo. La seĝo estas konservenda eĉ se okazos frapo je kvindek gradoj! Ĉu vi komprenas?

– Komprenas.

La tutan nokton vagis la koncesiuloj kune kun la panikaj amasoj, ne kuraĝante, kiel ĉiuj, eniri lasitajn domojn, kaj atendante novajn frapojn.

Mateniĝe, kiam la timo iom malpliĝis, Ostap elektis loketon, proksime al kiu estis nek muroj, kiuj povus surfali, nek homoj, kiuj povus malhelpi, kaj komencis dissekci la seĝon.

Rezultoj de la dissekcado miregis la koncesiulojn. En la seĝo estis nenio. Ipolit Matveeviĉ, kiu ne eltenis ĉiujn terurojn de la nokto kaj de la mateno, ekridis per rata rideto.

Tuj poste okazis tria frapo, la tero disiĝis kaj englutis la hamsan seĝon, floretoj de kiu ridetis al la suno leviĝanta ene de la polva nubo; seĝon saviĝintan post unua frapo de la tertremo, kaj difektigitan per la homoj.

Ipolit Matveeviĉ staris manpiede kaj hurlis, turnante la ĉifitan vizaĝon al la malklare-ruĝa suna disko. Aŭskultante lin la granda kombinanto falis sveninta. Kiam li rekonsciĝis, li ekvidis apud si ĉirkaŭkreskitan per violkolora hir-

taĵo mentonon de Vorobjaninov. Ipolit Matveeviĉ estis senkonscia.

– Fakte, – diris Ostap per voĉo de resaniĝanto post tifo, – ĉe ni restis nun cent ŝancoj el cent. La lasta seĝo (ĉe vorto “seĝo” Ipolit Matveeviĉ rekonsciiĝis) malaperis en vara korto de Oktobra stacidomo, sed certe ne falis en la teron. Pri kio do la afero? La kunsido daŭriĝas.

Ile kun frapobruo falis brikoj. Tire kriis ŝipa sireno.

Ĉapitro 40

La trezoro

En pluvan fin-oktobran tagon Ipolit Matveeviĉ, sen la jako, en la luna veŝto, supersŭtita per la eta arĝenta stelaro, klopodis en ĉambro de Ivanopulo. Ipolit Matveeviĉ laboris sur la fenestra breto, ĉar en la ĉambro daŭre forestis tablo. La granda kombinanto ricevis art-fakan mendon produkti adresajn platetojn por loĝeja kooperativo. Persĝablonan plenumon de la platetoj Ostap komisiis al Vorobjaninov, kaj mem, jam preskaŭ monaton, de tempo de ilia reveno en Moskvon, faris rondirojn en regiono de Oktobra stacidomo, kun neimagebla pasio serĉante spurojn de la lasta seĝo, sendube kaŝanta en si brilantojn de *madam* Petuĥova.

Sulkiginte la frunton, Ipolit Matveeviĉ trafaretis la la-dajn platetojn. Dum duonjaro de la brilanta galopado li perdis siajn kutimojn.

Dum noktoj Ipolit Matveeviĉ sonĝis montajn krestojn, plibeligitajn per sovaĝaj reklamtabuloj, antaŭ liaj okuloj flugis Iznurenkov, tremetante per siaj brunaj femuroj, renversiĝis boatoj, dronis homoj, de ĉielo falis briko, kaj fendiginta tero eligis en la okulojn sulfuran fumon.

Ostap, kiu ĉiutage estis kuna kun Ipolit Matveeviĉ, rimarkis en li neniun ŝanĝon. Tamen Ipolit Matveeviĉ ŝanĝiĝis eksterordinare. Irmaniero de Ipolit Matveeviĉ estis jam ne tia, esprimo de la okuloj ekestis sovaĝa, kaj elkrekitaj lipharoj elstaris jam ne paralele al tera surfaco, sed preskaŭ perpendikle, kiel ĉe maljuna kato. Ipolit Matveeviĉ ŝanĝiĝis ankaŭ interne. En lia karaktero aperis trajtoj de decidemo kaj krueleco, kiuj antaŭe estis fremdaj al li. Tri okazaĵoj poiome edukis en li tiujn ĉi novajn sentojn: mirinda saviĝo de pezaj pugnoj de vasjukiaj ŝakŝatantoj, unua debuto de almozetado ĉe pĵatigorska “Florejo” kaj, fine, la tertremo, post kiu Ipolit Matveeviĉ iom difektiĝis, kaj eksentis kaŝan malamon al sia partnero.

Dum lasta tempo Ipolit Matveeviĉ estis posedata per tre fortaj suspektoj. Li timis ke Ostap dissekcos la seĝon mem kaj, preninte la trezorojn, forveturos, ĵetinte lin al sia sorto. Diri pri siaj suspektoj li ne kuraĝis, konante pezan manon de Ostap, kaj lian firman karakteron. Ĉiutage, sidante ĉe la fenestro kaj korektante per malnova breĉita razilo la sekiĝintajn literojn, Ipolit Matveeviĉ angoris. Ĉiutage li timis ke Ostap ne revenos plu kaj li, iama gvidanto de nobelaro, mortos pro malsato sub iu malseka moskva barilo.

Sed Ostap venis ĉiuvespere, kvankam ĝojajn novaĵojn li ne alportis. Liaj energio kaj ĝojo estis neelĉerpeblaj. Espero eĉ ne por minuto lasis lin.

En la koridoro ekaŭdiĝis piedfrapado, iu stumblis je la gardoŝranko, kaj la krucligna pordo vaste malfermiĝis kun facileco de paĝo, renversita per vento. Ĉe la pordo staris la granda kombinanto. Li estis tute malseka, liaj vangoj ruĝiĝis kiel pometoj. Li peze spiris.

– Ipolit Matveeviĉ! – kriis li. – Aŭskultu, Ipolit Matveeviĉ!

Vorobjaninov ekmiris. Ankoraŭ neniam la teknika direktoro nomis lin per liaj nomo kaj patronomo. Kaj subite li komprenis...

– Ĉu estas? – elspiris li.

– Ĝuste tiel, estas. Ho Kisa, diablo vin disŝiru!

– Ne krii, ĉio estas aŭdebla.

– Vere, vere, oni povas ekaŭdi, – flustris Ostap rapide. – Estas, Kisa, estas; kaj, se vi volas, mi povas demonstri ĝin tuj. Ĝi troviĝas en klubo de fervojistoj, en nova klubo... Hieraŭ okazis la malfermo... Kiel mi trovis ĝin? Ĉu simple? Tio estis neordinare malfacila afero! Genia kombinaĵo, brile plenumita! Antikve-greka aventuro!... Unuvorte, alta klaso!

Ne atendante kiam Ipolit Matveeviĉ surtiros la jakon, Ostap elkuris en la koridoron. Vorobjaninov aliĝis al li sur la ŝtuparo. Ili ambaŭ, ekscite superŝutante unu la alian per demandoj, impetis sur malsekaj stratoj al Kalanĉevskaja placo. Ili ne komprenis eĉ ke oni povas preni tramon.

– Vi estas vestita kiel ŝuisto! – ĝoje babilis Ostap. – Kiu vestiĝas tiel, Kisa? Al vi estas bezonataj amelitaj tolaĵoj, silkaj ŝtrumpetoj kaj, certe, cilindra ĉapelo. En via vizaĝo estas io nobla! Diru, ĉu vi vere estis gvidanto de nobelaro?

Montrante al la gvidanto la seĝon, kiu staris en ĉambro de ŝaka rondeto, kaj havis tute ordinaran hambosan aspekton, kvankam kaŝis en si neimageblajn riĉaĵojn, Ostap eltiris na Vorobjaninov en la koridoron. Ĉi tie estis neniu. Ostap venis al fenestro, ankoraŭ ne preparita al la vintro, kaj malfermis klinkojn de la ambaŭ klapoj.

– Tra tiu ĉi fenestreto, – diris li, – ni simple kaj tenere trafos la klubon en iun ajn horon de hodiaŭa nokto. Memoru, Kisa, – tria fenestro de la ĉefa enirejo.

La amikoj ankoraŭ longe vagadis en la klubo, aspektante sin reprezentantoj de la fervoja sindikato, kaj ne ĉesis miri pri la belegaj haloj kaj ĉambroj.

– Se en Vasjuki, – diris Ostap, – mi ludus sidante sur tia seĝo, mi malgajnus eĉ ne unu partion. Tamen ni iru, maljunuleto, ĉe mi estas rezervaj dudek kvin rubloj. Ni devas drinki bieron kaj ripozi antaŭ la nokta vizito. Ĉu biero ŝokas vin, gvidanto? Ne gravas. Morgaŭ vi lektrinkados ĉampanon en nelimigita kvanto.

Irante el la bierejo na Sivcev Vraĵek, Bender terure gajiĝis kaj incitetis preterirantojn. Li ĉirkaŭprenis iom ebriiĝintan Ipolit Matveeviĉ je la ŝultroj, kaj diris tenere:

– Vi estas ekstreme simpatia maljunuleto, Kisa, sed pli ol dek procentoj mi ne donos al vi. Je Dio, ne donos. Nu, por kio al vi tiom da mono?

– Kial por kio? Kial por kio? – bolis Ipolit Matveeviĉ.

Ostap sincere ridis kaj premiĝis per la vango al malseka maniko de sia amiko je koncesio.

– Ja kion vi aĉetos, Kisa? Kion? Ja vi havas neniun imagokapablon. Je Dio, dek kvin miloj estas por vi tute sufiĉaj... Ja post nelonge vi mortos, vi estas maljuneta. Vi tute ne bezonas monon... Ĉu vi scias, Kisa, mi, ŝajne, nenion donu al vi. Tio estas petolaĵo. Sed prenu mi vin al mi, Kisjo, estiel sekretarion. Kial ne? Kvardek rublojn monate. Nutraĵo mia. Kvar ripoztagoj... Ĉu? Profesia vesto, trinkmono, sociala asekuro... Ĉu taŭgas al vi la propono?

Ipolit Matveeviĉ elŝiris la manon kaj rapide foriris antaŭen. Tiuj ĉi ŝercoj furiozigis lin.

Ostap atingis na Vorobjaninov ĉe eniro en la rozkol-oran izoldometon.

– Ĉu vi vere ofendiĝis? – demandis Ostap. – Mi ŝercis. Viajn tri procentojn vi ricevus. Je Dio, tri procentoj sufiĉas al vi, Kisa.

Ipolit Matveeviĉ malserene eniris la ĉambron.

– Ĉu? Kisa, – petolis Ostap, – konsentu je tri procentoj! Je Dio, konsentu! Ĉiu alia konsentus. Aĉeti ĉambron vi ne bezonas, ĉar Ivanopulo forveturis na Tverj por la tuta jaro. Aŭ, malgraŭ ĉio, dungiĝu vi esti mia ĉambristo... Ĉarma loketo.

Vidinte ke na Ipolit Matveeviĉ oni povas influi jam per nenio, Ostap dolĉe oscedis, tiriĝis ĝis la plafono mem, pleniginte per aero sian vastan bruston, kaj diris:

– Nu, amiko, pretigu la poŝojn. En la klubon ni iru antaŭ la mateniĝo. Tio estas plej bona tempo. La gardistoj dormas kaj vidas dolĉajn sonĝojn, pro kio oni ofte maldungas ilin sen elira subvencio. Kaj dume, karuleto, mi konsilas al vi ripozi.

Ostap ekkuŝis sur tri seĝoj, kolektitaj el diversaj partoj de Moskvo kaj, endormante, diris:

– Aŭ je ĉambristo... Bona salajro, nutraĵo... trinkmono... Hej, mi ŝercis... La kunsido daŭriĝas! Glacio ek-moviĝis, sinjoroj ĵurianoj!

Tio estis lastaj vortoj de la granda kombinanto. Li ekdormis per senzorga dormo, profunda, refreŝiga kaj ne pezigita per sonĝoj.

Ipolit Matveeviĉ eliris sur la straton. Li estis plena per malespero kaj malico. La luno saltadis sur la nubaj buloj. Masekaj kradoj de izoldomoj grase brilis, gasaj lanternoj, ĉirkaŭigitaj per kronetoj da akva polvo, lumiĝis alarme. El bierejo “Aglo” oni elpuŝis ebriulon. La ebriulo ekkriaĉis.

Ipolit Matveeviĉ grimaciĝis, kaj firme ekiris reen. Ĉe li estis nur unu deziro: pe-i ĉion rapide.

Li eniris la ĉambron, severe rigardis dormantan Ostap, purigis vitrojn de la nazumo, kaj prenis de la fenestra breto la razilon. Sur ĝiaj breĉetoj videblis skvametoj de olea farbo. Li metis la razilon en la poŝon, kaj ankoraŭfoje pret-eriris na Ostap, ne rigardante lin sed aŭdante lian spiron, kaj okazis en la koridoro. Ĉi tie estis trankvile kaj dorme. Ĉiuj, ŝajne, jam enlitiĝis. Subite, en plena obskuro de la koridoro, Ipolit Matveeviĉ ekridetis plej sarkasme, kaj eksentis ke sur lia frunto moviĝas haŭto. Por kontroli tiun ĉi novan senton li denove ekridetis. Li rememoris subite, ke en la gimnazio lernanto Piĥteev-Kakujev scipovis movi la orelojn.

Ipolit Matveeviĉ venis ĝis la ŝtuparo kaj atente aŭskultis. Sur la ŝtuparo estis neniu. De la strato aŭdiĝis huffera frapado de fiakrista ĉevalo, speciale laŭta kaj klara, kvazaŭ oni kalkulis per abako. La gvidanto per kataj paŝoj revenis en la ĉambron, prenis el jako de Ostap, pendanta sur la seĝo, dudek kvin rublojn kaj plattenajlon, surkapigis la malpuran admiralan kaskedon, kaj denove aŭskultis.

Ostap dormis mallaŭte, ne siblante. Liaj naz-faringo kaj pulmoj funkciis ideale, bonorde en- kaj el-spirante aeron. Lia fortega mano pendis ĝis la planko mem. Ipolit Matveeviĉ, sentante sekundajn frapojn de la tempia pulso, nehaste suprentiris sian dekstran manikon ĝis post la kubuto, volvis sian nudiĝintan antaŭbrakon per viŝtuko, deiris al la pordo, prenis el la poŝo la razilon kaj, mezurinte per la okuloj la enĉambrajn distancojn, turnis la ŝaltilon. La lumo estingiĝis, sed la ĉambro okazis iom lumigita per bluetakvaria lumo de strata lanterno.

– Des pli bone, – flustris Ipolit Matveeviĉ.

Li proksimiĝis al la dormanto kaj, malproksimen demovante la manon kun la razilo, plenforte, oblikve enigis la tutan tranĉ-randon en gorĝon de Ostap, tuj eltiris la razilon kaj desaltis al la muro. La granda kombinanto eligis sonon, kiun faras kuireja lavabo, ensuĉanta restaĵojn de la akvo. Ipolit Matveeviĉ ŝukcesis ne malpuriĝi per la sango. Fronte per la jako la brikan muron li ŝtelire venis al la blua pordo, kaj dum sekundo denove rigardis na Ostap. Ties korpo dufoje arke fleksiĝis, kaj falis al dorsetoj de la seĝoj. La strata lumo flosis sur nigra flako, kiu estiĝis sur la planko. «Kiu flako estas tio?» – pensis Ipolit Matveeviĉ. – «Jes, jes, sango... Kamarado Bender mortis».

Vorobjaninov devolvis iom malpurigitan viŝtukon, forĵetis ĝin, poste li singarde metis la razilon sur la plankon, kaj foriris, mallaŭte ferminte la pordon.

Okazinte sur la strato Ipolit Matveeviĉ sulkigis la frunton kaj, murmurante: «Ne nur ses procentoj, sed ĉiuj brilantoj estos miaj», ekiris al Kalanĉevskaja placo.

Ĉe tria fenestro de ĉefa enirejo de la fervojista klubo Ipolit Matveeviĉ haltis. Spegulaj fenestroj de la nova konstruaĵo perlamote griziĝis en lumo de la proksimiĝanta tago. En la humida aero aŭdiĝis obtuzaj voĉoj de ranĝaj vaporlokomotivoj. Ipolit Matveeviĉ lerte surgrimpis la kornicon, puŝis la klapon, kaj senbrue ensaltis la koridoron.

Facile orientiĝante en grizaj antaŭmateniĝaj haloj de la klubo, Ipolit Matveeviĉ enpenetris la ŝakan ĉambron kaj, tuŝinte per la kapo portreton de Emanuel Lasker, pendantan sur la muro, venis al la seĝo. Li ne hastis.

Li ne havis kien hasti. Lin postkuris neniu. Grandmajstro O. Bender dormis per eterna dormo en rozkolora izoldomo sur Sivcev Vraĵek.

Ipolit Matveeviĉ eksidis sur la plankon, ĉirkaŭigis la seĝon per siaj tendenecaj kruroj kaj, kun malvarmsangeco de dentkuracisto, komencis eltiri el la seĝo la kuprajn najlojn, preterlasante neniun el ili. Post sesdek-dua najlo lia laboro pe-iĝis. La angla katuno kaj la bast-mateto libere kuŝis sur sidaĵo de la seĝo.

Restis nur levi ilin por ekvidi ujojn, ujetojn kaj skatoletojn, plenajn per valoregaj ŝtonoj.

«Tuj al aŭto», – pensis Ipolit Matveeviĉ, lerninta vivsaĝecon en lernejo de la granda kombinanto, – «en stacidomon. Kaj al pola limo. Per iu ŝtoneto oni transkondukos min sur alian flankon, kaj tie...»

Dezirante tuj vidi kio estos “tie”, Ipolit Matveeviĉ deŝiris de la seĝo la katunon kaj la bast-mateton. Antaŭ liaj okuloj aperis risortoj, bonegaj anglaj risortoj, kaj remburajo, perfekta remburajo de ĝismilita kvalito. Tiun oni povas nun trovi nenie. Sed la seĝo enhavis nenion alian. Ipolit Matveeviĉ aŭtomate dismovis la remburajon, kaj plenan duonhoron sidis ne lasante la seĝon el la kroĉaj kruroj, stulte ripetante:

– Kial ĉi tie estas nenio? Tio ne povas esti! Tio ne povas esti!

Estis jam preskaŭ lume kiam Vorobjaninov, rimarkita per neniuj, lasinte ĉion en la ŝaka ĉambro samstate, forgesinte tie la plattenajlon kaj la kaskedon kun ora signo de neekzistanta jakta klubo, peze kaj lace elgrimpis tra la fenestro sur la straton.

– Tio ne povas esti, – ripetis li, forirante je unu kvartalo. – Tio ne povas esti!

Kaj li revenis al la klubo, kaj komencis promeni preter ĝiaj grandaj fenestroj, movante la lipojn:

– Tio ne povas esti! Tio ne povas esti! Tio ne povas esti.

Iam li kriis kaj kaptis la kapon, malsekan pro la matena nebulo. Rememorante ĉiujn okazaĵojn de la nokto li skuis la grizajn vilaĵojn. La brilanta ekscitiĝo okazis rimedo tro forta: li kadukiĝis dum kvin minutoj.

– Iradas ĉi tie iuj ajn, – aŭdis Vorobjaninov super sia orelo.

Li ekvidis gardiston en krudtola profesia vesto, kaj en malbone varmantaj botoj. La gardisto estis tre maljuna kaj, ŝajne, bonkora.

– Iradas kaj iradas, – komunikeme parolis la maljunulo, al kiu tedis la nokta soleco, – kaj ankaŭ vi, kamarado, interesiĝas. Kaj vere. Klubo nia, oni povas diri, estas nekutima.

Ipolit Matveeviĉ sufere rigardis la ruĝvangan maljunulon.

– Jes, – diris la maljunulo, – nekutima ĝi estas tiu ĉi klubo. Nenie estas iu simila.

– Sed kio nekutima estas en ĝi? – demandis Ipolit Matveeviĉ, kunigante la pensojn.

La maljunuleto ĝoje rigardis na Vorobjaninov. Ŝajnis ke rakonto pri la nekutima klubo plaĉas al li, kaj li ŝatas ripeti ĝin.

– Do jen kio, – komencis la maljunulo, – mi estas gardisto ĉi tie jam dekan jaron, sed nenio simila okazis. Vi aŭskultu, soldateto. Staris ĉi tie klubo, estas sciate kiu, de unua sekcio de tira servo. Kaj mi gardis ĝin. Sentaŭga klubo estis tio... Oni hejtis ĝin, hejtis, sed nenion povis fari. Kaj kamarado Krasilnikov atakas min: «Kien ja foriras ĉe vi la hejtligno?». Sed ĉu mi manĝas ĝin, tiun ĉi lignon? Turmentiĝis kamarado Krasilnikov pri tiu ĉi klubo: tie – hu-

mideco, ĉi tie – malvarmo, por la blovorkestra rondeto for-estas ejo, kaj ludi teatron estis plena turmento: malvarme estis al sinjoroj aktoroj. Kvin jaroj oni petis krediton por nova klubo, sed mi ne scias kio rezultis de tio. Fervojista sindikato ne konfirmis la krediton. Tamen printempe kama-rado Krasilnikov aĉetis seĝon por la scenejo, bonan seĝon, molan...

Ipolit Matveeviĉ aŭskultis, premiĝinte tutkorpe al la gardisto. Li estis duonsvena. Kaj la maljunulo, ĝoje ride-gante, rakontis kiel li surgrimpis foje tiun ĉi seĝon por el-ŝraŭbi la elektran lampon, sed deruliĝis.

– Deglitis mi de tiu ĉi seĝo, la tegaĵo sur ĝi disŝiriĝis. Kaj vidas mi: el sub la tegaĵo vitrajetoj ŝutiĝas, kaj ĉirkaŭk-olaĵoj blankaj sur fadeneto.

– Ĉirkaŭkolaĵoj, – diris Ipolit Matveeviĉ.

– Ĉirkaŭkolaĵoj! – eljelpis la maljunulo rave. – Kaj ri-gardas mi, soldateto, pluen, kaj tie estas skatoletoj diver-saj. Tiujn ĉi skatoletojn mi eĉ ne tuŝis. Sed iris mi rekte al kamarado Krasilnikov kaj raportis. Tiel mi poste raportis al la komizio. Ne tuŝis mi tiujn ĉi skatoletojn kaj ne tuŝis. Kaj bone mi, soldateto, faris, ĉar tie troviĝis valoraĵoj, kaŝitaj per burĝaro...

– Sed kie ili estas, la valoraĵoj? – kriis la gvidanto.

– Kie, kie, – moke ripetis la maljunulo, – ĉi tie, soldateto, oni devas komprenon havi. Jen ili estas!

– Kie? Kie?

– Ĉi tie! – kriis la ruĝvanga gardisto, ĝojante pri la okazigita efeto. – Jen ili estas! Purigu la okulvitrojn! Klubon oni konstruis per ili, soldateto! Ĉu vi vidas? Jen ĝi estas, la klubo! Hejtado per varma akvo, damludoj kun hor-loĝoj, bufedejo, teatro, en galoŝoj ne eniru!..

Ipolit Matveeviĉ glaciigis kaj, restante sur la loko, movis la rigardon sur la kornicojn.

Do jen kie ĝi estas, trezoro de *madam* Pjetuĥova! Jen ĝi estas! Tuta! Ĉiuj cent kvindek mil rubloj nul nul kopekoj, kiel ŝatis diri Ostap-Sulejman-Berta-Maria Bender.

La brilantoj transformiĝis en seninterrompajn fasadajn vitrojn kaj ferbetonajn plafonojn, la malvarmetaj gimnastikaj haloj estis faritaj el la perloj. La brilanta diademo transformiĝis en teatran halon kun turnebla scenejo, orelingoj kun rubenoj diskreskis je plenaj lustroj, la oraj serpentaj manringoj kun smeraldoj iĝis belega biblioteko, kaj la kolerio transformiĝis en infanvartejon, glisil-farejon, ŝakan kaj bilardan ĉambrojn.

La trezoro restis, ĝi estis konservita kaj eĉ pligrandigis. Ĝin oni povis tuŝi per la manoj, sed ne povis forporti. Ĝi transiris servi al aliaj homoj.

Ipolit Matveeviĉ tuŝis per la manoj la granitan tegaĵon. Malvarmo de la ŝtono transiris en lian koron mem.

Kaj li ekkriis.

La krio, freneza, pasia, sovaĝa, – krio de trapafita vulpino, elflugis sur mezon de la placo, ĵetiĝis sub la ponton kaj, forpelata de ĉie per sonoj de la vekiganta granda urbo, komencis obtuziĝi, kaj post minuto velkis. Bonega aŭtuna mateno forruliĝis de malsekaj tegmentoj sur stratojn de Moskvo. La urbo ekiris en sian ĉiutagan marŝadon.

DE LA TRADUKINTO

Ostap Bender mortis... Sed ne ploreĝu, kara leganto. Ĉu vi scipovas gardi sekretojn? Bone. Do: Ostap vivas. Jes. Lia sorto okazis sama al tiu de Ŝerlok Holms (Sherlock Holmes): la aŭtoroj pentis pri sia ne sufiĉe pripensita ago, kaj en dua sia romano "Ora bovido" la granda kombianto denove estas gaja, energia kaj entreprenema: «...Antaŭ li (Balaganov) sidis atleto kun preciza, kvazaŭ stampita sur monero vizaĝo. La sunbrunan gorĝon tranĉis rompebla blanka cikatro. La okuloj brilis per minaca ĝojo...».

Kaj nun, se vi ne kontraŭas, ni parolu iomete pri nia lingvo.

Ĉi tie la tradukinto prezentas al juĝo de la publiko la proponaĵojn kiuj, li esperas, neniel kontraŭas Fundamenton kaj animon de Esperanto:

PREFIKSO PE-

– Kio komuna estas inter tiuj ĉi kunmetaĵoj?

el-lernis,
fin-konstruis,
tra-legis,
re-saniĝis,
for-glutis,
sat-manĝis?

Ili ĉiuj celas montri kompletan plenumon de la ago.

Plena Analiza Gramatiko (PAG, §109) nomas tiun ĉi gramatikaĵon "fina aspekto", kaj bedaŭras ke «...en Esp-o ĝi ne havas apartan esprimilon».

Sed oni bezonas ĝin, tiun ĉi esprimilon, kaj sufiĉe ofte uzas tiucele prefikson fin- (fin-skribis). Sed ĉefa tasko de

prefikso fin- estas indiki ĈESON de la ago. Kion do signifas vorto “fin-kuracis”, vivon aŭ morton?

Por indiki finan aspekton ne naci-, sed esperant-maniere ni uzas ĉi tie prefikson “pe-” (plenumis):

Prefikso pe- indikas do kompletan plenumon de la ago:

pe-lernis,
pe-kreskis,
pe-konstruis,
pe-legis,
pe-saniĝis
pe-kuracis,
pe-glutis,
pe-manĝis,
pe-ad-as,
pe-us,
ek-pe-is...

PREPOZICIO NA

Prepozicion na proponis G. F. Makkink (Rigardu ties libron “Nia Fundamento sub lupeo”).

Prepozicio na utilas por

1. indiki akuzativon de ne-esperantigitaj vortoj:

Ĉu vi konas na Bernard Ŝou (Shaw)?

Ĉu vi legis na “Pigmalion (Pygmalion)”?

Ĉu vi spektis na “My Fair Lady”?

En kiu romano oni renkontas na Fawzi Kabir? (“The haj” far Leon Uris).

2. Indiki direkton: (Iras Parizon; Iras na Voroneĝ.)

PRI VORTO LA

(Laŭ ideoj de s-ro G. F. Makkink.)

Vorto la plibeligas nian lingvon. Ju pli ofte ni uzas ĝin des pli bele sonas nia lingvaĵo. Ĉu jes? Ne!

Vorto la ne estas facilanima sonorileto. Tio estas grava gramatika instrumento.

Frazo “Ĝis la revido” akiras sencon de konkreco nur kontraste al nekonkreto “Ĝis revido”.

Frazo “La leono estas malsana” akiras sencon de konkreco nur kontraste al Zamenhofa “Leono (= ĝenerale, iu ajn, ĉiu) estas besto”.

Senbrida la-la-ismo ege malfaciligas priskribi uzon de vorto LA. Ĉu vi volas esti gvidata, ekzemple, per kvindeko da la-reguloj? Bonvolu. Mi spektis ilin en tiu ĉi interretaĵo: < <http://www.bertilow.com/pmeg/gramatiko/difiniloj/la>>.

(Libroforme ĝi nomighas PMEG).

Jen KVARO da reguloj kiujn la tradukinto uzis ene de tiuj ĉi tradukaĵoj:

Vorto la estu uzata:

- 1) por prezenti sencon de vortoj **tiu, tiu ĉi**.

Ekzemploj el Fundamenta Ekzercaro (F.E.):

§9. **La knabo (= tiu ĉi) forpelis la birdojn (= tiujn ĉi).**

- 2) por prezenti sencon de posedaj pronomoj: mia, via... ktp: F.E. §8. **Diru al la patro (= mia) ke mi estas diligenta.**

- 3) Por prezenti ellasaĵo(j)n:

F.E. §10. **El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna (= infano).**

F.E. §12. Hodiaŭ estas la dudek sepa (= tago) de Marto.

PAG, §77. Ludoviko la dekkvara; Frederiko la granda (= kromnomo de kiu estas...).

4) Ni penu eviti uzadon de konkretiga vorto la (konkreta = tiu, tiu ĉi, mia, via...) se la konkreteco estas memevidenta:

F.E. §22. En (la) lingvo "Esperanto" ni vidas (la) es-tontan lingvon de (la) tuta mondo.

ENHAVO

Parto unua. Stargoroda leono

Ĉapitro 1. Bezenĉuk kaj "Nimfoj"	51.
Ĉapitro 2. Morto de madam Petuĥova.....	12.
Ĉapitro 3. Parabolo de pekulo	13.
Ĉapitro 4. Muzo de malproksimaj vojaĝoj.....	17.
Ĉapitro 5. La granda kombinanto.....	21.
Ĉapitro 6 Brilanta fumo.....	27.
Ĉapitro 7. Spuroj de "Titanik"	31.
Ĉapitro 8. Blua ŝtelisteto.....	34.
Ĉapitro 9. Sed kie estas viaj bukloj?.....	43.
Ĉapitro 10. Seruristo, papago kaj divenistino.....	48.
Ĉapitro 11. Alfabetumo "Spegulo de vivo"	56.
Ĉapitro 12. Pasia virino – revo de poeto.....	65.
Ĉapitro 13. Spiru profunde: vi estas emociigita.....	73.
Ĉapitro 14. "Alianco de glavo kaj plugilo"	84.

Parto dua. En Moskvo

Ĉapitro 15. En oceano da seĝoj	94.
Ĉapitro 16. Komunloĝejo je nomo de monaĥo Bertold Ŝvarc	95.
Ĉapitro 17. Estimuj matracojn, civitanojn	100.
Ĉapitro 18. Muzeo de mebloj	105.
Ĉapitro 19. Eŭrop-stila balotado	112.
Ĉapitro 20. De Sevilo ĝis Granado	119.
Ĉapitro 21. Punado	127.
Ĉapitro 22. Kanibalino Eloĉka	135.
Ĉapitro 23. Avesalom Vladimiroviĉ Iznurenkov	142.
Ĉapitro 24. Klubo de aŭtoŝatantoj	149.
Ĉapitro 25. Konversacio kun nuda inĝeniero	155.
Ĉapitro 26. Du vizitoj	160.
Ĉapitro 27. Mirinda prizono korbo	164.
Ĉapitro 28. Kokinetoj kaj pacifika koketo	170.
Ĉapitro 29. Aŭtoro de "Gavriliado"	176.
Ĉapitro 30. En teatro "Kolumbo"	181.

Parto tria. Trezoroj de madam Petuĥova

Ĉapitro 31. Sorĉa nokto sur rivero Volgo	190.
Ĉapitro 32. La malpura paro	196.
Ĉapitro 33. Forpelo el la paradizo	201.
Ĉapitro 34. Interplaneda ŝaka kongreso	205.
Ĉapitro 35. Kaj aliaj	216.
Ĉapitro 36. Pejzaĝo de malaĥita flako	220.
Ĉapitro 37. Verda Kabo	226.
Ĉapitro 38. Sub nuboj	233.
Ĉapitro 39. Tertremo	238.
Ĉapitro 40. La trezoro	248.
De la tradukinto	255.